

Nia Hejmo

De la Spirito Andreo Ludoviko
Francisco Cândido Xavier

La Vivo en la Spirita Mondo

feb

NIA HEJMO

(Mediuma verko)

Francisco Cândido Xavier

N I A H E J M O

Kiam servanto estas preta, aperas
tasko — ANDREO LUDOVIKO.

El la portugala lingva tradukis

L. C. Porto Carreiro Neto

Laŭ la 7^a eldono

1959



Eldonfako de Brazila Spiritisma Federacio
DEPARTAMENTO EDITORIAL E GRÁFICO
Rua Souza Valente, 17 — 20941 - 040
Rio de Janeiro, RJ — *BRAZIL*O

Composto e impresso
nas oficinas da
— FEDERAÇÃO —

23-RF; 3.066-L; 959

Tabelo de la enhavo

	<i>Paĝo</i>
<i>Prezento</i>	7
<i>Nova amiko</i>	11
<i>Mesaĝo de Andreo Ludoviko</i>	15
I. En la malsuperaj regionoj.....	17
II. Klarencio.....	20
III. Kolektiva preĝo.....	24
IV. La spirita kuracisto.....	28
V. Kuraca helpo.....	32
VI. Altvalora admono.....	36
VII. Klarigoj de Lizio.....	40
VIII. Organizado de servoj.....	44
XIX. Problemo de nutrado.....	48
X. En la arbaro de la akvoj.....	52
XI. Informoj pri la organizado.....	56
XII. La Ombrejo.....	60
XIII. En la kabineto de la ministro.....	64
XIV. Klarigoj de Klarencio.....	69
XV. La vizito de mia patrino.....	73
XVI. Korelverŝoj.....	77
XVII. En la hejmo de Lizio.....	81
XVIII. Amo, nutraĵo de la animoj.....	85
XIX. La elkarniĝinta junulino.....	89
XX. Kio estas hejmo.....	94
XXI. La konversacio daŭras plu.....	98
XXII. La kuponhoro.....	102
XXIII. Scii aŭdi.....	107
XXIV. Impresa alvoko.....	111
XXV. Bonkora konsilo.....	115
XXVI. Novaj perspektivoj.....	119

XXVII.	Fine laboro.....	123
XXVIII.	En servado	128
XXIX.	La vizio de Francisko	132
XXX.	Heredo kaj eŭtanazio	136
XXXI.	Vampiro.....	141
XXXII.	Sciigoj pri Veneranda.....	146
XXXIII.	Kuriozaj rimarkoj	150
XXXIV.	Kun la ĵusvenintoj de la Ombrejo.....	154
XXXV.	Eksterordinara rekontiĝo	158
XXXVI.	La sonĝo	163
XXXVII.	La lekcio de la ministrino	168
XXXVIII.	La afero de Tobija	174
XXXIX.	Konsiliĝo kun sinjorino Laŭra.....	180
XL.	Kiu semas, tiu rikoltas	184
XLI.	Kunvoko al batalado.....	189
XLII.	La parolo de la guberniestro	194
XLIII.	Interparoloj	199
XLIV.	La Mallumo	203
XLV.	Sur la Kampo de Muziko.....	208
XLVI.	Sinofero de virino.....	213
XLVII.	La reenkarniĝo de Laŭra.....	218
XLVIII.	Familia kulto	223
XLIX.	Reveno hejmen.....	228
L.	Civitano de “Nia Hejmo”	233

Prezento

Jen, estimataj, mi ankoraŭ unu fojon prezentas min al vi kun la traduko de alia verko pri transtombaj aferoj.

Legu ĝin kun bonvola koro. Legu ĝin kvazaŭ libron de la Naturo mem, kun tiu evangelia simpleco, kiu kondukas al la “regno de la ĉielo”, sen antaŭjuĝoj, signoj de ridinda kaj pereiga vantamo.

Vi ja scias, ke la vero ne malofte estas neverŝajna. La Tero aspektas senmova, tamen ĝi turniĝas kaj senhalte traflugas la Spacon. La “atomon”, laŭ la etimologio, oni rigardis kiel la lastan eron de la materio, sed hodiaŭ — nu, mi ne bezonas pri ĝi doni al vi lecionon... “Mortintoj”, t.e. “elfiniĝintoj”, oni konsideris, kaj ankoraŭ hodiaŭ kelkaj konsideras, tiujn, kies korpo rigidiĝis sub la potenca mano de la tiel nomata “morto”: oni do forgesas la ordinaran komunikigon de tiuj estuloj kun la teranoj, rakontatan en la Biblio kaj aliaj verkoj; kaj la pli ol centjara Spiritisma Doktrino, sin bazanta ĝuste sur tia komunikigado, firme paŝas kiel la konsolanto promesita de nia Majstro Jesuo.

Sincere parolante, mi ne komprenas, kiel iu povas nei tiujn realajn faktojn aŭ almenaŭ ilin klarigi alie, ol kiel la Spiritismo ilin pravas. Mi volonte aŭdus la opinion de iu kiu klarigus, ekzemple, kiel homo sen literaturaj aŭ iaj aliaj kapabloj, ricevitaĵ per kulturo, jam ĝis hodiaŭ publikigis pli ol kvindek multepaĝajn verkojn pri la plej diversaj temoj de la homa kampo, eĉ fakaj: tia homo estas Francisco Cândido Xavier, tiu sama mediumo (konsentu pri la vorto!), per kiu estis al ni donita la romano, kiun ankaŭ mi esperantigis kaj la Brazila Spiritisma Federacio eldonis, nome “Antaŭ du mil jaroj...”, de alia Spirito, Emmanuel. “Nia Hejmo”, kiun vi havas en la manoj, estas la unua el serio

da dek verkoj de unu sama Spirito, *Andreo Ludoviko*. Tiuj libroj de *Andreo Ludoviko* vekis grandan intereson ĉe brazilaj medicinistoj, kaj sendube montras la sciencan signifon de la *mediuma literaturo*.

Al *ne-spiritistoj*, same ankaŭ al *spiritistoj*, ĉi tiu verko kvazaŭ ofendas la konvinkojn: ĝi estas ja io eksterordinara, neniam eksciita!

Ne-spiritistojn, laŭŝajne, ĝi ne interesas; ili ĝin ne legos, aŭ ĝin legos por distriĝo, en ia senokupa horo... Eĉ tiel, mi asertas, ĝi portus al ili grandan profiton, ĉar ĝi estus invito al fieruloj, ian unu fojon pensi pli serioze pri la vivo. *Spiritistojn* ĝi miregigas, ĉar tian tro materialan mondon, ekster la materiala elaçeta planedo, ili verŝajne neniam antaŭe imagis al si, kontraŭe: en la mondo de “*Spiritoj*” ia malsubtila materio, simila al la surtera, estus neimagebla kaj nekomprenbla. Tiel tamen estas... “*Nia Hejmo*” aperas antaŭ vi kun siaj pejzaĝoj, bestoj kaj floroj, domoj kaj mebloj, manĝoj kaj trinkoj, hospitaloj, veturiloj, televidiloj, muzikado,... eĉ gefianĉoj...

Kiu nome estas “*Andreo Ludoviko*” (portugallingve “*Andre Luiz*”)? Oni scias nur, ke li estis brazila kuracisto, sed lian veran nomon neniu scias. Kial do li tiel sin kaŝas? “*Nomoj*”, kiel ni *spiritistoj* lernas, nenio grava estas sur ĉi tiu kampo; eĉ *Spiritoj*, neniam migrintaj sur la Tero, povas veni kaj paroli al ni. Ili estas do por ni tute fremdaj: ili diras ian ajn nomon, por iel kontentigi nian naŭvan sci-volemon...

Andreo Ludoviko trovis pli bone sin ne rekonigi antaŭ ni: ĉu neprave? Ĉu li timis, kaj ankoraŭ timas, la homan klaĉadon, ke li, certe siatempa klerulo, nun parolas “*sensenc-aĵojn*”?

La demando havas du aspektojn: aŭ oni ne kredas tiajn “*fantaziaĵojn*”, kaj tiam “*sencerba*” estas la *mediumo*; aŭ oni estas certa pri tiuj veraĵoj, kaj nomo estas indiferenta. Sed, ankoraŭ en ĉi tiu okazo, oni povus rediri, ke, sciante la “*fonton*”, oni pli volonte legus la verkon kaj pli facile ensorbus ĝian elŝprucantan akvon. Mi ne estas tiel stulta, ke mi tion neus: verkojn de *Zamenhof*, ekzemple, ni legas — aŭ devas legi — kiel modelon de lingvo, kaj sekve ili superstaras ĉiujn ceterajn. Sed, kiam la demando estas temo

doktrina pri “superteraj” aferoj, tiam la “persono” mem perdas ĉian gravecon, ĉar cetere tiuj voĉoj esprimas ĉiuj unu solan penson, strebas al unu sola celo, estas senditoj de la Unu Sola.

Eĉ rilate al plej materialaj aferoj oni enkomune ne zorgas pri nomoj. Kiom da homoj scias, kiu elpensis la presarton, la elektran lampon, la radiotelegrafion, la aviadilojn; aŭ kiu eltrovis la asepson, la graviton, eĉ ... Amerikon? En nia ordinara vivo ni eĉ tute ne pensas, kia mano jetis en la teron la semon de la manĝota greno ... La nomo mem “Dio” estas nenio alia, ol konvencio interhoma — ĉar ia nomo estas por ni nepre necesa...

Ĉion ni estimu laŭ ĝia valoro vera, ne ŝajna. Ĉi tiu verko, miaj karaj, estas ja io vere valora; ĝi valoras vian tempon, vian atenton, eĉ vian vivon mem.

Denove, kiel mi ĝin faris en la antaŭaj verkoj, mi ĉi tie esprimas al nia tre estimata Ismael Gomes Braga, Direktoro de la Departamento de Esperanto de la Brazila Spiritisma Federacio, mian plej koran dankon por lia netaksebla helpo en la tradukado de ĉi tiuj paĝoj el la Transaj Regionoj.

Porto Carreiro Neto

Nova amiko

Antaŭparoloj ordinare prezentas aŭtorojn, glorante iliajn meritojn kaj teksante konsideradojn pri ilia persono. Ĉi tie okazas alie: vane miaj enkarnaj amikoj elserĉus ian kuraciston “Andreo Ludoviko” en la konvencijaj nomaroj.

Anonimeco iafoje naskiĝas el la ĝusta kompreno kaj el la vera amo. Por la pagado de kulpa pasinteco, aliĝas ĉe la reenkarriĝo la ordinare uzataj nomoj. Fariĝas kelkatempa forgeso, kiel beno de la Dia Favorkoreco.

Ankaŭ Andreo Ludoviko devis tiri la kurtenon antaŭ sin. Tial mi ne povas prezenti la iaman surteran kuraciston kaj aŭtoron-homon, sed nur la novan amikon kaj fraton en la Eterno.

Por alporti altvalorajn impresojn al la teraj kunuloj, li devis formeti de si ĉiajn konvenciojn, inkluzive sian propran nomon mem, por ne vundi amatajn korojn, ankoraŭ envolvitajn en la malnovaj manteloj de la iluzio. Kiuj rikoltas la jam maturajn spikojn, tiuj ne ofendu la homojn nur nun plantantajn, nek malhelpu la verdan kreskaĵaron, ankoraŭ en florado.

Ni ja konfesas, ke ĉi tiu libro ne estas unika: aliaj Estuloj jam pritraktis la transtombajn vivokondiĉojn... Ni tamen jam longe deziris en nian spiritan Rondon enkonduki iun, kiu povus konigi al aliaj la valoron de sia propra sperto, kun ĉiuj detaloj taŭgaj por la perfekta kompreno de la ordo, sub kiu agadas la laboremaj kaj bonintencaj elkarniĝintoj en la sferoj neatingeblaj por la homa rigardo, kvankam streĉe ligitaj kun via planedo.

Multaj amikoj certe ridetos ĉe iuj lokoj de ĉi tiu

rakonto. Kio esta neordinara, tio en ĉiuj tempoj mi-regigas. Kiu ja, sur la Tero, antaŭ kelke da jaroj ne ridetus, se iu parolus al li pri aviado, elektro, radiofonio?

Surpriziĝo, konfuzo kaj dubo estas sentoj de ĉiuj lernantoj, kiuj ankoraŭ ne trapasis la koncernan lecionon. Tio estas tute natura, tute pravigebla. Ni do nenian vorton dirus pri aliula impresio: ĉiu leganto devas mem analizi tion, kion li legas.

Ni tial ĉi tie parolas sole nur pri la esenca celo de ĉi tiu verko.

Spiritismo nun gajnas rimarkindan nombran gravecon. Miloj da homoj interesiĝas pri ĝiaj laboroj, aspektoj, eksperimentoj. Tamen, sur ĉi tiu vastega kampo de novaĵoj, la homo ne devas malzorgi sin mem.

Ne sufiĉas esplori fenomenojn, buŝe aliĝi al la movado, plinombri la nomaron de adeptoj, instrui aliajn pri la Doktrino, sin doni al prozelitismo kaj konkerti favorojn de la publika opinio, kiel ajn respektinda ĉi tiu estas. Nepre necesa al ĉiu estas zorgi pri la konado de siaj grandegaj kapabloj kaj ilin uzi en la laboroj de la Bono.

La terano ne estas ia senhavulo: li estas de Dio filo, vestita per karno, en konstrua laborado; lernanto en altvalora instruejo, kie li devas lerni altiĝi. La homa batalado estas lia oportuno, laborilo, libro.

La interrilatoj kun la nevidebla mondo estas sankta movado, aganta por la restarigo de la Kristanismo pura; neniuj homoj tamen malzorgu siajn proprajn bezonojn tie, kie li staras laŭ la volo de la Sinjoro.

Andreo Ludoviko ĉi tie sciigas vin, kara leganto, ke la plej granda surprizo, kiun faras al ni la karna morto, estas tio, ke ĝi starigas nin vizaĝo kontraŭ vizaĝo antaŭ nia propra konscienco, kie ni konstruas ĉielon, haltadas en purgatorio aŭ falas en inferan abismon; li memorigas, ke la Tero estas sankta laborejo, kaj neniuj ajn ĝin malŝatas, ne eksciantes la koston de la terura eraro, en kiun li kondukis sian koron mem.

Konservu al vi en la libro de via animo lian sperton. Ĉi tiu tre klare diras, ke al la homo ne sufiĉas alkroĉiĝi

al la pure homa ekzistado, sed li devas ĝin digne uzadi; ke la paŝoj de la kristano, en ĉia ajn religia kultejo, devas vere direktiĝi al la Kristo, kaj ke, sur nia doktrina kampo, ni ja bezonas Spiritismon kaj Spiritualismon, sed, multe pli multe, Spiritecon.

EMMANUEL (*)

Pedro Leopoldo, la 3-an de Oktobro 1943.

(*) La Gvidanto de la mediuo. — *La Trad.*

MESAĜO DE ANDREO LUDOVIKO

La vivo ne ĉesas. La vivo estas fonto eterna, kaj la morto estas la malluma ludo de la iluzioj.

La granda rivero iras sian vojon, antaŭ ol atingi la vastan maron. Kopiane ĝian konduton, ankaŭ la animo trapasas diversajn vojojn kaj plurajn stadiojn, ĉi tie kaj tie ricevas alfluojn da scioj, prenas ĉiam pli difinitan karakteron kaj rafinas sian estecon, antaŭ ol trafi la Eternan Oceanon de la Saĝo.

Fermi la karnajn okulojn estas tre simpla ago. Ŝanĝi sian fizikan vestaĵon ne solvas la fundamentan problemon de la mensklarigo, tiel same kiel la ŝanĝo de vestaĵoj havas nenion komunan kun la profundaj demandoj pri la esto kaj destino.

Ho vojoj de la animoj, misteraj vojoj de la koro! Estas necese paŝadi sur vi, antaŭ ol provi alpaŝi al la superega ekvacio de la Vivo Eterna! Estas neformeteble vian dramon travivi, koni vin detalo post detalo, en la longa proceso de la spirita perfektigado! Tro infanece estus pensi, ke la sola "malleviĝo de la kurteno" solvus transcendantajn demandojn de la Senfino.

Ekzistado estas akto.

Korpo — vestaĵo.

Jarcento — tago.

Servo — sperto.

Venko — akiraĵo.

Morto — renoviga blovo.

Kiom da ekzistadoj, da korpoj, da jarcentoj, da servoj, da venkoj, da mortoj ni ankoraŭ bezonos?

Kaj la instruito pri religia filozofio parolas pri iaj finaj decidoj kaj definitivaj pozicioj!

Ho ve! Ĉie la kleraj pri doktrino kaj la neniosciantaj pri la spirito!

Multe da peno devas fari la homo, por eniri en la lernejon de la Evangelio de la Kristo, eniro preskaŭ ĉiam okazanta en stranga maniero: li sola, apud la Majstro, sekvante la malfacilan kurson, ricevante lecionojn sen videblaj katedroj, aŭdante longajn disertaciojn sen propre eldiritaj vortoj.

Tre longa do nia laborplena migrado.

Mia ja ne multe dononta klopodo celas nur almenaŭ iomete konigi tiun fundamentan veraĵon.

Dankon do, miaj amikoj!

Mi aperas inter vi sub anonimeco, kiun diktas la frata karito. La homa ekzistado prezentas vazojn plejparte malfortikajn, ankoraŭ ne povantajn enteni la tutan veron. Cetere nun ne interesus nin io alia, ol la profunda sperto kun siaj kolektivaj valoroj. Mi neniun turmentos per la ideo de la Eterno: antaŭ ĉio la vazoj fariĝu pli fortikaj. Mi donas nur iajn kelkajn informojn al la soifanta spirito de miaj fratoj sur la vojo de la spirita laborado, homoj komprenantaj, ke “la Spirito blovas, kie li volas”^().*

Kaj nun, amikoj, mia danko restu sur la papero, retirigante en la grandan silenton de la simpatio kaj dankemo. Altiro kaj danko, amo kaj ĝojo — loĝas en la animo. KREDU, ke tiajn altvalorajn sentojn rilate vin mi konservos en la sanktejo de la koro.

La Sinjoro nin benu.

ANDREO LUDOVICO

(*) En la Esperanta traduko (Evangelio laŭ Sankta Johano, ĉap. 3:9) estas skribite: “la vento blovas, kie ĝi volas”. La latina traduko diras: “*Spiritus ubi vult spirat*”.—
La Trad.

- Nia Hejmo

I

EN LA MALSUPERAJ REGIONOJ

Mi havis la impreson, kvazaŭ mi perdis ĉian ideon pri tempo. La ideo pri spaco de longe ĉe mi disnieniĝis.

Mi estis konvinkita, ke mi jam ne apartenas al la rondo de la enkarniĝintoj en la mondo, kaj tamen miaj pulmoj profunde spiradis.

De kiam mi fariĝis ludilo de nerezisteblaj fortoj? Ne eble diri.

Mi ja sentis min ia suferanta koboldo en la malluma reto de la teruro. Kun hirtaj haroj, saltanta koro, timego min tutan posedanta, mi multajn fojojn kriegis kiel freneza, petegis pri kompato kaj plendis pri la dolora senkuraĝeco premanta mian spiriton; sed, kiam la malvarma silento ne ensorbis mian tondran voĉon, tiam lamentoj pli kortuŝantaj, ol miaj, respondis miajn kriojn. Aliajn fojojn ĉerktonaj ridegoj traŝiradis la tiean kvieton. Eble iu nekonata kunulo, kiel mi supozis, troviĝis sub la manoj de frenezo. Iam kaj iam aperis diablecaj formoj, stultaj vizaĝoj, bestecaj mienoj, kio pliigis mian terusenton. La pejzaĝo, kiam ne tute nigra, ŝajnis superverŝita de blanketa lumo, kvazaŭ envolvita en densa nebulo, kiun la radioj de la suno de malproksime varmigus.

Kaj tiu stranga irado daŭradis ĉiam plue... Al kiu celo? Kiu ĝin povus diri? Mi sciis nur, ke mi senhalte forkuras... La timego min turnopelis. Kie la hejmo, la edzino, la infanoj? Mi estis perdinta ĉian ideon pri direkto. La timo antaŭ la nekonataĵo, la hororo antaŭ la mallumo ekposedis mian tutan rezonkapablon, apenaŭ

mi liberiĝis de la lastaj fizikaj ligiloj en la interno de toambo!

La konscienco min turmentis: mi preferus la absolutan neprudenton, la neestecon.

Komence larmoj senĉese banadis al mi la vizaĝon, kaj nur en maloftaj minutoj min iel feliĉigis la beno de la dormo. Tamen tiu sento de korfaciliĝo estis abrupte rompata: kun ironiaj mienoj, monstraj estaĵoj min vekadis; mi ja devis de antaŭ ili forkuri.

Mi nun faris al mi klaran bildon de tiu malsama medio, leviĝanta el la polvo de la mondo, sed estis jam tro malfrue. Afliktantaj pensoj mordis mian cerbron. Apenaŭ mi skizis projekton de solvo, jen sennombraj interokazaĵoj pelis min al kapturnaj konsideradoj. Neniam antaŭe la religia demando aperis al mi tiel profunda antaŭ la okuloj. La pure filozofiaj, sciencaj kaj politikaj principoj nun aspektis al mi nuraj akcesoraĵoj koncerne la homan vivon. Laŭ mia opinio, ili estas altvalora havaĵo sur la Tero, sed oni konfesu, ke la homaro konsistas ne el forpasantaj generacioj, sed el Spiritoj eternaj, vojantaj al glora celo. Mi rimarkis, ke io sidas super ĉia simpla cerbumado: tiu io estas la Fido, manifestaĵo de Dio al la homo. Sed tia analizo tro malfrue montrigis. Vere, mi konis la parolon de la Malnova Testamento kaj ofte foliumis la Evangelion, sed mi devas konfesi, ke mi neniam esploris la sanktajn verkojn per la torĉo de la koro. Ilin mi konis laŭ la kritiko de verkistoj malpli konformiĝintaj al sento kaj al la konscienco, aŭ absolute malakordantaj kun la esencaj veraĵoj. Aliajn fojojn mi ilin interpretadis laŭ la maniero de la pastraro, neniam elirante el la rondo da reciprokaj kontraŭdiraĵoj, kie mi propravole restis.

Ĝustadire, laŭ mia propra komprenmaniero, mi krimulo ne estis. Sed la filozofio de la "rekte-alcelismo" min tutan antaŭe posedis. Ian surteran ekzistadon, kiun la morto aliigis, ne punktis apartaj okazaĵoj ekster la ordinaraj.

Filo de eble tro molkoraj gepatroj, mi ricevis miajn universitatajn titolojn sen pli grandaj penoj, malvirtis tiel same, kiel la junularo de mia tempo, fondis hejmon,

ekhavis infanojn, elserĉis firmajn poziciojn, kiuj asekuris la ekonomian trankvilecon de mia familiano; tamen, ĉe atenta esplorado de mia propra persono, io igis min havi la senton de tempo perdita, pri kio ankaŭ la konscienco min ja silente akuzis. Mi loĝis la Teron, ĝuis ĝiajn bonaĵojn, rikoltis la benojn de la vivo, sed eĉ per groŝo mi al ĝi ne repagis mian grandegan ŝuldon. Mi havis gepatrojn, kies grandanimecon kaj sinoferojn por sia filo mi neniam iel taksis; ankaŭ edzinon kaj infanojn, kiujn mi sovaĝe tenadis en la feraj maŝoj de la detrua egoismo. Mi posedis hejmon, kiun mi fermis al ĉiuj paŝantoj tra la dezerto de angoro. Mi plezuris ĉe la ĝojoj de mia propra familio, forgesante etendi tiun Dian benon sur la multenombran familion homan, surda por elementaj devoj de frateco.

Unuvorte, simile al oranĝeria vegetaĵo, mi nun ne eltenis la klimaton de la eternaj realaĵoj. Mi ne elvolvis la Diajn ĝermojn, per kiuj la Sinjoro de la Vivo pri-semis mian animon. Ilin mi krime sufokis, senbride avidante komforton. Mi ne ekzercis organojn por la nova vivo. Estis do juste, ke mi tie vekiĝis simile al kriplulo, kiu, denove ĵetita en la senmezuran riveron de la Eterno, nur perforte povus sekvi la senhaltan fluon, aŭ kvazaŭ kompatinda almozulo, kiu, lacekonsumita meze en dezerto, vagadus laŭ la kaprico de vivegaj uraganoj.

Ho, amikoj sur la Tero! Kiom da vi povos eviti la vojon de amaraĵoj, preparante la internajn kampojn de la koro? Ekbruligu viajn lumojn, antaŭ ol transiri la grandan ombbron. Serĉu la veron, antaŭ ol la vero vin surprizos. Ŝvitu nun, por ne plori poste.

II

KLARENCO

“Memmortiginto! Memmortiginto! Krimulo! Fiulo!” — similaj krioj min ĉiuflanke ĉirkaŭis. Kie la malmolkoraj banditoj? Iafoje mi ilin dum momento ekvidis, glitantajn en la densa mallumo, kaj, kiam mia malespero atingis la apogeon, mi ilin atakis per ekstrema streĉo de miaj fortoj. Mi tamen vane pugnobatis la aeron, en paroksismo de kolero. Sarkasmaj ridegoj travundis al mi la orelojn, dum la nigraj figuroj malaperis en la ombron.

Kiun peti pri helpo? Turmentis min malsato, soifo min bruligis. Ordinaraj okazaĵoj de la materia provado montriĝis antaŭ miaj okuloj. Mia barbo elkreskis, mia vesto ekĉifoniĝis ĉe la penoj por kontraŭstaro en tiu nekonata regiono. Sed la plej dolora fakto estis ne la terura forlasiteco, por kiu mi sentis min destinita, sed la konstanta sieĝado de malicaj fortoj, kiuj kolerigis min sur tiuj mallumaj dezertaj vojoj. Ili min incitis, nuligis ĉe mi la eblon kolekti ideojn. Mi deziris mature pesi la situacion, traserĉi motivojn, streki por la pensado novajn vojojn, sed tiuj voĉoj, tiuj lamentoj, miksitaj kun akuzadoj kontraŭ mi mem, konsternis min frakase.

— Kion vi serĉas, malfeliĉa! Kien vi iras, memmortiginto?

Tiaj riproĉoj, senĉese ripetataj, konfuzis mian koron. Malfeliĉa, jes; sed memmortiginto? — neniel! Tiuj admonoj, laŭ mi, estis malpravaj. La fizikan korpon mi forlasis kontraŭvole. Mi memoris mian obstinan dueldadon kontraŭ la morto. Mi ankoraŭ laŭŝajne aŭdis la last-

ajn opiniojn de la kuracistoj en la resanigejo; mi memoris la sindonan flegadon al mi, la dolorajn lokajn kuracadojn dum la multaj tagoj post delikata operacio ĉe la intestoj. En la tuta daŭro de tiuj rememoroj mi sentis la kontakton de la termometro, la malagrablan pikon de la injektilo kaj fine la lastan scenon, kiu antaŭis la grandan dormon: jen mia ankoraŭ juna edzino kaj la tri infanoj min rigardadis, sub la terureco de la porĉiama disiĝo. Poste... la vekigo sur la malseka senluma pejzaĝo kaj la longa marŝado, kiu ŝajnis senfina.

Kial do min makuli, kulpigante min pri ia memmortigo, se mi ja estis devigita forlasi hejmon, familion, la dolĉan kunevivadon kun la miaj? Eĉ la plej forta homo havas limitan kontraŭstaremon por emocioj. Komence kun firmeco kaj decidemo, mi tamen poste ektrapasis longajn periodojn de senkuraĝeco, kaj anstataŭ daŭrigi plu tian moralan bravecon, ne sciante mian propran finon, mi sentis, ke larmoj, longe retenataj, ofte banas al mi la vizaĝon, elverŝinte el la koro.

Al kiu mi min turnu? Kiel ajn granda la intelekta kulturo, kiun mi kunportis el la mondo, mi nun ne povus iel ŝanĝi la realecon de la vivo. Miaj scioj, antaŭ la Senlimo, similis etajn sapvezikojn pelatajn de fortega vento, kiu aliigas la mienon de pejzaĝoj. Mi ja estis io, kion la uragano de Vero forportadis tre malproksimen. Tiu situacio tamen neniel modifis tiun alian realaĵon, nome mian esencon mem. Demandante min mem, ĉu mi ne freneziĝis, mi konstatis la klarecon de mia konscienco, kiu diris al mi, ke mi estas ĉiam ankoraŭ mi mem, kun la sentoj kaj kulturo ĉerpitaj el la sperto en la materio. Ankoraŭ tiaj samaj la fiziologiaj bezonoj. Malsato suferigis al mi ĉiujn fibrojn, sed la ĉiam pli granda malvigligo tamen ne atingis definitive ĝis absoluta konsumiteco. Ie kaj ie montriĝis al mi verdaj arbetaĵoj, kiuj ŝajnis al mi sovaĝaj, ĉirkaŭ humilaj akvofluetoj, al kiuj mi ĵetiĝis soifanta. Mi avide formanĝis tiujn nekonatajn foliojn, alpreminte la lipojn al tiu malklara akvo, dum tion ebligis al mi la nekontraŭstareblaj fortoj, min antaŭen pelantaj. Mi ofte ensuĉis la ŝlimon de la vojo, rememoris la iaman ĉiutagan panon, kaj tiam mi abunde

ploregadis. Ne malofte mi devis kaŝi min de multenombraj bandoj da animaleskaj estaĵoj, kiuj pretergalo-
lopis kvazaŭ nesatigeblaj rabobestoj. Tio estis ŝtonigaj
bildoj! Mia senkuraĝeco ĉiam pli kreskis. Tiam mi ko-
mencis rememori, ke sendube ekzistas ia Aŭtoro de la
Vivo, kie ajn Li sidas. Ĉi tiu penso min konsolis. Mi,
abomeninta la religiojn de la mondo, nun eksentis la
bezonon de mistika konsolo. Kuracisto, plej obstine al-
kroĉita al la negativismo de mia generacio, nun mi dev-
is preni renovigan sintenon. Nepre necese estis konfesi
la bankroton de la memamo, al kiu mi fiere min iam
fordonis.

Kiam al mi tute mankis la fortoj, kiam mi sentis
min absolute algluiĝinta al la ŝlimo de la Tero, ne-
kapabla restariĝi, tiam mi petis la Superegan Aŭtoron
de la Naturo tendi al mi patrajn manojn, en tia prem-
anta situacio.

Kiel longe daŭris tiu petego? Kiom da horoj mi tiel
restis, kun manoj kunmetitaj, simile al afliktita infano?
Mi scias nur, ke torento da larmoj lavis al mi la vizaĝon;
ke ĉiuj miaj sentoj koncentriĝis en dolora preĝo. Ĉu mi
estas do tute forgesita? Ĉu ankaŭ mi ja ne estas filo
de Dio, kvankam mi ne zorgis ekkoni Lian superegan
laboradon tiam, kiam mi dronis en la homaj vantaĵoj?
Kial la Eterna Patro ne pardonus min, Li, kiu provizas
neston al la senprudentaj birdoj kaj bonkore protektas
la delikatan floron de la nekulturitaj kampoj?

Ha! la homo devas antaŭe multe suferi por kom-
preni ĉiun misteran belaĵon de preĝo; li devas scii, kio
estas riproĉo de la konscienco, humiligo, ekstrema mal-
feliĉo, por sukcese trinki la senkomparan eliksiron de
espero.

En tiu momento la densa nebulego aerdisiĝis kaj
iu ekaperis, ia sendito de la Ĉielo. Simpatia maljunulo
patre ridetis al mi. Li kliniĝis, fiksitis sur la miaj siajn
grandajn klarajn okulojn, kaj parolis:

— Kuraĝon, mia infano! La Sinjoro ne forlasas vin.

Maldolĉa ploro banis al mi la tutan animon. Emoci-
ita, mi ekdeziris esprimi mian ĝojon, fari konsideradojn
pri la konsolo, al mi tiam veninta, sed, kolektinte ĉiujn

ĉe mi ankoraŭ restantajn fortojn, mi sukcesis nur demandi:

— Kiu nome vi estas, komplezema sendito de Dio?

La neatendita bonfaranto afable ridetis kaj respondis:

— Nomu min Klarenco, mi estas simple via frato.

Kaj, rimarkinte mian kadukan staton, li aldiris:

— Nun trankviliĝu kaj silentu. Vi devas ripozi, por revigliĝi.

Tuj poste li alvokis du kompaniulojn, kiuj staris en teniĝo de sindonaj servantoj, kaj ordonis:

— Ni helpu al nia amiko per la krizokazaj rimedoj.

Sur tiu sama loko estis sternita blanka litotuko, kaj ambaŭ helpantoj pretiĝis por min komplezeme transporti sur tiu improvizita blankardo.

Kiam ili min zorge estis levantaj, Klarenco momenton enpensiĝis kaj aldonis, kvazaŭ rememorante neprokrasteban devon:

— Ni ekiru, ne perdante sekundo. Mi devas veni al “Nia Hejmo” kiel eble plej baldaŭ.

III

KOLEKTIVA PREĜO

Kvankam transportata laŭ la maniero de ordinara vundito, mi tamen duonvidis la revigligan bildon, sterniĝantan antaŭ miaj okuloj.

Klarencio, apogante sin al bastono el lumanta substanco, haltis antaŭ granda pordo enkadrigita en alta muro tapetita de graciaj florantaj grimpkreskaĵoj. Palpante, li premis punkton sur la murego kaj jen fariĝis longa aperturo, tra kiu ni silente eniris.

Milda lumo tie superverŝis ĉion. Malproksime, gracia lumilo aspektis kvazaŭ ia vespera krepusko en printempo. Laŭgrade kiel ni antaŭeniris, mi povis rimarki majestajn konstruaĵojn, starantajn en vastaj ĝardenoj.

Laŭ signo de Klarencio, miaj portantoj delikate kuŝigis sur la herbo la improvizitan blankardon. Antaŭ miaj okuloj tiam montriĝis la akceptema pordo de blanka konstruaĵo, similanta grandan hospitalon de la Tero. Du junuloj, surhavantaj tunikon el neĝoblanka lino, servoprete alkuris al la voko de mia bonfaranto; dum ili komfortigis min sur improvizita lito, por min zorge transporti internen, mi aŭdis la komplezeman maljunulon karese rekomendi:

— Loku nian zorgaton en la dekstran pavilonon. Nun oni atendas min. Morgaŭ frue matene mi lin revidos.

Mi direktis al li dankrigardon, samtempe kiel mi estis forkondukata en grandan komfortan ĉambron, riĉe meblitan, kie oni prezentis al mi invitan liton.

Envolvante la du flegistojn en la vibradon de mia danko, mi ekpensis ilin alparoli kaj fine sukcesis diri:

— Amikoj, mi vin petas, klarigu al mi, en kia nova

mondo mi troviĝas... El kia stelo nun venas al mi ĉi tiu karesa, brilanta lumo?

Unu el ili karesis mian frunton, kvazaŭ li estus mia malnova persona konato, kaj respondis:

— Ni nin trovas en la spiritaj sferoj najbaraj al la Tero, kaj la suno, en ĉi tiu momento nin prilumanta, estas tiu sama, kiu iam vivigis nian fizikan korpon. Sed ĉi tie nia vivado estas pli potenca. La stelo, kiun la Sinjoro eklumigis por niaj surteraj laboroj, estas pli altvalora kaj bela, ol kia ni ĝin opinias, kiam ni apartenas al la sfero de la karno. Nia suno estas la Dia fonto de la vivo, kaj la lumo, kiun ĝi disradias, originas de la Aŭtoro de la Kreitaĵaro.

Mia “mem”, kvazaŭ penetrita de ondo da plej alta respekto, fikse rigardis la mildan lumon, kiu invadis la ĉambro tra la fenestroj, kaj mi perdiĝis en sinsekvo da profundaj pensoj. Mi tiam rememoris, ke sur la Tero mi neniam rigardis la sunon, meditante pri la senmezura boneco de Tiu, kiu ĝin donas al ni por la eterna vojo de la Vivo. Mi do similis feliĉan blindulon, kiu malfermas la okulojn antaŭ la belega Naturo post longedaŭraj jarcentoj da mallumo.

Tiam oni alportis al mi refortikigan buljonon kaj poste tre freŝan akvon, laŭŝajne saturitan de Diaj emanajoj. Tiu eta kvanto da likvaĵo min neatendite reanimis. Mi ne scius diri, kia supo tio estis: ĉu kvietiga nutraĵo, ĉu saniga medikamento. Novaj fortoj subtenis mian animon, profundaj afekcioj vibris en mia spirito.

Mia plej granda emocio tamen estis venonta post kelkaj momentoj.

Apenaŭ mi eliris el tiu konsola surpriziĝo, jen Dia melodio penetris en mian ĉambron, ŝajnanta dolĉa svarmo da sonoj, sin direktantaj al la superaj sferoj. Tiuj mirinde harmoniaj notoj trafluis mian koron. Ĉe mia demandanta rigardo, la flegisto, staranta apud mi, volonte klarigis:

— Estas veninta la krepusko en “Nia Hejmo”. En ĉiuj sekcioj de ĉi tiu laborkolonio, konsekrita al la Kristo, ekzistas ligiteco kun la preĝoj el la Guberniestrejo.

Kaj dum la muziko balzame plenigis la ĉambron, li min ĝentile adiaŭis:

— Nun restu en paco. Mi revenos tuj post la preĝo.

Subita angoro min ekposedis.

— Ĉu mi do ne povos akompani vin? — mi demandis per peteganta voĉo.

— Vi estas ankoraŭ tro malfortika — li afable respondis —, tamen, se vi sentas vin en taŭga humoro...

Tiu melodio refreŝigis plej interne en mi la fortojn. Mi stariĝis, supervenkante min mem, kaj alteniĝis al la frata brako, kiu sin etendis al mi. Ŝanceliĝante, mi venis al vasta salono, kie multenombra kolekto da estuloj silente meditadis, en profunda enmemiĝo. De la brile lumanta volbo pendis delikataj floraj girlandoj, de la plafono ĝis la planko, formante disradianajn simbolojn de supera spiriteco. Neniu laŭŝajne ekrimarkis mian ĉeeston, kaj mi apenaŭ kaŝis mian plej grandan surpriziĝon. Ŝajnis, ke ĉiuj alestantoj, en streĉa teniĝo, atendas ion. Pene retenante sennombrajn demandojn, bolantajn en mia menso, mi rimarkis, sur la fundo, ke sur giganta ekrano pentriĝas mireginda bildo kun intensega lumo. Laŭ plej modernaj procedoj de televido ekaperis la figuro de belega templo. Sidante sur distingiga loko, maljunulo, surhavanta blankan brilege radiantan tunikon kaj kronita de lumo, fikse rigardadis al la Supro, en teniĝo de preĝanto. Malsupre, sepdek du estuloj, ŝajnis al mi, en respekta silento akompanis lian preĝon. Forte mirante, mi rimarkis Klarencon en tiu kunveno, inter tiuj, kiuj ĉirkauis la lumantan maljunulon.

Mi ekpemis la brakon al la amika flegisto; antaŭvidante miajn baldaŭajn demandojn pri tia okazaĵo, li klarigis mallaŭte, preskaŭ flustre:

— Tenu vin kviete. Ĉiuj loĝejoj kaj institucioj de “Nia Hejmo” nun preĝas kune kun la Guberniestro pere de la malproksimaj aŭdado kaj vidadado. Ni laŭdu la Nevideblan Koron de la Ĉielo.

Apenaŭ li finis ĉi tiun klarigon, jen tiuj sepdek du estuloj ekkantis melodian, neesprimeble belan himnon. La vizaĝo de Klarenco, en tiu rondo de liaj respektigindaj kunuloj, aspektis al mi pli intense prilumita. La

ĉiela himno konsistis el anĝelaj notoj, esprimantaj plej puran dankon. Ŝvebis en la ĉambro misteraj vibroj de paco kaj ĝojo, kaj kiam la arĝentaj notoj eksilentis, bildiĝis malproksime, sur alta loko, mirinde blua koro (*), kun oraj strioj. Tuj poste, karesa muziko, eble venanta el superaj sferoj, respondis tiujn laŭdojn. Tiam pluvego da bluaj floroj disŝutiĝis sur nin; sed, kvankam ni vidis tiujn ĉielajn miozotojn, ni tamen ne sukcesis ilin konservi en la manoj. La etaj koroloj delikate disfluiĝis, ektaŝante niajn fruntojn, kaj mi spertis strangan renoviĝon de fortoj ĉe la kontakto de tiuj fluidecaj petaloj, kiuj plifaciligis mian koron.

Post tiu belega preĝo mi revenis en mian ĉambrom de malsanulo, helpate de la amiko, kiu min plej proksime flegadis. Sed nun mi jam ne estis tiu grave malsana homo de antaŭ kelkaj horoj. La unua kolektiva preĝo, en "Nia Hejmo", min tute aliigis. Neatendita sento de agrableco envolvis mian animon. La unuan fojon, post sinsekvaj jaroj de sufero, la kompatinda koro, sopiranta kaj turmentata, simile al longe senenhava kaliko, denove pleniĝis de la fortikigaj gutoj de la likvoro de espero.

(*) Simbola figuro, estigita de la mensaj vibroj de la kolonianoj. — *Noto de la Aŭtoro.*

IV

LA SPIRITA KURACISTO

En la morgaŭa tago, post profunda revigliga dormo, mi ricevis la radiantan benon de la amika suno, kvazaŭ dolĉan mesaĝon al la koro. Refortikiga helo envenis tra larĝa fenestro, inundante la ĉambron per karesa lumo. Mi sentis min kiel tute nova homo. Fortoj aliaj atingis mian internon. Mi havis la impreson, kvazaŭ mi per profundaj enspiroj sorbas la ĝojon de la vivo. En la animo restis unu sola ombreto: la respiro pri la hejmo, la alligiteco al la nun fora familio. Multego da demandoj naĝis en mia menso, sed tiel granda estis tamen la sento de korfaciliĝo, ke mi, jam ne pensante pri ia demando, trankviligis mian spiriton.

Mi ekdeziris stariĝi, ĝui la spektaklon de la Naturo plena de ventetoj kaj lumo, sed tio al mi ne prosperis; tiam mi venis al la konkludo, ke, sen la magneta helpo de la flegisto, estis por mi ne eble ellitiĝi.

Mi ankoraŭ ne rekonsciiĝis post tiuj sinsekvantaj surprizoj, kaj jen la pordo malfermiĝis kaj mi ekvidis Klarencon enveni, akompanatan de simpatia nekonato. Ili ĝentile min salutis, dezirante al mi pacon. Mia hieraŭa bonfarinto demandis pri mia farto. La flegisto intervenis, donante informojn.

Ridetante, la amika maljunulo prezentis al mi sian kunulon. Tio estis, li diris, la frato Henriko de Luna, oficanta en la Departemento de Kuracado de la Kolonio. Blanke vestita, kun mieno elradianta grandegan simpation, Henriko min longe brustaŭskultis, ridetis kaj diris:

— Estas bedaŭrinde, ke li venis dank' al mem-mortigo.

Dum Klarenco restis serena, mi sentis, ke stranga ekribelo elŝprucas en mia interno.

Memmortigo?! Mi tiam rememoris la akuzojn de la malicaj estuloj, en tiu antaŭa ombro. Malgraŭ la multo da danko, kiu jam komencis min posedi, mi ne povis silenti ĉe tia kulpigo.

— Mi pensas, ke ĉi tie estas ia eraro — mi firme diris ofendetita —; mia reveno el la mondo ne havis tian kaŭzon. Mi bataladis pli ol kvardek tagojn en la resanigejo, penante venki la morton. Mi estis submetita al du seriozaj operacioj pro intesta obstrukco...

— Jes — rediris la kuracisto, montrante la saman noblan serenecon —, sed tiu obstrukco havis siajn radikojn en kaŭzoj profundaj. Mia amiko eble ne sufiĉe pensis pri tio. La spirita organismo prezentas en si mem la plenan historion de la agoj en la mondo.

Kaj respekte kliniĝante, li montradis certajn punktojn de mia korpo.

— Ni ekzameni la intestan regionon — li diris. — La obstrukco originis de kanceraj faktoroj, kaj ĉi tiuj, siavice, de iaj senpripensaĵoj de mia estimata frato koncerne la sifilison. La malsano eble ne prenis tiel gravan formon, se via mensa konduto sur la planedo estus adaptiĝinta al la principoj de frateco kaj sobreco. Sed via persona maniero de kunevivado, en oftaj incitiĝo kaj galhumoro, kaptis ruinigajn vibrojn el viaj aŭdantoj. Ĉu vi neniam ekpensis, ke kolero estas fonto de fortoj negativaj por ni mem? Via manko de memregado, la neatentemo ĉe la traktado de viaj similuloj, kiujn vi ofte pretervole ofendis, pli ol unu fojon kondukis vin en la sferon de malsanaj kaj malaltnivelaj estuloj. Tia cirkonstanco pli, ja multe pli kadukigis vian fizikan staton.

Post longa paŭzo, dum kiu li min atente ekzamenis, li daŭrigis:

— Ĉu vi, mia amiko, jam rimarkis, ke vian hepaton vi mem difektis; ke viajn renojn vi malzorgis, terure malŝatante la sanktajn donojn?

Stranga konsterno posedis mian koron. Ŝajnte ignori la angoron, kiu min premegis, la kuracisto daŭrigis, klarigante:

— La organoj de la materia korpo, laŭ la plano de la Sinjoro, enhavas en si nekalkuleblajn rezervojn; sed mia amiko preterlasis bonegajn okazojn, misuzante riĉajn kapitalojn el la fizika sperto. La vasta tasko, kiun al vi konfidis la Mentoroj de la Supera Spiritita Mondo, limigis sin al simplaj provoj de ia laboro, kiu ja ne elfiniĝis. La tutan digestan aparaton detruis ekscesoj de laŭŝajne ne gravaj nutraĵoj kaj alkoholaĵoj. Sifiliso konsumis ĉe vi esencajn fortojn. Kiel vi vidas, la memmortigo estas nerefutebla.

Mi ekmeditis pri la problemoj de la homaj vojoj, pesante la perditajn oportunojn. Dum la vivo surtera mi sukcese alkroĉis al la vizaĝo plej diversajn maskojn, ilin skulptante konforme al ĉiu situacio. Cetere mi tiam ne povis supozi, ke iu postulos de mi ian kalkulon pri banalaj epizodoj, kiujn mi ordinare rigardis kiel faktojn sen ia aparta signifo. Ĝis nun mi konsideris la homajn erarojn laŭ la instruoj de la kriminologio. Ĉia bagatela okazaĵo, ekstera de la kodoj, apartenis, laŭ mia opinio, al la naturaj fenomenoj. Sed nun montriĝis alia procedo de kontrolado de kulpoj. Mi ne staris antaŭ ia torturanta tribunalo, nek min surprizis inferaj abismoj; kontraŭe, ridetantaj bonfarantoj teksis konsiderojn pri miaj mizeraĵoj, kiel iu vartanta infanon sendecidan, for de la gepatraj okuloj. Tiu propramova interesiĝo tamen pikis al mi la vantecon de homo. Se venus al mi diabloj kaj min turmentus per tridentoj, mi eble ricevus forton por fari la frakason malpli amara. Malgraŭ ĉio ĉi la grandega boneco de Klarenco, la karesa voĉtono de la kuracisto, la frata trankvileco de la flegisto penetris ĝis la fundo en mian spiriton. Ne ia deziro de reago bolis en mi: doloris al mi honto — kaj mi ekploris. Kun vizaĝo en la manoj, simile al ĉagrenita kaj malfeliĉa knabo, mi ekplorsingultis pro la doloro, kiu aspektis al mi senrimeda. Ne eble estus ne konsenti kun Henriko de Luna: li estis nediskuteble prava. Fine, sufokante la ekpuŝojn de vantemo, mi rekonis la amplekson de miaj antaŭaj frivolaĵoj. La falsa koncepto pri persona digno cedis lokon al la justeco. Antaŭ miaj spiritaj okuloj nun ekzistis unu sola turmentanta realaĵo: mi ja estis

memmortiginto, mi perdis la altvaloran oportunon de la homa sperto, mi estis nenio alia, ol ŝiprompiĝulo, kiun oni kompate gastigis.

Tiam la grandanima Klarenco, sidiĝante apud mi sur la lito, patre karesis la mi la harojn kaj kortuŝite parolis:

— Ho, mia filo, ne lamentu tiel amare. Mi venis al vi elaŭdante la propeton de tiuj, kiuj vin amas, el pli altaj sferoj. Viaj larmoj atingas iliajn korojn. Ĉu vi ne deziras esti dankema, tenante vin trankvila ĉe la ekzameno de viaj propraj eraroj? Vere via situacio estas ja la situacio de nekonscia memmortiginto, sed oni tamen konfesu, ke ĉiutage centoj da homoj en sama stato foriras de la Tero. Trankviliĝu do. Profitu de la trezoro de la pento, konservu la benon de la riproĉo de konscienco, kvankam malfrua, ne forgesante, ke afliktiĝo ne solvas problemojn. Fidu al la Sinjoro kaj konfidu nian fratan sindonecon. Kvietigu la konsternitan animon, ĉar ankaŭ multaj el ni ĉi tieaj iradis tiajn samajn vojojn, kiel vi.

Ĉe la nobleco, elfluanta el tiuj vortoj, mi alpremis la kapon al lia patra brusto kaj longe ploradis.

KURACA HELPO

— Ĉu estas vi la zorgato de Klarenco?

Ĉi tiun demandon faris junulo kun dolĉa nevulgara mieno.

Kun granda sako, pendanta de lia mano kaj ŝajne enhavanta rimedojn por kuracado, li direktis al mi allogan rideton. Ĉe mia jesa gesto, li montriĝis senĝena kaj, kun frataj manieroj, li diris:

— Mi estas Lizio, via frato. Mia direktoro, la asistanto Henriko de Luna, nomis min por servi al vi tiel longe, kiel vi bezonos flegadon.

— Ĉu vi do estas flegisto? — mi demandis.

— Mi estas vizitisto ĉe la kuraco-servoj. Kiel tia, mi ne nur kunlaboras en flegadoj, sed ankaŭ informas pri okazoj, en kiuj ia helpo fariĝas necesa, aŭ faras antaŭaranĝojn koncerne ĵus venintajn malsanulojn.

Rimarkinte mian surpriziĝon, li klarigis:

— Kiel mi, ekzistas multe da servantoj en “Nia Hejmo”. La amiko ĵus venis en la kolonion kaj, kompreneble, ne scias la amplekson de niaj laboroj. Por ke vi faru al vi ian ideon pri tio, sufiĉas al mi diri, ke nur ĉi tie, en la fako, kie vi troviĝas, estas pli ol mil spirito-malsanuloj, kaj eksciu, ke ĉi tiu estas unu el la plej malgandaj konstruaĵoj de nia hospitala organizaro.

— Ĉio ĉi estas ja mirinda! — mi ekkriis.

Antaŭvidante, ke mia parolo englitos en laŭdon, Lizio leviĝis de la brakseĝo, kie li sin komfortigis, kaj komencis min atente brustaŭskulti, kaj tiel li nebligis al mi ian vortan dankon.

— La regiono de viaj intestoj prezentas gravajn

lezojn kun sendubaj postesignoj de kancero; tiu de la hepato montras disŝirojn; tiu de la renoj evidentigas signojn de antaŭtempa konsumiteco.

Afable ridetante, li aldiris:

— Ĉu mia frato scias, kion ĉi tio signifas?

— Jes — mi respondis —, la kuracisto hieraŭ ĝin klarigis al mi, dirante, ke la kaŭzinto de ĉi tiuj perturboj estas mi mem...

Rimarkinte la ĝenecon de mia apenaŭ farita konfeso, li rapidis konsoli min:

— El la okdek malsanuloj, kiujn mi ĉiutage devas flegi, kvindek sep troviĝas en tia sama stato, kiel vi; kaj eble vi ne scias, ke ĉi tie ekzistas ankaŭ kripluloj. Ĉu vi jam ekpensis tion? Ĉu vi scias, ke neantaŭzorgema homo, kiu foruzis siajn okulojn ĉe malbono, aperas ĉi tie kun malplenaj orbitoj; ke maliculo, ĉiam pensanta uzi por krimoj la naturan doton de facila irado, spertas la doloron de paraliziĝo, kaj iafoje estas gastigata ĉi tien sen kruroj; ke la kompatindaj obseditoj en la seksaj anomalioj ordinare venas tute frenezaj?

Ĉe mia natura mirego, li daŭrigis:

— “Nia Hejmo” ne estas ia restadejo de Spiritoj ĝustadire venkintaj, laŭ la strikta senco de ĉi tiu vorto. Ni estas feliĉaj, ĉar ni havas laboron; kaj ĝojo sidas en ĉiu anguleto de la kolonio, ĉar la Sinjoro ne rifuzis al ni la benatan panon de servado.

Profitante pli longan paŭzon, mi diris kortuŝita:

— Plue, mia amiko, klarigu al mi ĉion. Mi sentas mian koron faciligita kaj trankvila. Ĉu tiu ĉi regiono ne estas ia ĉiela departemento de la elektitoj?

Lizio ridetis kaj respondis:

— Ni rememoru la malnovan instruon rilatan al la multaj vokitoj kaj malmultaj elektitoj sur la Tero^(*).

Kaj etendante sian rigardon al fora horizonto, kvazaŭ fiksante spertojn pri si mem sur la tolo de la plej profundaj rememoroj, li emfaze aldonis:

— La religioj, sur via planedo, kunvokas la hom-

^(*) Laŭ Mateo, 22:14. — *La Trad.*

ojn al la ĉiela bankedo. Kun pura konscienco, neniu ajn, kiu iam ricevis ian ekkonon pri Dio, rajtas preteksti nescion en ĉi tiu rilato. Nekalkulebla estas la nombro de la vokitoj, mia amiko; sed kie la respondantaj al la voko? Kun maloftaj esceptoj, la homoj pli volonte cedas al alispecaj invitoj. Oni uzas ĉian favoran okazon por deflankiĝoj for de la bono, oni nutras la kapricon de ĉiu el tiuj malvirtoj, oni disbatas sian korpon per frapoj de senpripensoj. Jen la rezulto: miloj da homoj ĉiutage foriras de la karna mondo en dolora stato de nekomprenejo. Sennombraj amasoj da frenezaj, malsanaj kaj sensciaj vagadas ĉie en la regionoj najbaraj al la krusto de la planedo.

Rimarkinte mian miron, li demandis:

— Ĉu vi pensus, ke la morto de la korpo kondukas nin al regionoj de mirakloj? Ni estas trudpelataj al malfacila laborado, al multepezaj servoj, kaj ĉi tio ja ne sufiĉas. Se ni havas ŝuldojn sur la Tero, kiel ajn alten ni iras, ni devas nepre reveni, por ilin pagi, lavante la vizaĝon per la surtera ŝvito, rompante katenojn el malamo kaj ilin anstataŭigante per sanktaj ligiloj el amo. Ne estus juste altrudi al aliulo la taskon sarki la kampojn, kiun ni per niaj propraj manoj prisemis per dorĉoj.

Balancante la kapon, li aldonis:

— Jen la okazo pri la multaj vokitoj, mia kara. La Sinjoro forgesas nenian homon, sed tre malmultaj homoj Lin memoras.

Profunde malĝoja ĉe la rememorado de miaj propraj eraroj, antaŭ tiel gravaj ekkonoj pri individua prirespondeco, mi ekkriis:

— Kiel malica mi estis!

Sed, antaŭ ol mi ellasis pluajn ekkriojn, la vizitisto delikate metis sian dekstran manon al miaj lipoj kaj flustis:

— Silentu! Ni meditu pri la farenda laboro. Ĉe vera pentoj, oni devas scii paroli, por denove konstrui.

Tuj poste li, per la manoj zorge fluigis sur min magnetajn emanaĵojn. Aplikante kuracajn rimedojn sur la intesta regiono, li diris:

— Ĉu vi ne rimarkas la specialan kuracadon ĉe la

kancera regiono? Nu, bone notu al vi: ĉia honesta kuraca sistemo estas servado de amo, laborado de alkonforma helpo; sed la klopodo por resanigo estas tute individua, laŭ ĉiu aparta Spirito. Vi, mia frato, estos karese kuracata, sentos vin vigla, kiel en la plej belaj tempoj de via surtera juneco, forte laboros kaj, mi pensas, estos unu el la plej bonaj kulaborantoj en “Nia Hejmo”; tamen la kaŭzo de viaj perturboj daŭros plu en vi mem, ĝis vi dejetos de vi la ĝermojn de pereigo de tiu Dia dono — la sano —, kiujn vi alligis al via subtila korpo dank’al morala malzorgo kaj deziro ĝuadi pli multe, ol la ceteraj homoj. La karno surtera, en kiu ni faras tiom da ekscesoj, estas ankaŭ tiu benata kampo, kie ni sukcesas fari fruktodonaj laborojn por nia radikala resaniĝo, se nur ni plenumas niajn juste altruditajn devojn.

Mi ekmeditis pri tia sentenca parolo, konsideris la Dian bonecon kaj en la plej alta grado de kortuŝiteco, abunde ploris.

Sed Lizio serene finis la kuracadon en tiu tago kaj parolis:

— Kiam larmoj ne naskiĝas de ribelo, ili ĉiam estas elpurigita rimedo. Ploru, mia amiko. Faciligu vian koron. Kaj ni benu tiun mikroskopajn organizaĵojn, kiaj estas la karnoĉeloj sur la Tero. Tiel humilaj kaj altvaloraj, tiel malŝatataj, sed tiel miregindaj pro sia servemeco! Sen ili, kiuj malfermas al ni templon por nia reboniĝo, kiom da jarmiloj ni travivus en nesciado?

Tiel parolante, li dolĉe karegis al mi la nuban fruntojn kaj, min frate kisinte, li foriris.



VI

ALTVALORA ADMONO

La morgaŭan tagon, post la krepuska preĝo, Klarenco venis al mi kune kun la diligenta vizitisto.

Kun mieno disradianta noblecon, li demandis, ĉirkaŭbrakante min:

— Kiel vi nun fartas? Pli bone?

Mi faris mienon, kian montras malsanulo, kiu sur la Tero vidas sin karesata, malstreĉante la emociiĝemajn fibrojn. En la mondo la frata kareso esta iafoje miskomprenata. Cedante al longatempa malbona kutimo, mi komencis konigi mian penson, dum ambaŭ bonfarantoj komforte sidiĝis apud mi:

— Mi ne povus nei, ke mi fartas pli bone, tamen mi treege suferas. Fortaj doloroj en la intesta regiono, strangaj sentoj de premo sur la koro. Mi neniam supozis en mi tian grandan eltenpovon, mia amiko. Ha, kiel peza jam de longe estas mia krucio! Nun, kiam mi povas kolekti miaj pensojn, mi havas la impreson, kvaŭ la doloro neniigis ĉe mi ĉiujn disponeblajn fortojn...

Klarenco atente aŭdis, vidigante grandan interesiĝon pri miaj lamentoj, sen ia eĉ apenaŭ perceptebla gesto, kiu montrus intencon sin miksi en la aferon. Kuraĝigita de tia sintenado, mi daŭrigis:

— Krom tio, miaj moralaj suferoj estas grandegaj kaj neesprimeblaj. Post kvietiĝo de la tempesto ekstera danke la ricevintajn helpojn, mi nun refalas en mian agitiĝon internan. Kio estis kun mia edzino, miaj infanoj? Ĉu mia unuenaskito sukcesis progresi, laŭ mia longe dordotata idealo? Kaj la filinetoj? Mia malfeliĉa Zelia ofte

diris, ke ŝi mortos de sopirado, se ŝi min iam perdos. Tia admirinda edzino! Mi ankoraŭ sentas ŝiajn larmojn en miaj lastaj momentoj. Mi ne scias, de kiom longe mi travivas la premantan ĉagrenon de la foreco... Sinsekvaj disŝiroj defrotis de mi ĉian ideon pri tempo. Kie troviĝas mia kompatinda kunulino? Ĉu ploradante ĉe la cindro de mia korpo, aŭ ĉu en ia malluma loko de la regionoj de la morto? Ho, mia doloro estas ja tre amara! Kian teruran destininon havas viro, sin oferanta por la familio! Mi pensas, ke tre malmultaj homoj suferis tiom, kiel mi! Sur la planedo, sortobatoj, elreviĝoj, malsanoj, nekomprenoj kaj ĉagrenoj dampadis la maloftajn notojn de ĝojo; poste, la suferoj ĉe la morto de la korpo... Tiom sekvante, turmentegoj transtombaj! Kio estas do la vivo? Ĉu tuta serio da mizeroj kaj larmoj? Ĉu do ne ekzistas ia rimedo por semi pacon? Kiel ajn volonte mi deziras firme stari en optimismo, mi sentas, ke la penso pri malfeliĉo ĉirkaŭbaras mian spiriton, kvazaŭ terura karcero de la koro. Kia nigra destino, nobla bonfaranto!

Veninte al ĉi tiu punkto, la ventego de la pendado estis pelinta mian mensan barkon sur la vastan oceanon de larmoj. Sed Klarenco, serena, stariĝis kaj parolis per senafekta tono:

— Mia amiko, ĉu vi efektive deziras vian spiritan resaniĝon?

Ĉe mia jesa gesto li daŭrigis:

— Lernu do ne tro paroli pri vi mem kaj neniom pri la propra doloro. Lamentado estas signo de mensa malsano, kaj malsano ja kun peniga disvolviĝo kaj malfacila kuracado. Estas nepre necese krei al si novajn pensojn kaj disciplini la lipojn. Ni atingas spiritan ekvilibron, nur malfermante la koron al la Suno de Dio. Rigardi la necesan penon kiel frakasantan altrudon, vidi suferojn tie, kie fariĝas edifa lukto — ordinare signifas blindecon de la animo. Ju pli da vortoj vi malŝparos en konsideradoj doloraj por vi mem, des pli ĝenaj estos la ligiloj, kiuj retenas vin ĉe bagatelaĉaj rememoroj. Tiu sama Patro, kiu zorgas pri vi, gastiginte vin sub la amikan tegmenton de ĉi tiu domo, Li helpos viajn surterajn parencojn. Ni devas konsideri nian familian grup-

on sankta konstruo, sed ja ne forgesante, ke nia familio estas simpla apartaĵo de la universa Familio sub la Dia Direktado. Ni staros apud vi, por solvi viajn nunajn malfacilaĵojn kaj glatigi estontajn projektojn, sed neniom da tempo ni disponas, por repaŝi sur la senfruktan kamp-on de lamentado. Cetere ni, en ĉi tiu kolonio, prenis sur nin la devon akcepti eĉ la plej penigan laboron kiel benon, por ion fari, konsiderante, ke la Providenco dis-verŝas amon, dum vi vivas sub la ŝarĝo de ŝuldoj. Se vi deziras restadi en ĉi tiu helpdomo, lernu do pensi ĝuste.

Dum li parolis, miaj larmoj sekigis kaj, stimulita de la nobla instruanto, mi prenis alian teniĝon, kvankam hontante mian malfortecon.

— Ĉu vi, dum en la karno — afable daŭrigis Klarenco —, ne strebadis al la naturaj profitoj el bonaj pozicioj? Ĉu vi ne ŝatis la akiron de permesataj vivrimedoj, dezirante havigi bonstaton al viaj karuloj? Ĉu vi ne interesiĝis pri la pago konforma al la laboro kaj pri la komfortaĵoj, per kiuj vi povus servi al la familio? Ĉi tie la programo estas ne malsama; aliaj estas nur detaloj. En la rondoj de la karno, konvencio kaj mona garantio; ĉi tie, laboro kaj definitivaj akiroj de la nemortema Spirito. Doloro, laŭ nia punkto de vidado, signifas eblon riĉigi la animon; lukto estas la vojo por la realigo de la Diaj planoj. Ĉu vi komprenis la diferencon? Ĉe ia laboro la animoj malfortaj kuŝiĝas inerte kaj plendas al la preterpasantoj kontraŭ la sorto; sed la fortaj akceptas la taskon kiel sanktan donon, per kies manipulado ili sin preparas, direkte al perfekteco. Neniu mallaŭdas vian pravan resopiron, nek pretendas haltigi la fluadon de viaj plej noblaj sentoj; mi tamen rimarkigu, ke plorado el senespereco ne konstruas bonon. Se vi ja amas vian surteran familion, vi devas do esti brava, por esti al ĝi utila.

Fariĝis longa paŭzo. La parolo de Klarenco levis mian animon por pli sanigaj pensoj.

Dum mi meditis pri la saĝeco de la altvalora admono, mia bonfaranto, simile al patro, kiu forviŝas de la memoro ian frivolaĵon de siaj infanoj, por serene rekomenci la lecionon, ree demandis kun bela rideto:

— Nu, kiel vi nun fartas? Pli bone?

Ĝojante, ke mi sentas min pardonita, simile al iu infano deziranta lerni, mi respondis reanimita:

— Mi fartas multe pli bone, por pli ĝuste kompreni la Dian Volon.

VII

KLARIGOJ DE LIZIO

Ripetiĝis la periodaj vizitoj de Klarenco kaj la ĉiutaga atentemo de Lizio.

Laŭgrade kiel mi penis alkonformigi min al la novaj devoj, mi sentis la koron plifaciligita. Malpliigis la doloroj kaj la malhelpoj de senembarasa irado; sed mi rimarkis, ke ĉe pli forta rememorado pri la fizikaj travivaĵoj reaperadis la angoro, la timo antaŭ la nekonataĵo, la ĉagreno pro mia neadaptiĝo al la nova medio. Malgraŭ ĉio ĉi mi konstatis en mi pli da firmeco.

Mi nun plezuris rigardante la vastajn horizontojn, antaŭen klinita ĉe la larĝaj fenestroj. Impresis min precipe la aspektoj de la Naturo. Preskaŭ ĉio estis plibonigita refiguraĵo de la Tero. Koloroj inter si pli harmoniaj, substancoj pli delikataj. La grundon tapiŝis vegetaĵaro. Grandaj arboj, riĉaj fruktarbejoj, ĉarmaj ĝardenoj. Konturiĝis montoj kronitaj de lumo, kiel kontinuaĵo de la kampo, kie la kolonio kuŝis. Ĉiuj sekcioj montriĝis plej zorge kulturitaj. En negranda distanco staris graciaj konstruaĵoj, en diversaj formoj, laŭ egalaj interspacoj inter si. Neniu el ili sen floroj ĉe la enirejo; distingiĝis kelkaj ĉarmaj dometoj, ĉirkaŭitaj de heĝoj el hederroj, kie plurvariaj rozoj, tie kaj tie, estis en plena florado, ornamente la verdaĵon per kalejdoskopaj nuancoj. Birdoj kun multkoloraj plumaroj traflugis la aeron; iam kaj iam pli arope eksidis sur la tre blankaj, rekte leviĝantaj turoj, kvazaŭ gigantaj lilioj, sin streĉantaj al la ĉielo.

De ĉe la larĝaj fenestroj mi scivole observis la movadon en la parko. Treege surprizite, mi vidis hejmajn bestojn inter foliriĉaj arboj, vice starantaj ĉe la fundo.

En mia introspekta batalado mi perdiĝis en ĉiaspekaj demandoj. Mi ne povis kompreni tiun plurecon de formoj analogaj al tiuj sur nia planedo, pro tio, ke mi troviĝas en ĝustadire spirita regiono.

Lizio, la ĝentila ĉiutaga kunulo, ne ŝparis klarigojn.

La morto de la korpo, li diradis, ne kondukas la homon en ian miraklan situacion. Ĉia evolua proceso estas nepre ligita kun ia gradigado. Ekzistas multoblaj regionoj por la elkarniĝintoj, same kiel sennombraj kaj surprizaj rangoj por la homoj en la karno. Animoj kaj sentoj, formoj kaj aĵoj, ĉio obeas principojn de natura disvolviĝado kaj justa hierarĥio.

Maltrankviligis min tamen jam de multe da semajnoj restadi tie, en sanparko, ne vizitata eĉ de unu konato en la mondo. Efektive, mi ja ne estis la sola inter mia amikaro, kiu deĉifris la enigmon de la tombo. Miaj gepatroj antaŭiris min sur la granda vojo. Tiel same pluraj amikoj iam venis pli frue ol mi. Kial do ili sin ne prezentis en tiu ĉambro de spirita malsano, por faciligi mian dolorantan koron? Sufiĉus iaj nemultaj momentoj de konsolado.

Unu tagon mi ne povis min regi plu kaj demandis la diligentan servanton:

— Mia kara Lizio, ĉu vi trovas ebla, ĉi tie, la renkontiĝon de iu kun la homoj, lin antaŭintaj per la morto de la fizika korpo?

— Kial do ne? Ĉu vi pensas, ke vi estas forgesita?

— Jes. Kial ili ne vizitas min? Sur la Tero mi ĉiam havis la patrinan abnegacion; tamen mia patrino ĝis nun ne venis al mi. Ankaŭ mia patro ekiris la longan vojon, tri jarojn antaŭ mia lasta translokiĝo.

— Nu, bone notu al vi — klarigis Lizio —, via patrino vin tage kaj nokte helpadas, komencante de la krizo antaŭ via veno ĉi tien. Kiam vi enlitiĝis, por demeti la teran vestaĵon, duobliĝis ŝia interesiĝo pri vi. Vi kredible ankoraŭ ne scias, ke vi restadis en la malsuperaj regionoj pli ol ok seninterrompaj jarojn. Ŝi neniam senkuraĝiĝis. Ŝi multajn fojojn propetis por vi en “Nia Hejmo”. Ŝi petis pri la interhelpo de Klarenco, kaj tiam ĉi tiu komencis vin ofte vizitadi, ĝis la vanta surtera

kuracisto iom forviŝiĝos mem, por ke estiĝu la filo ĉiela. Ĉu vi komprenis?

Miaj okuloj estis malsekaj de larmoj. Mi ne sciis, de kiom da jaroj mi troviĝas for de la Tero. Mi ekdeziris konatiĝi kun la procedoj de neperceptebla protektado, sed ne sukcesis. La pene retenataj larmoj min mutigis.

— En tiu tago, kiam vi tiel fervore preĝis — daŭrigis la flegisto-vizitisto —, kiam vi ekkomprenis, ke ĉio en la Universo apartenas al la Plejalta Patro, tiam via ploro estis alia. Ĉu vi ne scias, ke estas tiaj pluvoj, kiuj detruas, kaj tiaj pluvoj, kiuj kreas? Ankaŭ tiaj larmoj ekzistas. Estas evidente, ke la Sinjoro ne atendas pri niaj petoj, por ami nin; tamen ni devas ja havigi al ni certan ricevokapablon, por kompreni Lian senliman bonecon. Fulgigita spegulo ne reflektas lumon. Nia Patro do ne bezonas nian pentofaron, sed ni konfesu, ke pentofaroj bonege utilas al ni mem. Ĉu vi komprenis? Elaŭdante la petojn de via amanta patrino, Klarenco vin senpene trovis, sed vi longe ne trovis Klarencon. Kaj kiam via patrineto eksciis, ke ŝia filo disŝiris la ombrajn vualojn dank' al preĝo, ŝi, kiel oni raportis al mi, ekploris de ĝojo...

— Sed kie sin trovas mia patrino? — mi fine ekkriis. — Se estas al mi permesite, mi volas ŝin vidi kaj ĉirkaŭbraki, stariĝi genue ĉe ŝiaj piedoj!

— Ŝi vivas ne en “Nia Hejmo” — diris Lizio —, sed en pli alta regiono, kie ŝi laboras ne sole por vi.

Rimarkinte mian desapontiĝon, li per frata voĉo aldonis:

— Ŝi certe iam venos vidi vin pli frue, ol kiam ni tion supozas. Kiam iu varme deziras ion, tio jam iras la vojon de efektiviĝo. Ĉi tion vi lernis mem. Jaroj post jaroj vi turnopelis vin simile al plumo, nutrante timon, malĝojojn, elreviĝojn; sed, kiam vi korpigis en via menso la bezonon ricevi la Dian subtenon, tiam vi pliigis la vibramplekson de la menso kaj atingis vidkapablon kaj helpon.

Kun brilantaj okuloj, kuraĝigita de la ricevita klarigo, mi decideme ekkriis:

— Mi ĝin do deziras per ĉiuj miaj fortoj... ŝi venos, ŝi ja venos...

Lizio inteligente ridetis kaj, amike avertante, sentence parolis, adiaŭante min:

— Estas grave ne forgesi, ke la realigo de io digna postulas la kontentigon de tri fundamentaj kondiĉoj, nome: unua, deziri; dua, scii deziri; kaj tria, meriti, aŭ alivorte, aktiva volo, persista laboro kaj efektiva merito.

La vizitisto ridetante atingis la pordon kaj foriris, dum mi restis silenta, meditante pri la vasta programo formulita per tiel malmultaj vortoj.

VIII

ORGANIZADO DE SERVOJ

Post kelkaj semajnoj da intensa kuracado, mi eliris, la unuan fojon, en akompano de Lizio.

La spektaklo de la stratoj min forte impresis. Vastaj avenuoj, ornamitaj de foliriĉaj arboj. Aero pura, atmosfero de profunda spirita trankvileco, sed nenia senmoveco aŭ senfareco: la stratoj estis plenaj de homoj. Multenombraj estuloj iradis tien kaj reen. Iuj laŭŝajne havis sian menson ie malproksime, sed aliaj direktis al mi bonvenan rigardon. Ĉe la sinsekvaj surprizaj aperoj mia kunulo prenis sur sin la taskon doni al mi informojn. Rimarkinte miajn internajn konjektojn, li afable klarigis:

— Ni troviĝas en la kvartalo de la Ministerio de Helpo. Ĉio ĉi, kion ni vidas, loĝejoj kaj aliaj konstruaĵoj, estas institucioj kaj aziloj alkonformaj al la tasko de nia fako. Orientistoj, laboristoj kaj aliaj servantoj de nia misio loĝas ĉi tie. En ĉi tiu fako oni akceptas malsanulojn, aŭdas petojn, dispecigas preĝojn, preparas surterajn reenkarniĝojn, organizas taĉmentojn por helpo al la loĝantoj de la Ombrejo aŭ al la plorantoj sur la Tero, serĉas solvon por ĉiaj aferoj koncernantaj suferon.

— Ĉu do ekzistas, en “Nia Hejmo”, ia Ministerio de Helpo? — mi demandis.

— Kiel do ne? Niaj servoj estas distribuataj en organizaĵo, kiu de tago al tago perfektiĝas sub la orientado de la direktantoj de niaj destinoj.

Fiksante sur mi siajn klarajn okulojn, li daŭrigis:

— Ĉu vi ne vidas, en la ceremonioj de preĝado, nian

Spiritan Guberniestron ĉiam ĉirkaŭita de sepdek du kunlaborantoj? Tio estas ja la ministroj de “Nia Hejmo”. La kolonio, organizaĵo esence de laboro kaj farado, dividiĝas en ses ministeriojn, el kiuj ĉiu estas gvidata de dek du ministroj. Ni havas la Ministeriojn de Regenerado, de Helpo, de Komunikado, de Klarigo, de Altigo kaj de Dia Unuigo. La unuaj kvar alproksimigas nin al la teraj regionoj, la lastaj du ligas nin al la supera sfero. Ĉar nia spirita urbo estas regiono transiĝa. La malplej delikataj servoj apartenas al la Ministerio de Regenerado la plej altaj al tiu de Dia Unuigo. Klarenco, nia amika estro, estas unu el la ministroj de Helpo.

Uzante la naturan paŭzon, mi kortuŝita ekkriis:

— Ho, mi neniam imagis al mi, ke estus eblaj tiaj kompletaj organizaĵoj post la morto de la fizika korpo!

— Jes — klarigis Lizio —, la iluziovalo estas tre densa en la rondoj de la karno. La ordinaramensa homo ne scias, ke ĉia manifestiĝo de ordo, en la mondo, venas de supera regiono (*). La kruda Naturo, kiam direktata de la homa menso, aliĝas en ĝardenon, kaj la homa menso, sovaĝa en la primitiva estulo, ŝanĝiĝas en kreantan potencialon, kiam inspirata de la mensoj, vibrantaj en pli altaj sferoj. Sur la tera krusto konkretiĝas nenia utila entrepreno, se ĝiaj originaj radioj ne venas de supre.

— Sed, ĉu ankaŭ “Nia Hejmo” havas ian historion, kiel la grandaj urboj de la Tero?

— Jes, sendube. Ankaŭ la tavoloj (**), najbaraj al la terglobo havas apartan karakteron. “Nia Hejmo” estas institucio antaŭ longe fondita de eminentaj portugaloj, elkarniĝintaj en Brazilo, en la 16-a jarcento. Komence, kiel registrite en niaj arkivoj de la Ministerio de Klarigo, tio kostis grandegan, fortokonsumantan penon. Ekzistas krudaj substancoj en la regionoj nevideblaj por la Tero,

(*) Laŭ I. Korintanoj, 2:14: “La natura homo ne akceptas la aferoj de la Spirito de Dio.” — *La Trad.*

(**) *Tavoloj*: regionoj, kvazaŭ kuŝantaj unu sur alia en la Spaco, kompareblaj kun la geologiaj “etaĝoj” — *La Trad.*

tiaj, kiel en la regionoj, kies trajto estas la maldelikata materio. Ankaŭ ĉi tie sin trovas vastegaj etendaĵoj kun malsupera potencialo, same kiel, sur la Tero, estas grandaj spacoj ankoraŭ sen ia kulturo kaj civilizacio. La komencaj laboroj estis senkuraĝigaj, eĉ por la plej fortaj spiritoj. Kie hodiaŭ kunestas delikataj, noblaj vibroj, arte ellaboritaj konstruaĵoj, tie zumis konfuzo la primitivaj notoj de la landindigenoj kaj la infancaj konstruaĵoj de iliaj rudimentaj mensoj. La fondintoj tamen ne senkuraĝiĝis. Ili peladis ĉiam antaŭen sian verkon, imitante la klopodon de la eŭropanoj, kiuj venadis al la materia sfero, nur kun tiu diferenco, ke tie oni uzis perforton, militon, sklavigon, kaj ĉi tie persistan servadon, fratan solidarecon, spiritan Amon.

En ĉi tiu momento ni estis sur placo kun mirindaj konturoj kaj vastaj ĝardenoj. Sur la centro de tiu placo staris impone bela palaco, kronita de majestaj turoj, kiuj sin streĉis en la ĉielon ĝis nevidebleco.

— La fondintoj de la kolonio komencis sian laboradon de ĉi tie, kie funkcias la Guberniestrejo — diris la vizitisto.

Montrante en direkto al la palaco, li daŭrigis:

— El ĉi tiu placo disradias la diritaj ses ministrejoj. Ili ĉiuj komenciĝas de la Guberniestrejo, etendiĝante en triangula formo.

Kaj respektoplena li parolis:

— Tie loĝas nia sindonema direktanto. En la administraj laboroj li havas la kunhelpon de tri mil oficistoj; li tamen estas la plej senlaca laboranto kaj pli fidela, ol ni ĉiuj kune. La ministroj kutimas ekskursi en aliajn regionojn, refreŝigante siajn fortojn kaj pliriĉigante sian kapitalon da scioj; ni, subuloj, ĝuas ordinarajn amuziĝojn, sed la Guberniestro neniam disponas tempon por tio. Li insistas ĉe ni, ke ni ripozu, devigas nin havi periodajn feriojn, dum li mem preskaŭ neniam ripozas, eĉ en la horoj difinitaj por dormo. Ŝajnas al mi, ke lia fiero estas la konstanta servado. Sufiĉu al mi diri, ke mi troviĝas ĉi tie jam de kvardek jaroj, kaj, esceptinte la kunvenojn por la kolektivaj preĝoj, mi lin malofte vidas en publikaj festoj. Lia penso tamen ampleks-

as ĉiujn servokampojn, lia bonkora helpo ĉion kaj ĉiujn atingas.

Post longa paŭzo la amika flegisto akcente aldonis:

— Antaŭ nelonge ni festis la 114-an datrevenon de lia milda direktado.

Post ĉi tiuj vortoj, tra kiuj vidiĝis plej profunda estimo kaj kortuŝiteco, Lizio eksilentis; kaj mi, apud li, respektoplena kaj ravita, ekrigardadis la mirindajn turojn, kiuj ŝajnis trabori la firmamenton...

IX

PROBLEMO DE NUTRADO

Ravite de la vido de tiuj miregindaj ĝardenoj, mi petis la sindoneman flegiston kelke da minutoj ripozi sur proksima benko. Lizio volonte konsentis.

Agrabla sento de paco feliĉigis mian spiriton. Fantaziaj ŝprucaĵoj el kolora akvo zigzagadis en la aero, formante ĉarmajn figurojn.

— Kiu observas ĉi tiun grandegan abelaron da laborantoj — mi diris —, tiu estas instigata ekzameni multenombrajn problemojn. Kaj nutraĵoj? Mi ne aŭdis pri ia ministerio de Ekonomio...

— Antaŭe — klarigis mia pacienca interparolanto — tiaj servoj havis pli elstaran karakteron, sed la nuna Guberniestro decidis iom paligi ĉiajn vivelmontrojn, kiuj rememorigus al ni la pure materiajn agojn. La laboroj por manĝoprovizado estis sekve reduktitaj al simpla distribuado, sub rekta kontrolado de la Guberniestraro. Cetero, tia decido estis plej benefika paŝo. Laŭ la kroniko, la kolonio, antaŭ unu jarcento, renkontis grandegajn barojn por alkonformigi siajn loĝantojn al sobereco. Multaj el tiuj ĵus venintaj al “Nia Hejmo” duobligis siajn postulojn: ili volis abunde kovritajn tablojn, ekscitajn drinkaĵojn, pluigante enradikiĝintajn surterajn malvirtojn. Nur la Ministerio de Dia Unuigo ne estis infektita de tiaj malbonaj kutimoj dank’ al sia propra karaktero; la ceteraj baraktadis en amaso da premantaj problemoj tiaspecaj. La nuna Guberniestro tamen ne ŝparis al si penojn. Apenaŭ preninte sur sin administrajn devojn, li faris konvenajn disponojn. Iamaj ĉi tieaj misiistoj sciigis min pri kuriozaj okazaĵoj. Ili diris al mi, ke, laŭ

peto de la Guberniestro, venis el tre alta mondo ducent instruistoj, por dissemi novajn konojn, koncernantajn al la scienco pri spirado kaj ensorbado de vivo-elementoj el la atmosfero. Okazis multenombraj kunvenoj. Kelkaj teknikaj kunlaborantoj en "Nia Hejmo" manifestis sian malaprobbon, prezentante kiel motivon, ke la urbo estas transiĝa loko kaj do ne estus juste nek eble, per tiaj postuloj, tuj elpreni el ilia elemento la elkarniĝintajn homojn sen grava risko por ilia spirita strukturo. La Guberniestro tamen ne senkuraĝiĝis. La kunvenoj, la paŝoj, la klopodoj daŭradis plue, dum tridek seninterrompaj jaroj. Kelkaj eminentuloj eĉ publike protestis. Pli ol dek fojojn la Ministerio de Helpe estis superplena de malsanuloj, plendantaj, ke ili estas viktimoj de la nova sistemo de nesufiĉa nutrado. Dum tiuj fazoj la kontraŭantoj al tia malpliigo multoblis akuzojn. Sed la Guberniestro neniam iun punis. Li venigis al sia palaco tiujn kontraŭantojn kaj patre elvolvis antaŭ ili la planon kaj celon de la dieto; li reliefigis la superecon de la spiritigo-metodoj, faciligis al la plej obstinaj malamikoj de la nova procedo diversajn studekskursojn en tavolojn pli altajn ol nia, kaj tiel li gajnis pli grandan nombron da adeptoj.

Ĉe pli longa paŭzo mi petis, interesita:

— Bonvolu daŭrigi, mia kara Lizio. Kiel finiĝis la edifa lukto?

— Post dudek unu jaroj da persistaj pruvoj, faritaj de la Guberniestro, la Ministerio de Altigo aliĝis al la movado kaj ekprovizis sin nur per tio nepre necesa. Tiel ne agis la Ministerio de Klarigo, kiu longe ne volis preni sur sin ian ŝuldiĝon en ĉi tiu rilato, pro la multenombraj Spiritoj, tie sin donantaj al Matematiko. Tie estis la plej obstinaj kontraŭuloj. Kvazaŭ maŝinoj, manipulantaj proteinojn kaj karbonhidratojn, kiuj neniel devas manki al la fizikaj animportiloj^(*), ili ne volis cedi al la ĉi tiea punkto de vidadado pri la afero. Ili ĉiu-

^(*) *Animportilo*, t.e. la surtera materia korpo — *La Trad.*

semajne sendadis al la Guberniestro longajn rimarkojn kaj admonojn, kune kun analizoj kaj ciferoj, kio iafoje eĉ ĝislimis senprudentecon. La maljuna estro neniam tamen agis per si mem. Li petis kunhelpon de noblaj mentoroj, kiuj nin gvidas per la Ministerio de Dia Unuigo, kaj ĉian klarigobultenon, eĉ plej malgravan, li detale ekzamenadis. Dum la scienculoj argumentis kaj la Guberniestraro pacience tratoleris la situacion, fariĝis danĝeraj tumultoj en la iama Departemento, hodiaŭ Ministerio de Regenerado. Kuraĝigite de la ribeleco de la kunlaborantoj ĉe Ministerio de Klarigo, la malpli progresintaj Spiritoj, tien akceptitaj, fordoniĝis al kondamndaj manifestacioj. Ĉio ĉi naskis gravajn skismojn en la kolektivaj organoj de “Nia Hejmo”; tio donis okazon por danĝera atako de la nigraj legioj el la Ombrejo, kiuj provis invadi nian urbon, profitante de breĉoj en la servoj de Renegerado, kie granda nombro da kunlaborantoj subtenadis kaŝitan interŝanĝon de ideoj pro neĝusta dieto. Ĉe la krio de alarmo la Guberniestro ne konfuziĝis. Teruraj minacoj ŝvebis super ĉiuj. Li petis aŭdiencon ĉe la Ministerio de Dia Unuigo kaj, aŭdinte nian plej altan Konsilantaron, ordonis kelkatempe fermi la Ministerion de Komunikado, decidis, ke funkciu ĉiuj karceroj en la sfero de la Ministerio de Renegerado, por ke estu izolitaj la obstinaj kontraŭstarantoj, admonis la Ministerion de Klarigo, kies impertinentaĵojn li elportis dum pli ol sinsekvaj tridek jaroj, provizore malpermesis ĉian helpon al la malsuperaj regionoj, kaj, la unuan fojon dum sia adminstrado, ordonis ŝalti la elektrajn bateriojn de la urbaj muregoj, por la disjetado de magnetaj pikradioj, uzataj por la komuna defendo. Ne fariĝis batalo, nek ofensivo de la kolonio, sed energia rezistado. Dum pli ol ses monatoj la nutrado, en “Nia Hejmo”, estis sole nur enspirado de vivo-elementoj el la atmosfero kaj akvo miksitaj kun sunaj elektraj kaj magnetaj elementoj. La kolonio tiam eksciis, kio estas indigno de nekolerema kaj justa spirito. Kiam finiĝis la plej akuta fazo, la Guberniestraro estis gajninta la venkon. La Ministerio de Klarigo mem rekonis sian eraron kaj kunhelpis en la laboroj por realĝustigo. Tiam

manifestiĝis popola ĝojego; oni rakontas, ke, meze en tiu ĝojo de ĉiuj, la Guberniestro ploris emociita kaj diris, ke la senescepta kompreno estas la Vera premio al lia koro. La urbo revenis al sia normala aktiveco. La antaŭa Departamento de Regenerado estis ŝanĝita en Ministerion. De tiam pli granda provizado de nutraĵoj, rememorigantaj la Teron, estas farata nur en la Ministerioj de Regenerado kaj de Helpo, kie ĉiam sin trovas multe da estuloj, bezonantaj tiajn nutraĵojn. En la ceteraj oni donas nur tion nepre necesan, t.e. la nutrado severe obeas al netranspaŝebla sobereco. Nun ĉiuj konfesas, ke la laŭŝajna kaprico de la Guberniestro estis ja gravega paŝo por nia spirita liberiĝo. Malpliigi la karaktero pure materia kaj estiĝis mirinda havo spirita.

Lizio eksilentis, kaj mi enabismiĝis en profundan meditado pri tia grandvalora leciono.

EN LA ARBARO DE LA AKVOJ

Ĉe mia ĉiam kreskanta interesiĝo pri la nutroprocedoj Lizio faris al mi jenan inviton:

— Ni iru al la akvuĝejo de la kolonio. Vi tie vidos interesajn aferojn. Vi vidos, ke akvo estas kvazaŭ esenca elemento en nia transiĝa stacio.

Plej scivola, mi senhezite akompanis la flegiston.

Kiam ni venis al vasta angulo de la placo, la nobla amiko diris:

— Ni atendu la aerobuson (*).

Mi apenaŭ rekonsciigis el tia surprizo, kiam jen ekaperis granda veturilo, kuranta super la grundo proksimume kvin metrojn alte kaj jam kun multe da pasaĝeroj. Kiam ĝi malsuprenvenis ĝis ni, simile al lifto, mi ĝin atente ekzamenis. Tio ne estis ia maŝino konata sur la Tero. Ĝi estis longega, el tre fleksebla materialo, kaj laŭŝajne ligita al nevideblaj fadenoj, pro la granda nombro da antenoj fiksitaj al la tegmento. Ĉi tiun mian supozon mi vidis poste konfirmita, kiam mi vizitis la grandajn laborejojn de la Servado de Trafiko kaj Transportado.

Lizio ne lasis al mi tempon por demandoj. Nin oportune aranĝinte en la komforta veturilo, ni silente ekiris. Posedis min la natura timemo de iu ekster sia propra medio, inter nekonatoj. La rapideco estis tia, ke ĝi ne ebligis observi detalojn de la konstruaĵoj, vice starant-

(*) Granda aertransportilo, memoriganta la ŝnurfervojn sur la Tero. — *Noto de la Aŭtoro.*

aj tra longa vojo. La distanco estis ne malgranda, ĉar nur post kvardek minutoj, enkalkulante nedaŭrajn haltojn ĉiujn tri kilometojn, Lizio, ridanta kaj trankvila, invitis min elveturiĝi.

Ravis min la panoramo kun plej admirindaj belaĵoj. La arbaro, en mirinda florado, parfumis la freŝan venton per ebbriiga parfumo. Ĉion pompe superverŝis mildaj koloroj kaj lumoj. Inter bordoj tapiŝitaj de sukriĉa herbo, tute punktita de bluetaj floroj, fluis riverego. La akvoj ruliĝis kviete kaj estis tiel kristalklaraj, ke dank' al la rebrilo de la firmamento ili ŝajnis ĉielblue koloraj. Larĝaj vojoj tratranĉis la verdejon. Starante en egalaj interspacoj, foliriĉaj arboj donis plaĉan ombbron, kvazaŭ agrablegaj restadejoj en la heleco de revigliga suno. Benkoj kun fantaziaj formoj invitis al ripozo.

Rimarkinte mian ravitecon, Lizio klarigis:

— Ni troviĝas en la Arbaro de la Akvoj. Ĉi tio estas unu el la plej belaj regionoj de “Nia Hejmo”. Ĝi estas unu el la lokoj, plej volonte vizitataj de geamantoj, kiuj ĉi tien venadas, por teksu la plej ĉarmajn promesojn de amo kaj fideleco, sin preparante por la surteraj provoj.

Ĉi tiu informo vekis en mi la deziron fari tre interesajn konsiderojn, sed Lizio ne donis al mi oportunon por demandoj pri tio. Montrante grandegan konstruaĵon, li klarigis:

— Tie kuŝas la akvuĵego de la kolonio. La tuta akvo de la Blua Rivero, kiun ni vidas, estas kolektata en distribuajn uĵegojn. La akvo uzata por ĉiuj laboroj de la kolonio ekfluas tuta de ĉi tie. Poste tiuj branĉoj reunuiĝas, malsupre de la tereno de Regenerado, kaj denove estigas la riveron, kiu tiam normale fluas direkte al la granda oceano el substancoj nevideblaj por la Tero.

Rimarkinte mian demandan mienon, li aldonis:

— Efektive, la ĉi tiea akvo havas alian densecon. Ĝi estas multe pli subtila kaj pura, kvazaŭ fluideca.

Vidante la belegajn konstruaĵojn, antaŭ mi starantajn, mi demandis:

— Kian ministerion koncernas la distribuado?

— Kredu — diris Lizio —, ke ĉi tiu estas unu el

la malmultaj materiaj servoj de la Ministerio de Dia Unuigo!

— Kio! — mi ekkriis, ne sciante, kiel interkonsentigi ĉi tiujn du aferojn.

La vizitisto ridetis kaj plezure rediris:

— Sur la Tero preskaŭ neniu serioze donas al si la penon ekkoni la gravecon de la akvo; sed en “Nia Hejmo” aliaj estas la scioj. En la religiaj rondoj de la Tero oni instruas, ke la Sinjoro kreis la akvojn. Nu, estas logike, ke ĉia kreita servado bezonas fortojn kaj brakojn, por esti konvene tenata. En ĉi tiu spirita urbo ni lernas danki nian Patron kaj Liajn kunlaborantojn por tia dono. Ĝin pli interne konante, ni scias, ke la akvo estas el plej potencaj portiloj de ĉiaspecaj elementoj. Ĉi tie ĝi estas uzata precipe kiel nutraĵo kaj medicamento. Ekzistas fakoj en la Ministerio de Helpo, sin absolute dediĉantaj al la preparado de akvo pura, per almikso de certaj elementoj kaptablaj el la lumo de la suno kaj el la spirita magnetismo. En la plimulto de la regionoj de nia vasta kolonio la nutrado havas kiel bazon ĝuste ĉi tiun principon. Sed nur la ministroj de Dia Unuigo posedas, inter ni, la plej altan gradon de supera spiriteco, kaj tial koncernas ilin la magnetizado de la tuta Blua Rivero, por ke ĝia akvo estu uzata de ĉiuj loĝantoj de “Nia Hejmo” en tia pureco kiel nepre necese. Ili faras la komencan purigadon kaj la institutoj plenumas specifajn laborojn, por la liverado de nutraj kaj kuracaj substancoj. Kiam la multaj branĉoj de la fluo reunuigās, en malproksima loko trans ĉi tiu arbaro, tiam la rivero foriĝas de nia regiono, kunportante niajn spiritajn ecojn.

Mi estis ravita de ĉi tiuj informoj.

— Sur la Tero — mi rediris — mi neniam ricevis tiajn sciojn.

— La homo estas neatentema — diris Lizio —; jam de multaj jarcentoj la maro tenadas ekvilibron en lia planeda loĝmedio, la akva elemento havigas al li la fizikan korpon, la pluvo donas al li panon, la rivero organizas lian urbon, la ĉeesto de la akvo estas kiel beno por lia hejmo kaj laboro; tamen li sin ĉiam opinias la absoluta

sinjoro de la mondo, forgesante, ke, antaŭ ĉio, li estas filo de la Plejsupra. Sed venos tempo, kiam li kopios niajn servojn, alte konsiderante la gravecon de tiu dono de la Sinjoro. Li tiam komprenos, ke la akvo, kiel kreanta fluido, ensorbas en ĉiu hejmo la mensajn karakterizaĵojn de ĝiaj loĝantoj. La akvo en la mondo, mia amiko, forportas ne nur la restaĵojn de la korpoj, sed ankaŭ la esprimojn de niamensa vivo. Ĝi estas malbonfara en manoj malicaj, utila en manoj noblaj, kaj, kiam sin movanta, ĝia fluo ne sole disdonas vivobenojn, sed estas ankaŭ portilo de la Dia Providenco, en sin prenante amaraĵojn, malamojn kaj afliktojn de la homojn, lavante ilian materian domo kaj purigante ilian internan atmosferon.

En respekta sintenado mia interparolanto eksilentis, kaj miaj okuloj restis longe fiksitaj sur la kvieta fluo, kiu naskis en mi plej altajn pensojn.

XI

INFORMOJ PRI LA ORGANIZADO

Mia nobla kamarado volonte havigus al mi la eblon fari observojn en la diversaj kvartaloj de la kolonio, sed urĝaj devoj revokis lin al lia posteno.

— Vi ja havos okazon ekkoni la diversajn sferojn de niaj servoj — li bonkore diris —, ĉar, kiel vi rimarkas, la ministerioj de “Nia Hejmo” estas grandegaj ĉeloj de intensa laborado. Iaj kelkaj tagoj da observado tute ne sufiĉas por detala vido eĉ de unu el ili; sed okazon por tio vi ja iam havos. Eĉ se al mi ne estos eble akompani vin, tamen Klarenco estas sufiĉe aŭtoritata, por ke vi ricevu permeson por facila eniro en ĉian ajn fakon.

Ni revenis al la loko, kie preterpasadis la aerobuso, kiu ne lasis sin atendi.

Nun mi sentis min pli hejme, la multo da pasaĝeroj ne ĝenis min; la antaŭa sperto treege bonfaris al mi. Bolis mia cerbo per demandoj utilaj al mi. Ĉar min interesis ilia respondo, mi tial profitis tiun minuton, por kiel eble uzi la komplezemon de mia kunulo.

— Lizio, amiko — mi demandis —, ĉu vi bonvolus informi min, ĉu ĉiuj spiritaj kolonioj estas identaj al ĉi tiu? Ĉu la samaj procedoj, la samaj karakterizaĵoj?

— Neniel. Se en la materiaj medioj ĉiu regiono kaj ĉiu institucio posedas apartajn trajtojn, imagu do al vi la multecon de kondiĉoj en la niaj. Ĉi tie, same kiel sur la Tero, la estuloj grupiĝas laŭ la komunaj originoj kaj la graveco de la celoj, kiujn ili devas trafi; sed oni atentu, ke ĉiu kolonio, kiel ankaŭ ĉiu estulo, staras sur ŝtupo diferencanta unu de alia en la longa suprenirado. Ĉiaj grupaj provoj estas inter si malsamaj, kaj “Nia Hejmo” estas tiaspeca kolektiva provo. Laŭ niaj arkivoj, niaj

antaŭirintoj ofte ĉerpis inspiron el laboroj de sindonemaj servantoj en aliaj sferoj; inverse de tio, aliaj grupoj petas nian helpon por formi novajn koloniojn. Sed ĉiu organizaĵo ja prezentas esencajn apartaĵojn.

Rimarkinte pli daŭran paŭzon, mi demandis:

— Ĉu ja ĉi tie naskiĝis la kurioza ideo estigi iajn ministeriojn?

— Jes, la misiuloj, komisiitaj por la fondo de “Nia Hejmo”, vizitis la laborojn en “Nova Aŭroro”, unu el la plej gravaj spiritaj kolonioj najbaraj al nia, kaj tie vidis la klasifikon de tiuj laboroj laŭ departementoj. Ili alprenis tian sistemon, sed anstataŭigis la vorton “departemento” per “ministerio”, esceptinte la regenerajn servojn, kiuj, nur sub la nuna Guberniestro, ricevis pli altan rangon. Ili agis tiele, konsiderante, ke la organizado laŭ ministerioj pli bone esprimas kaj difinas spiritecon.

— Tre bone! — mi ekkriis.

— Kaj tio ĉi ne estas ja ĉio — ĝentile daŭrigis la flegisto —; la institucio estas kerne severa rilate al ordo kaj hierarĥio. Nenia reliefa posteno estas ĉi tie kosentata kiel ia favoro. En la daŭro de dek jaroj nur kvar oficistoj sukcesis, kun difinita prirespondeco, eklabori en la Ministerio de Dia Unuigo. Ordinare ni ĉiuj, post longa provtempo da servado kaj instruado, reenkarigiĝas por perfektigo.

Dum mi kun prava sciemo aŭdis ĉi tiujn informojn, Lizio daŭrigis:

— Kiam la ĵusvenintoj el la Ombrejo montriĝas kapablaj ricevi fratan subtenon, ili longe restas en la Ministerio de Helpo; sed kiam ribelemaj, ili estas kondukataj en la Ministerion de Regenerado. Se ili vidigas ian profiton, kun la tempo ili estas enlasataj en la laborojn de la Ministerioj de Helpo, Komunikado kaj Klarigo, por sin efike prepari por estontaj surteraj taskoj. Nur kelkaj sukcesas daŭre servadi en la Ministerio de Altigo, kaj treege malmultaj, en ĉiu jardeko, partoprenas en la plej internaj laboroj de la Dia Unuigo. Kaj ne pensu, ke la atestoj estas iaj malprecizaj esprimoj de idealisma aktiveco. Ni jam ne troviĝas sur tiu terglobo, kie al la elkarniĝinto oni trudus la rangon de fantomo. Ni vivas

en rondo kun aktivaj pruvoj. La taskoj en la Ministerio de Helpo estas penigaj kaj komplikaj; la devoj en tiu de Regenerado estas tre pezaj atestoj; la laboroj en tiu de Komunikado postulas profundan komprenon pri individua respondeco; por la kampoj de tiu de Klarigo oni devas havi grandan laboremon kaj altajn intelektajn kvalitojn; en la Ministerio de Altigo estas necesaj abnegacio kaj posedo de Dia inspiro; la komisionoj en tiu de Dia Unuigo neprigas ĝustan konadon kaj sinceran praktikadon de la universa amo. La Guberniestrejo mem estas svarmanta sidejo de ĉiaj administraj sferoj; ĝi tenas multenombrajn servojn de rekta kontrolado, kiel ekzemple tiujn de nutrado, distribuado de elektra energio, trafiko, transportado kaj aliaj. Ĉi tie la leĝo pri ripozo estas ja severe observata, por ke iuj servantoj ne estu pli ŝarĝitaj ol aliaj; sed ankaŭ la leĝo pri laboro estas absolute litere plenumata. Koncerne al ripozo, la sola escepto estas la Guberniestro mem, kiu neniam faras uzon de sia rajto pri ĝi.

— Sed, ĉu li neniam eliras el la palaco? — mi demandis.

— Nur en tiuj okazoj, kiam ĝin postulas la publika bono. Ekster tia devo, la Guberniestro ĉiusemajne vizitas la Ministerion de Regenerado, fakon de “Nia Hejmo”, kie pli multe ekzistas da afekcioj dank’ al la identeco de sentoj inter multaj el la tieaj loĝantoj kaj la fratoj en la Ombrejo. Tie sin trovas grandega nombro da Spiritoj deflankiĝintaj de la ĝusta vojo. Li do profitas la dimanĉajn posttagmezojn, fininte la preĝon kune kun la urbo en la Granda Templo de la Guberniestrejo, por helpi al la ministroj de Regenerado, solvante iliajn malfacilajn labordemandojn. En ĉi tiu okupo li kelkfoje rezignas respektindajn ĝojojn, zorgante pri senkonsilaj kaj suferantaj Spiritoj.

En tiu momento ni elveturiĝis el la aerobuso proksime al la hospitalo, kie min atendis mia komforta ĉambro.

Sur la strato mem, same kiel ĉe nia foriro de tie, aŭdiĝis tra la aero belaj melodioj. Rimarkinte mian demandan mienon, Lizio frate klarigis:

— Ĉi tiuj muzikaĵoj venas el la laborejoj, kie servas la loĝantoj de “Nia Hejmo”. Post longa observado la Guberniestraro konkludis, ke muziko pliefikigas la laboron sur ĉiuj kampoj de konstrua penado. De tiam neniu laboras en “Nia Hejmo” sen tia ĝojostimulilo.

Dume ni venis al la Pordistejo. Ĝentila flegisto ekpaŝis al ni kaj diris:

— Frato Lizio, oni vokas vin en la dekstran pavilonon por urĝa servo.

Mia kunulo kviete foriris, kaj mi, dronante en demandoj al mi mem, direktis min al mia aparta ĉambro.

XII

LA OMBREJO

Ricevinte tiajn valorajn klarigojn, mi ardis de la deziro ekhavi pli detalajn sciaĵojn rilatajn al pluraj problemoj, kiujn vekis la parolo de Lizio. Lia aludo pri Spiritoj en la Ombrejo mordadis mian sciemon. La nekzisto de ia religia preparado, en la mondo, naskas en la homa menso turmentan konfuzon. Kio ja estas la ombrejo? Mi sciis nur pri ia infero kaj ia purgatorio, laŭ predikoj en la romkatolikaj ceremonioj, kiujn mi ĉeestis, observante konvencian normojn; sed pri tia Ombrejo mi neniam ion aŭdis.

Ĉe mia plej proksima renkontiĝo kun la nobla vizitisto mi lin tuj demandis pri tio. Lizio min ĝentile aŭdis kaj respondis:

— Nu, nu, vi tie restadis tiel longe, kiel do vi ĝin ne konas?

Mi rememoris la travivitajn suferojn kaj tiam min tutan trakuris tremo de teruro.

— La Ombrejo — li afable daŭrigis — komenciĝas sur la tera krusto. Ĝi estas la malluma regiono de ĉiuj, kiuj en la mondo ne volis trapasi la pordojn de la plenumendaj sanktaj devoj, sed restis en la valo de nedecidemo aŭ en la marĉo de multenombraj eraroj. Kiam iu Spirito reenkarniĝas, li promesas efektiviĝi la programon de servoj de la Patro; sed, refarante provojn sur la Tero, li tre malofte memoras sian promeson kaj inkliniĝas nur al tio, kio kontentigas lian egoismon: estas plue nutrataj la sama malamo kontraŭ malamikoj kaj la sama pasio por amikoj. Sed, nek malamo estas justeco,

nek pasio estas amo. Ĉia superfluaĵo, ĉio ne utile uzata, malutilas la ekonomion de la vivo. Nu: ĉiuj tiuj grandnombraj senprudentuloj longe restas en la nebulaj regionoj, sekvantaj la karnajn vibrojn. La plenumita devo estas pordo, kiun ni transiras en la Senlimo direkte al la sankta lando de unuiĝo kun la Sinjoro. Estas do nature, ke al homo, deturnanta sin de la devo, tute juste al li trudita, ĉi tiu beno estas prokrastata ĝis nedifinita tempo.

Rimarkinte, kiel malfacile mi sorbas la tutan enhavon de lia instruado danke mian preskaŭ absolutan sensciecon pri la spiritaĵaj principoj, Lizio penis fari la lecionon pli klara:

— Imagu al vi, ke ĉiu el ni, renaskiĝante sur la Tero, portas malpuran veston, por ĝin senmakuligi en la lavopelvo de la homa vivo. Tiu malpura vesto estas la kaŭzeca korpo, teksita de niaj propraj manoj en antaŭaj provoj. Sed, denove ĝuante tiun benon, la surteran oportunon, ni forgesas la esencan celon de tiu feliĉa okazo kaj, anstataŭ puriĝi, penante nin lavi, ni fariĝas ankoraŭ pli makulitaj, kreante al ni novajn ligilojn kaj katenante nin mem por efektiva sklaveco. Nu, se, revenante al la mondo, ni serĉis ian rimedon por forigi de ni la malpurecon, pro la nekonformeco de nia situacio kun la alta medio, kiel do reveni al ĉi tiu sama luma ejo en pli malbona stato? La Ombrejo funkcias do kiel regiono difinita por enkolektado de mensaj restaĵoj; ĝi estas ia purigejo, kie iom post iom forbrulas la putrinta materialo de la iluzioj, kiun la homo ricevis per unu fojo, malŝatante la altvaloran oportunon de ekzistado sur la Tero.

La figuro ne povus esti pli klara, pli konvinka.

Mian pravan miron mi ja ne povis kaŝi. Rimarkinte la bonfaran efikon de tiuj klarigoj sur mi, Lizio daŭrigis:

— La Ombrejo estas regiono treege interesa por la teranoj. Tie koncentriĝas ĉio per si mem sensignifa rilate la superan vivon. Notu al vi, ke la Dia Providenco saĝe agis, permesante la fondon de tia departemento najbare de la Tero. Ekzistas multenombraj legioj da nedecidemaj kaj sensciaj animoj, ne tiel malicaĵ, ke oni

ilin sendu en koloniojn de pli dolora revirtiĝo, nek tiel noblaj, ke oni ilin irigu en sferojn de plialtiĝo. Ili estas tutaj amasoj da loĝantoj de la Ombrejo, plej proksimaj kamaradoj de la enkarnuloj, de kiuj ilin apartigas nur vibroleĝoj. Ne estas do strange, ke la karaktero de tiaj lokoj estas granda menskonfuziteco. Tie vivas, kolektiĝas ĉiaspecaj erarintoj. Ili ankaŭ formas nevideblajn societojn, potencajn pro la koncentriĝo de ĝeneralaj inklinoj kaj deziroj. Ĉu multaj homoj sur la Tero ne memoras, ke ili incitiĝas, kiam la leterportisto ne venas aŭ la vagonaro malfruas? Nu, la Ombrejo estas plena de tiaj galhumoraj. Ĉar, post la morto de la materia korpo, ili ne trovas la Sinjoron preta obei iliajn kapricojn, kaj sentante, ke la krono de la vivo eterna estas la glora propraĵo de la laborantoj ĉe la Patro, tiuj homoj tial elmontras sian naturon kaj implikiĝas mem en bagatelajfoj. “Nia Hejmo” havas socion spiritan, sed tiuj aliaj societoj konsistas el ĉiaspecaj malfeliĉaj, maliciaj kaj senokupaj homoj. Tio estas medio de turmentistoj kaj viktimoj, de ekspluatistoj kaj ekspluatatoj.

Uzante la fariĝintan paŭzon, mi ekkriis, impresita de ĉi tiuj informoj:

— Kiel tion klarigi? Ĉu do tie ekzistas nenia defendo, nenia organizo?!

Mia kunparolanto ridetis kaj respondis:

— Organizo estas eco propra al sin organizintaj Spiritoj. Kiel alie povus esti? Tiu malsupera regiono, pri kiu mi parolas, similas domon, kiu panon ne havas: ĉiu tie kriegas, sed neniu pravas. Senatenta vojaĝanto ne atingas la vagonaron, terkulturisto ne seminta ne povas rikolti. Pri unu tamen estu certa: malgraŭ ĉiuj nuboj kaj afliktoj en la Ombrejo, tie neniam mankis la Dia protekto. Ĉiu Spirito tie restas tiel longe kiel necese. Por tio, mia amiko, la Sinjoro permesis la fondon de multe da kolonioj kiel ĉi tiu, destinitaj al la spiritaj laboroj kaj helpo.

— Mi do pensas — mi intermetis —, ke tiu regiono iel miksiĝas kun la homa medio...

— Jes — konfirmis la sindonema amiko —, kaj ĝuste en tiu regiono sin etendas la nevideblaj fadenoj, ligant-

aj inter si la homajn mensojn. Tiu tavolo estas plena de elkarnuloj kaj de pensoj-formoj de enkarnuloj, ĉar, vere, ĉiu Spirito, kie ajn li troviĝas, estas kerno elradianta fortojn, kiuj kreas, aliigas aŭ detruas, eksteriĝante per vibroj, kiujn la tera scienco nun ne povas kompreni. Kiu estas pensanta, tiu estas aliloke ion faranta. Ja per la penso la homoj renkontiĝas, en la Ombrejo, kun siaj samsentaj kamaradoj. Ĉiu animo estas potenca magneto. Ekzistas grandnombra estularo nevidebla post la homaro videbla. La misiularoj, plej diligente laborantaj ĉe la Ministerio de Helpe, konsistas el abnegaciaj servantoj en la Ombrejo; efektive, se la tasko de la fajrestingistoj en la grandaj teraj urboj estas malfacila pro la flamoj kaj ondoj da fumo, leviĝantaj kontraŭ ili, la misiuloj ĉe la Ombrejo renkontas pezegajn emanaĵojn, senĉese ĵetatajn de miloj da konfuzitaj mensoj, sin donantaj al la farado de malbono aŭ terure turmentataj ĉe la rebonigaj suferoj. Oni devas esti tre brava kaj tre abnegaciema, por helpi iun, kiu neniel komprenas la al li proponatan helpon.

Lizio eksilentis. Sub plej granda impresio, mi ekkriis:

— Ho! kiel forte mi deziras labori ĉe tiuj legioj da malfeliĉuloj, portante al ili la spiritan panon de klarigo!

La amika flegisto bonkore fiksitis sur mi sian rigardon kaj post longa silenta meditado, emfaze demandis, adiaŭante min:

— Ĉu vi ja sentas en vi la preparitecon nepre necesan por tia servado?



XIII

EN LA KABINETO DE LA MINISTRO

Ĉe ĉiam pli bona farto mi eksentis la bezonon de moviĝado kaj laboro. Post tiom da tempo, post malfacilaj jaroj de batalado, mi rricevis interesiĝon pri la okupoj, kiuj plenigas la utilan tagon de ĉiu ordinara homo en la mondo. Mi ne povis nei, ke mi perdis bonegajn oportunojn sur la Tero, ke multo da eraroj markis mian vojon. Nun mi rememoris la dek kvin jarojn de mia kuracista praktikado kaj sentis ian “malplenon” en la koro. Mi imagis min simila al diligenta terkultivisto sur la kampo, kun ligitaj manoj, ne povanta labori. Ĉirkaŭita de malsanuloj, mi tamen ne povis, kiel iam, alproksimiĝi, samtempe kiel amiko, kuracisto kaj scienca esploristo. Mi aŭdadis senĉesajn ĝemojn en la apudaj ĉambroj, sed al mi ne estis permesita eĉ la funkcio de flegisto kaj kunlaboranto en la okazoj de urĝa helpo. Kompreneble ne mankis al mi deziro por tio, sed mia pozicio tie estis tro humila, ke mi kuraĝu esprimi ĝin. La spiritaj kuracistoj uzis alian teknikon. Sur la Tero, mi sciis, mia rajto partopreni en tiaj laboroj komenciĝis en la konataj libroj kaj en la konkeritaj titoloj; sed en tiu nova medio la medicino naskiĝis en la koro kaj manifestiĝis en la formo de amo kaj frata prizorgado. Ĉia flegisto, eĉ el la plej simplaj, en “Nia Hejmo”, posedis konojn kaj kapablojn tre superajn ol mia tuta sciaro. Nerealigebla estis do ia ajn provo de laboro, por kiu mi proponus min mem, ĉar tio, laŭ mia opinio, estus enŝovigo en fremdan sferon.

En la reto da tiaj malfacilaĵoj, Lizio estis la ĝusta amiko por miaj konfidencoj de frato. Alparolite, li demandis:

— Kial vi ne petus la helpon de Klarenco? Li vin certe kontentigus. Petu lin pri konsiloj. Li ĉiam demandas pri vi kaj ĉion faros por vi.

Animis min granda espero. Mi ja konsultos la ministron de Helpo.

Sed, farinte la unuajn paŝojn al ĉi tiu celo, mi eksciis, ke mia grandanima bonfaranto povos akcepti min nur en la morgaŭa mateno, en sian apartan kabineton.

Kun senpacienco mi atendis la oportunan momenton.

En la sekvanta tago, frumatene, mi direktis min al la indikita loko. Sed kiel forte mi surpriziĝis, ekvidante, ke tri personoj tie atendas Klarencon en tia sama situacio kiel mi!

La ĝentila ministro alvenis longe antaŭ ni kaj nun donis atenton al aferoj pli gravaj, ol akceptado de vizitantoj kaj petoj.

Fininte tiun pli urĝan laboron, li komencis venigi nin duope. Impresis min tia maniero de aŭdienco, sed poste mi eksciis, ke li tiel agas, por ke lia parolo al iu interesato estu utila ankaŭ al aliaj; li do kontentigas ĝeneralan bezonon, ŝparas tempon kaj havigas profiton al ĉiuj.

Post multe da minutoj venis mia vico.

Mi eniris en la kabineton kune kun maljuna sinjorino, kiu laŭorde estis aŭdota la unua. La ministro nin afable akceptis kaj konsentis al ni plenan liberecon paroli.

— Nobla Klarenco — komencis mia nekonata kunulino —, mi venis peti pri via favoro por miaj du infanoj. Ho ve! mi ne povos plu elporti tian grandan resopiron, kaj mi eksciis, ke ili ambaŭ vivadas ekstreme lacaj kaj superŝarĝitaj per malfeliĉoj sur la Tero. Mi konfesas, ke la decidoj de la Patro estas justaj kaj devenantaj de amo, tamen mi estas patrino! Mi ne sukcesas liberigi min el sub la ŝarĝo de la angoro!

Kaj la kompatinda virino en tiu sama loko fandiĝis en abundajn larmojn. Turninte al ŝi amikan rigardon, kvankam konservante plu sian personan energion, la ministro milde respondis:

— Sed, se mia fratino konfesas, ke la decidoj de la Patro estas justaj kaj sanktaj, kion do mi faru?

— Mi dezirus — ŝi afliktita rediris —, ke vi havigu al mi rimedojn, por ke mi mem ilin protektu sur la Tero.

— Ha, mia amikino — afable diris la bonfaranto —, protekti iun ni povas nur kun la sento de humileco kaj laboro. Kiel ŝajnus al vi, se iu patro, sur la Tero, dezirus helpi siajn infanojn, tenante sin tute kviete en la hejma komforto? La Patro kreis servadon kaj kunlaboradon kiel leĝojn, kiujn neniu povas malobei sen malutilo al si mem. Ĉu la konscienco nenion al vi diras pri ĉi tio? Kiom da kuponhoroj ^(*) vi povas prezenti favore al via pretendo?

La alparolita virino respondis, hezitante:

— Tricent kvar.

— Bedaŭrinde — diris Klarenco, ridetante —, ĉar vi ĉi tie loĝas jam pli ol ses jarojn, kaj tamen ĝis hodiaŭ donis al la kolonio nur tricent kvar horojn da laboro. Tuj kiam vi revigliĝis el la doloroj travivitaj en mal-supera regiono, mi proponis al vi meritan laboron en la Gardistaro, de la Ministerio de Komunikado...

— Sed tio estis neelportebla laboro — ŝi intermetis —, senĉesa lukto kontraŭ maliculoj. Estis tute natura mia neadaptiĝo al ĝi.

Klarenco flegme daŭrigis:

— Poste mi lokis vin inter la Fratojn de Eltenado, en korektigaj taskoj.

— Pli malbone! — ekkriis la sinjorino. — Tiuj ĉambroj estas plenaj de fiuloj. Malĉasta parolo, senhontaĵoj, mizero...

— Rekoninte viajn embarasojn — diris la ministro —, mi sendis vin por servi ĉe la Flegado de Mensmal-sanuloj.

— Kiu ilin digestus, se ne sanktuloj? — demandis la ribelanta petantino. — Mi faris ĉion, kion mi povis; tamen tiu armeaĉo da deviintaj animoj ĉiun ajn konsternegas!

— Mia klopodado ne haltis tie — trankvile diris la

^(*) *Kuponhoro*: valorunuo rilata al ĉiu horo da servado. — *Noto de la Aŭtoro*.

bonfaranto —; mi lokis vin en la Kabinetojn de Imformiĝoj kaj Esploroj, de la Ministerio de Klarigo, kaj tamen, eble tedita de miaj paŝoj, mia fratino memdecide retiriĝis en la Kampejon de Ripozo.

— Ankaŭ tie restadi estis ne eble — diris la impertinenta virino —; mi tie renkontis nur konsumantajn provojn, strangajn emanaĵojn, krudajn estrojn.

— Nu, bone notu al vi, mia amikino — rimarkis la sindona kaj solida orientisto —: laboro kaj humileco estas la du bordoj de la vojo de helpo. Por iun helpi, ni bezonas fratojn, kiuj fariĝus niaj kunlaborantoj, amikoj, protektantoj kaj servantoj. Antaŭ ol subteni niajn amatojn, ni nepre devas fandi simpatio-ĉenojn. Sen kunlaborado estas ne eble efike servi. Kampulo, kulturanta la teron, ricevas dankon de tiuj, kiuj ĝuas la fruktojn. Laboristo, kiu komprenas siajn postulemajn estrojn, plenumante iliajn ordonojn, estas la apogilo de la hejmo, kiun la Sinjoro al li konsentis. Servanto, kiu obeas, konstruante, konkeras la koron de siaj superuloj, kamaradoj kaj interesatoj pri la ofico. Kaj nenia mezranga administranto povas esti utila al siaj amatoj, se li ne scias noble servi kaj obei. Estu la koro vundita kaj malhelpoj spertitaj, sed ĉiu sciu, ke utila servo apartenas, antaŭ ĉio, al la Universa Donanto.

Post negranda paŭzo li parolis plue:

— Kion vi do farus sur la Tero, se vi ankoraŭ ne lernis ion ajn elporti? Mi ne dubas pri via sindoneco por la karaj infanoj, sed mi rimarkigu, ke vi devus tie vivi kiel patrino, kiu pro paralizo ne kapablas doni konvenan helpon. Por ke homo ekhavu la ĝojon helpi siajn amatojn, estas necesa la partopreno de multaj, al kiuj li mem helpis. Kiu ne kunlaboras, kunlaboron ne ricevas: ĉi tio estas artikolo de leĝo eterna. Se mia fratino neniom da have kolektis al si, por iom doni, estas do juste peti la aman kontribuadon de aliaj. Sed, kiel vi ricevus la nepre necesan kunlaboradon, se vi ankoraŭ nenion semis, eĉ ne la nuran simpatian? Revenu do al la Kampejo de Ripozo, kien vi laste enfermiĝis mem, kaj meditu. Ni

post kelka tempo ekzamenos la aferon kun la atento, kiun ĝi postulas.

La maltrankvila patrino sidiĝis, forviŝante abundajn larmojn.

Poste la ministro fiksiĝis sur mi kompateman rigardon kaj parolis:

— Alproksimiĝu, mia amiko!

Hezitante, mi stariĝis, por konversacii.

XIV

KLARIGOJ DE KLARENCO

Vivege batis al mi la koro, kvazaŭ mi estus ia novico antaŭ severaj ekzamenantoj. Vidante tiun virinon en larmoj kaj konsiderante la serenan energion de la ministro de Helpo, mi tremis en mia interno, pentante, ke mi mem okazigis tiun aŭdiencon. Ĉu mi ne estus farinta pli bone, se mi silentus, lernante atendi decidojn de superuloj? Ĉu ne estas nekonvena pretendo peti pri oficado kiel kuracisto en tiu domo, kie mi ankoraŭ loĝis kiel malsanulo? La sincereco de Klarenco kontraŭ la min antaŭirinta fratino vekis en mi novajn rezonojn. Mi volis rezigni la hieraŭan deziron kaj reveni en mian ĉambron, sed tio estis jam ne ebla. Kvazaŭ divenante miajn plej profundajn intencojn, la ministro de Helpo per firma voĉo diris:

— Preta aŭdi vin.

Malgraŭ la min reganta ŝanceliĝo, mi instinkte ekpensis peti ian ajn kuracistan taskon en “Nia Hejmo”; tamen la konscienco avertis min: “Kial paroli pri iu faka tasko? Ĉu tio ne estus ripeti la homajn erarojn, laŭ kiuj la vantamo permesas nenian alian specon de laboro, ol tiun rilatan al la konvenciaj rajtoj de nobelecaj aŭ akademijaj titoloj?” Ĉi tiu penso ĝustatempe alportis ekvilibron al mia spirito. En forta konfuziteco mi parolis:

— Mi prenis al mi la liberecon veni ĉi tien peti vian influan aŭtoritaton, por ke mi rekomencu labori. Mi resopiras miajn profesiajn okupojn, nun, kiam la grandanimeco de “Nia Hejmo” rekondukis min en la benatan organisman harmonio. Ĉia ajn utila laboro interesas min, se nur ĝi liberigus min el neaktiveco.

Klarencio min longe rigardis, kvazaŭ esplorante miajn plej internajn intencojn.

— Mi komprenas. Buŝe vi petas ian ajn taskon, sed, en la profundo de la koro, vi sentas la mankon de viaj klientoj, de via kabineto, de la labormedio, per kiu la Sinjoro honoris vian personon sur la Tero.

Ĝis ĉi tie liaj vortoj estis fluoj da kuraĝigo kaj espero, kiujn mi ricevis en la koron kun jesantaj gestoj. Sed post pli longa paŭzo la ministro daŭrigis:

— Estas tamen grave rimarki, ke la Patro kelkfoje honoras nin per Sia konfido, kaj ni kripligas la verajn servotitolojn. Vi sur la Tero estis kuracisto, ĉirkaŭita de ĉiaj faciligoj sur la kampo de lernado. Vi neniam sciis la prezon eĉ de libro, ĉar viaj gepatroj, malavaraj, elspezadis por ĉiuj viaj bezonoj. Diplomite, vi tuj komencis ĉerpadi el via profesio ĝustan profiton; eĉ la malfacilaĵojn, kiajn renkontas malriĉa kuracisto, devanta helpi al si per la homa simpatio, por la medicina praktikado, vi ilin ne spertis. Vi prosperis tiel rapide, ke vi aliigis konkeritajn faciligaĵojn en kuradon al la tro frua morto de la korpo. En junaĝo kaj saneco vi faris senombrajn ekscesojn sur la laborkampo, kien Jesuo vin kondukis.

Antaŭ tiu samtempe rigida kaj milda rigardo, ekposedis min stranga konfuzo. Per respekta tono mi rimarkis:

— Mi konfesas la pravecon de viaj admonoj, sed, se eble, mi tamen ĝojus ricevi rimedojn por pagi miajn ŝuldojn, sincere min tutan fordonante al la malsanuloj de ĉi tiu hospitalaro.

— Tre nobla impulso — nesevere diris Klarencio —, tamen oni konsentu, ke ĉia surtera tasko en la profesiaj sferoj estas invito de la Patro, ke la homo eniru en la Diajn labortemplojn. Titolon ni rigardas kiel simplan kuponon, sed en la mondo ĝi plej ofte estas perdo malfermata al ĉiaj malsaĝaĵoj. Per tiu kupono ĉiu aĉetas al si la rajton noble lerni kaj servi al la Sinjoro en la kadro de Liaj sanktaj laboroj sur la Tero. Krom la ordinaraj rajtoj kaj devoj, aljuĝitaj de la homa konvencio, ĉiu profesio estas ankaŭ servo al Dio; tia principo estas

aplikebla al ĉiaj surteraj taskoj. Vi, mia frato, ricevis kuponon de kuracisto. Vi eniris en la templon de Medicino, sed en ĝia interno via konduto ne estis tia, ke mi sentus min rajtigita konsenti viajn nunajn dezirojn. Kiel do en palpebruma daŭro vin transformi en kuraciston de malsanaj Spiritoj, se vi obstine decidis fari observojn ekskluzive en la sfero de la materia korpo? Mi ne neas vian kapablon de bonega fiziologo, tamen la kampo de la vivo estas tre vasta. Kiel ŝajnus al vi iu botanikisto, kiu farus liston da difinoj nur el la ekzamenado de la sekaj ŝeloj de iaj kelke da arboj? Multaj kuracistoj, sur la Tero, preferas ian konkludon matematikan el siaj Anatomiaj esploroj. Ni konsentu, ke Matematiko estas io respektinda, sed ĝi ja ne estas la sola scienco de la Universo. Kiel vi nun rekonas, kuracisto ne povas staradi meze en diagnozoj kaj terminaroj: li nepre devas penetri la animon, sondi ĝian plejprofundon. Multaj medicinistoj, sur la terglobo, estas kvazaŭ malliberuloj de la altlernejaj ĉambroj, ĉar la vantemo ŝtelis la ŝlosilon de ilia karcero. Tre malmultaj sukcesas trapasi la marĉon de malnoblaj interesoj, leviĝi super ordinaraĵoj konvencioj; por tiaj eksternormuloj estas destinataj mokado de la mondo kaj rikanado de la kolegoj.

Mi konsterniĝis. Tiaj konoj pri profesia respondeco estis por mi fremdaj. Miregigis min, kiel li rigardas universitatan titolon, reduktitan al ia kupono, per kiu oni estas enlasata en sferojn de laboro, por efektiva kunagado kun la Superega Sinjoro. Ne kapablante ion intermeti, mi atendis, ĝis la ministro de Helpo religos la fadenon de siaj klarigoj.

— Kiel vi povas mem konkludi — li parolis plue —, vi do ne preparis vin konvene por niaj ĉi tieaj servoj.

— Nobla bonfaranto — mi kuraĝis diri —, mi komprenas la lecionon kaj kliniĝas antaŭ la evidenteco de la faktoj.

Kaj farante penon super mi mem por retenigi la larmojn, mi humile petis:

— Mi submetiĝas al ĉia ajn laboro en ĉi tiu kolonio de faroj kaj paco.

Kun profunda kunsentorigardo li respondis:

— Mia amiko, mi ne havas nur amarajn veraĵojn, sed ankaŭ stimulan parolon. Vi ankoraŭ ne povas esti kuracisto en “Nia Hejmo”, sed en oportuna tempo vi povos ofici kiel lernanto. Via nuna stato ne estas el la plej bonaj, tamen ĝi estas kuraĝiga dank’ al la propetoj por vi, venintaj al la Ministerio de Helpo.

— Ĉu mia patrino? — mi demandis ebria de ĝojo.

— Jes — respondis la ministro —, via patrino kaj aliaj amikoj, en kies koron vi metis la semon de la simpatio. Tuj post via alveno mi petis la Ministerion de Klarigo havigi al mi viajn notojn, kaj mi ilin atente ekzamenis. Multe da neantaŭzorgemo, multe da ekscesoj, multe da senpripensemo, sed, dum viaj dek kvin jaroj da medicina praktikado, vi tamen senpage donis receptojn al pli ol ses mil mizeruloj. Plej ofte vi tiel laŭdinde agis el simpla ŝercemo; sed nun vi povas mem konstati, ke eĉ ŝerce la Vera bono dissemas benon sur niajn vojojn. El tiuj, favoritaj de via kompatemo, dek kvin ne forgesis vin kaj ne ĉesas ĉi tie pledi por vi. Mi tamen aldonu, ke eĉ la bono, kiun vi ĝuigis al indiferentuloj, parolas favore por vi.

Kun rideto finante siajn surprizajn klarigojn, Klarenco emfaze diris:

— Vi lernos novajn lecionojn en “Nia Hejmo” kaj, post utilaj provoj, vi efike kunlaboros kun ni, preparante vin por la senfina estonteco.

Mi radiis de feliĉo. La unuan fojon mi ploris de ĝojo en tiu kolonio. Ho, kiu sur la Tero povas kompreni tiajn ĝojegon? Kelkfoje la koro devas esti muta en la dia elokventa silento.

LA VIZITO DE MIA PATRINO

Atente observante la rekomendojn de Klarenco, mi penis kolekti fortojn por rekomenci la lernadon. En pasinta tempo mi eble sentus ofendon en liaj ŝajne tiel krudaj admonoj, sed en la nunaj cirkonstancoj mi rememoris miajn iamajn erarojn kaj sentis min trankvila. La karnaj vibroj ŝetas la animon en profundan svenon. Vere, nur nun mi konfesis al mi mem, ke la surtera provado neniel povas esti rigardata kiel ia amuzo. La graveco de la enkarniĝo sur la Tero falis al mi en la okulojn, montrante ĝis tiam nekonatajn grandajn aferojn. Pripensante la perditajn oportunojn, mi rekonis, ke mi ne indas esti gasto de “Nia Hejmo”. Klarenco estis ja absolute prava, parolante al mi kun tia senkaŝeco.

Kelkajn tagojn mi pasigis en profunda meditado pri la vivo. En mia interno bolis plej granda sopiro revidi la surteran hejmon, tamen mi detenis min peti pri novaj favoroj. La bonfarantoj en la Ministerio de Helpo estis treege komplezemaj por mi; ili divenis miajn pensojn. Se ĝis tiu momento ili ne kontentigis mem mian deziron, ĝi certe estis tial, ĉar tia deziro estis neĝustatempa. Mi tiam silentis, rezignaciinta kaj iom malĝoja. Lizio ĉion eblan faris por ĝojigi min per siaj konsolantaj opinioj; sed mi tiam troviĝis en tiu fazo de neesprimebla enmemiĝo, en kiu la homo estas vokata de la konscienco profunda en sian propran internon.

Unu tagon la bonkora vizitisto kun radianta mieno venis en mian ĉambron kaj ekkriis:

— Divenu, kiu estas veninta al vi!

Tia gaja mieno, tiaj brilantaj okuloj de Lizio ne trompis min.

— Mia patrino! — mi fidplene respondis.

Kun okuloj malfermegitaj de ĝojo mi vidis mian patrino, envenantan kun aletenditaj brakoj.

— Filo! Mia filo! Venu al mi, karulo mia!

Mi ne povas diri, kio tiam okazis. Mi sentis min kvazaŭ infano, kiel en la tempo, kiam mi nudapiede ludadis sub pluvo sur la sablo de la ĝardeno. Mi ŝin ame ĉirkaŭbrakis, plorante de ĝojo, en la plej sankta spirita feliĉego. Mi ŝin kisis kaj kisis, ŝin premis en la brakoj, miksis miajn larmojn kun ŝiaj larmoj, kaj mi ne scias, kiel longe ni restis en la brakoj unu de la dua. Fine ŝi vekis min el tiu raviteco, konsilante:

— Nu, infano, ne tiel forte emociiĝu! Ankaŭ ĝojo, kiam tro granda, ofte vipas la koron.

Kaj anstataŭ ke mi portus mian adorantan maljunulineton en la brakoj, kiel mi faradis sur la Tero en la lastaj jaroj de ŝia migrado sur la planedo, ŝi forviŝis miajn abundajn larmojn kaj kondukis min al la divano.

— Vi estas ankoraŭ malforta, infano. Ne malŝparu fortojn.

Mi sidiĝis apud ŝi, kaj ŝi zorge kuŝigis komforte mian lacan kapon sur ŝiaj genuoj, min delikate karesis, reanimante min ĉe sanktaj rememoroj. Mi tiam sentis min la plej feliĉa el la homoj. Mi havis la impreson, kvazaŭ la barko de mia espero ankras en pli sekura haveno. La ĉeesto de la patrino estis grandega rekuraĝigilo por mia koro. Tiuj minutoj estis kvazaŭ ia sonĝo teksita el fadenoj de neesprimebla feliĉo. Simile al infano serĉanta detalojn, mi fikse rigardis ŝiajn vestojn, perfektan reproduktaĵon de unu el ŝiaj iamaj hejmvestoj. Mi rimarkis ŝian malhelkoloran robon, la lanŝtrumpojn, la bluan mantilon, la malgrandan kapon, aŭreolitan de neĝblankaj fadenoj, la faltojn de la vizaĝo, la ĉiam dolĉan, trankvilan rigardon. Per manoj tremantaj de ĝojo, mi karesadis ŝiajn amatajn manojn, ne povante diri eĉ unu vorton. Sed mia patrino, pli fortanima ol mi, serene ekparolis:

— Ni neniam scios danki Dion por tiaj grandaj don-

oj. La Patro nin neniam forgesas, mia infano. Kia longa tempo da disiĝo! Ne pensu tamen, ke mi vin forgesis. Iafoje la Providenco kelkatempe disigas korojn, por ke ni lernu la Dian amon.

Rekonante ŝian ĉiaman dolĉecon, mi sentis, ke reviviĝas miaj surteraj ulceroj. Ho! kiel malfacile estas forviŝi makulojn kunportatajn el la Tero! Kiel multe pezas la malperfektaĵoj amasigitaj dum sinsekvaj jarcentoj! Kiom da fojoj mi aŭdis edifajn konsilojn de Klarenco, fratajn admonojn de Lizio, ke mi forĵetu de mi lamentojn; sed ĉe la patrina karesado, kvazaŭ remalfermiĝis antaŭaj vundoj. El la ploro de ĝojo mi falis en larmojn de angoro, dolore rememorante miajn surterajn travivaĵojn. Mi ne povis kompreni, ke ŝia vizito ne celis ian kontentigon de niaj kapricoj, sed estis aldonita netaksebla benaĵo de la Dia Favorkoreco. Refarante en mi mem iamajn postulojn, mi erare konkludis, ke mia patrino devas esti ankoraŭ ia vazo de miaj senfinaj plendoj kaj afliktoj. Sur la Tero, patrinoj, laŭ la komprenmaniero de iliaj infanoj, preskaŭ ĉiam estas nenio alia ol iaj sklavinaj; tre malmultaj infanoj taksas ilian sindonemon, antaŭ ol ilin perdi. Kun tiu sama erara opinio el antaŭe, mi englitis en la abismon de la doloraj korelverŝoj.

Mia patrino min silente aŭdadis, elmontrante neesprimeblan melankolion. Kun larmantaj okuloj, iam kaj iam min pli forte alpremante al sia koro, ŝi dolĉe parolis:

— Ho, filo, mi ja scias pri la instruoj de nia nobla Klarenco al vi. Ne lamentu. Ni danku la Patron por tia beno, kia estas ĉi tiu reapudiĝo. Ni nun sentu nin en lernejo alia, kie ni lernas esti idoj de la Sinjoro. Kiel patrino, mi, sur la Tero, ne ĉiam povis vin konvene gvidi. Ankaŭ mi do laboras, reĝustigante la koron. Viaj larmoj igas min reveni sur la scenejon de la homaj sentoj. Io penas tiri mian animon malantaŭen. Mi ja volus pravigi viajn lamentojn, konstrui al vi tronon, kvazaŭ vi estus la plej bona homo en la Universo; sed tiu via sintenado ne alkonformiĝas al la novaj lecionoj de la vivo. Tia konduto estas pardoninda en la medioj de la karno, sed ĉi tie, mia infano, estas nepre necese atenti, antaŭ

ĉio, la Sinjoron. Vi ne estas la sola elkarniĝinta homo, reboniganta erarojn, kaj mi ne estas la sola patrino, troviĝanta for de siaj amatoj. Nia doloro do edifas nin ne per niaj verŝataj larmoj, nek per niaj sangantaj vundoj, sed per la lumpordo, kiun ĝi malfermas al nia spirito, por ke ni fariĝu pli komprenemaj kaj pli humanaj. Larmoj kaj ulceroj prezentas la procedon por benata vastiĝo de niaj plej puraj sentoj.

Post longa paŭzo, dum kiu la profunda konscienco min severe admonis, mia patrino parolis plue:

— Se estas eble profiti ĉi tiujn nemultajn minutojn en amelverŝoj, kial do ilin deturni en la ombron de lamentado? Ni ĝoju, infano, kaj senĉese laboru. Ŝanĝu vian mensan teniĝon. Konsolas min via konfido al mia karesemo, ekstreman feliĉon mi sentas ĉe via fila dolĉeco, tamen mi ne povas repaŝi sur la vojo de miaj provoj. Ni nun amu nin reciproke per la granda, la sankta Dia amo!

Ĉi tiuj benindaj vortoj vekis min. Mi sentis, kvazaŭ potencaj emanaĵoj elŝetiĝas el la patrina sento, vivigante al mi la koron. Mia patrino min ravita rigardadis kun bela rideto. Respektoplena mi ekstaris kaj ŝin kisis sur la frunto, kaj tiam mi sentis ŝin pli aminda kaj pli bela ol ĉiam.

XVI

KORELVERŜOJ

La patrino parolo min konsolis, reordigis mian animan energion. Mia patrino teksis konsiderojn pri la laboro, kvazaŭ ĝi estus ia beno kompanse de doloroj kaj malhelpoj, rigardante ĉi tiujn kiel ĝojojn kaj belegajn lecionojn. Neatendita kaj nesprimebla ĝojego envolvis mian spiriton. Tiuj saĝaj vortoj min strange nutris. Mi sentis min tute alia, pli gaja, vivoplena kaj feliĉa.

— Ho, patrino mia — mi emociita ekkriis —, la sfero, en kiu vi loĝas certe estas mirinda! Kiaj superbelaj spiritaj vidaĵoj, kia feliĉego!

Ŝi signife duonridetis kaj modeste rediris:

— Pli alta sfero, mia infano, ĉiam postulas pli multe da laboro, pli grandan abnegacion. Ne pensu, ke via patrino staradas ĉe beataj vizioj, for de la konvenaj devoj. Mi tamen volas igi vin senti, ke miaj vortoj tute ne signas ian malĝojon en la situacio, en kiu mi troviĝas: ili estas ĝustadire elmonro de necesa prirespondeco. De kiam mi revenis de la Tero, mi ne ĉesas forte klopodi por nia spirita renoviĝo. Multaj homoj, post elkarniĝo, restas alkroĉitaj al sia surtera hejmo, pretekstante, ke ili tre amas tiujn, ankoraŭ vivantajn en la mondo de la karno. Sed oni ĉi tie lernigis min, ke la vera amo, por elverŝiĝi per bonfaroj, devas ĉiam laboradi. Mi do, de post mia veno ĉi tien, plej klopodas por ekhavi la rajton helpi tiujn, kiujn ni tiel kore amas.

— Kaj mia patro? — mi demandis. — Kie li estas? Kial li ne venis kune kun vi?

La vizaĝo de mia patrino ricevis la stampon de stranga esprimo, kaj ŝi respondis:

— Ho ve, via patro! Jam de dek du jaroj li staras en regiono, kie regas densa mallumo, en la Ombrejo. Sur la Tero li ĉiam ŝajnis al ni fidela al la familiaj tradicioj, alligita al la bontoneco de la grandkomercistaro, al kies rondo li apartenis ĝis la fino de sia ekzistado, kaj al la fervoro por la religiaj eksteraj formalajoj; sed, en la fundo, li estis spirite malforta kaj tenadis sekretajn amrilatojn ekster la hejmo. Du el tiuj virinoj estis mense enligitaj en vasta reto da malicaj estuloj; tial, tuj kiam mia kompatinda Laerto elkarniĝis, lia restado en la Ombrejo estis por li tre amara, ĉar tiuj malfeliĉulinoj, al kiuj li antaŭe faris multe da promesoj, lin sopirege atendis kaj lin denove entiris en la maŝaron de la iluzioj. Komence li volis reagi, penante trovi min, sed li ne povis kompreni, ke post la morto de la materia korpo la animo statas tiel same, kiel ĝi esence estas. Laerto do ne rimarkis mian spiritan ĉeeston, nek la sindonan helpadon de aliaj niaj amikoj. Multe da jaroj forperdinte en hipokritaĵoj, li difektis la spiritan vidadon, malpliigis sian gradon de vibrado; el tio rezultis, ke li ek troviĝis sole nur en la societo de tiuj rilatoj, kiujn li senprudente kulturis, per la menso kaj per la koro. La familiaj devoj, la amo al nia nomo dum kelka tempo okupis lian spiriton. Li iel luktis, repuŝante la tentojn, sed fine falis, denove baraktante en la ombro, pro sia nepersistado en la bona kaj ĝusta pensmaniero.

Treege impresita de ŝiaj vortoj, mi demandis:

— Ĉu do ekzistas nenia rimedo por forsavi lin el tiaj fiaĵoj?

— Ha, mia infano — ŝi respondis —, mi lin ofte vizitas, sed li ne rimarkas min: lia grado de vibrado estas ankoraŭ tre malalta. Mi penas per inspiro voki lin sur la bonan vojon, sed prosperas al mi nur, iam kaj iam, eltiri el liaj okuloj iom da larmoj pro pento, sed ne, ke li faru seriozajn decidojn. Tiuj malfeliĉulinoj, kies kaptito li fariĝis, delogas lin for de miaj konsiloj. Jam longajn jarojn mi forte klopodas en ĉi tiu direkto. Mi petis helpon de kelkaj amikoj el kvin diversaj rondoj kun pli alta spirita agado, inkluzive el “Nia Hejmo”.

Unu fojon Klarenco preskaŭ sukcesis altiri lin al la Ministerio de Regenerado, sed vane. Ne estas eble ekbruligi lampon sen oleo kaj sen meĉo... Ni bezonas la mensan aliĝon de Laerto, por povi lin levi kaj malfermi liajn spiritajn okulojn. Dume la kompatinda restas mem inerta, inter indiferenteco kaj ribelemo.

Post longa paŭzo ŝi sopirĝemis kaj daŭrigis:

— Vi kredeble ankoraŭ ne scias, ke ankaŭ viaj fratinoj Klara kaj Priskila hodiaŭ vivas en la Ombrejo, algluitaj al la terkrusto. Mi sentas min devigita kontentigi la bezonojn de ĉiuj. Mia sola rekta helpo estis la amika kunlaborado de via fratino Ludovika, tiu, foririnta de la Tero, kiam vi estis ankoraŭ infano. Ludovika dum multe da jaroj atendis min ĉi tie, ŝi estis mia ĉefa asistantino en la malfacila protektado al nia surtera familio. Sed antaŭ nelonge, post brava batalado, apud mi, por via patro, por vi kaj por la fratinoj, tiel granda estas la menskonfuzo de niaj familianoj, ke ŝi en la ĵus pasinta semajno reiris, por denove enkarniĝi inter ili, per heroa akto de plej bela abnegacio. Mi do esperas, ke vi baldaŭ revigliĝos, por ke ni povu labori sur la kampo de bonfarado.

Miregigis min tiaj informoj pri mia patro. Kiaj estas ja liaj luktoj? Ĉu li do ne ŝajnis sincera pratikanto de la religiaj ordonoj, ĉu li ne komuniĝis ĉiujn dimanĉojn? Ravita de la patrina sindonemo, mi demandis:

— Ĉu vi do helpas paĉjon, malgraŭ lia ligiteco kun tiuj fivirinoj?

— Ne nomu ilin tiaj — saĝe respondis mia patrino —; prefere diru, mia infano, “niaj fratinoj malsanaj, sensciaj aŭ malfeliĉaj”. Ankaŭ ili estas filinoj de nia Patro. Mi ne propetas nur por Laerto, sed ankaŭ por ili, kaj mi estas konvinkita, ke mi ja trovis rimedojn, por ilin ĉiujn altiri al mia koro.

Mirigis min tia nobla manifestiĝo de rezignemo. Mi tuj ekpensis pri mia familio mem, kies estro mi estis. Mi sentis la iaman koralligon al la karaj edzino kaj infanoj. Antaŭ Klarenco kaj Lizio mi ĉiam prenis la decidon subpremi sentojn kaj prisilenti demandojn; sed la patrina rigardo min kuraĝigis. Io naskis en mi la senton,

ke mia patrino ne longe restos apud mi. Profitante la rapide pasantan minuton, mi demandis:

— Ĉu vi, kiu sindone akompanadas paĉjon, ne povus ion informi pri Zelia kaj miaj infanoj? Mi arde atendas la momenton reveni hejmen, por ilin helpi. Ho! la sama grandega respiro vundas kiel mian, tiel ja iliajn korojn! Kiel kruele eble suferas mia mafeliĉa edzino pro ĉi tiu disiĝo!

Mia patrino apenaŭ montris malgajan rideton kaj respondis:

— Mi de tempo al tempo vizitas miajn genepojn. Ili fartas bone.

Kaj meditante kelkajn momentojn, ŝi emfaze diris:

— Ne maltrankviliĝu rilate al la problemoj pri helpo al via familio. Antaŭ ĉio preparu vin, por ke ni plene sukcesu; certajn demandojn ni devas, per la penso, konfidi al la Sinjoro, antaŭ ol peni trovi ilian solvon.

Mi volis insisti pri la afero, por ĉerpi detalojn, sed mia patrino delikate detenis sin reveni al ĝi. La konversacio ankoraŭ longe daŭris, envolvante min en plej dolĉan konsolon. Post kelka tempo ŝi min adiaŭis. Sci-vola informiĝi, kiel ŝi ĝis tiam vivas, mi petis permeson ŝin akompani. Ŝi min ame karesis kaj diris:

— Ne venu, mia filo. Oni min urĝe atendas en la Ministerio de Komunikado, en kies transformaj kabinetoj mi estos provizita per emanaĵaj rimedoj por mia reveno. Cetere mi ankoraŭ devas vidiĝi kun la ministro Celio, por danki lin pro la plezuriga okazo de ĉi tiu vizito.

Kaj lasante post si en mia animo longedaŭran impreson de feliĉo, ŝi kisis min kaj foriris.

XVII

EN LA HEJMO DE LIZIO

Nemulte da tagoj pasis post la neatendita vizito de mia patrino, kiam jen Lizio venis kun invito, ke mi akompanu lin al la ministro Klarenco. Mirante tian alvokon, mi iris kun li.

Ĝentile akceptite de la nobla bonfaranto, mi plej plezure atendis liajn ordonojn.

— Mia amiko — li afable diris —, de hodiaŭ vi estas rajtigita fari observojn en niaj laborfakoj, escepte de la ministerioj kun supera karaktero. Henriko de Luna, en la lasta semajno, deklaris finita vian kuracadon, kaj estas do juste, ke vi nun uzu la tempon observante kaj lernante.

Mi direktis rigardon al Lizio, al tiu frato, kiu tiam certe partoprenis en mia neesprimebla feliĉo. La flegisto, forte ĝojante, reciprokis mian rigardon. Mi apenaŭ ne krevis de ĝojo. Tio estos la komenco de nova vivo. Mi do iel povos labori, enirante en lernejojn malsamajn, ol la surteraj. Klarenco, kiu laŭŝajne rimarkis mian nevortigeblan feliĉon, diris:

— Ĉar vi jam ne bezonas restadi en hospitalo, mi tial atente ekzamenos vian eblan lokumon en nova medio. Mi demandas iun el niaj institucioj...

Sed Lizio interrompis lin, dirante:

— Se eble, mi plezure akceptus lin en nian hejmon dum lia observostadio; tie mia patrino zorgus pri li, kiel pri sia propra filo.

En raviteco mi fikse ekrigardis la vizitiston. Ankaŭ Klarenco turnis al li aproban rigardon kaj diris:

— Tre bone, Lizio! Jesuo ĉiam ĝojas kun ni, kiam ni akceptas amikon en la koron.

Mi ĉirkaŭbrakis la komplezeman flegiston, ne povante esprimi mian dankon. Ĝojo nin iafoje mutigas.

— Prenu ĉi tiun dokumenton — diris la ĝentila ministro de Helpo, donante al mi kajeron —; kun ĝi vi povos eniri en la Ministeriojn de Regenerado, de Helpo, de Komunikado kaj de Klarigo, dum unu jaro. Post tiu tempo ni vidos, kio estos farebla rilate viajn dezirojn. Instruiĝu, mia kara. Ne perdu eĉ minuton. La tempo inter du enkarnaj provoj devas esti bone profitata.

Lizio oferis al mi la brakon, kaj mi, kun plej viva plezuro en la animo, foriris kun li.

Post kelke da minutoj ni venis al la pordo de gracia domo, ĉirkaŭita de multekolora ĝardeno.

— Jen, ĉi tie — diris la ĝentila kamarado.

Kaj per karesa tono li aldonis:

— Nia hejmo en “Nia Hejmo”...

Ĉe la milda vibrado de la sonorileto en la interno ekaperis ĉe la pordo simpatia matrono.

— Patrino, patrino! — ekkriis la flegisto, min gaje prezentante. — Ĉi tio estas tiu frato, kiun mi promesis venigi al vi.

— Estu bone veninta, amiko! — digne diris la sinjorino. — Ĉi tiu domo apartenas al vi.

Kaj brakumante min:

— Mi eksciis, ke via patrineto ne vivas ĉi tie; vi do havas en mi fratinn-patrinon.

Mi ne sciis, kiel ilin danki pro tia komplezema gastigo. Mi jam estis dironta kelke da frazoj, por elmontri mian emocion kaj dankon, sed la nobla matrono, rimarkinde bonhumora, antaŭvenis, divenante mian penson:

— Estas malpermesite al vi paroli pri ia danko. Ne faru tion. Vi devigus min subite rememori multajn konvenciajn frazojn de la Tero...

Ni ĉiuj ekridis kaj mi diris kortuŝita:

— La Sinjoro esprimu mian dankon al vi ĉiuj per pluaj benoj de ĝojo kaj paco.

Ni eniris. Simpla kaj alloga atmosfero. Mebloj tre similaj al tiuj de la Tero; objektoj, entute, nur iomete diferencaj je tiuj ordinaraj. Bildoj kun superbela spirita karaktero. Piano kun rimarkindaj proporcioj, sur kiu

staris granda harpo kun altastilaj kaj delikataj formoj. Rimarkinte mian atenton, Lizio ŝerce diris:

— Kiel vi vidas, vi trans la tombo ankoraŭ ne trovis la anĝelojn-harpistojn; jen tamen harpo, atendanta nin mem.

— Ho, Lizio — milde intermetis lia patrino —, ne spritu! Ĉu vi ne memoras, kiel la Ministerio de Dia Unuigo akceptis oficistojn de la Ministerio de Altigo en la pasinta jaro, kiam venis ĉi tien kelke da delegitoj el Harmonio?

— Jes, panjo, sed mi intencas diri nenion alian, ol tion, ke la harpistoj ja ekzistas, kaj ke ni devas krei al ni spiritan aŭdadon, por ilin aŭdi, klopodante en la lernado de la Diaj aferoj.

Post la konvenciaj vortoj de prezentado, per kiuj mi informis, de kie mi venis, mi eksciis, ke la familio de Lizio vivis en malnova urbo de la Ŝtato Rio de Janeiro; plie, ke lia patrino estas nomata Laŭra kaj en la domo loĝis ankaŭ du liaj fratinoj, Jolanda kaj Jehudit.

Oni tie enspiris la aromon de dolĉa kaj reanimanta intimeco. Mian ĝojon, mian senmezuran ĝojon mi ne povis kaŝi. Tiu unua kontakto kun la hejma organizo en la kolonio min ravis. Tiu gastigado, tiel plena de karesemo, vibrigis mian spiriton per profunda emocio.

Ĉe la bombardado de miaj demandoj, Jolanda montris al mi mirindajn librojn. Rimarkinte mian interesigon pri tiu afero, la domestrino atentigis:

— Koncerne al literaturo, ni havas en “Nia Hejmo” grandegan superecon antaŭ la teranoj, nome, ke la fiverkistoj, tiuj, kiuj amas la animvenenon, estas tuj kondukataj en la mallumajn partojn de la Ombrejo. Ĉi tie sin teni ili ne povas, eĉ ne en la Ministerio de Regenerado, tiel longe, kiel ili persistas en tia stato de la animo.

Mi ne povis min deteni de rideto kaj observis plu la belegajn fotografajojn sur la paĝoj antaŭ miaj okuloj.

Poste Lizio vokis min, por vidi kelkajn partojn de la domo; pli longe mi restis en la banĉambro, kies interesaj instalaĵoj min miregigis. Ĉio simpla, sed komforta.

Ankoraŭ posedis min tiu miro, kiam sinjorino Laŭra invitis nin al la preĝado.

Ni sidiĝis, silentaj, ĉirkaŭ granda tablo.

Granda televidilo estis ŝaltita kaj jen aŭdiĝis milda muzikaĵo. Tio estis la laŭdo al Dio en la krepuska momento. Sur la fono ekaperis tiu sama ĉarmega bildo de la Guberniestrejo, kiun mi, en la hospitala kvartalo, ĉiun vesperiĝon ne laciĝis rigardadi. Sed en tiu momento mi sentis min posedita de profunda mistera ĝojo. Kaj vidante la bluan koron, malproksime desegnititan, mi sentis, ke mia animo genuiĝas en la interna templo, ekster si de raviteco kaj danko.

XVIII

AMO, NUTRAĴO DE LA ANIMOJ

Post la preĝo la domestrino vokis min al la tablo kaj donis revigligan buljonon kaj aromajn fruktojn, kiuj ŝajnis prefere koncentraĵoj el bongustegaj fluidaĵoj. Tre ege surprizite, mi aŭdis sinjorinon Laŭra sprite rimarki:

— Vere, niaj manĝoj, ĉi tie, estas multe pli agrablaj, ol sur la Tero. Kelkaj familioj en “Nia Hejmo” ilin preskaŭ tute ne bezonas, sed en la fakoj de la Ministerio de Helpo ni ne povas malhavi la fluidecajn koncentraĵojn pro la pezaj laboroj, kiujn trudas la cirkonstancoj. Ni konsumas multe da energio. Estas necese renovigi provizojn da fortoj.

— Sed tio — intermetis unu el la junulinoj — ne signifas, ke ni solaj, la oficistoj de Helpo kaj de Reĝenerado, ĉiam dependas de nutraĵoj. Ĉiuj ministerioj, ankaŭ tiu de Dia Unuigo, ilin ja bezonas: nur la substanca formo estas alia en ĉiu loko. En Komunikado kaj en Klarigo estas konsumata grandega kvanto da fruktoj. En Altigo la konsumo de sukoj kaj koncentraĵoj estas ne malgranda; kaj en Dia Unuigo la demando de nutrado atingas neimageblan amplekson.

Mia demandanta rigardo sin turnadis jen al Lizio, jen al sinjorino Laŭra, en la sopirego je tujaj klarigoj. Ĉiuj ridetis mian tute naturan konfuzitecon, sed la patrino de Lizio decidis kontentigi miajn dezirojn, klarigante:

— Nia frato kredeble ankoraŭ ne scias, ke la plej fortika subtenilo de la kreitoj estas ja amo. De tempo al tempo venas al “Nia Hejmo” grandaj komisionoj el instruistoj, kiuj donas lecionojn pri la spirita nutrado. Ĉiu nutrometodo, en la pluraj sferoj de la vivo, esence

baziĝas sur amo. Fizika nutraĵo, ankaŭ ĉi tie, estas ĝustadire nura demando de materieco pasema, simila al tiu de la teraj veturiloj, kiuj ja bezonas la kunhelpon de la graso kaj oleo. La animo nutras sin nur per amo. Ju pli alte ni levigōs en la evolua kadro de la Kreitaĵaro, des pli profunde ni konos ĉi tiun veron. Ĉu ne ŝajnas al vi, ke la Dia Amo estas la nutraĵo de la Universo?

Ĉi tiuj klarigoj min treege ravis. Rimarkinte mian efektivan ĝojon, Lizio sin intermetis, aldonante:

— Ĉio ekvilibriĝas en la senlima amo de Dio; ju pli evoluinta la estaĵo, des pli delikata la nutrado. Vermo, en la subgrundo, sin nutras ekskluzive per tero. Bruto ĉerpas el vegetaĵo la substancojn por sia vivtenado, same kiel infano suĉas la patrinan mamon. Homo deŝiras frukton de vegetaĵo, preparas ĝin laŭ sia propra gusto kaj ĝin manĝas ĉe la hejma tablo. Ni, elkarnuloj, bezonas substancojn sukriĉajn, konformajn al nia fluideca konstruo, kaj la procedo estas ĉiam pli rafinita, laŭgrade kiel la individuo plialtiĝas.

— Sed ni ne forgesu la aferon de la veturiloj — aldiris sinjorino Laŭra —, ĉar, en la fundo, vermo, bruto, homo kaj ni mem, ĉiuj dependas absolute de amo. Ni ĉiuj moviĝas en ĝi, kaj sen ĝi ni ekziston ne havus.

— Mireginde! — mi diris kortuŝita.

— Ĉu vi ne memoras la evangelian instruon “amu unu alian”? — afable diris la patrino de Lizio. — Jesuo rekomendis ĉi tiun principon, celante ne sole karitajn farojn, per kiuj ni pli aŭ malpli frue lernos, ke la plenumado de bono estas ja elementa devo. Li konsilis al ni ankaŭ nutri nin reciproke per frateco kaj simpatio. La enkarna homo iam ekscios, ke amika konversacio, karesema ago, reciprokaj bonvoleco kaj konfido, la lumo de interkompreniĝo, frata interesiĝo de unu pri alia — kondutnormoj nature diktitaj de la profunda amo — estas kernecaj nutraĵoj por la vivo en ties esenco mem. Reenkarniĝinte sur la Tero, ni spertas grandajn limigojn, sed reveninte ĉi tien, ni konstatas, ke la stabileco de ĝojo estas demando de pure spirita nutraĵo. Hejmoj, vilaĝoj, urboj kaj nacioj naskiĝas laŭ similaj normoj.

Mi instinkte rememoris la teoriojn pri la sekso, vaste

diskonigitajn en la mondo; sed, eble divenante miajn pensojn, sinjorino Laŭra diris:

— Neniu pensu, ke ĉi tiu fenomeno estas io nur seksa. La sekso estas sankta manifestiĝo de tiu universa Dia amo, sed ja nenio alia, ol aparta esprimo de la nelĉerpebla fonto. Ĉe pli spiritenaturaj geedzoj, karesemo kaj konfido, reciprokaj sindoneco kaj komprenemo staras multe super la fizika kuniĝo, kiu ĉe tiaj estas simple pasema akto. La magneta interŝanĝo estas la faktoro, kiu donas la ritmon necesan al la montriĝo de harmonio. Por nutri la feliĉon, sufiĉas la apudesto, iafoje nur interkomprenemo.

Profitante la paŭzon, Jehudit aldonis:

— Ni lernas en “Nia Hejmo”, ke la surtera vivo fundamentas sian internan ekvilibron sur amo, sed la plej multaj homoj tion ne rimarkas. Animoj ĝemelaj, animoj frataj, animoj parencaj formas multenombrajn parojn kaj grupojn. Kuniĝante unu kun alia, sin reciproke helpante, ili starigas ekvilibron laŭ la plano de elaĉeto de eraroj; sed, ĉe neekzisto de kunulo, la homo malpli fortanima ordinare falas en la vojo.

— Kiel vi vidas, mia amiko — ĝoje aldiris Lizio —, ankaŭ en ĉi tiu okazo estas rememorinda la Evangelio de la Kristo: “Ne per pano sole vivas homo” (*).

Sed antaŭ ol estis faritaj pluaj konsideroj, oni forte sonorigis ĉe la pordo. La flegisto leviĝis por ĝin malfermi. En la ĉambron eniris du bonsocietaj junuloj.

— Jen estas — diris Lizio, ĝentile turnante sin al mi — niaj fratoj Polidoro kaj Estacio, miaj kolegoj ĉe la Ministerio de Klarigo.

Salutoj, ĉirkaubrakoj, ĝojo.

Post kelke da momentoj sinjorino Laŭra ridetante diris:

— Hodiaŭ vi ĉiuj multe laboris, utile uzis la tagon. Ne difektu pro mi la aman parton de via programo. Ne forgesu la ekskurson al la Kampo de Muziko.

(*) Mateo, 4:4; Luko, 4:4. — *La Trad.*

Rimarkinte la maltrankvilecon de Lizio, lia patrino instige diris:

— Iru, mia filo, ne atendigu Lascinian tiel longe. Nia frato restos apud mi, ĝis li povos akompani vin al tiuj amuzoj.

— Ne ĝenu vin pro mi — mi instinkte diris.

Sed sinjorino Laŭra ĝentile ridetis kaj rediris:

— Mi ankoraŭ hodiaŭ ne povos dividi kun vi la ĝojojn de la Kampo. Gastas en nia domo mia resaniĝanta nepino, antaŭ nemulte da tagoj reveninta de la Tero.

Ĉiuj gaje eliris. Ferminte la pordon, la mastrino sin turnis al mi kaj klarigis kun rideto:

— Ili iras, por serĉi al si tiun nutraĵon, pri kiu ni parolis. La amligiloj estas ĉi tie pli belaj kaj pli fortikaj. Amo, mia amiko, estas la Dia pano de la animoj, la ĉiela nutraĵo de la koroj.

XIX

LA ELKARNIĜINTA JUNULINO

— Ĉu via nepino ne venas al la tablo por la komuna manĝado? — mi demandis la domestrinon, provante esti pli intiman konversacion.

— Ŝi manĝas ankoraŭ sola — respondis sinjorino Laŭra —; tiu malsaĝulineto ankoraŭ estas nervekscitita, senkuraĝa. Ĉi tie ni allasas al la tablo neniu, kiu elmontras menskonfuzon aŭ ĉagrenon. Neŭrastenio kaj maltrankvilo elĵetas pezajn kaj venenajn emanaĵojn, kiuj aŭtomate miksiĝas kun la nutraĵoj. Mia nepino restadis en la Ombrejo dek kvin tagojn en stato duondorma, helpate de ni. Ŝi devus iri en iun hospitalan pavilonon, sed ŝi tamen venis sub mian personan zorgadon.

Mi manifestis la deziron viziti la ĵusvenintinon el la Tero. Estus ja tre interese aŭdi ŝin. Jam de kiel longe mi ne ricevis rektajn sciigojn pri nia surplaneda vivo!

Mi ne bezonis insisti ĉe sinjorino Laŭra pri tiu mia deziro.

Ni direktis nin al komforta, tre granda ĉambro. Tre pala junulino ripozis en oportuna brakseĝo. Ekvidinte min, ŝi forte surpriziĝis.

— Ĉi tiu amiko, Eloiza — klarigis la patrino de Lizio, montrante al mi —, estas unu frato nia, antaŭ ne-longe reveninta el la fizika sfero.

La junulino scivole min fikse ekrigardis, kvankam ŝiaj okuloj, apenaŭ videblaj super malhelaj arkoj, esprimis grandan penon por koncentrigi sian atenton. Ŝi salutis min, apenaŭ montrante facilan rideton, kaj mi reciproke konigis al ŝi mian memecon.

— Vi certe estas laca — mi rimarkis.

Sed antaŭ ol ŝi ion rediris, sinjorino Laŭra antaŭvenis, celante ŝparigi al ŝi penojn tro malfacilajn por la junulino.

— Eloiza ankoraŭ estas maltrankvila, afliktita. Tio estas parte pravigebla. La tuberkulozo longe daŭris kaj restigis ĉe ŝi profundajn postesignojn; oni tamen en ĉia okazo devas havi optimismon kaj bravecon.

Mi tiam vidis la junulinon malfermegi siajn karbonigrajn okulojn, kvazaŭ penante reteni la ploron, sed vane. Ŝia torako komencis forte ondadi, kaj, alpremante naztukon al la vizaĝo, ŝi ne sukcesis sufoki la angorajn plorsingultojn.

— Malsaĝulineto! — diris la kormilda sinjorino, ŝin brakumante. — Vi ja devas kontraŭ tio reagi. Tiuj impresoj estas nenio alia, ol la rezultato de neperfekta religia edukado. Vi scias, ke via patrino ne malfruos kaj ke vi ne povas kalkuli je la fideleco de via fianĉo: li tute ne estas preparita al tio, ke li oferus al vi sinceran spiritan sindonon sur la Tero. Li staras ankoraŭ tre malproksime de la superega spirito de la amo pura. Li kredeble edziĝos kun alia virino, kaj vi devas alkonformiĝi al ĉi tiu konvinko. Cetere ne estus juste postuli lian tujan venon.

Patrinece ridetante, sinjorino Laŭra aldonis:

— Ni supozu, ke li tuj venus, perfortante la leĝon. Ĉu via sufero ne estus pli dolora? Ĉu vi ne pagus kare por via kunklopodado en ĉi tiu rilato? Ne mankos al vi afablaj amikoj kaj frata helpo, por ke ĉi tie al vi fariĝu hejme. Kaj, se vi efektive amas tiun junulon, vi devas do serĉi al vi harmonion, por poste al li bonfari. Krom tio via patrino baldaŭ venos.

La abundaj larmoj de la junulino min kortuŝis. Mi penis ŝanĝi la temon de la konversacio, por liberigi ŝin el tia atako de la nervoj.

— De kie vi venis, Eloiza? — mi demandis.

Ankaŭ la patrino de Lizio, nun silenta, laŭŝajne deziris vidi ŝin senĝeniĝi.

Post longaj momentoj, en kiuj ŝi viŝis al si la larmplenajn okulojn, la junulino respondis:

— De Rio de Ĵanejro. (*)

— Nu, ne ploru — mi rediris. — Vi estas tre feliĉa. Vi elkarniĝis antaŭ nemulte da tagoj, troviĝas kune kun viaj parencoj kaj ne renkontis ventegojn sur la granda vojo...

Ŝi ŝajnis revigliĝi kaj pli trankvila parolis:

— Vi ne povas prezenti al vi, kiom multe mi longe suferas. Ok monatoj de batalado kontraŭ la tuberkulozo, malgraŭ la kuracado... La ĉagreno, ke mi infektis mian kareseman patrinon... Krom tio, estas neesprimeble, kion pro mi suferis mia kompatinda fianĉo...

— Pa, pa, ne diru tion — ridetante rimarkis sinjorino Laŭra. — Sur la Tero ni ĉiam havas la iluzion, ke ne ekzistas doloro pli granda, ol nia propra. Simpla blindeco: milionoj da homoj baraktas en situacioj ĝustasence kruelaj, kompare kun niaj provoj.

— Sed, avineto, Arnaldo restis senkonsola, en mal-espero. Ĉio ĉi estas pripensinda — ŝi emfaze diris ne-kontenta.

— Kaj ĉu vi sincere kredas tian impreson? — demandis la matrono per ama tono. — Plurajn fojojn, en la daŭro de via malsaneco, mi observadis vian ekŝfianĉon. Estis tute nature, ke li tiel profunde kortuŝiĝis, vidante vian korpon reduktita al iaj ĉifonaĵoj; li tamen ne estas preparita por kompreni iun senton puran. Li tre rapide konsoliĝos. Amo ĉiela estas io, kion ne havus ĉia ajn homa estaĵo. Konservu do vian optimismon. Vi ja povos lin ofte helpadi, sed, koncerne geedziĝon, kiam vi kune kun ni povos viziti terajn regionojn, vi lin trovos jam edziĝinta kun alia virino.

Mirante mem tion ĵus diritan, mi rimarkis la doloran surpriziĝon de Eloiza. La resaniĝanta junulino ne sciis, kiel sin teni antaŭ la flegmo kaj saĝeco de sia avino.

— Ĉu tio estas ebla?

(*) Rio de Ĵanejro: nomo de la ĉefurbo kaj ankaŭ de unu el la ŝtatoj de Brazilo. Ordinare oni komprenas sub ĉi tiu nomo la *ĉefurbon*. — *La Trad.*

La patrino de Lizio prenis ekstreme afablan mienon kaj diris:

— Ne estu obstina kaj ne volu nei mian parolon.

Rimarkinte, ke la malsanulino ŝajnis preni teniĝon, kvazaŭ ŝi dezirus pruvojn, sinjorino Laŭra tre dolĉe insistis:

— Ĉu vi ne memoras pri Maria de Luz, via koleginino, kiu ĉiudimane alportis al vi florojn? Nu, eksciu do: kiam la kuracisto konfidence komunikis, ke via materia korpo ne povos revigliĝi, Arnaldo, kvankam profunde ĉagrenita, komencis involvi ŝin en mensajn vibrojn aliajn, ol la ĝistiamaj. Nun, kiam vi ĉi tie troviĝas, liaj novaj decidoj ne longe prokrastiĝos.

— Fi, kiel abomene, avineto!

— Kial “abomene”? Vi ja devas kutimi konsideri la aliulajn bezonojn. Via fianĉo estas nenia eksterordinara homo, ankoraŭ ne atentis la superegajn belaĵojn de la spirita amo. Vi ne povas ĉe li okazigi ian miraklon, kiel ajn kore vi lin amas. La eltrovo de si mem estas aparta afero de ĉiu. Arnaldo post kelka tempo ekkonos la belecon de via idealismo; en la nuna momento estas necese lasi lin al la provo, kiujn li devas sperti.

— Mi ne rezignacias pri tio! — ekkriis en larmoj la junulino. — Ĝuste Maria de Luz, tiu amikino, kiun mi ĉiam opiniis plej fidela...

Sinjorino Laŭra ridetis kaj prudente parolis:

— Ĉu tamen ne estus ja pli agrable konfidi lin al la zorgado de iu parenca animo? Maria de Luz ĉiam estos via spirita amikino, dum ia alia virino eble, post kelke da jaroj, malfaciligus al vi la eniron en lian koron.

Ĉio ĉi min ekstreme mirigis. Eloiza dronis en larmoj. La bonkora sinjorino rimarkis mian maltrankvilecon, kaj, eble por orienti ne nur sian nepinon, sed ankaŭ min, saĝe klarigis:

— Mi scias la kaŭzon de via ploro, infano: viaj larmoj fontas el la senkultura grundo de nia miljara egoismo, de la obstina vantamo homa. Tamen la avineto tiel parolas, ne por vundi, sed por vekti vin.

Dum Eloiza ploradis, la patrino de Lizio, konsider-

ante, ke la malsanulino bezonas ripozon, invitis min re-
turne en la konversaciejon.

Kiam ni sidis, ŝi parolis konfidence:

— Mia nepino alvenis ĉi tien lacekonsumita. Ŝi tro forte implikis sian koron en la reto de memamo. Laŭ severa normo ŝia loko estus iu ĉambro en unu el niaj hospitaloj; tamen la asistanto Kocejro trovis pli bone lokumi ŝin apud nia karesemo. Cetere tio al mi tre plaĉas, ĉar mia kara Tereza, ŝia patrino, estas baldaŭ venonta. Iom da pacienco, kaj ni trafos la ĝustan solvon. Demando pri tempo kaj trankvileco.

KIO ESTAS HEJMO

Dezirante ĉerpi edukajn elementojn, fluantajn mem el la parolo de sinjorino Laŭra, mi scivole demandis:

— Ĉu vi, krom tiom da devoj, havas ankoraŭ aliajn taskojn eksterhejme?

— Jes; ni vivas en urbo de transiĝo, tamen la celoj de la kolonio estas laboro kaj lernado. Ĉi tie la inaj animoj prenas sur sin multe da devoj, preparante sin por reveni al la Tero aŭ por supreniri al pli altaj sferoj.

— Sed, ĉu la hejma organizado en “Nia Hejmo” estas tia sama kiel sur la Tero?

Mia kunparolantino faris multesignifan mienon kaj respondis:

— Pli bone, tio estas la surtera hejmo, kiu jam longe penas kopii nian hejmsistemon; tamen la tieaj edzoj kaj edzinoj, krom tre malmutaj, ankoraŭ sarkadas la grundon de la sentoj, invaditan de la amaraj herbaĉoj de la persona vantamo kaj loĝatan de la monstroj de ĵaluzo kaj egoismo. Kiam mi laste revenis de la Tero, mi kunportis, kiel kompreneble, profundajn iluziojn; sed ĝuste en tiu mia krizo de vundita fiero mi estis kondukita aŭdi grandan instruiston, en la Ministerio de Klarigo. De tiu tago, nova fluo da ideoj penetris en mian spiriton.

— Ĉu vi ne povus diri al mi ion pri tiuj lecionoj? — mi demandis, interesita.

— Tiu instruisto, tre kompetenta en Matematiko — ŝi daŭrigis —, igis nin senti, ke hejmo estas kvazaŭ ia orta angulo en la sistemo de la evoluado al Dio. La latero vertikala estas la virina sento, envolvita en la

inspiroj, kreantaj la vivon; la latero horizontala esta la vira sento, en senĉesa aktiveco sur la kampo de la komuna progresado; la hejmo estas la sankta vertico, kie viro kaj virino renkontas unu la duan por la nepre necesa interkompreno: ĝi estas templo, kie la homoj devas sin interligi pli bone spirite, ol korpe.

“Hodiaŭ, sur la Tero, granda nombro da homoj, studentaj la sociajn demandojn, proponas plurajn rimedojn kaj aŭdigas sian voĉon por la reboniĝo de la hejma vivado. Iuj el ili eĉ asertas, ke la sistemo de la homa familio minacas disfali. Gravas tamen atenti, ke hejmo estas valorega konkero, kiun la homoj paŝo post paŝo konkretigas. Kie, sur la Tero, la vera hejma konstruo, fundamentita sur perfekta harmonio, kun juste interdividitaj rajtoj kaj devoj? La plimulto de la surteraj geedzoj pasigas la sanktajn horojn de la tago nutrante reciprokajn indiferentecon aŭ sovaĝan egoismon. Kiam la edzo sin tenas trankvila, la edzino ŝajnas afliktegita; kiam la edzino humile silentas, la edzo tiranas. Nek la edzino estas preta kuraĝigi la edzon laŭ la horizontala linio de liaj materiaj laboroj, nek la edzo decidiĝas sekvi ŝin en la dia flugado de kordolĉeco kaj sento, direkte al la superaj sferoj de la Kreitaĵaro. En la societo ili hipokritas, kaj en la intima vivo unu faras mensajn vojaĝojn malproksimen, kiam la alia pritraktas sian propran oficon. Se la edzino parolas pri siaj infanoj, la edzo vagadas tra siaj negocoj; se li rakontas pri ia malfacilaĵo en la lin koncernanta laboro, ŝia menso flugas al la metiejo de la modistino. Komprenoble, ke en tiaj cirkonstancoj la Dia angulo estas misdesegnita. Du diverĝaj linioj vane penas formi la idealan verticon, kiu prezentus ŝtupon de la grandioza ŝtuparo de la vivo eterna.”

Ĉi tiuj paroloj min profunde penetris; treege impresita de ili, mi rimarkis:

— Sinjorino Laŭra, ĉi tiuj sciigoj kreas tutan mondon da novaj pensoj. Ha, se ĉion ĉi ni konus sur la Tero!

— Ĝi estas demando pri sperto, mia amiko — rediris la respektinda sinjorino —; viro kaj virino lernos tra suferado kaj batalado. En la nuna momento tre malmultajn scias, ke hejmo estas esence Dia organismo, kaj

en ĝia interno oni devas vivi per la tuta koro, per la tuta animo. En la tempo, kiam la ordinaraj homoj trairas la florantan ĝardenon de gefianĉeco, ili uzas la plej efikajn rimedojn por esti duope; tial oni diras, ke ĉiuj estaĵoj estas belaj, kiam vere amantaj. Temo eĉ plej banala fariĝas aparte ĉarma en plej frivolaj babiladoj. Viro kaj virino tie montriĝas en la tuta pleneco de sia plej nobla potenco; sed, apenaŭ ili ricevis la geedziĝan benon kaj eliris el la iluzia vualo de la deziro, jen la plimulto falas en la brakojn de la malnovaj monstroj, kiuj tiranas korojn. Fariĝas neniam kompromisoj. Ne ekzistas toleremo kaj, iafoje, eĉ ne frateco. Kaj kiam la geedzoj perdas sian kamaradecon kaj la plezuron konversacii, jen estingiĝas la luma beleco de amo. Post tiu momento tiuj pli bone edukitaj sin reciproke respektas, tiuj pli krudaj apenaŭ digestas unu la duan. Ili neniel interkompreniĝas. Demandoj kaj respondoj estas formulataj per iaj sekaj vortetoj. Kiel ajn forte kuniĝas la korpoj, tamen vivas la mensoj malkune, irante vojojn en kontraŭaj direktoj.

— Ĉio ĉi estas pura vero! — mi diris kortuŝita.

— Sed kion fari, mia amiko? — daŭrigis la bonkora sinjorino. — En la nuna evolucia fazo de la Tero ekzistas en la karnaj rondoj tre maloftaj ligiĝoj de animoj ĝemelaj, malmultaj geedziĝoj de animoj frataj aŭ samsentaj, kaj frakase grandega elcento da ligiĝoj, difinitaj por elaĉetado de kulpoj. La plej multaj homparoj estas efektivaj punlaboruloj en katenoj.

Por religi la fadenon de la konsideroj, elvokitaj de mia komenca demando, la patrino de Lizio parolis plue:

— La inaj animoj ne povas ĉi tie restadi senfaraj. Ĉiu el ili devas ja lerni esti patrino, edzino, misiulino, fratino. La tasko de virino en la hejmo ne povas limigi sin je iaj kelke da larmoj de senutila kompatato kaj multe da servutaj jaroj. Estas evidente, ke la nuntempa movado de la ardega feminismo estas abomeninda agado kontraŭ la veraj apartenaĵoj de la ina spirito. Virino ne povas elpaŝi konkure kun viro en oficejoj kaj kabinetoj, kie laŭrajta aktiveco estas rezervata al la spirito vira. Sed nia kolonio instruas, ke ekzistas, por virinoj,

noblaj servoj eksterhejmaj: prizorgado de malsanuloj, instruado, ŝpinado, informado, servoj postulantaj pacienc-on — ĉiuj ĉi prezentas tre signifajn okupojn. La viro devas lerni alporti en la hejman medion la riĉan frukton de siaj spertoj, kaj la virino devas havigi al la mal-facilaj laboroj de la viro la hejman dolĉecon. En la domo, inspiro; ekster ĝi, aktiveco. Unu ne vivus sen la dua. Kiel teniĝus rivero sen fonto, kaj kiel disverŝiĝus la akvo de fonto sen la fluejo de rivero?

Aŭdinte ĉi tiun demandon, mi ne povis deteni min de rideto.

Post longa paŭzo la patrino de Lizio daŭrigis:

— Kiam la Ministerio de Helpo konfidas infanojn al mia hejmo, miaj servohoroj estas kalkulataj duoble; el tio vi iel povas prezenti al vi la gravecon de la patrina tasko sur la Tero. Kiam tia ne estas la okazo, mi havas miajn konstantajn devojn kiel flegistino, oficante ĉiu-semajne kvardek ok horojn. Ĉiuj laboras en nia domo. Ekster mia resaniĝanta nepino neniuj el niaj familianoj troviĝas en regionoj de ripozo. Ok horoj da laborado ĉiutage, en la kolektiva intereso, estas programo facila por ĉiu. Mi hontus, se ankaŭ mi mem ĝin ne plenumus.

Mia kunparolantino kelkajn momentojn silentis, kaj dume mi vagis tra senfinaj konsideradoj...

LA KONVERSACIO DAŬRAS PLU

— Nia konversacio, sinjorino Laŭra — mi diris interesita —, elvokas sennombrajn demandojn, tial vi pardonu al mi la scivolemon, la trouzon de via pacienco...

— Ne parolu tiel — ŝi bonkore rediris —; demandu ĉiam. Mi ne kapablas instrui, tamen ĉiam facile estas informi.

Ni ridis ĉe tiu diro, kaj mi tuj demandis:

— Kiel estas rigardata la demando pri la proprumeco en ĉi tiu kolonio? Ĉu ekzemple ĉi tiu domo apartenas al vi?

Ŝi ridetis kaj klarigis:

— Ĝuste tiel, kiel okazas sur la Tero, la proprumeco ĉi tie estas relativa. Niaj akiroj estas farataj laŭ horoj da laboro. Nia mono en la fundo estas la kuponhoro. Ĉian uzataĵon ni aĉetas per tiuj kuponoj, kiujn ni mem havigas al ni koste de penado kaj sindono. La konstruaĵoj ĝenerale estas komuna haveco, sub la kontrolo de la Guberniestraro; tamen ĉiu spirita familio povas akiri hejmon (en nenia okazo pli ol unu), prezentante tridek mil kuponhorojn, kion oni povas atingi post kelka tempo da servado.

“Nia loĝejo estas akirita per la persista laborado de mia edzo, kiu venis en la spirita sferon longe antaŭ mi. Dek ok jarojn ni troviĝis for unu de la dua koncerne la ligilojn fizikajn, sed ĉiam kune dank’ al la ligiloj spiritaj. Sed Rikardo ne ripozis. Akceptite en “Nian Hejmon”, post kelka tempo da plej forta menskonfuziteco, li tuj komprenis la neceson de vigla laboro kaj por ni ambaŭ konstruis neston por la estonteco.

“Kiam mi alvenis, ni ekloĝis en la domo, kiun li ja ekstreme zorge aranĝis, kaj nia feliĉo fariĝis ankoraŭ pli granda. De tiam mia edzo donis al mi novajn sciojn. Miaj luktoj, dum mia vidvineco, estis akraj. Ankoraŭ tre juna, kun infanoj nemultejaraj, mi devis fronte rigardi al pezaj laboroj. Koste de malfacilaj atestoj mi havigis al la idoj de nia ligiĝo la edukajn ilojn, kiujn mi povis disponi, kaj, jam de iliaj plej fruaj jaroj, al kutimigis ilin al penigaj laboroj. Mi poste komprenis, ke la malglata surtera ekzistado evitigis al mi la ŝanceliĝojn kaj angorojn proprajn al la Ombrejo, ĉar ĝi gardis min kontraŭ multaj kaj danĝeraj tentoj. La korpa ŝvito aŭ la nobla okupiĝo, sur la kampoj de honesta agado, estas multevaloraj rimedoj por la altiĝo kaj sindefendo de la animo.

“Denove renkontiĝi kun Rikardo, teksu novan aman neston, estis por mi tio sama, kiel la ĉielo mem. En la daŭro de multe da jaroj ni vivadis senrompe feliĉan vivon, klopodante por nia evoluado, ĉiam pli unuiĝante kaj kunhelpante al la efektiva progresado de niaj familianoj. Kun la kreskado de la tempo Lizio, Jolanda kaj Jehudit alkolektiĝis al ni, kio pliigis nian feliĉon.”

Post nelonga paŭzo, dum kiu ŝi laŭŝajne meditis, mia kunparolantino gravamiene daŭrigis:

— Sed la tera medio nin atendis. Se la nuneco estis plena de ĝojo, la pasinteco tamen postulis reguligon de kontoj, por ke la estonteco alkonformiĝu al la Leĝo eterna. Ni ne povus ion pagi sur la Tero per kuponhoroj, sed per honesta ŝvito el laborado. Dank’ al nia bona volo klariĝis nia vidado rilate la doloran pasintecon. La leĝo pri la ritmo postulis do nian revenon.

Ĉi tiuj vortoj faris sur mi fortan impreson. Tio estis la unua fojo, en la kolonio, ke tiel profunde penetris en miajn orelojn la afero pri antaŭaj enkarniĝoj.

— Sinjorino Laŭra — mi diris, interrompante ŝin —, bonvolu permesi al mi rimarkon. Pardonu mian sciivolemon, ĉar ĝis nun mi ankoraŭ ne povis ion ekscii pri mia spirita pasinteco. Ĉu mi ne estas libera de la fizikaj ligiloj? Ĉu mi ja ne transiris la riveron de morto?

Ĉu, ĵus veninte ĉi tien, vi ekmemoris vian pasintecon, aŭ ĉu vi devis atendi la kunhelpon de la tempo?

— Mi ĝin atendis — ŝi kun rideto respondis —; antaŭ ĉio oni nepre devas forskui la fizikajn impresojn. La krustoj de la spirita malsupereco estas forte altenĝemaj. Estas necesa efektiva ekvilibro de spirito, por ke oni kapablu edifan rememoradon. Ĝenerale ĉiu homo portas kriantajn kulpojn dum la cikloj de sia vivo eterna. Kiu rememoras krimon de li mem faritan, tiu sin ordinare opinias la plej mizera homo en la Universo; kaj iu, kiu rememoras la krimon, kies viktimo li estis, sin tiel same rigardas kiel malfeliĉan. Sekve, nur tia animo, kiu estas plene memfida, ricevas kapablon de tuja rememorado, kiel ion venantan per si mem; la ceteraj estas konvene kontrolataj rilate rememorojn, kaj se ili provas trompi tiun postulon de la leĝo, tiam ili iras la vojon al menskonfuziĝo kaj al frenezo.

— Sed, ĉu vi rememoris vian pasintecon en natura maniero? — mi demandis.

— Mi klarigos al vi, kio okazis — ŝi volonte respondis. — Kiam heliĝis mia interna vidado, la malprecizaj rememoroj naskis en mi fortan konsternon. Pro kuntrafiĝo de cirkonstancoj mia edzo tiam travivis tian saman animstaton. Ni ambaŭ decidis konsulti la asistanton Longobardo. Detale ekzameninte niajn impresojn, tiu amiko kondukis nin al la magnetizistoj, oficiantaj en la Ministerio de Klarigo. Afable akceptite, mi unue venis en la Arkivon, kie estas konservataj individuaj notoj pri ĉiuj. La teknikistoj de tiu ministerio konsilis al ni, sen malutilo al niaj laboroj ĉe tiu de Helpo, legi, dum du jaroj, niajn proprajn memoraĵojn pri okazoj ampleksantaj tri jarcentojn. La estro de la sekcio de Rememoroj ne permesis al ni legi pri antaŭaj fazoj, ĉar, li diris, ni ne povus elporti la rebildiĝon de pli malproksimaj tempoj.

— Kaj ĉu vi sentis, ke vi reposedas en la memoro tiujn okazaĵojn dank' al tiu sola legado? — Mi scivole demandis.

— Ne; legado sole nur informas. Post longa tempo da meditado por la mensklarigo de ni mem, ni estis,

ekstreme surprizite, submetitaj al konvenaj psikaj procedoj, por enpaŝi en la emociosferon de rememoroj. La Spiritoj teknikistoj pri la afero penetrigis emanajojn en niajn cerbojn, kio vekis certajn dormantajn fortojn... Al Rikardo kaj mi tiam revenis en la memoron tutaj tricent jaroj. Tiamaniere ni komprenis, kiel granda ankoraŭ estas nia ŝuldo al la teraj institucioj!

— Kaj kie troviĝas nia frato Rikardo? Kiel plezure mi konatiĝus kun li! — mi ekkriis sub forta impreso.

La patrino de Lizio signifoplene balancis la kapon kaj diris:

— Laŭ niaj observoj rilataj al la pasinteco ni interkonsentis novan renkontiĝon sur la terkrusto. Ni havas laboron, multe da laboro por fari sur la Tero. Tial Rikardo foriris de ĉi tie antaŭ tri jaroj. Miavice, mi foriros post nemultaj tagoj. Mi atendas nur pri la alveno de Tereza, por ke ŝi restu apud niaj karuloj.

Kaj kun nebula rigardo, kvazaŭ ŝia menso ŝvebus tre malproksime, apud la filino ankoraŭ mallibera sur la Tero, sinjorino Laŭra daŭrigis:

— La patrino de Eloiza ne malfruos. Ŝia trairado tra la Ombrejo daŭros nur kelkajn horojn, konsidere al ŝiaj grandegaj sinoferoj detempe de ŝia infaneco. Dank' al siaj multaj suferoj ŝi ne bezonos la flegadon en la fakoj de Regenerado. Mi povos do transdoni al ŝi miajn devojn en la Ministerio de Helpo kaj foriri trankvila. La Sinjoro ne forgesos pri ni.

XXII

LA KUPONHORO

Rimarkinte, ke sinjorino Laŭra subite malĝojiĝis, rememorante sian edzon, mi ŝanĝis la temon de nia interparolado, demandante:

— Kion vi dirus al mi pri tia “kuponhoro”? Ĉu ĝi estas ia monigita metalo?

Mia kunparolantino disfandis la melankolian aspekton, en kiun ŝi estis enprofundiĝinta, kaj ĝentile respondis:

— Ĝi propre ne estas mono, sed kupono de individua servado, en rolo de akira valorajo.

— Akira? — mi abrupte demandis.

— Mi klarigos la aferon — respondis la bonkora sinjorino. — En “Nia Hejmo” la produktado de elementaj vestaĵoj kaj manĝoj apartenas komune al ĉiuj. Ekzistas centraj servoj por distribuado ĉe la Guberniestrejo kaj ĉe la departementoj kun tia sama laboro ĉe la ministerioj. La fundamenta provizejo estas propraĵo kolektiva.

Ĉe mia mieno, silenta de mirego, ŝi emfaze daŭrigis:

— Ĉiuj kontribuas por la pligrandigo de la komuna haveco kaj de ĉi tiu vivas; sed tiuj, kiuj laboras, akiras justajn rajtojn. Ĉiu loĝanto en “Nia Hejmo” ricevas porciojn da pano kaj vestoj, sed ja tiujn ĝuste necesajn; tamen, tiuj, kiuj klopodas por havigi al si la kuponhoron, atingas certajn prerogativojn en la socio. Tiu Spirito, kiu ankoraŭ ne laboras, povas esti gastigata ĉi tie; tiuj kunlaborantaj povas havi sian propran domon. La senfarulo ja portas ian veston, sed la laborulo surmetas ĉian ajn veston laŭplaĉe: ĉu vi komprenis? La senokupuloj povas pasigi longan tempon sur la ripozo-

kampoj aŭ en la flegparkoj, dank' al la propeto de amikoj por ili; sed la laboremuloj gajnas la kuponhoron kaj rajtas ĝui la societon de karaj fratoj en la lokoj difinitaj por amuzo, aŭ la kontakton kun saĝaj orientistoj en la diversaj lernejoj de la ministerioj ĝenerale. Ni devas scii la prezon de ĉiu noto pro pliboniĝo kaj altiĝo. Ĉiu el ni, laborantaj, devas oferi minimume ok horojn da utila servado en la dudek kvar horoj de la tagnokto. Sed la laborprogramoj estas multenombraj, kaj la Guberniestraro konsentas kvar horojn da kromlaboro al ĉiu, kiu volonte deziras porti sian helpon al la komuna penado. Tiamaniere multaj gajnas ĉiusemajne sepdek du kuponhorojn, ne parolante jam pri la servoj-oferoj, kies pago estas duobla, iafoje eĉ triobla.

— Sed, ĉu tiu estas la sola pagilo? — mi demandis.

— Jes, ĝi estas la norma rimedo por pagado al ĉiuj laborantoj en nia kolonio, kiel al regantoj, tiel ankaŭ al regatoj.

Rememorante la terajn organizaciojn, mi demandis mirigite:

— Kiel tamen alkonformigi tian normon kun la speco de la servo? Administranto ricevas ok kuponhorojn pro sia ordinara taglaboro, kaj transportisto ricevas tiom same? Ĉu la laboro de la unua ne estas pli inda, ol tiu de la dua?

La sinjorino ridetis al ĉi tiu demando kaj klarigis:

— Ĉio estas rilata. Ĉu en la sfero de regantoj, ĉu en la rondo de subuloj, se la laboro postulas personan sinoferon, la pago esta laŭjuste multobligata. Sed, por pli detale ekzameni vian demandon, estas necese antaŭ ĉio flanken meti certajn antaŭjuĝojn de la tera socio. La speco de la servo estas el la plej gravaj aferoj, kaj en ĉi tiu rilato la demando sur la Tero estas ja pli malfacile solvebla. La plej multaj enkarnuloj apenaŭ kreas al si spiriton de servado kaj eklernas labori sur la diversaj kampoj de la homa vivo. Ĝuste tial oni devas pli atenteme difini la salajrojn sur la Tero. Ĉia ekstera gajno en la mondo estas gajno pasema. Ni vidas laborulojn, kiujn obsedas la avideco je mono kaj kiuj transdonas montojn da oro en la manojn de senkonsciencaj,

malŝparemaj heredantoj; aliaj amasigas monon en bankoj, kio alportas al ili turmenton kaj ilia familio ruinon. Krom tio, oni konsideru, ke sepdek elcentoj de la administrantoj sur la Tero ne pesas la moralajn devojn, kiuj ilin koncernas, kaj tia sama kvanto ekzistas da subuloj. Preskaŭ ĉiuj konfesas, ke ili havas nenian alvokiĝon al siaj oficoj, kaj tamen ili ricevas la salajrojn respondajn al la rangoj, kie ili sidas. Registaroj kaj entreprenoj pagas kuracistojn, kiuj ekspluatas interesojn aliajn, ol la propraj devoj, kaj laboristojn, kiuj nur lasas pasi la tempon. Ĉu do tie ekzistas ia konscienco pri servado? Pluraj teknikistoj de ekonomia industrio neniel ŝatas sian devon kaj profitas de favoremaj leĝoj, simile al venenaj muŝoj sur la sankta pano (*), postulante kromsalajrojn, faciligojn kaj emeritecon. Sed kredu, ke ĉiuj tre kare pagos por sia malzorgeco. Ŝajnas ankoraŭ malproksima la tempo, kiam la socio povos difini la kvaliton de servado de la homoj; en la supera spirita mondo oni taksas nenian laboron, ne konsiderante la elspezintajn moralajn valorojn.

Ĉi tiuj vortoj vekis min por novaj konceptoj pri la vivo. Rimarkinte mian soifon je instruiĝo, mia kunparolantino daŭrigis:

— La vera gajno de la homo havas spiritan karakteron, kaj la kuponhoro, en nia organizacio, varias rilate la substancan valoron, laŭ la speco de niaj servoj. En la Ministerio de Regenerado, estas la Kuponhoro-Regenerado; en tiu de Klarigo, la Kuponhoro-Klarigo, kaj tiel plu. Nu, ĉe la ekzamenado de la spirita profito, estas kompreneble, ke la labordokumentaro montras la esencon de la servo. La fundamentaj akiroj konsistas el sperto, edukiĝo, riĉiĝo je Diaj benoj, pliigo de kapabloj. El ĉi tiu punkto de vidado, la faktoroj frekventemo kaj sindonemo ĉi tie estas preskaŭ ĉio. Ĝenerale parolante, en nia transiĝa urbo la plimulto sin preparas, cel-

(*) Komparu kun “La Predikanto”, 10:1: “Venenaj muŝoj putrigas kaj haladzigas la oleon de parfumisto.” — *La Trad.*

ante la neceson reiri al la enkarnaj rondoj. Laŭ ĉi tiu principo estas kompreneble, ke iu, oferinta kvin mil horojn en servoj de regenerado, faris admirindan penon, efektive por sia propra bono; tiu, kiu dediĉis ses mil horojn ĉe la Ministerio de Klarigo, estas pli instruita. Ni ja povas elspezi la akiritajn kuponhorojn, sed pli multe valoras la individua registrado de la tempo de utila servado, kiu konsentas al ni rajton je plej meritaj titoloj.

Tiaj instruoj min profunde interesis.

— Sed, ĉu ni povus elspezi niajn kuponhorojn favore por niaj amikoj? — mi scivola demandis.

— Jes, sendube — ŝi diris —; ni ja povas dividi la benojn el nia penado kun ĉiu ajn laŭ nia propra plaĉo. Tio estas neforigebla rajto de la fidela laboranto. Miloj da personoj estas en “Nia Hejmo” favorataj de tia aktivigo de la amikeco kaj de la frata stimulado.

La patrino de Lizio nun ridetis kaj rimarkis:

— Ju pli granda estas nia kalkulita labortempo, des pli multe da propetoj ni povas fari. Ni ĉi tie komprenas, ke ekzistas nenio nepagata kaj ke por ion ricevi, estas nepre necese ion doni. Peti estas do tre signifa okazaĵo en la ekzistado de ĉiu. Nur tiuj povas peti aŭ konsenti iun komplezon, kiuj posedas alkonformajn titolojn, ĉu vi komprenis?

— Kaj la demando pri heredo? — mi subite demandis.

— Ĉi tiu afero estas ĉe ni neniom komplikita — respondis sinjorino Laŭra kun rideto. — Ni vidu ekzemple mian situacion. Proksimiĝas la tempo de mia reveno al la terkrusto. En mia persona registro mi havas tri mil Kuponhorojn-Helpojn. Mi ne povas heredigi ilin al mia baldaŭ venonta filino, ĉar tiuj valoradoj de tiam apartenos al la komuna kapitalo, kaj tial mia familio rajtos heredi nur la domon. Mia servatesto tamen rajtigas min propeti por ŝi kaj prepari por ŝi laboron kaj amikan helpo; samtempe tio certigas al mi la altvaloran apogon de la organizacioj de nia spirita kolonio dum mia estado en la rondoj de la karno. Al tio mi ne alkalkulas la grandegan profiton, kiun mi ĉerpis el la sperto dum la

jaroj de kunlaborado en la Ministerio de Helpo. Mi revenos sur la Teron provizita per pli altaj valoraĵoj kaj portante pli noblajn kapablojn por la dezirata sukceso.

Mi estis jam preta ellasi ekkriojn de admiro pro tia simpla maniero gajni, profiti, kunlabori kaj servi, komparante tiujn solvojn kun la surteraj normoj, sed jen murmureto alproksimiĝis al la domo. Antaŭ ol mi povis fari ian rimarkon, sinjorino Laŭra ĝoje diris:

— Jen revenas niaj karaj.

Kaj ŝi leviĝis, por ilin akcepti.

XXIII

SCII AŬDI

En mia koro mi bedaŭris la interrompon de nia konversacio. La klarigoj de sinjorino Laŭra plifortigis mian koron.

Lizio envenis hejmen videble feliĉa.

— Halo! Ĉu vi do ankoraŭ ne enlitiĝis? — li ridetante demandis.

Kaj dum la gejunuloj faris sian adiaŭon, li komplezeme min invitis:

— Venu en la ĝardenon, ĉar vi ankoraŭ ne vidis la ĉi-tiean lunlumon.

Dum la mastrino komencis konversacion kun siaj filinoj, mi eliris kun Lizio al la florantaj bedoj.

Tio estis belega spektaklo! Enfermite en hospitalo, inter grandaj arboj, mi ankoraŭ ne konis la mirindan scenon, kiun tie prezentis la hela nokto, en la vastaj kvartaloj de la Ministerio de Helpo. Plej belaj glicineoj ornamis la pejzaĝon. Neĝblankaj lilioj, ĉe kiuj la fundo de ilia kaliko estis blueta, aspektis kiel karesaromaj pokaloj. Mi profunde enspiris tiun aeron kaj sentis, ke ondoj da nova energio min tutan penetras. En la forajo la turoj de la Guberniestrejo montris belajn lumefektojn. Plej ravita, mi ne sukcesis vortigi la impreson, kiun ĉio tie faris sur min. Penante esprimi la admiron, kiu posedis mian animon, mi kortuŝita parolis:

— Mi neniam spertis tiel grandan pacon! Kia nokto!

Mia kamarado ridetis kaj emfaze diris:

— Inter ĉiuj sanmensaj loĝantoj de nia kolonio ekzistas ĉi tiu interkonsento, ke neniu elradia pensojn kontraŭajn al bono. Tiel la penado de la plimulto aliĝas

en preskaŭ konstantan preĝon, kaj de tio ekestas la pacvibroj, kiujn ni sentas.

Post kiam mi raviĝis ĉe la rigardado de tiu superbela bildo, kvazaŭ mi ensorbus la lumon kaj trankvilon de la nokto, ni revenis en la domon, kie Lizio alproksimiĝis al malgranda aparato en la akceptejo, simila al niaj radiofonoj. Mia scivolemo pliakriĝis. Kion ni aŭdos? Ĉu mesaĝojn el la Tero? Penetrante en miajn internajn demandojn, tiu amiko klarigis:

— Ni ne aŭdos voĉojn el la Tero. Niaj transsendoj estas farataj per vibrofortoj pli subtilaj, ol tiuj de la terkrusto.

— Sed nenia rimedo ekzistas — mi demandis —, por kapti la terajn elsendaĵojn?

— Sendube ni por tio havas rimedojn en ĉiuj ministerioj; tamen en niaj hejmoj esenca estas la demando pri nia nuneco. La planado de la farenadaĵoj, la notoj de la supera spiriteco kaj la altnivelaj instruoj staras nun, koncerne nin ĉi-tieajn, multe super ĉia penso pri iaj surteraj aferoj.

Li ja estis prava; tamen pro la malnova alligiteco al la hejmo, mi malpacience demandis:

— Ĉu tia seninteresiĝo estas tiel granda? Kaj la fore restantaj parencoj? Niaj gepatroj, niaj infanoj?

— Mi jam atendis ĉi tiun demandon. Sur la Tero ni ofte estas pelataj al kripligo de situacioj. La trograndiĝo de la sentado estas malbonaĵo komuna al preskaŭ ĉiuj el ni. Ni tie estas miljaraj katenitoj de ekskluzivismo. Ni ordinare zorgas nur pri nia propra familio, izoligante mem en tiu enfermiĝejo samsanga, kaj forgesas la ceterajn devojn. Ni vivas aparte de la veraj principoj de frateco. Ni ilin instruas al ĉiuj, sed ordinare, ĉe la momento de la atesto, ni estas solidaraj nur kun niaj plej proksimaj. Sed ĉi tie, mia amiko, la medalo de la vivo prezentas sian duan flankon. Estas necese ripari malnovajn kriplaĵojn kaj kompensi maljustaĵojn.

“En la komenco de la kolonio ĉiuj loĝejoj estis konstante ligitaj kun la rondoj de la surtera evoluado. Neniu rezignaciis pri la manko de sciigoj el sia parenkaro. De la Ministerio de Regenerado ĝis tiu de Altigo oni vivis

en senĉesa nervomilito. Maltrankviligaj onidiroj metis konfuzon en ĉiajn laborojn. Sed, ĝuste antaŭ du jarcentoj, unu el la grandanimaj ministroj de Dia Unuigo instigis la Guberniestraron plibonigi tian situacion. La eksguberniestro kredeble estis tro tolerema. Boneco misuzata naskas ribelojn kaj falojn. Kaj de tempo al tempo la sciigoj el la surteraj karuloj tumultigis multajn familiojn. La kolektivaj malfeliĉegoj en la mondo, kiam ili interesis kelkajn homojn en “Nia Hejmo”, ĉi tie fariĝis efektivaj plagoj. Laŭ nia arkivo, nia urbo estis pli bone ia departemento de la Ombrejo, ol propre regiono por refreŝigo de fortoj kaj instruado. Subtenate de la Ministerio de Dia Unuigo, la Guberniestro malpermesis tian ĝeneraligitan interkomunikiĝon. Ekflamis agitiĝo. Sed la nobla ministro, kiu inspiris tiun planon, uzis tiun instruon de Jesuo, ke la mortintoj enterigu siajn mortintojn (*), kaj la nova reĝimo post nelonge venkis.”

— Tamen — mi rediris — estus interese rikolti sciigojn pri niaj amatoj, migrantaj sur la Tero. Ĉu tio ne alportus al la animo pli da trankvileco?

Ankoraŭ apud la aparato, kiun li ne estis ŝaltinta eble tial, ke li deziris doni al mi pli detalajn klarigojn, Lizio respondis:

— Konsultu vian konsciencon, por vidi, ĉu valorus tion fari. Ĉu vi estas preparita, ekzemple, por tenadi la necesan flegmon, fidplene esperante kaj agante laŭ la Diaj ordonoj, eksciinte, ke iu filo de via koro estas kalumniata aŭ kalumnianta? Se oni nun sciigus vin, ke iu el viaj samsangaj fratoj estas hodiaŭ enkarcerigita kiel krimulo, ĉu vi estus sufiĉe fortanima por konservi vian trankvilecon?

Mi ridetis hontigita.

— Ni ne penu ricevi sciigojn el la malsuperaj tavoloj — li komplezeme daŭrigis — krom por tiu celo, por alporti ĝustan helpon. Sed oni konfesu, ke neniu helpas konvene, se lia sento kaj racio estas en malordo. Tial taŭga preparado fariĝas nepre necesa, antaŭ la starigo

(*) Mateo, 8:22. — *La Trad.*

de novaj kontaktoj kun la surteraj parencoj. Se ili liverus kampon al spirita amo, tia interkomunikiĝo estus dezirinda; sed grandega nombro da enkarniĝintoj eĉ ne la regadon super si mem atingis, baraktante iele-trapele meze en la ondoj de la materiala vivo. Ni devas, malgraŭ la sentimentaj malfacilaĵoj, eviti falon en malsuperajn vibrorondojn.

Montrante mian obstinemon, mi tamen demandis:

— Sed, Lizio, ĉu al vi, kiu havas amikon en la karno, nome vian patron, ne estus plezuro komunikiĝi kun li?

— Jes, sendube — li ĝentile respondis —; kiam ni meritas tian ĝojon, ni vizitas lin en lia nova formo, kaj tiel same okazas tiam, kiam li mem volas komunikiĝi kun ni. Sed ni ne forgesu, ke ni estas eraremaj; ni devas do nin turni al la koncernaj aŭtoritatoj, por ke tiuj difinu la postulatan oportunun aŭ meriton: por tio ni havas la Ministerion de Komunikiĝo. Mi aldiru, ke pli facila estas la veno el supera al malsupera sfero. Ekzistas tamen iuj leĝoj, laŭ kiuj oni devas ĝuste kompreni tiujn, troviĝantajn en pli malaltaj regionoj. Tiel grave estas scii paroli, kiel scii aŭdi. “Nia Hejmo” vivis tumulte, ĉar, ne sciante aŭdi, ĝi do ne povis doni efikan helpon, kaj la kolonio ofte fariĝis ia Babel.

Venkite de lia konvinka argumentado, mi ne plu parolis. Kaj, dum mi tenis min silente, la amika flegisto funkciigis la ricevagordilon antaŭ miaj rigardemaj okuloj.

XXIV

IMPRESA ALVOKO

Tuj kiam la aparato estis ŝaltita, milda melodio disverŝiĝis en la ĉambro, lulante nin en harmoniaj ondoj; sur la televida ekrano montriĝis per sia figuro la parolanto en sia kabineto. Post kelke da momentoj li komencis paroli:

— Radiostacio de la Posteno N-ro 2, en Loĝejo! Ni ĉiam ankoraŭ disradias la alvokon de la kolonio por la paco sur la Tero. Ni admonas la bonanimajn kunlaborantojn kolekti fortojn, por la gardo de la morala ekvilibro en la rondoj de la terglobo. Helpu nin ĉiuj, kiuj povos oferi kelkajn horojn da kunpenado en la laborfakoj, kie ligiĝas la mallumaj fortoj de la Ombrejo kun la homa menso. Nigraj falangoj de la malklereco, iam flamiginte la brulkonsumantajn torĉojn de milito en Azio, nun sieĝas la eŭropajn naciojn, ilin pelante al novaj krimoj. Nia sekcio, kune kun la ceteraj, klopodantaj por la spirita higieno en la rondoj pli proksimaj al la terkrusto, dissciigas tiujn manovrojn de la koncentriĝintaj potencoj de malbono kaj petas pri frata kunpenado kaj laŭebla helpo. Memoru, ke la paco bezonas defendantojn! Kunlaboru kun ni laŭmezure de viaj fortoj! Taskoj ekzistas por ĉiuj, ekde la kampoj de la terkrusto ĝis niaj pordegoj! La Sinjoro nin benu!

Ĉesis la voĉo kaj ree aŭdiĝis dia muziko. La tono de tiu stranga admono skuis miajn plej internajn fibrojn. Lizio helpeme klarigis:

— Ni nun aŭdas “Loĝejon”, malnovan servokolonion en intimaj rilatoj kun la malsuperaj regionoj. Kiel vi scias, ni estas en Aŭgusto 1939. Viaj lastaj personaj

suferoj ne ebligis al vi pensi pri la angora situacio de la mondo, sed mi povas aserti, ke la teraj nacioj troviĝas tre proksimaj al plej disruinigaj bataloj.

— Kio! — mi ekkriis terurita. — Ĉu do ja ne sufiĉis la tuta sango de la antaŭnelonga granda milito?

Lizio ridetis kaj fikse rigardis min per siaj brilaj kaj profundaj okuloj, kvazaŭ silente bedaŭrante la seriozecon de tiu homa horo. La unuan fojon la amika flegisto ne respondis al mi. Lia silento premis al mi la koron. Super ĉio miregigis min la multego de la spiritaj servoj sur la kampoj de nova vivo, kie mi nun troviĝis. Ĉu do ekzistas urboj, kie noblaj Spiritoj petas pri helpo kaj kunlaborado? La voĉo de la parolinto aspektis kiel efektiva S.O.S. (*). Mi vidis lian konsternitan mienon sur la ekrano de la televidilo. Tra siaj maltrankvilaj okuloj li elmontris profundan afliktiĝon. Kaj la lingvo? Mi klare aŭdis de li la portugalan lingvon, netan kaj korektan. Mi pensis, ke ĉiuj spiritaj kolonioj interkomunikiĝas per la vibro de la penso. Ĉu do, eĉ tie, estis tiel malfacila tia interrilato? Rimarkinte mian embarason, Lizio klarigis:

— Ni staras ankoraŭ tre malproksime de la idealaj regionoj de la menso pura. Kiel sur la Tero, tiel same ĉe ni tiuj, kiuj perfekte harmonias, kapablas interŝanĝi pensojn sen la idiomaj baroj; sed entute ni ne povas flanken meti la formon, laŭ la vasta senco de la vorto. Nia kampo de batalado estas nemezurebla. La tera homaro, konsistanta el milionoj da estuloj, ligiĝas kun la nevidebla kreitaro de tiu sama planedo, en la nombro de multaj miliardoj da animoj. Neniu povus do atingi pli progresintajn regionojn tuj post la morto de la materia korpo. Ankaŭ ĉi tie la naciajn kaj lingvajn posedaĵojn ĉirkaŭbaras psikaj limoj (**). En la plej divers-

(*) Kiel sciante, S.O.S. estas telegrafa signo, per kiu ŝipo en danĝero petas pri helpo. — *La Trad.*

(**) La nombro da elkarnuloj, kiuj bezonas lingvon internacian por interrilatoj kun aliaj elkarnuloj, estas nealkuleblaj miriadoj; kaj ĉiuj senescepte ĝin bezonas por mesaĝoj

aj fakoj de nia spirita laborado ekzistas granda nombro de Spiritoj liberaj de ĉia limigo, tamen estas grave konsideri, ke la plej multaj havas tiajn limigojn. Nenio trompas la principon pri sinsekvado, regantan en la leĝoj de evolucio.

En tiu momento ĉesis la muziko, kaj la sama parolinto reaŭdiĝis:

— Radiostacio de la Posteno N-ro 2, en Loĝejo! Ni disradias plu da alvokon de la kolonio por la paco sur la Tero. Pezaj nebulegoj amasiĝas super la tuta Eŭropo. Mallumaj fortoj el la Ombrejo penetras en ĉiujn angulojn, respondante al la alvoko de la malnoblaj inklinoj de la homo. Multaj sindonaj bonfarantoj, en la politikaj kabinetoj sinofere klopodas pri la internacia konkordo; sed iuj registaroj estas tiel enfermiĝintaj en si mem, ke ili apenaŭ ebligas ian spiritan influon. Ne havante organojn, kiuj estus prudentaj kaj donus nepasiajn konsilojn, tiuj landoj marŝas al vastampleksa milito. Ho tre amataj fratoj el la superaj sekcioj, ni helpu la konservadon de la homa trankvileco! Ni defendu la jarcentojn da sperto de multaj landoj, patrinoj de la okcidenta civilizacio! La Sinjoro nin benu!

Silentigis la parolanto kaj reaŭdiĝis la karesantaj melodioj.

La flegisto restis en silento, kiun mi ne kuraĝis rompi. Post kvin minutoj da ripoziga harmonio, reaŭdiĝis la sama voĉo:

— Radiostacio de la Posteno N-ro 2, en Loĝejo! Ni ankoraŭ disradias la alvokon de la kolonio por la paco sur la Tero. Kamaradoj kaj fratoj, ni voku pri helpo la potencajn Fratarojn de Lumo, respondantaj pri la destino de Ameriko! Kunlaboru kun ni por la savo de miljaraj kapitaloj de la tera evoluado! Ni marŝu helpe al la sendefendaj kolektivoj, ni subtenu la patrinajn kor-

al enkarnuloj. Ekzistas granda Esperanto-movado en la Transmondo, kaj en Brazilo multaj spiritistoj estas pri tio informitaj per mediumaj libroj. La efektiva centro de la Esperanto-movado estas Esperantista Universitato en la Transmondo.

— *La Eldonistoj.*

ojn, sufokitajn de angoro! Niaj fortoj nun vigle duelo-
 adas kontraŭ la legioj de la malklereco. Kiom vi nur
 povas, venu helpo al ni! Ni estas la nevidebla parto de
 la tera homaro, kaj multaj el ni reiros en la karnon,
 por elviŝi pasintatempajn erarojn. Ankaŭ la enkarna
 homaro estas nia familio. Ni unuigu en unu solan vi-
 bradon. Kontraŭ sieĝado de la mallumo, ni ekbruligu
 la lumon; kontraŭ la milito de malbono, ni ekmovu la
 kontraŭstaron de bono. Riveroj da sango kaj larmoj
 minacas la kampojn de la eŭropaj societoj. Ni proklamu
 la neceson de konstrua laboro, ni plivastigu nian fidon.
 La Sinjoro nin benu!

Lizio nun elŝaltis la aparaton, kaj mi vidis lin dis-
 krete forviŝi larmon, kiun liaj okuloj ne sukcesis reten-
 i. El digna impulso li diris emociita:

— Grandaj abnegaciuloj, tiuj fratoj en Loĝejo! Sed
 ĉio ĉi estas vana — li emfaze daŭrigis, malĝoja, post
 negranda paŭzo — : la tera homaro en la plej proksimaj
 tagoj pagos terurajn tributojn el suferado.

— Sed, ĉu nenia rimedo ekzistas, por forturni tiun
 grandegan katastrofon? — mi demandis kortuŝita.

— Bedaŭrinde — respondis Lizio per serioza kaj
 dolora tono —, la ĝenerala situacio estas tre kriza. Por
 elaŭdi la petojn de Loĝejo kaj de aliaj sekcioj en la
 najbaraĵo de la Ombrejo, ni ĉi tie faris multenombrajn
 kunvenojn; sed la Ministerio de Dia Unuigo avertis, ke
 la enkarna homaro, konsiderata kiel kolektiva persono,
 troviĝas en la stato de iu nesatigebla homo, kiu en la
 komuna bankedo superplene ŝtopis al si la stomakon:
 la organa krizo estas neevitebla. Pluraj nacioj nutris sin
 per krima malhumileco, vantamo kaj sovaĝa egoismo.
 Ili nun suferas la neceson elvomi la mortigajn venenojn.

Sed, vidigante sian decidon, ne plu trakti pri tiu do-
 lora temo, Lizio konsilis al mi enlitiĝi.

BONKORA KONSILO

La morgaŭan tagon, tre frue matene, mi faris simplan manĝon kune kun Lizio kaj liaj familianoj.

Antaŭ ol ŝiaj gefiloj foriris al sia laboro ĉe la Ministerio de Helpo, sinjorino Laŭra kuraĝigis mian hezitantan spiriton, bonhumore dirante:

— Mi jam elzorgis por vi kunulon por hodiaŭ. Nia amiko Rafael, oficisto ĉe Ministerio de Regenerado, venos ĉi tien, laŭ mia peto. Vi povas akcepti lian kompanion direkte al la ministerio, kiun vi nun vizitos. Rafael estas malnova amiko de nia familio kaj prezentos vin, en mia nomo, al la ministro Genezio.

Mi ne povus esprimi la ĝojon, kiu ekposedis mian animon. Mi radiis de feliĉo. Mi dankis emociita, ne trovante vortojn por mia ĝojego. Ankaŭ Lizio montris tian saman senton. Antaŭ ol eliri, li min forte ĉirkaŭbrakis, kio min ja kortuŝis. Kisante sian filon, sinjorino Laŭra petis:

— Vi, Lizio, avizu la ministron Klarenco, ke mi iros al la oficejo por la ĉiutagaj laboroj, tuj kiam mi konfidos ĉi tiun nian amikon al la zorgado de Rafael.

Tre kortuŝita, mi ne sukcesis danki ŝin por tia granda sindoneco al mi.

Duope kun mi, la sindonema patrino de mia amiko min dolĉe alparolis:

— Mia frato, permesu, ke mi donu al vi kelkajn konsilojn por viaj novaj vojoj. Mi pensas, ke patrina kunlaborado ja ion valoras, kaj ĉar via patrino ne loĝas en “Nia Hejmo”, tial mi prenas mem sur min la plezuron gvidi vin en ĉi tiu momento.

— Mi vin tre dankas! — mi diris kortuŝita. — Mi neniam scios vortigi mian dankon pro via komplezemo por mi.

La bonkora sinjorino ridetis kaj diris:

— Mi eksciis, ke vi antaŭ kelka tempo petis ian laboron...

— Jes, jes... — mi rediris, rememorante la klarigojn de Klarencio.

— Mi scias ankaŭ, ke vi ĝin ne tuj ricevis, sed iam poste estis al vi permesite viziti la ministeriojn, kiuj nin pli streĉe ligas kun la Tero.

Farante multesignifan mienon, la bona sinjorino aldonis:

— Ĝuste en ĉi tiu rilato mi prezentas al vi miajn humilajn admonojn. Mi parolas kun la rajto de pli granda sperto. Nun kun tiu permeso, kiel eble formetu de vi ĉian intencon je simpla scivolemo. Ne deziru similiĝi al ia nokta papilio, fluganta de unu lampo al alia. Mi scias, ke via emeco al intelekta esplorado estas ja tre granda. Vi estis kuracisto studema, pasie amanta novaĵojn kaj enigmojn; tial estos por vi tre facile iri glate en via nova loko. Ne forgesu, ke vi povos akiri sciojn pli valorajn kaj indajn, ol la nura analizado de la aferoj. Scivolemo, eĉ noblinterca, estas kvalito, kiu kreas mensan klimaton konsenteble tre interesan, sed iafoje danĝeran. En ĝia interno, brava kaj lojala Spirito kapablas moviĝi, farante honorigajn laborojn; sed la nedecidemaj kaj senspertaj eble trafas plej amarajn dolorojn, al neniu ajn utilajn.

“Klarencio proponis al vi vizitadi la ministeriojn, plej antaŭe tiun de Regenerado. Nu, atentu: ne limigu vin per nura observado. Anstataŭ nutri scivolemon, konsideru serioze la laboron kaj fordonu vin tutan al ĝi en la unua aperinta okazo. Se montriĝos ia tasko en la Ministerio de Regenerado, ne faru al vi la klopodon atingi pli altajn servojn en la aliaj ministerioj. Lerne konstrui vian rondon da simpatiantoj al vi kaj ne forgesu, ke esploro devas sekvi post servemo. Enmiksi sin en aliulajn laborojn sen nobla celo iafoje estas krima impertinentaĵo. Multaj fiaskoj en la mondaj aferoj ori-

ginas de tiu anomalio. Ĉiuj volas observi, malmultaj estas pretaj realigi. Nur digna laboro havigas al la Spirito la nepre necesan meriton je novaj rajtoj.

“La Ministerio de Regenerado baraktas meze en pezaj luktoj, ĉar tie ja situacias la plej malalta regiono de nia spirita kolonio. El tie eliras ĉiuj rotoj, difinitaj por la plej malfacilaj laboroj. Sed ne rigardu vin kiel humiligitan, plenumante modestajn taskojn. Memoru, ke en ĉiuj niaj sferoj, deloke de la Tero ĝis la plej altaj sekcioj de la superaj regionoj, rilate al la Tero, la plej granda laboristo estas la Kristo mem kaj ke li ne forfuzis fiere la pezan segilon de ĉarpentisto.

“La ministro Klarenco ĝentile rajtigis vin koni, viziti, analizi, sed, kiel saĝa servisto, vi povus turni observadon en utilan taskon. Povas esti, ke iu ricevas ĝustan rifuzon de la adminstrantoj, kiam li petas iun laboron, juste rezervatan al tiuj, kiuj forte penis kaj suferis en iu specialeco; sed neniuj malakceptas la manon de volontulo, amanta laboron pro la plezuro servi.”

Miaj okuloj estis malsekaj de larmoj. Tiuj vortoj, diritaj kun patrina dolĉeco, penetris al mi en la koron kvazaŭ ĉiela balzamo. Malofte mi iam sentis en mia vivo tian fratan intereson pri mia sorto. Tiu konsilo enprofundiĝis en mian animon. Kvazaŭ dezirante mildigi per amo siajn saĝajn konsiderojn, sinjorino Laŭra aldonis per karesa tono:

— La arto rekomenci estas el la plej noblaj, kiujn nia spirito povas preni al si. Tre malmultaj sur la Tero ĝin komprenas, kiel ni ja vidas. Ni tamen rememoru pri Paŭlo el Tarso, Doktoro en la Sinedrio, espero de unu raso pro sia kulturo kaj juneco, al kiu sin turnis ĉiuj okuloj en Jerusalemo kaj kiu unu tagon reiris al la dezerto, por rekomenci la homan provadon kiel kruda kaj malriĉa teksisto.

Mi ne povis plu elteni. Mi ekprenis al ŝi la manojn kiel dankplena filo kaj ilin superverŝis per la larmoj de ĝojo, inundantaj mian koron.

La patrino de Lizio, nun kun okuloj fiksita al la foraĵo, diris:

— Mi vin tre dankas, mia frato. Mi pensas, ke vi

ne venis en ĉi tiun domon dank' al ia hazardo. Ni ĉiuj estas interplektitaj per centjara amikeco. Mi baldaŭ reiros en la karnorondon, tamen ni estos ĉiam ankoraŭ ligitaj unu al la dua per la koro. Mi esperas, ke, antaŭ ol foriri, mi vidos vin entuziasma kaj feliĉa. Faru el ĉi tiu domo vian loĝejon. Laboru kaj kuraĝiĝu, fidante al Dio.

Mi levis miajn larmantajn okulojn, fikse rigardis ŝian amplenan mienon, spertis tiun feliĉon, fontantan el la puraj korinklinoj, kaj ricevis la impreson, ke mi konas mian kunparolantinon jam de longe pasintaj tempoj, kvankam mi, ja vane, provis rekoni ŝian karesemon ĉe pli malproksimaj rememoroj. Mi ekvolis ŝin kisi kaj rekisi kun fila kortuŝiteco, sed en tiu momento iu frapis je la pordo.

Montrante nedifineblan patrinan dolĉecon, sinjorino Laŭra min rigardis kaj diris:

— Tio estas Rafael, kiu venis por vin forkonduki. Iru, mia amiko, pensante pri Jesuo. Laboru por la bono de la aliaj, por trovi vian propran bonon.

NOVAJ PERSPEKTIVOJ

Meditante pri la amaj kaj saĝaj konsiloj de la patrino de Lizio, mi akompanis Rafaelon, konvinkite, ke mi iras, ne al observvizitoj, sed al lernado kaj utila servado.

Surprizite, mi rimarkis la belegajn aspektojn de tiu nova regiono, direkte al la loko, kie la ministro Genezio min atendis; mi tamen akompanadis Rafaelon silente, nun tenante min for de la plezuro multe demandi. Antaŭe, mi spertis novan specon de mensa aktiveco. Mi min tutan fordonis al preĝado, petante Jesuon helpi min sur la novaj vojoj, por ke ne manku al mi laboro kaj fortoj por ĝin plenumi. Antaŭe malinklina al preĝoj, mi nun tion uzis kiel altvaloran sentimentan bazon de mia programo servi.

Rafael mem de tempo al tempo direktis al mi rigardon de miro, kvazaŭ li ne devus atendi de mi tian konduton.

La aerobuso haltis antaŭ vasta konstruaĵo. Ni silente eliĝis.

Post nemultaj minutoj mi troviĝis antaŭ la respektinda Genezio, maljunuleto simpatia, sed kies vizaĝo elmontris neordinaran energion.

Rafael min frate prezentis al li.

— Ho jes! — diris la nobla ministro. — Ĉu vi estas nia frato Andreo?

— Por al vi servi — mi respondis.

— Mi havas informon de Laŭra pri via veno. Ne ĝenu vin, mi petas.

En tiu momento mia kamarado respektite alproksim

iĝis kaj petis sian forpermeson; poste li ĉirkaŭbrakis min kaj eliris. Rafael estis urĝe atendata en la fako, kie li oficis.

Fikse rigardante min per siaj tre brilaj okuloj, Genezio komencis, dirante:

— Klarenco interesite parolis al mi pri vi. Ni ofte akceptas personojn el la Ministerio de Helpe, vizitantajn por observoj, el kiuj plej multaj fariĝas provtempoj de servado.

Mi komprenis la subtilan aludon kaj diris:

— Ĉi tio estas mia plej granda deziro. Mi ja ne ĉesas petegi la Diajn Fortojn helpi mian mizeran spiriton, permesante, ke mia estado en ĉi tiu ministerio fariĝu tempo de lernado.

Genezio ŝajnis tuŝita de miaj vortoj; farante uzon el la inspiroj, kiuj inklinigis min al humileco, mi en larmoj petegis:

— Via Ministra Moŝto, mi nun komprenas, ke mia kelkatempa estado en la Ministerio de Helpe okazis dank' al la Favorkoreco de la Plejalta, eble pro la konstanta propeto de mia sindona sankta patrino. Mi tamen rimarkas, ke mi, ĝis nun, nur ricevis bonfarojn, nenion utilan donante. Certe mia loko estas ĉi tie, en rebonigaj laboroj. Se eble, mi petas, faru, ke la permeso viziti estu anstataŭigita per la eblo servi. Pli ol iam antaŭe mi nun komprenas la neceson renovigi miajn proprajn sciojn. Multe da tempo mi perdis en senutila vantamo, grandegajn elspezojn de energio mi faris en la ridinda adorado de mi mem!

Kontenta, li rimarkis sur la fundo de mia koro vivan sincerecon. Kiam mi min turnis al la ministro Klarenco, mi ankoraŭ ne sufiĉe konsciis, kion mi petas. Mi volis servon, sed mi eble ne deziris servi. Mi ne komprenis la valoron de la tempo kaj ne vidis la sanktigan benon de iu oportuno. En la fundo, ĝi estis la deziro esti plue tio, kio ĝis tiam: la kuracisto malhumila kaj respektata, blinda pri la sensecaj pretendoj de la egotismo ^(*), en-

(*) Egotismo: supermezura sento de sia propra personeco. — *La Trad.*

kiu mi vivis, enŝlosita en miaj propraj opinioj. Sed nun, ĉe tio, kion mi vidis kaj aŭdis, komprenante la respondecon de ĉiu filo de Dio en la senlima kreitaĵaro, mi metis sur la lipojn ĉion, kion mi posedis plej bonan. Unuvorte, mi estis sincera. Ne zorgigis min la speco de ia tasko al mi komisiota; mi strebadis al la superega enhavo de servemo.

La maljunuleto, surprizita, rigardis min kaj demandis:

— Ĉu la ekskuracisto esta ja vi mem?

— Jes... — mi hezitante respondis.

Genezio iom silentis, kvazaŭ serĉante ian decidon pri la afero, kaj poste diris:

— Mi laŭdas vian decidon kaj ankaŭ petas la Sinjoron vin konservi en tiu digna teniĝo.

Kaj kvazaŭ plej forte dezirante min kuraĝigi kaj ekflamigi en mia spirito novajn esperojn, li emfaze daŭrigis:

— Kiam lernanto estas preta, la Patro sendas instruanton. Tio sama okazas koncerne laboron: kiam servanto estas preta, aperas tasko. Vi, mia amiko, de longe ricevas de la Providenco grandegajn rimedojn. Vi volonte kunlaborus, komprenas respondecon, akceptas devon. Tia teniĝo treege favoras la konkretigon de viaj deziroj. En la rondoj de la karno ni havas la kutimon gratuli iun, kiu atingis finanĉan prosperacon aŭ bonegan socian pozicion; ĉi tie estas malsame: oni estimas komprenemon, individuan klopodon, sinceran humilecon.

Rimarkinte mian maltrankvilon, li finis:

— Estos por vi eble ricevi ĝustajn okupojn; tamen, en la nuna momento vi farus la plej bone, se vi vizitus, observus, esplorus.

Kaj tuj komunikigante kun la apuda kabineto, li laŭte parolis:

— Mi petas Tobijan al mi, antaŭ ol li iros al la Ĉambroj de Rebonigo.

Post nemultaj minutoj, ĉe la pordo ekaperis sinjoro kun senĝenaj manieroj.

— Tobija — afable diris Genezio —, jen amiko, veninta de la Ministerio de Helpe por observado. Mi opinias

tre utila por li la kontakton kun niaj laboroj en la rebonigaj ĉambroj.

Mi etendis al Tobija la manon, kion li reciprokis, ĝentile dirante:

— Al via dispono.

— Gvidu lin — daŭrigis la ministro, montrante grandan bonkorecon. — Andreo bezonas plej interne koni niajn laborojn. Faciligu al li ĉian oportunon, kiun ni povos disponi.

Tobija esprimis sian pretecon, vidigante la plej grandan bonvolon.

— Mi foriras — li bonhumore diris. — Se vi deziras min akompani...

— Sendube! — mi plezure rediris.

La ministro Genezio min ĉirkaŭbrakis kortuŝita, kun kuraĝigaj vortoj.

Mi decideme sekvis Tobijan.

Ni trairis vastajn kvartalojn, kie multe da konstruaĵoj aspektis al mi kvazaŭ abelejoj de intensa laborado. Rimarkinte mian silentan demandon, la nova amiko klarigis:

— Ĉi tie staras la grandaj fabrikoj de “Nia Hejmo”. La preparado de sukoj, de teksaĵoj, unuvorte, de ĉiaj ellaboraĵoj havigas okupon al pli ol cent mil homoj, kiuj per unu fojo revirtiĝas kaj lumigas al si la menson.

Post kelke da momentoj ni eniris en majestan konstruaĵon. Tuta armeo da servantoj ondadis tien kaj reen. Trapasinte longajn koridorojn, ni renkontis grandampleksan ŝtuparon, kondukantan al la malsupraj etaĝoj.

— Ni malsupreniru — diris Tobija per serioza tono.

Kaj rimarkinte mian miron, li komplezeme klarigis:

— La Ĉambroj de Rebonigo situacias en la najbarajo de la Ombrejo. Tiuj, ĉi tien enkondukitaj por flegado, ne eltenas la suprajn lumon kaj atmosferon en la unuaj tempoj de loĝado en “Nia Hejmo”.

XXVII

FINE LABORO

Mi neniam povus pentri al mi la bildon, kiu nun sterniĝis antaŭ miaj okuloj. Tio ne estis propre ia ambulanco, nek ia hospitalo por la ordinara kuracado de malsanuloj. Ĝi estis serio da vastaj ĉambroj, ligitaj inter si kaj plenaj de efektivaj homaj restaĵoj.

Stranga voĉbruado ŝvebis en la aero. Ĝemoj, plorsingultoj, korŝiraj frazoj, pafataj sen senco kaj celo. Kadavrecaj vizaĝoj, skeletaj manoj, monstraj mienoj travidigis teruran spiritan mizeron.

Tiel angora estis mia unua impresoj, ke mi devis helpi al mi per preĝo, por ne senkuraĝiĝi.

Tobija, tute trankvila, vokis maljunan servantinon; ĉi tiu komplezeme venis kaj li diris mirigita:

— Mi vidas malmulte da helpantoj: kio okazis?

— La ministro Flakus — respondis la maljunulino respektive — ordonis, ke la plimulto da ili akompanu la Samarianojn (*) por la hodiaŭaj laboroj sur la kampoj de la Ombrejo.

— Ni devas ankoraŭ pli streĉi niajn fortojn — li trankvile diris. — Ni perdu neniom da tempo.

— Frato Tobija! Frato Tobija! Pro karito! — kriis maljunulo kun gestoj, alkroĉita al la lito, kvazaŭ freneza. — Mi sufokiĝas! Ĉi tio estas miloble pli malbona, ol la morto sur la Tero... Helpon, helpon! Mi volas eliri, eliri! Mi volas aeron, multe da aero!

(*) Organizaĵo el bonfarantaj Spiritoj en "Nia Hejmo".
— *Noto de la Aŭtoro.*

Tobija alproksimiĝis, lin atente ekzamenis kaj demandis:

— Kial la stato de Ribejro tiel plimalboniĝis?

— Trafis lin grava krizo — respondis la servantino —, kaj la asistanto Gonsalves klarigis ĝin dirante, ke la faskoj da mallumaj pensoj, kontraŭ lin ĵetataj de liaj enkarnaj parencoj, estas la fundamenta kaŭzo de tiu pli granda menskonfuziteco. Ĉar li ankoraŭ estas tre malfortika kaj ne kolektis al si la mensan forton sufiĉan por elvindiĝi el la ligiloj, lin pli streĉe katenantaj ĉe la mondo, tial la kompatinda ne eltenas kiel dezirinde.

Dum la bonkora Tobija karesis la frunton al la malsanulo, la servantino klarigis plue:

— Hodiaŭ, tre frue matene, li sen nia permeso forkuregis el ĉi tie. Li kriadis, ke oni postulas lian ĉeeston en la hejmo; ke li ne povas forgesi siajn plorantajn edzinon kaj infanojn; ke ĝi estas kruelaĵo, reteni lin ĉi tie, for de la hejmo. Lorenzo kaj Hermes penis revenigi lin en la liton, sed tio estis ne ebla. Mi do decidis fluigi sur lin malvigligajn emanajojn. Mi forprenis de li la fortojn kaj la movokapablon, por lia bono mem.

— Vi faris tre bone — diris Tobija, pripensante la aferon —; mi petos la necesajn disponojn kontraŭ tia konduto de lia familio. Ĝi devas ricevi pli multe da zorgoj, por lasi en paco nian Ribejron.

Mi fikse ekrigardis la malsanulon, penante malkovri lian profundan estecon, kaj konstatis la veran karakteron de frenezulo. Li vokis Tobijan simile al iu infano, konanta sian bonfaranton, sed elmontris tamen absolutan apartecon for de ĉio, kio estis dirata pri li.

Rimarkinte mian miron, mia nova gvidanto klarigis:

— La kompatinda travivas ankoraŭ la fazon de inkubo, dum kiu la animo preskaŭ nenion alian vidas kaj aŭdas, ol siajn proprajn afliktojn. Homo, mia kara, renkontas en la reala vivo tion, kion li kolektis por si mem. Nia Ribejro lasis sin tutan posedi de multo da iluzioj.

Mi ekdeziris demandi pri la origino de liaj suferoj, ekkoni ilian kaŭzon, la historion de lia situacio; sed mi rememoris la saĝajn konsiderojn de la patrino de Lizio pri scivolemo kaj restis silenta. Tobija diris al la mal-

sanulo amikajn vortojn je optimismo kaj espero. Li promesis, ke li serĉos rimedojn por lia pli bona farto; li rekomendis al Ribejro teni sin trankvila por sia propra bono kaj ne ĉagreniĝi, ke li estas alkatenita al lito. Ribejro, forte tremante, kun vakseca vizaĝo, apenaŭ vidigis tre malgajan rideton kaj en larmoj lin dankis.

De tie ni ekiris inter multaj vicoj da bone zorgataj litoj, sentante la tian malagrablan haladzon; kiel mi poste eksciis, ĝi venis el la mensaj vaporejoj de tiu socio, ankoraŭ portanta la dolorajn impresojn de la materia morto kaj, en granda nombro, sub la regado de malnoblaj sentoj.

— Ĉi tiuj ĉambroj — afable klarigis mia kamarado — estas rezervitaj ekskluzive al viroj.

— Tobija! Tobija... Mi mortas de malsato kaj soifo! — kriis unu el la loĝantoj.

— Helpu, frato! — kriis alia.

— Pro Dio! Mi ne eltenas plu! — ekkriis ankoraŭ unu.

Kun la koro travundita ĉe la suferado de tiom da estuloj, mi ne povis reteni doloran demandon:

— Mia amiko, kiel ĉagrena estas tia amaso da suferantoj kaj turmentatoj! Kial ĉi tiu korprema vidaĵo?

Tobija nekonsternite respondis:

— Ni ne rimarku ĉi tie nur doloron kaj malesperon. Memoru, mia frato, ke ĉi tiuj malsanuloj estas flegataj, jam liberiĝis de la Ombrejo, kie tiom da retoj atendas la neantaŭvidemajn, ne zorgantajn pri si mem. En ĉi tiuj pavilonoj ili almenaŭ preparas sin por sia revirtiĝo. Koncerne la larmojn, kiujn ili verŝas, ni memoru, ke ili devas danki al si mem tiujn suferojn. La vivo de homo koncentriĝas tie, kie li koncentrigas sian propran koron.

Kaj post paŭzo, dum kiu li ŝajnis surda al tiom da krioj, li emfaze daŭrigis:

— Ili estas kontrabandistoj en la vivo eterna.

— Kiel do? — mi interrompis, interesite.

Mia kunparolanto ridetis kaj respondis per firma voĉo:

— Ili pensis, ke la esence surteraj valoraĵoj havas tian saman indon en la merkato de la Spirito. Ili imagis,

ke krimea plezuro, potenco de la mono, ribelo kontraŭ leĝo, altrudo de kapricoj transpasas la limojn de tomo kaj validas ankaŭ ĉi tie, donante al ili okazon por plujaj malsaĝaĵoj. Ili estis neantaŭzorgemaj negocistoj. Ili forgesis ŝanĝi siajn materiajn havaĵojn je spiritalaj kreditoj. Ili ne lernis eĉ la plej simplajn borsajn operaciojn en la mondo. Kiam ili iris Londonon, ili ŝanĝis milojn da milrejsoj (*) je sterlingoj; tamen, eĉ ĉe la matematika certeco pri la karna morto, ili ne donis al si la penon akiri la valoraĵojn de la spiriteco. Nun... kion fari? Jen milionuloj de la fizikaj sensacioj sin turnis en mizerulojn de la animo!

Absoluta realaĵo! Tobija ne povus pli logike rezoni.

Abunde disdoninte konsolon kaj klarigon, mia nova instruanto kondukis min en vastan apudan ĉambron, aspektantan kiel granda malsanulejo, kaj diris:

— Ni vidu kelkajn el ĉi tiuj duonmortintaj malferliculoj.

Narciza, la servantino, nin komplezeme akompanadis. La pordo malfermiĝis kaj mi preskaŭ ŝanceliĝis sur miaj piedoj ĉe tiu korpremanta surprizo. Tridek du kadavramienaj viroj kuŝis senmovaj sur tre malaltaj litoj, kun apenaŭ percepteblaj spirmovoj.

Farante signifoplenan geston per la montrofringo, Tobija klarigis:

— Ĉi tiuj suferantoj spertas dormon pli pezan, ol aliaj el niaj sensciaj fratoj. Ilin ni nomas “negativaj kredantoj”. Anstataŭ akcepti la regadon de la Sinjoro, ili estis absolutaj regatoj de egoismo; anstataŭ kredi la vivon, la aktivecon, la laboron, ili rigardis kiel verajn nur la nenion, la senmovecon kaj la venkon de krimo. Ili faris el la homa provado konstantan preparadon de granda dormo; kaj, havante nenian ideon pri tio, kio estas la bono servanta al kolektivo, ili ne povas alie, ol dormadi jarojn post jaroj tra inferaj inkuboj.

Mi ne sukcesis esprimi mian miregon.

(*) Milrejsa = mil rejsoj: iama brazila monunujo, hodiaŭ nomata “kruzero”. — *La Trad.*

Tre zorgema, Tobija komencis, antaŭ miaj mirplenaj okuloj, fluigi sur ĉiun el ili revigligajn emanaĵojn. Tion ricevinte, la du unuaj komencis eligi tra la buŝo nigran substancon, ian malhelkoloran viskecan vomajon kun naŭzegaj kadavrecaj vaporetoj.

— Tio estas venenaj fluidaĵoj, kiujn ili sekrecias —
tute trankvile klarigis Tobija.

Narciza plej klopodis por la tuja purigado, sed vane. Granda nombro da ili elvomis tian saman fiodoran nigran substancon. Tiam mi instinkte ekprenis la higienajn laborilojn kaj arde eklaboris.

La servantino laŭŝajne ĝojis pro la humila helpo de la nova frato, kaj Tobija rigardadis min kontenta kaj dankoplena.

Tiu laboro daŭris plu la tutan tagon kaj kostis al mi benindan ŝviton; neniu amiko en la mondo povus taksu la supermezuran ĝojon de la kuracisto, rekomencanta la edukadon de si mem kiel tute simpla flegisto.

XXVIII

EN SERVADO

Post la kolektiva preĝo, ĉe krepusko, Tobija funkciigis la radiofonon, por aŭdi la Samarianojn, laborantajn en la Ombrejo.

Prave scivola, mi eksciis, ke tiaj taĉmentoj en interkonsentitaj horoj komuniĝas kun tiuj servantoj ĉe la malantaŭaj postenoj.

Mi sentis min iom laca pro la fortaj penoj, sed la koro kantis himnojn de interna ĝojo. Mi fine ricevis la feliĉon de laboro; kaj la servopreteco havigas mistere energiajn fortikigilojn.

Ĉe la elektra kontakto la malgranda aparato, antaŭ miaj okuloj, post kelkaj minutoj da atendo ektranssendis alvokon:

— Samarianoj al la Ministerio de Regenerado! Samarianoj al la Ministerio de Regenerado! Multe da laboro en la abismoj de la ombro. Ni sukcesis delokigi grandan amason da malfeliĉuloj, liberiginte el la spirita mallumo dudek naŭ fratojn: dudek du en menskonfuziteco kaj sep en absoluta psika elĉerpiĝo. Niaj taĉmentoj nun aranĝas ilian transportadon. Ni alvenos je kelke da minutoj post noktomezo. Ni petas la necesajn disponojn...

Rimarkinte, ke Narciza kaj Tobija forte mirante rigardas unu la duan, apenaŭ eksilentis la stranga voĉo, mi ne povis reteni la demandon, ŝvebantane super miaj lipoj:

— Kio do? Kial tia amasa transportado? Ĉu ĉiuj ne estas ja Spiritoj?

Tobija ridetis kaj klarigis:

— Mia frato forgesas, ke ne en alia maniero vi venis al la Ministerio de Helpejo. Mi konas la epizodon

pri via veno. Ni ĉiam memoru, ke la Naturo ne faras saltojn kaj ke, ĉu sur la Tero, ĉu en la Ombrejo, ni estas envolvitaj en pezegaj fluidecaĵoj. Struto kaj hirundo ambaŭ estas birdoj kaj havas flugilojn; tamen la unua nur portate atingas la altojn, dum la dua rapide tranĉas la vastajn lazurojn.

Kaj por vidigi, ke tiu momento ne permesas ekster-temajn konsiderojn, li sin turnis al Narciza, dirante:

— La transportotoj en ĉi tiu nokto estas tre multaj. Ni devas fari tujajn antaŭarangojn.

— Estos necesaj multe da litoj! — ekkriis iom afliktita la servantino.

— Ne zorgu — energie rediris Tobija —, ni lokos la menskonfuzitojn en la Pavilonon 7 kaj la senfortulojn en la Ĉambbron 33.

Tuj poste li levis la dekstran manon sur la frunton, kvazaŭ meditante pri io tre grava, kaj diris:

— Ni facile solvos la demandon pri gastigo, sed ne same okazos rilate flegadon. Niaj plej fortaj helpantoj estis rekviziiciitaj, por garantii la laborojn de la Ministerio de Komunikado sur la terkrusto, pro la mallumo, nun envolvanta la mondon de la enkarnuloj. Ni bezonas servantojn por la nokto, ĉar tiuj, laborantaj kune kun la Samarianoj, venos treege lacaj.

— Mi plezure proponas min por fari tion, per kio mi povus esti al vi utila — mi spontanee diris.

Tobija direktis al mi rigardon de profunda simpatio, ligita kun danko, kio naskis en mi konsolan ĝojon.

— Sed, ĉu vi estas preta restadi en la Ĉambroj dum la nokto? — li mirante demandis.

— Ĉu aliaj ne same agas? — miavice mi demandis. — Mi sentas min preparita kaj forta, mi devas realpeli la perditan tempon.

La nobla amiko min ĉirkaŭbrakis kaj diris:

— Bone, mi konfide akceptas vian kunlaboron. Ankaŭ Narciza kaj la ceteraj kamaradoj deĵoros. Krom tiuj mi sendos Venancon kaj Salustion, du fratojn, al kiuj mi aparte fidas. Ĉi tie restadi, deĵorante dum la nokto, mi ne povas, ĉar mi estas jam ŝarĝita per aliaj devoj; tamen, se necese, vi aŭ iu el niaj komunikos al

mi ian ajn pli gravan okazaĵon. Mi faros la planon de la laboroj kaj kiel eble plej faciligos ĝian plenumon.

Kaj jen ekzumis svarmo da antaŭpreparoj. Dum kvin servantoj laboris kune kun Narciza, preparante al-konformajn tolaĵojn kaj rimedojn por flegado, mi kaj Tobija movis pezan materialon en la Pavilono 7 kaj en la Ĉambro 33.

Mi ne povus esprimi, kio en mi fariĝis. Malgraŭ la laceco de la brakoj mi sentis plej grandan ĝojon en la koro.

En ĉiu metiejo, kie la plimulto serĉas laboron, komprenante ties altan indon, servado estas superega feliĉo. Sincere parolante, mi ne pensis pri ia pago per kupon-horoj, pri la tutaj rekompencoj, kiujn mi povus ricevi pro mia penado; mia kontenteco estis tamen ja profunda, ĉar mi vidis, ke mi povos feliĉa kaj digna veni antaŭ mian patrinon kaj la bonfarantojn, kiuj min akceptis en la Ministerio de Helpo.

Ĉe sia adiaŭo Tobija min denove ĉirkaŭbrakis kaj diris:

— Mi deziras al vi ĉiuj multe da paco de Jesuo, bonan nokton kaj utilan servon. Morgaŭ, je la oka matene, vi, Andreo, povos ripozi. La ĉiutaga laboro daŭras maksimume dek du horojn, sed ni troviĝas en esceptaj cirkonstancoj.

Mi respondis, ke tiuj ordonoj plenigas min per sincera kontenteco.

Nun sola, inter tiom multaj flegistoj, mi pli kore ekinteresiĝis pri la malsanuloj. Meze de tiuj helpantoj plej forte impresis min la spontanea bonkoreco de Narciza, kiu patrinece al ĉiuj servadis. Altirite de ŝia grandanimeco, mi penis alproksimiĝi al ŝi. Ne estis por mi malfacile ricevi la plezuron de ŝia afabla kaj simpla konversacio. La ĝentila maljunulino similis ĉarmegan libron pri boneco kaj saĝo.

— Sed, ĉu mia fratino ĉi tie laboras jam longe? — mi demandis ĉe unu momento de nia amika interparolo.

— Jes, mi efektive laboradas ĉe la Ĉambroj de Rebonigo jam ses jarojn kaj kelke da monatoj, sed ankoraŭ

restas al mi pli ol tri jaroj por la elplenumo de miaj deziroj.

Ĉe la silenta demando de mia rigardo Narciza afable diris:

— Mi bezonas tre gravan apogon.

— Kion vi komprenas sub ĉi tio? — mi scivole demandis.

— Mi devas renkontiĝi kun iuj amataj Spiritoj sur la Tero por komunaj laboroj, celantaj animan leviĝon. Dank' al miaj pasintatempaj eraroj, dum longa tempo mi vane petegis pri la eblo realigi mian intencon. Mi vivadis maltrankvila, afliktita. Iu tiam konsilis al mi iri al la ministrino Veneranda, kaj ĉi tiu nia bonfarantino, oficanta en la Ministerio de Regenerado, promesis apogi mian intencon ĉe la Ministerio de Helpo, sed postulis, ke mi ĉi tie laboru dek seninterrompajn jarojn, por rebonigi certajn neĝustaĵojn de la sento. En la unua momento mi ekvolis rifuzi, trovante tiun postulon supermezura, sed poste mi konfesis al mi mem, ke ŝi estas prava. Efektive, ŝia konsilo celis intereson ne ŝian, sed mian; kaj, akceptinte ŝian proponon, mi ja multe gajnis. Mi nun iel retrovis la ekvilibron kaj sentas min pli humana, kaj, mi supozas, mi digne trapasos mian venontan provon sur la Tero.

Mi estis esprimonta profundan admiron, sed unu el la plej proksimaj malsanuloj ekkriis:

— Narciza! Narciza!

Ne decis por mi reteni, el simpla persona scivolemo, tiun sindoneman fratinton, kiu fariĝis spirita patrino de la suferantoj.

LA VIZIO DE FRANCISKO

Dum Narciza konsolis la afliktitan malsanulon, oni sciigis min, ke mi estas vokita al la aparato de urbaj komunikoj.

Tio estis sinjorino Laŭra, petanta sciigojn pri mi. Efektive, mi forgesis komuniki al ŝi la decidon pri mia nokta servado. Mi petis mian bonfarantinon pardoni min kaj faris mallongan raporton pri mia nova situacio. Tra la drato la patrino de Lizio laŭŝajne ĝojis, partoprenante en mia prava feliĉo.

Ĉe la fino de nia nelonga konversacio ŝi bonkore diris:

— Tre bone, mia infano! Fordonu vin flame al via laboro, ebriiĝu de utila servado. Nur tiamaniere oni konstruas mem sian estontencon por eterne. Sed memoru, ke ĉi tiu domo apartenas ankaŭ al vi.

Tiuj vortoj movis min al noblaj impulsoj.

Reveninte al la rekta kontakto kun la malsanuloj, mi ekvidis Narcizan heroe penanta trankviligi junulon, kiu montris strangajn perturbojn. Mi decidis ŝin helpi.

La kompatinda, kun okuloj disvagantaj en la aero, kriadis terurita:

— Helpu al mi, pro Dio! Mi havas timon, timon!

Kaj kun vitreca rigardo de homo treege terurita, li kriegis:

— Fratino Narciza, jen ĝi venas, la monstro! Mi devone sentas la vermojn! Ĝi! Ĝi! Savu min de ĝi, fratino! Mi ne volas, mi ne volas!

— Trankviliĝu, Francisko — petis la amikino de la

malfeliĉuloj. — Vi liberiĝos, vi ricevos multe da sereneco kaj ĝojo, sed tio dependas de via penado. Imagu, kvazaŭ via menso estus ia spongo penetrita per vinagro: estas necese elpremi la acidajon. Mi helpos vin por tio, sed la plej granda fortostreĉo koncernas vin mem.

La malsanulo montris volontecon, estis trankvila dum li aŭdis tiujn karesajn vortojn, sed jen li denove paliĝis kiel antaŭe kaj eksplodis per pluaj ekkrioj.

— Sed, fratino, streĉu la okulojn... Ĝi min ne forlasas. Jen ĝi min ree turmentas! Rigardu, rigardu!

— Mi ja ĝin vidas, Francisko — ŝi konsenteme respondis —, sed vi nepre devas min helpi forpeli ĝin.

— Tia diabla fantomo! — li daŭrigis, plorante kvazaŭ infano, vekante ĉe ni kompaton.

— Fidu al Jesuo kaj forgesu la monstron — kompateme diris la fratino de la malfeliĉuloj. — Mi nun fluigu sur vin emanaĵojn. La fantomo foriros.

Ŝi fluigis sur lin sanigajn kaj reanimajn emanaĵojn, pro kiuj Francisko ŝin dankis, vidigante per la rigardo grandegan ĝojon.

— Nun — li diris post tiu magneta procedo — mi estas pli trankvila.

Narciza ĝuste aranĝis liajn kapkusenojn kaj ordonis al servantino alporti al li magnetizitan akvon.

Tiu ekzempla konduto de la flegistino min edifis. Bono, same kiel malbono, ĉie naskas misteran imitemon.

Rimarkinte mian sinceran deziron lerni, Narciza pli alproksimiĝis al mi, montriĝante preta inici min pri la sekretoj de tiu plej nobla servado.

— Kiun aludas la malsanulo? — mi demandis, impresita de tia bildo. — Ĉu lin persekutas ia ombro nevidebla por mia rigardo?

La malnova servantino ĉe la Ĉambroj de Rebonigo afable ridetis kaj diris:

— Ĝi estas lia propra kadavro.

— Kiel do! — mi rediris mirigita.

— La kompatinda tro forte alkroĉiĝis al la materia korpo kaj venis en la spiritan sferon post akcidento pro simpla malprudento. Dum multe da tagoj li staris apud siaj restaĵoj en la tomba, ne akceptante alian situacion.

Tia estis la potenco de la iluzio, en kiu li vivadis, ke li nepre volis levi la rigidan korpon; en tiu bedaŭrinda penado li perdis longan tempon. Li timiĝis ĉe la penso rekte rigardi al la nekonataĵo kaj eĉ ne iomete li povis sin deŝiri de la fizikaj sensacioj. Nenion donis helpoj el la pli altaj sferoj, ĉar li fermis la mensan regionon kontraŭ ĉia penso koncarnanta la vivon eternan. Fine la vermoj lin tiel kruele suferigis, ke la kompatinda kun abomeno sin forpelis el la tombo. Li tiam komencis vagadi tra la malsuperaj regionoj de la Ombrejo, sed liaj iamaj gepatroj sur la Tero, ĝuante ĉi tie grandan spiritan krediton, petis pri lia enloĝigo en nian kolonion. Alportis lin la Samarianoj, preskaŭ perforte; sed lia animstato ankoraŭ estas tiel delikata, ke li ne baldaŭ povos eliri el la Ĉambroj de Rebonigo. Nia amiko, lia iama patro, nun plenumas riskan mision malproksime de “Nia Hejmo”...

— Ĉu li venas viziti la malsanulon? — mi demandis.

— Li venis jam du fojojn, kaj, vidante lian ja diskretan suferon, mi estis forte emociita. La junulo estas tiel menskonfuzita, ke li ne rekonis sian grandaniman kaj sindonan patron. Li kriadis affliktita, elmontrante sian korpreman frenezecon. Lia patro, kiu venis vidi lin kune kun la ministro Padovo, de Komunikado, laŭŝajne staris super la kondiĉo homa, tiel longe kiel li estis ĉe tiu sia nobla amiko, al kiu prosperis ĉi tien gastigi lian malfeliĉan filon. Ili ĉi tie longe restis, parolante pri la spirita situacio de la ĵusvenintoj el la medioj de la karno. Sed, kiam la ministro Padovo foriris al la devoj de sia funkcio, la patro de la junulo petis min pardoni al li tian agon homan kaj genuiĝis antaŭ la malsanulo. Li ekprenis liajn manojn tremante, kvazaŭ enŝprucigante vivofluojn, kaj, ploregante, kisis al li la vangon. Mi ne povis reteni la larmojn kaj foriris, lasante ilin solaj. Mi ne scias, kio poste okazis inter ambaŭ, sed mi rimarkis, ke de tiu tago Francisko multe pli bone fartas. La absoluta frenezeco fariĝis simplaj krizoj, kiuj nun estas ĉiam pli maloftaj.

— Kiel profunde ĉio ĉi min kortuŝas! — mi ekkriis

sub forta impresio. — Sed, kiel la figuro de lia kadavro povas lin persekuti?

— La vizio de Francisko — ĝentile klarigis la amin-da maljunulino — estas la prembildo de multaj Spiritoj post la karna morto. Ili tro alligiĝas al la korpo, vidas nenion alian, vivas sole nur el ĝi kaj por ĝi, faras al ĝi efektivan kulton, kaj kiam venas la renoviga blovo, ili la materion ne forlasas. Ĉian ideon pri spiriteco ili repuŝas de si kaj plej arde batalas por konservi plu la korpon. Sed jen ekaperas la mordantaj vermoj kaj ilin forpelas. Ili tiam eksentas abomenon al la korpo kaj prenas novan teniĝon, en la kontraŭa ekstremo. La vido de la kadavro, kiel forta mensa kreaĵo de ili mem, ilin tamen turmentas en la plejprofundo de la animo. Sekvas mensmalordoj kaj krizoj pli aŭ malpli daŭraj, kaj multaj suferadas, ĝis tute forneniĝas ilia fantomo.

Rimarkinte mian emocion, Narciza aldonis:

— Dank' al nia Patro mi senĉese ĉerpas grandan profiton el la laste pasintaj jaroj da servado. Ha, kiel profunda la spirita dormo de la plej multaj niaj enkarn-aj fratoj! Tio nin zorgigu, sed ne vundu. La krizalido alteniĝas al la inerta materio, sed la papilio supren ekflugos; semo estas preskaŭ nevidebla, kaj tamen kverko estos giganto; mortinta floro revenas al la tero, sed parfumo ŝvebas en la ĉielo. Ĉia embrio de vivo ŝajnas dormi. Ni ne forgesu ĉi tiujn lecionojn.

Narciza eksilentis, kaj ŝian silenton mi ne kuraĝis rompi.

HEREDO KAJ EŬTANAZIO

Ankoraŭ posedis min mirego pro ĉio ĵus aŭdita, kiam Salustio alpaŝis kaj sciigis Narcizan:

— Nia fratino Paŭlina deziras vidi sian malsanan patron, en la Pavilono 5. Antaŭ ol plenumi ŝian peton, mi opiniis bone konsiliĝi kun vi, ĉar la malsanulo ankoraŭ trapasas tre akutan krizon.

Montrante sian tute karakterizan bonkorecon, Narciza diris:

— Enlasu ŝin tuj. Ŝi havas por tio permeson de la ministrino, ĉar ŝi nun ofertas sian disponeblan tempon por la reamikiĝo de siaj familianoj.

Dum la sendito rapide adiaŭis, la bonkora flegistino aldiris, parolante al mi:

— Vi vidos, kia sindonema filino!

Ne pasis unu minuto kaj jen Paŭlina antaŭ ni, svelta kaj ĉarma. Ŝi portis tunikon tre malpezan, el lumanta silko. Anĝele belaj estis ŝiaj fizionomiaj trajtoj, sed ŝiaj okuloj atestis ekstreman maltrankvilecon. Narciza ŝin afable prezentis al mi, kaj, eble sentante, ke ŝi povas fidi al mi, ŝi iom afliktita demandis:

— Kaj paĉjo, mia amikino?

— Li fartas iom pli bone — respondis la flegistino —; li tamen ankoraŭ elmontras fortan menskonfuziĝon.

— Domaĝe! — rediris la junulino. — Nek li nek la ceteraj cedas en la mensa stato, en kiun ili enfermiĝis. Ĉiam tia sama malamo kaj tia sama seninteresiĝo.

Narciza invitis nin akompani ŝin, kaj post kelke da

minutoj staris antaŭ mi malplaĉmiena maljunulo. Kun malmilda rigardo, diskombitaj haroj, profundaj faltoj, retirigintaj lipoj, li elvokis pli bone kompaton ol simpaton. Mi tamen ekpenis venki la malsuperajn vibrojn, kiuj min ekposedis, por observi, anstataŭ la suferanto, la spiritan fraton. Mia menso ekvidis pli klare, malaperis do la impresoj de naŭzeco. Mi aplikis la lecionon al mi mem. En kia stato mi ja venis al la Ministerio de Helpe? Mia mieno de konsternito certe estis terura. Kiam oni ekzamenas ies malfeliĉon, memorante siajn proprajn mankojn, la koro ĉiam havas loketon por la frata amo.

Nenian karesan vorton la maljuna malsanulo diris al sia filino, kiu lin amplene salutis. Laŭ la rigardo, tra kiu vidiĝis akreco kaj ribelo, li similis enkaĝigitan rabobeston en formo homa.

— Ĉu vi, paĉjo, sentas vin pli bone? — ŝi demandis kun plej granda filina amo.

— Ho ve! Ho ve! — kriegis la malsanulo per tondra voĉo. — Mi ne povas forgesi tiun fiulon, mi ne povas kvietigi mian pensadon... Mi lin ankoraŭ vidas apud mi donanta al mi la mortigan venenon!

— Ne diru tion, paĉjo — delikate petis la junulino. — Memoru, ke Edelberto venis en nian domon kiel filo, sendita de Dio.

— Mia filo?! — kriis la malfeliĉulo. — Neni! Neni! Li estas nepardonebla krimulo, infano de la infero!

Paŭlina nun ekparolis kun okuloj plenaj de larmoj:

— Ni aŭdu, paĉjo, la lecionon de Jesuo, kiu rekomendas, ke ni nin reciproke amu. Ni travivas sur la Tero provojn kiel samsanguloj, por akiri la veran spiritan amon. Cetere ni nepre devas konfesi, ke ekzistas nur unu reale eterna Patro, nome Dio; sed la Sinjoro de la Vivo permesas, ke ni estu patroj aŭ patrinoj en la mondo, por ke ni lernu la senmakulan fratecon. Niaj surteraj hejmoj estas krisoloj por purigo de la sentoj aŭ temploj de sankta ligiĝo, celantaj la universan solidarcon. Ni devas forte batali kaj suferi, por fine akiri la veran titolon frato. Ni ĉiuj estas unu familio en la Kreitaĵaro, sub la providenca beno de unu Patro.

Aŭdante ŝian tre dolĉan voĉon, la malsanulo ekploris konvulsie.

— Pardonu Edelberton, patreto! Penu vidi en li ne ventkapan filon, sed fraton, kiu bezonas instruon. Mi ankoraŭ hodiaŭ estis en nia hejmo, kaj tie mi rimarkis grandegan mensan malordon. De ĉi tie, de ĉi tiu lito vi envolvas ĉiujn niajn familianojn en fluidecaĵojn je aflikto kaj nekomprenemo, kaj tiel same ili agas kun vi. La penso, per subtilaj vibroj, trafas la celon, kiel ajn malproksima ĉi tiu staras. Interŝanĝo de malamo kaj nekompreneo naskas ĉe la animo ruinojn kaj suferon. Panjo antaŭ kelkaj tagoj iris en frenezulejon, konsumita de angoro. Amalia kaj Kacilda ekprocesis kun Edelberto kaj Agenoro pro la granda havaĵo, kiun vi kolektis al vi en la materiaj rondoj. Tio estas terurega bildo, kies ombroj povus ja fariĝi malpli intensaj, se via fortika menso ne dronus en deziro je venĝo. Ĉi tie ni vidas vin serioze malsana; sur la Tero, panjon freneza kaj ŝiajn filojn menskonfuzitaj, malamante unu alian. Meze de tiom da mensoj en malordo staras amaso da miliono kaj kvicent mil kruzeroj. Kiom tamen ĉi tio helpas, se por neniu eĉ unu centavo da feliĉo ekzistas?!

— Sed mi postlasis al mia familio grandegan heredaĵon — intermetis la malfeliĉulo per voĉo plena de malamo —, celante la bonstaton de ĉiuj...

Paŭlina ne lasis lin fini, sed reprenis la parolon:

— Ni ne ĉiam scias, kio estas bonaĵo koncerne la momentan riĉecon. Se vi asekurus la estontecon de niaj familianoj, certigante al ili moralan trankvilecon kaj honestan laboron, via penado estus ago de altvalora antaŭvidemo; sed, paĉjo, ni iafoje amasigas monon pro vantamo kaj ambiciemo. Se ni volas vivi super la ceteraj, ni pri tio pensas nur ĉe la eksteraĵoj de la vivo. Nur tre malmultaj penas havigi al si noblajn sciojn, toleremon, la lumon de humileco, la benon de komprenemo. Ni trudas al aliulo niajn kapricojn, ni dekliniĝas de la servoj de la Patro, ni forgesas pri la facetado de nia spirito. Neniu naskiĝas sur la Tero, nur por amasigi monerojn en kasoĵ aŭ valorpapirojn en bankoj. Estas ja natura afero, ke la homa vivo bezonas antaŭvidemon,

kaj pravigeble, ke ĝi devas nepre havi la kunlaboradon de fidelaj kaj saĝaj administrantoj; sed neniu povas prizorgi la aferojn de la Patro avare kaj celante superregadon. Tiaspeca vivo disruinigis nian domon. Mi iam vane penadis alporti al nia hejmo spiritan helpon. Dum vi kaj panjo plej klopodadis por pligrandigi la havaĵon, Amalia kaj Kacilda flanken metis ĉian utilan servon kaj, kiel senfarulinoj de la monduma frivoleco, renkontis neniofarantojn, kiuj ilin edzinigis al si, celante finanĉan profiton. Agenoro forlasis seriozan studadon kaj fariĝis kamarado de malvirtaj homoj. Edelberto akiris diplomon de kuracisto, sed el ĝi li apenaŭ faras uzon, ĉar nur tre malofte li praktikas la medicinon, simile al laboristo, kiu nur el scivolemo vizitas la metiejon. Ĉiuj preterlasis belajn spiritajn oportunojn, ilin ne atentante pro la facile ricevebla mono kaj alkroĉite al la penso pri la heredo.

La malsanulo ekprenis mienon de teruro kaj kriis:

— Malbeninda Edelberto! Krima, nedankema filo! Li min senkompate mortigis tiam, kiam mi ankoraŭ bezonis fari mian testamenton! Malica! Malica!

— Ĉesu, paĉjo! Kompatu vian filon, pardonu kaj forgesu!

Sed la maljunulo laŭte sakradis plu. La junulino estis plue diskutonta kun li, sed Narciza direktis al ŝi multesignifan rigardon kaj vokis Salustion por prizorgi la malsanulon en kriza stato. Paŭlina eksilentis, kaj tiam ŝi komencis karesi al la patro la frunton, apenaŭ retenante la larmojn. Post nelonge mi sub forta impreso foriris kune kun ambaŭ virinoj.

La du amikinoj ankoraŭ dum kelke da minutoj interparolis; fine Paŭlina nin adiaŭis, elmontrante grandan noblecon per siaj afablaj frazoj, sed multe da malĝojo ĉe la rigardo saturita de prava maltrankvilo.

Nun denove intime kun mi, Narciza bonkore diris:

— Heredaj aferoj ordinare esta treege komplikitaj; esceptinte tre malmultajn, ili fariĝas grandega ŝarĝo kiel por testamentantoj, tiel ankaŭ por heredantoj. Sed en ĉi tiu okazo ekzistas ne nur tio, sed ankaŭ eŭtanazio. La avido je mono naskis en la tuta familio de Paŭlina

strangaĵojn kaj malkonsentojn. Gepatroj avaraj havas infanojn malŝparemajn. Mi iris en la domon de nia amikino, kiam ŝia frato Edelberto, noblaspekta kuracisto, aplikis al sia preskaŭ mortanta patro la tiel nomatan “trankvila morto”. Ni plej klopodis por ĝin antaŭhaltigi, sed ĉio estis vana. La kompatinda junulo pro kaŭzoj financaj deziris ja plifruigi tiun morton, kaj jen nun neantaŭvidemo kaj rezulto: malamo kaj malsano.

Kaj per esprimoplena tono ŝi fine diris:

— Dio kreis estaĵojn kaj ĉielojn, sed ni plej ofte nin turnas en diablajn Spiritojn kaj forĝas mem niajn proprajn inferojn.

VAMPIRO

Estis la naŭa vespere. Ĝis tiam prosperis al ni ripozoj nur en momentoj de nelonga konversacio, kiun postulis la solvo de spiritaj demandoj. Ĉi tie, iu malsanulo petis pri faciligo de siaj suferoj; tie, alia bezonis revigligajn emanaĵojn. Kiam ni iris helpi du malsanulojn en la Pavilono 11, mi aŭdis proksiman kriegadon. Mi instinkte alpaŝis tien, sed Narciza min zorgeme detenis.

— Ne iru tien — ŝi diris —; tie loĝas la seksaj mensmalsanuloj. Tia vidaĵo estus treege dolora por viaj okuloj. Prokrastu tian emocion ĝis tempo pli oportuna.

Mi ne insistis. En mia cerbo tamen svarmis mil demandoj. Tute nova mondo ĵus malfermiĝis antaŭ mia intelekta esploro. Mi devis ĉiumomente rememori la konsilon de la patrino de Lizio, por ne deflankiĝi de la ĝusta devo.

Tuj post la naŭa horo iu venis el la fundo de la grandega parko. Tio estis kuriozmiena malalta viro, montranta sian rangon de simpla laboristo. Narciza lin ĝentile akceptis kaj demandis:

— Kio da nova, Justeno? Kio estas via komisiono?

La servanto, el la gardistaro de la Ĉambroj de Rebonigo, respondis afliktita:

— Mi venis komuniki al vi, ke malfeliĉa virino petas pri helpo ĉe la granda kradpordo, kondukanta sur la kulturkampojn. Mi supozas, ke ŝin pretervidis la unuaj liniaj gardistoj...

— Kaj kial vi ne helpis al ŝi? — demandis la flegistino.

La servanto faris geston de skrupulo kaj klarigis:

— Laŭ la nin regantaj ordonoj mi tion ne povis fari, ĉar la kompatinda estas ĉirkaŭita de nigraj punktoj.

— Kio?! — ekkriis Narciza terurita.

— Jes, sinjorino!

— Ĝi do estas tre serioza afero.

Scivola, mi akompanis la flegistinon tra la kampo superverŝita per la lumo de la luno. La distanco estis ne malgranda. Sur ambaŭ flankoj staris trankvila bosko de tre vasta parko, sin balancanta en la karesanta vento. Post irado de unu kilometro ni trafis tiun grandan kradpordon, pri kiu la servanto parolis.

Montriĝis tiam antaŭ ni la mizera figuro de la virino, peteganta helpo trans tiu bariero. Mi ekvidis nenion krom la figuro de tiu malfeliĉulino en ĉifona vesto, kun abomena vizaĝo kaj kruroj, kie faŭkis ulceroj; sed Narciza laŭŝajne vidis aliajn detalojn, nerimarkeblajn por mia rigardo, ĉar mirego ekkovris ŝian ordinare serenan mienon.

— Infanoj de Dio — ekkriis la ĉifonulino, nin ekvidinte —, donu rifuĝon al mia laca animo! Kie sidas la paradizo de la elektitoj, kie mi povus ĝui la sopiratan pacon?

Tiu lamenta voĉo tuŝis al mi la koron. Narciza mem aspektis emociita, sed konfidence demandis min:

— Ĉu vi ne vidas la nigrajn punktojn?

— Ne — mi respondis.

— Via spirita vidado ankoraŭ ne estas sufiĉe edukita.

Kaj post nelonga paŭzo ŝi daŭrigis:

— Se mi rajtus ĝin fari, mi tuj malfemus al ŝi la pordon; sed kiam temas pri estuloj en tia stato, mi nenion povas decidi mem. Mi devas turni min al la deĵoranta Ĉefgardisto.

Kun ĉi tiuj vortoj, ŝi alproksimiĝis al la malfeliĉulino kaj per frata tono diris:

— Bonvolu atendi kelke da minutoj.

Ni rapide revenis en la domon. La unuan fojon mi vidiĝis kun la gardistestro de la Ĉambroj de Rebonigo. Narciza prezentis min kaj komunikis al li la okazaĵon. Li faris multesignifan geston kaj diris:

— Vi agis tre bone, sciigante min pri la afero. Ni iru tien.

Ni tri direktis nin al la nomita loko.

Kiam ni venis al la bariero, la Frato Paŭlo, gardistestro, atente ekzamenis la ĵusvenintinon el la Ombrejo kaj diris:

— Ĉi tiu virino en la nuna tempo ne povas ricevi nian helpon. Ŝi estas unu el la plej teruraj vampiroj, kiajn mi ĝis hodiaŭ vidis. Ni forlasu ŝin al ŝia propra sorto.

Mi skandaligis. Ĉu ĝi ja ne estus neplenumo de la kristanaj devoj, forlasi tiun suferantaron al la hazardaj cirkonstancoj de la vojo? Narciza, kiu laŭŝajne dividis kun mi tian saman impreson, elpaŝis peteganta:

— Sed, Frato Paŭlo, ĉu ni niel povus doni rifuĝon al ĉi tiu mizerulino en la Ĉambrojn?

— Tion permesi — li respondis — estus perfidi mian funkcion de gardisto.

Kaj montrante al la ĉifonulino, kiu, malpacience kriante, atendis ian decidon, li demandis la flegistinon:

— Ĉu vi, Narciza, jam rimarkis ion krom la nigraj punktoj?

Nun venis al mia servinstruistino la vico respondi nee.

— Nu, mi vidas ankoraŭ ion krom ili — rediris la Ĉefgardisto.

Mallaŭtigante la voĉon, li petis:

— Kalkulu la nigrajn makulojn.

Narciza fikse rigardis la malfeliĉulinon kaj post kelke da momentoj respondis:

— Kvindek ok.

La Frato Paŭlo, kun la pacienco de homo, scianta ame instrui, klarigis:

— Tiuj malhelkoloraj punktoj prezentas kvindek ok infanojn, murditajn ĉe sia naskiĝo. En ĉiu makulo mi vidas la mensan bildon de infaneto mortigita, ĉu per frakasa bato, ĉu per asfiksio. Ĉi tiu malfeliĉulino profesiiis ginekologion. Sub la preteksto malŝarĝi aliulajn konsciencojn, ŝi sin donadis al abomenindaj krimoj, ekspluatante la mispaŝojn de senspertaj junulinoj. Ŝia situacio estas pli malbona, ol tiu de memmortigintoj kaj

murdintoj, ĉar tiuj iafaje havas por si konsiderindajn malpligravigajn cirkonstancojn.

Mi tiam rememoris, terurita, la medicinajn procedojn, en kiuj mi multe da fojoj proksime vidis la neceson pereigi naskiĝontojn, por savi patrinan organismon en danĝeraj okazoj; sed, legante mian penson, la Frato Paŭlo aldonis:

— Mi nun, en ĉi tiu rilato, parolas ne pri tiaj ĝustaj rimedoj, kiuj ja estas aspektoj de elaĉetantaj provoj, sed pri la krimo murdi iun, kiu komencas sian surteran provadon kun la natura rajto je vivo.

Montrante la sentemecon de la noblaj animoj, Narciza petis:

— Frato Paŭlo, ankaŭ mi jam multe eraris en mia pasinteco. Ni elaŭdu ĉi tiun malfeliĉulinon. Se vi ĝin permesas, mi prizorgos ŝin per speciala flegado.

— Mi konfesas, mia amikino — respondis la Ĉefgardisto, impresante min per sia sincereco —, ke ni ĉiuj estas Spiritoj dronantaj en ŝuldoj; ni tamen havas por ni la rekonon de niaj propraj mizeraĵoj kaj la volontecon pagi niajn ŝuldojn; sed ĉi tiu virino, en la nuna momento, nenion alian deziras, ol malhelpi laborantajn homojn. Tiuj, kies sentoj estas harditaj en hipokriteco, ĵetas el si detruajn fortojn. Kion do utilis al ni ĉi tie ia kontrolservo?

Kaj esprimoplene ridetante, li diris:

— Ni serĉu la pruvon.

La Ĉefgardisto tiam alproksimiĝis al la petantino kaj demandis:

— Kion nia fratino deziras de nia frata servado?

— Helpon! Helpon! Helpon! — ŝi respondis en larmoj.

— Sed, mia amikino — li saĝe konsideris —, ni devas scii akcepti rebonigan suferon. Kial vi fortranĉis la vivon al tiom multe da malfortikaj estaĵetoj, kiuj enpaŝis en la arenon kun la permeso de Dio?

Aŭdinte lin, maltrankvila, ŝi faris teruran mienon de malamo kaj kriis:

— Kiu imputas al mi tian fiaĵon? Mia konscienco estas trankvila, kanajlo! Mi uzis mian ekzistadon help-

ante al la patrineco sur la Tero. Mi estis karitema kaj diotima, bona kaj pura...

— Ne tio kuŝas sur la vivanta bildo de viaj pensoj kaj agoj. Mi pensas, ke mia fratino eĉ la bonon de la konscienco-riproĉo ankoraŭ ne ricevis. Kiam, rekoninte viajn proprajn bezonojn, vi malfermos la animon al la beno de Dio, tiam revenu ĉi tien.

Rabia de kolero, la kunparolantino rediris:

— Vi demono! Vi sorĉisto! Vi klikano de Satano! Mi neniam revenos! Mi atendas la ĉielon, kiun oni al mi promesis kaj kiun mi esperas trovi.

Prenante ankoraŭ pli firman teniĝon, la Ĉefgardisto diris per aŭtoritata voĉo:

— Foriru do, mi petas. Ni ĉi tie ne havas tian ĉielon, kiun vi deziras. Ni troviĝas en labordomo, kie la malsanuloj konscias siajn perturbojn kaj penas resaniĝi ĉe bonvolaj servantoj.

La ĉifonulino arogante kontraŭdiris:

— Mi petis de vi nek medikamenton nek laboron. Mi serĉas la paradizon, pri kiu mi havigis al mi rajton per bonfaroj.

Kaj direktante al ni flamantan rigardon de ekstrema kolero, ŝi ŝanĝis sian aspekton de apenaŭ iranta malsanulino kaj firme sin forpafis kiel iu sin mem plene reganta.

Dum multe da minutoj la Frato Paŭlo sekvis ŝin per la rigardo, kaj, turninte sin al ni, diris:

— Ĉu vi observis tiun vampiron? Ŝin ŝarĝas krimoj, sed ŝi pretendas senkulpecon; ŝi estas kerne perversa, sed opinias sin bona kaj pura; ŝi terure suferas, sed volas kredigi trankvilecon; ŝi kreis al si mem inferon, sed diras, ke ŝi serĉas la ĉielon.

Ĉe la silento, en kiu ni aŭdis lian lecionon, la Ĉefgardisto finis:

— Estas nepre necese gardi sin kontraŭ la bonaj kaj la malbonaj ŝajnoj. Supozeble tiu malfeliĉulino ie aliloke ricevos helpon de la Dia Boneco, sed, laŭ principo de strikta karitemo, mi, en mia funkcio, ne povus malfermi al ŝi niajn pordojn.

SCIIGOJ PRI VENERANDA

Nun, kiam mi estis enirinta en la parkon banantan de lumo, mi spertis strangan allongon.

Tiuj invitemaj arboj, tiuj verdantaj bedoj ĉiumomente altiris mian rigardon. Per kovritaj demandoj mi ne rekte elvokadis klarigojn de Narciza.

— En la granda parko — ŝi diris — ne ekzistas nur vojoj al la Ombrejo aŭ sole kulturado de vegetaĵoj por nutraj sukroj. La ministrino Veneranda kreis bonegajn planojn por niaj edukaj procedoj.

Kaj rimarkinte mian noblan scivolemon, ŝi klarigis plu:

— Mi parolas pri la “verdaj salonoj” por la edukado. Inter la longaj vicoj de la arboj estas ejoj kun mirindaj konturoj por la paroladoj de la ministroj de Regenerado; aliaj por vizitantaj ministroj kaj studemuloj enkomune; sed unu, rimarkinde bela, estas rezervita al la paroloj de la Guberniestro, kiam li bonvolas nin viziti. La rekte starantaj arboj periode kovriĝas per floroj, aspektante kvazaŭ koloraj turetoj, plenaj de naturaj ĉarmoj. Ni tiamaniere havas en la firmamento la ŝirmantan tegmenton, kun la benoj de la suno aŭ de la noktaj malproksimaj steloj.

— Tiuj naturaj palacoj certe estas plej belaj — mi intermetis.

— Jes, sendube — entuziasme daŭrigis la flegistino. — La projekto de la ministrino, kiel mi eksciis, ricevis varman aplaŭdon en la tuta kolonio. Mi eksciis, ke tio okazis ĝuste antaŭ kvardek jaroj. Komenciĝis tiam la kampanjo por la “Natura Salono”. Ĉiuj ministerioj petis pri kunlaborado, ankaŭ tiu de Dia Unuigo, kiu vokis Venerandan por organizi similajn ejojn en la Arbaro de la

Akvoj. Agrablegaj tiaspecaj ejoj ĉie ekaperis, sed la plej interesaj, laŭ mia opinio, estas tiuj aranĝitaj en la lernejoj. Ili estas diversaj laŭ formo kaj amplekso. En la parkoj por edukado, apartenantaj al la Ministerio de Klarigo, la ministrino konstruigis efektivan kastelon el kreskaĵoj, en la formo de stelo, kie multenombraj lernantoj prenas de kvin instruistoj lecionojn pri kvin diversaj objektoj. En la centro funkcias grandega aparato por instruado per bildoj, simila al la surtera kinematografo, per kiu oni povas fari samtempe kvin diversajn projekciojn. Tia iniciato alportis al la urbo grandan bonon, ĉar ĝi per unu fojo kunigis la profitan servon kun la praktika utilo kaj la spirita belo.

Profitante la naturan halton de ŝia parolo, mi demandis:

— Kaj la meblaro de la salonoj, ĉu ĝi estas egala al tiu de la salonoj sur la Tero?

Narciza ridetis kaj respondis:

— Ne tute egala. La ministrino konkretigis la evangeliajn bildojn de la tempo, kiam la Kristo estis en la mondo, kaj proponis, ke oni uzu rimedojn el la Naturo mem. Ĉiu “natura salono” havas benkojn kaj brakseĝojn skulptitajn en la substanco de la grundo, tegitajn per aroma mola herbo. Tio donas karakterizajn ĉarmon kaj aranĝojn. La organizintino diris, ke estus konvene memori la lecionojn de la Majstro ĉe la marbordo, kiam li ekskursadis apud Tiberias, kaj el tiu rememorado venis la ideo de la “natura meblaro”. Ĝia konservado postulas konstantan prizorgadon, sed la beleco de tiuj vidaĵoj tion sufiĉege kompensas.

La bonkora flegistino tiam ĉesis paroli, sed, rimarkinte mian interesiĝon, kvankam silentan, ŝi daŭrigis:

— La plej bela salono de nia ministerio estas tiu destinita por la paroladoj de la Guberniestro. La ministrino Veneranda trovis, ke li ĉiam ŝatis la pejzaĝojn kun helena gusto, pli malnova, kaj dekoraciis la salonon per specialaj trajtoj, nome kanaletoj kun freŝa akvo, graciaj pontoj, lagetoj, palankenoj el foliriĉaj arbetoj. En ĉiu monato de la jaro ĝi prezentas alian koloron, ĉar aliaj estas la floroj ĉiujn tridek tagojn. La ministrino elektis

la plej belan aspekton por la monato Decembro, memore de la Naskiĝo de Jesuo; tiam la urbo ricevas la plej ĉarmajn pensojn kaj la plej firmajn promesojn el niaj kamaradoj enkarniĝintaj sur la Tero, kaj de sia flanko sendas varmajn certigojn de espero kaj servemo al la superaj sferoj, honore al la Majstro inter la majstroj. Tiu salono estas noto de ĝojo por niaj ministerioj. Vi eble scias, ke la Guberniestro venas ĉi tien preskaŭ ĉiusemajne, dimanĉe. Li tie restas tutajn horojn, en konferenco kun la ministroj de Regenerado, konversacianta kun la laboristoj, donante altvalorajn konsilojn, ekzamenante demandojn pri nia najbaraĵo al la Ombrejo, ricevante niajn honorojn, akceptante vizitantojn kaj konsolante resaniĝantojn. Ĉe vesperkrepusko, kiam li povas iom plu restadi, li aŭdas muzikon kaj ĉeestas artprogramojn, ludatajn de gejunuloj kaj infanoj el niaj edukejoj. La plimulto de la fremduloj, gastantaj en “Nia Hejmo”, ĉi tien venas ordinaro, nur por ekkoni tiun “naturan palacon”, kiu komforte lokas en si pli ol tridek mil personojn.

Aŭdante ĉi tiujn intersajn informojn, mi ricevis samtempe ĝojon kaj scivolon.

— Ankaŭ la salono de la ministrino Veneranda — vivece daŭrigis Narciza — estas mirinde bela ĉambrego, kies konservado postulas de ni specialan zorgon. Nia tuta servokapablo estas tro mizera, por reciproki la sinferojn de tiu abnegacia servantino de Nia Sinjoro. Multo da bonfaroj, en ĉi tiu ministerio, estas kreitaj de ŝi por helpi al la plej malfeliĉaj. Ŝia labortradicio en “Nia Hejmo” estas konsiderata de la Guberniestraro kiel unu el la plej dignaj. Ŝi estas la persono kun la plej granda nombro da servohoroj en nia kolonio kaj entute la membro plej malnova de la registaro kaj de la ministerio. En ĉi tiu urbo ŝi aktive laboradas jam de pli ol ducent jaroj.

Impresite de ĉi tiuj informoj, mi ekkriis:

— Kiel respektinda certe estas tiu bonfarantino!

— Vi ja ĝuste parolis — rediris Narciza per riverenca tono —, ŝi estas el la personoj plej alte sidantaj en nia spirita kolonio. La dek unu ministroj, kun ŝi

direktantaj la aferojn en la Ministerio de Regenerado, demandas ŝian opinion, antaŭ ol fari pli gravan disponon. Pri multaj juĝaferoj la Guberniestraro sin turnas al ŝi kun peto pri konsilo. Esceptinte la Guberniestron, nur la ministrino Veneranda, en "Nia Hejmo", vidis Jesuon en la Lumaj Sferoj, sed ŝi tamen neniam parolas pri tiu okazaĵo de sia spirita vivo kaj pri ĝi nenian informon donas. Mi citu krom tiu alian pasaĵon, kiu ŝin distingas. Unu matenon, antaŭ kvar jaroj, "Nia Hejmo" vekigis en festo. La Frataroj de Lumo, prezidantaj la kristanan destinton de Ameriko, honoris Venerandan, donacante al ŝi la medalon de Merito pro Servado; ŝi estas la sola persono, en la kolonio, kiu ĝis hodiaŭ ricevis tian triumfon, prezentante unu miliono da horoj da utila servado sen rompo, sen plendo, sen malfervoriĝo. Tiun honoran premion alportis nobla komisiono, sed meze en la ĝojego de ĉiuj, kun la ĉeesto de la Guberniestraro, la ministeriaj oficistoj kaj la popolo, kolektiĝintaj sur la plej granda placo, la ministrino Veneranda nur silentis kaj ploris. Ŝi tuj donacis tiun premion al la urbaj arkivoj, dirante, ke ŝi ĝin ne meritas kaj ĝin trandonas al la kolektiva persono de la kolonio, malgraŭ la protestoj de la Guberniestro. Ŝi rifuzis ĉiujn festajn honoraĵojn, per kiuj oni intencis post kelka tempo memore soleni tiun okazaĵon, kaj neniam parolis pri la honoriga konkero.

— Eksterordinara virino! — mi ekkriis. — Kial ŝi ne supreniras en pli altajn sferojn?

Narciza mallaŭtigis la voĉon kaj respondis:

— Ŝi spirite vivas en regionoj multe pli altaj ol nia; ŝi restadas en "Nia Hejmo" pro amemo kaj sinoferemo. Mi eksciis, ke tiu admirinda bonfarantino jam de pli ol mil jaroj laboradas por iu grupo da koroj, por ŝi tre karaj, ankoraŭ migrantaj sur la Tero, kaj pacience atendas.

— Kiel mi povus konatiĝi kun ŝi? — mi demandis impresita de tiaj sciigoj.

Narciza, kiu laŭŝajne ekĝojis pro mia interesiĝo, plezure respondis:

— Morgaŭ ĉe vesperkrepusko, post la preĝado, la ministrino venos en la salonon, por instrui kelke da lernantoj pri la pensado.

XXXIII

KURIOZAJ RIMARKOJ

Malmulte da minutoj antaŭ noktomezo Narciza permesis, ke mi iru al la granda bariero ĉe la Ĉambroj. La Samarianoj kredeble troviĝis proksime. Ni devis do atenti pri ilia reveno, por fari eventuale necesajn antaŭpreparojn.

Kun kia emocio mi revenis sur la vojon ĉirkaŭitan de akceptemaj foliriĉaj arboj! Ĉi tie trunkoj, memorigantaj la maljunan kverkon de la Tero; tie delikataj folioj similaj al tiuj de akacio kaj pino. Tiu balzamodora aero ŝajnis al mi kvazaŭ beno. En la Ĉambroj, malgraŭ iliaj grandaj fenestroj, mi ne ricevis tiel profundan senton de agrableco. Mi silente iradis sub la amikaj foliaroj. Milda vento ilin delikate movis kaj envolvis min en sensacion de ripozo.

Nun tute sola, mi ekmeditis pri la okazaĵoj, kiuj min trafis de post mia unua renkontiĝo kun la ministro Klarenco. Kie do kuŝas la regiono de sonĝo? Ĉu sur la Tero aŭ en tiu spirita kolonio? Kio fariĝis kun Zelia kaj niaj infanetoj? Kial oni tie donis al mi tiel detalajn klarigojn pri la plej diversaj demandoj de la vivo, sed nenion diris pri mia iama hejmo? Mia patrino mem rekomendis al mi silenton kaj detenis sin de ĉia rekta informo.

Ĉio konsilis al mi, ke mi devas forgesi la demandojn pri la enkarna vivo, por min interne renovigi, kaj tamen, penetrante profunde en min mem, mi tie trovis la vivantan sopiradon je miaj karuloj. Mi arde deziradis revidi mian tre amatan edzinon, denove ricevi la kison de miaj infanetoj... Per kiaj decidoj de la destino ni nun vivas unu for de alia, kvazaŭ mi estus ia ŝiprompiĝ-

ulo sur nekonata marbordo? Samtempe kuraĝigaj pensoj min konsolis. Mi ja ne estis tia forlasita ŝiprompiĝulo. Se mia provo povis esti rigardata kiel ŝiprompiĝo, mi tamen devis danki la akcidenton nur al mi mem. Nun, kiam mi rimarkis en “Nia Hejmo” novajn vibrojn de intensa kaj konstrua laboro, mi ja miris, ke mi en la mondo perdis tiom da tempo en ĉiaspecaj frivolaĵoj.

Vere, mi iam tre amis mian kunvivantinon kaj ja superŝutadis miajn infanetojn per konstantaj karesoj; sed, senpasiie ekzamenante mian situacion kiel edzo kaj patro, mi konfesis al mi mem, ke mi nenion solidan kaj utilan enradikis en la spiriton de miaj familianoj. Mi tro malfrue konstatis tiun malzorgon. Kiu trairas kampon, ne preparante semejon necesan al pano kaj ne protektante la fonton, kiu sensoifigas, tiu ne povas reveni, intencante provizi siajn bezonojn. Tiaj pensoj okupis mian cerbon kun agacanta intenseco. Forlasinte la rondojn de la karno, mi trafis la senfruktan nekomprenemon. Kio okazis al la edzino kaj infanetoj, pelitaj for de la hejma stabileco en la ombrojn de vidvineco kaj senpatreco? Vana demando.

La milda vento ŝajne flustris grandiozajn ideojn, kva-zaŭ dezirante vekti mian menson por pli altaj studoj.

La internaj demandoj min turmentadis, sed, tiam submetante min al la ordonoj de la juste altrudita devo, mi ekiris al la granda bariero kaj per la rigardo esploris transen, tra la kulturejoj.

Ĉie lunlumo kaj sereneco, ĉielo majesta, beleco silenta! En raviteco ĉe la rigardado de tiu vidaĵo, mi dum kelke da minutoj restis en admirado kaj preĝado.

Post nelonge mi ekvidis malproksime du grandegajn figurojn, kiuj min forte impresis. Ili aspektis kvazaŭ du homoj el nedifinebla, duonluma substanco. De iliaj piedoj kaj brakoj pendis strangaj filamentoj, kaj el la kapo kvazaŭ eliĝis longa, neordinare granda fadeno. Mi havis la impreson, ke mi vidas du efektivajn fantomojn. Mi ne eltenis. Kun hirtiĝintaj haroj, mi rapide repaŝis en la domon. Maltrankvila kaj timoplena, mi rakontis al Narciza la okazaĵon, kaj dume mi rimarkis, ke ŝi ape-naŭ sin detenis de rido.

— Nu, mia amiko — ŝi fine diris, montrante bonhumorecon —, ĉu vi do ne rekonis tiujn personojn?

Profunde hontigita, mi sukcesis nenion respondi, sed Narciza daŭrigis:

— Ankaŭ mi mem iam spertis tian saman surprizon. Tio estas niaj surteraj fratoj mem. Ili estas potencaj Spiritoj, vivantaj en la karno tra savanta misio; kiel noblaj inicitoj pri la Eterna Saĝeco, ili kapablas forlasi sian fizikan animportilon kaj do libere trairi niajn regionojn. Tiuj filamentoj kaj fadenoj, kiujn vi rimarkis, estas apartaĵoj, ilin diferencigantaj de ni ĉi-tieaj. Vi do ne timu. La enkarnuloj, povantaj atingi ĝis ĉi tie, estas altege rafinitaj Spiritoj, kvankam sur la Tero ili estas homoj senfamaj kaj humilaj.

Kaj, bonkore kuraĝigante min, ŝi firme diris:

— Ni iru tien. Estas nun kvardek minutoj post noktomezo. La Samarianoj certe baldaŭ alvenos.

Ĝojante, mi revenis kune kun ŝi al la granda kradpordo.

Ankoraŭ estis vidataj, en grandega distanco, la du figuroj, trankvile foriĝantaj de “Nia Hejmo”.

La flegistino ilin rigardadis, signife riverencis kaj diris:

— Envolvas ilin blua lumo. Ili certe estas du senditoj, tre alte sidantaj en la medioj de la karno, kaj nun plenumantaj taskon, pri kiu ni ne povas scii, kio ĝi estas.

Tie ni multe da minutoj restadis, rave rigardante la silentajn kampojn. Subite la bonkora amikino montris al nigreta punkto sur la horizonto en la lunlumo kaj ekkriis:

— Jen ili venas!

Mi ja ekvidis tiun anaron, kiu venadis direkte al ni sub la dolĉa heleco de la ĉielo. Post momento mi ek-aŭdis malproksiman bojadon de hundoj.

— Kiel do tio estas? — mi demandis surprizita.

— Hundoj — respondis Narciza — estas altvaloraj helpantoj en la mallumaj regionoj de la Ombrejo, kie loĝas ne nur elkarnuloj, sed ankaŭ efektivaj monstroj, kiujn priskribi ne estas nun oportune.

La flegistino per firma voĉo vokis la malproksimajn

servantojn kaj irigis unu el ili en la domon, por disporti avizojn.

Mi atente ekrigardis la strangan grupon, kiu malrapide alproksimiĝadis.

Ses grandaj veturiloj, similaj al poŝtaj kaleŝoj, kiujn antaŭkuradis gajaj kaj bruantaj hundoj, estis tirataj de bestoj, kiuj, eĉ de malproksime, ŝajnis al mi egalaj al la surteraj muloj. Sed la plej kurioza rimarkindaĵo estis grandaj bandoj da birdegoj, kiuj malalte flugadis, super la veturiloj, strange bruante.

Mi tuj turnis min al Narciza kaj demandis ŝin:

— Kial ne la aerobuso? Ĉu oni ne povus uzi ĝin en la Ombrejo?

Ricevinte nean respondon, mi demandis, kial ne tiel. Ĉiam komplezema, la flegistino klarigis:

— Ĝi estas demando pri denseco de la materio. Vi povus imagi al vi ekzemplon, komparante akvon kun aero. Aviadilo traflugas la atmosferon de la Tero, sed ne la maran mason. Ni povus ja konstrui alkonformajn maŝinojn, similajn al la submarŝipoj; tamen pro kompatemo por la suferantoj la superaj spiritaj sekcioj preferas uzi transiĝajn aparatojn. Cetere, ĉe multaj okazoj, ni ja bezonas la kunhelpon de la bestoj.

— Kiel do? — mi demandis surprizita.

— Hundoj plifaciligas la laboron, muloj pacience portas ŝarĝojn kaj havigas varmon tie, kie necese; kaj tiuj birdoj — ŝi aldiris, montrante ilin en la spaco —, kiujn ni nomas “vojaĝantaj ibisoj”, bonege helpas al la Samarianoj, formanĝante la malamajn kaj malicajn mensajn formojn en arda batalado kontraŭ la mallumo de la Ombrejo.

Nun tiu anaro venis pli proksime. Narciza min ekrigardis kun bonkora atento kaj finis nian konversacion dirante:

— Nu, en la nuna momento la devo ne permesas informajn detalojn. Vi povos ĉerpi bonajn lecionojn pri la bestoj ne ĉi tie, sed ĉe la Ministerio de Klarigo, kie troviĝas la parkoj por studado kaj eksperimentado.

Kaj ĉi tie kaj tie disdonante laborordonojn, ŝi sin preparis por akcepti novajn malsanulojn je la spirito.

XXXIV

KUN LA ĴUSVENINTOJ EL LA OMBREJO

Haltis apud ni la hundoj, kondukitaĵ de la fortikaj manoj de laborantoj.

Post kelke da minutoj ni ĉiuj iris tra la longaj koridoroj, kondukantaĵ en la Ĉambrojn de Rebonigo. Servantoj rapide iradis tien kaj reen. Kelkaj malsanuloj, firme subtenate, estis portataĵ en la internon. Ne sole Narciza, Salustio kaj aliaj kamaradoj, plenaj de frata amo, sin donadis al la laboro, sed ankaŭ la Samarianoj, klopodante por alporti sian helpon, mobilizis ĉiujn siajn fortojn. Kelkaj malsanuloj kondutis humile kaj rezignacie, sed aliaj laŭte protestis kontraŭ tio.

Ankaŭ min ĵetante al la laboro, mi rimarkis, ke maljunulino faras grandan penon por eliĝi el la lasta veturilo. Vidinte min proksime, ŝi ekkriis kun mirego:

— Kompatu min, mia infano! Helpu al mi pro Dio!

Mi alproksimiĝis interesita.

— Fi! Tfu! — ŝi daŭrigis, sin krucosignante. — Dank' al la Dia Providenco mi min forsavis el la purgatorio... Hu! Kiaj malbenitaj demonoj min tie torturadis! Kia infero! La Anĝeloj de la Sinjoro tamen fine alvenis.

Posedita de plej granda scivolo, mi helpis ŝin elveturiĝi. La unuan fojon mi aŭdis pri la infero kaj la purgatorio vortojn de iu, kiu ŝajnis al mi trankvilanima kaj prudenta. Eble cedante pli bone al la pikemo, kiu estis al mi propra, mi demandis:

— Ĉu vi do venis de tiel malproksime?!

Tiel parolante, mi afektis mienon de profunda frata interesiĝo, kio estis mia kutimo sur la Tero, tute forgesinte, en tiu momento, la saĝajn rekomendojn de la patrino de Lizio. La kompatinda virino, rimarkinte mian interesiĝon, komencis elvolvi siajn travivaĵojn:

— Jes, de malproksime. Mi, mia filo, sur la Tero estis tre bonmora virino; mi faris multe da karitaĵoj, mi senĉese preĝadis kiel sincera piulino. Kiu tamen povas kontraŭstari la ruzaĵojn de Satano? Apenaŭ elirinte el la mondo, jen mi vidis min ĉirkaŭita de monstraj estaĵoj, kiuj min entiris en efektivan ventokirlon. Komence mi petegis la protekton de la Ĉielaj Ĉefanĝeloj, sed la diablaj Spiritoj min plu tenadis enŝlosita. Mi tamen ne perdis la esperon pli aŭ malpli frue esti liberigita, ĉar mi ja difinis iom da mono por ĉiumonataj mesoj, ke mi ricevu ripozon.

Cedante al la malbona impulso pritrakti aferojn, al kiuj mi havis nenian rilaton, mi insiste diris:

— Kiel interesa estas via rakonto! Sed, ĉu vi ne penis ekscii, kial vi tiel longe restadis en tiu loko?

— Tute ne — ŝi respondis, farante signon de kruco. — Kiel mi diris al vi, dum mi troviĝis sur la Tero, mi faris ĉion por mi eblan, por esti konsciencema religiulino. Vi ja scias, ke neniuj estas ŝirmita kontraŭ pekado. Miaj sklavoj kelkfoje kverelis kaj malpaciis, kaj, kvankam la riĉeco havigis al mi vivon trankvilan, mi tamen devis iam kaj iam ilin puni. La kontrolistoj estis tro skrupulemaj, kaj mi ne povis heziti pri la ordonoj de ĉiu tago. Ne malofte iu negro mortis ĉe la pilorio por ĝenerala averta ekzemplo; aliajn fojojn mi estis devigata vendi la patrinajn-sklavinojn, disigante ilin de iliaj infanoj, por konservi la hejman harmonion. En tiuj momentoj mi sentis mordi min la konscienco, sed mi konfesis ĉiumonate, kiam la pastro Amanco vizitadis la bienon; post la komuniĝo mi estis libera de tiuj nemortaj pekoj, ĉar, ricevinte la absolvon en la konfesejo kaj englutinte la sanktan macon, mi do neniom ŝuldis koncerne miajn devojn al la mondo kaj al Dio.

Tiaj paroloj skandalis min kaj tial mi komencis pie konsili:

— Mia fratino, tiu motivo de spirita paco estas falsa. Ankaŭ la sklavoj estas ja niaj fratoj. Antaŭ la Eterna Patro la infanetoj de servantoj estas egalaj al tiuj de mastroj.

Ĉe tio ŝi aŭtoritate piedfrapis la grundon kaj diris kolere:

— Nur ne tio! Sklavo estas ja sklavo; se tiel ne estus, tiam la religio instruus nin alie. Se ekzistis sklavoj en la domo de episkopoj, kial do ne, des pli prave, en niaj bienoj? Kiu priplantus la grundon, se ne ili? Kaj kreu, ke mi ĉiam cedis al ili miajn senzalojn (*) kiel efektivan honoron! En mia bieno ili neniam venis sur la korton de la vizitantoj por io alia, ol por plenumi ordonojn. La pastro Amanco, nia virta ekleziulo, diris al mi, en la konfesejo, ke la afrikanoj estas la plej malbonaj homoj en la mondo, naskiĝintaj por servi al Dio sole nur en sklaveco. Ĉu vi do pensus, ke mi povus havi ian skrupulon ĉe la traktado kun tiaspecaj estaĵoj? Neniom dubu: sklavoj estas maliculoj, satanidoj! Mi eĉ miras la paciencon, kun kiu mi toleris tiajn homaĉojn sur la Tero. Mi aldiru, ke mi preskaŭ neatendite eliĝis el la karno, ĉar min profunde frapis la decido de la Princino (**), kiu emancipis tiujn aĉulojn. Tio okazis antaŭ multe da jaroj, sed mi ĝin perfekte memoras. De multe da tagoj mi estis malsaneta, kaj kiam la pastro Amanco alportis el la urbo tiun novaĵon, mia farto subite plimalboniĝis. Kiel do ni tiam povos ankoraŭ vivi en la mondo, vidante tiujn krimulojn liberaj? Certe ili siavice deziras sklavigi nin, kaj, se ni devos servi al tiaj feĉuloj, ĉu do ne estos pli bone morti? Mi memoras, ke mi malfacile konfesis; mi ricevis la konsolajn parolojn de nia pastro, tamen ŝajnas, ke ankaŭ la demonoj estas afrikanoj kaj senĉese spionadis, kaj tial mi devas suferi ilian ĉeeston ĝis hodiaŭ...

— Kiam vi venis? — mi demandis.

— En Majo 1888.

(*) *Senzalo*, en la portugala lingvo “senzala” : grupo da loĝejaĉoj de sklavoj. — *La Trad.*

(**) Tiu “Princino”, Izabel, estis la filino de la dua kaj lasta imperiestro de Brazilo, Petro la Dua. Pro la foresto de la imperiestro, tiam en Eŭropo, ŝi subskribis, en la 13-a de Majo 1888, la leĝon — la “Oran Leĝon” —, kiu forfinis la sklavecon en nia lando. — *La Trad.*

Mi ricevis strangan senton de mirego.

Mia kunparolantino fiksas vitrecan rigardon al la horizonto kaj diris:

— Eble miaj nevoj forgesis pagi la mesojn, tamen mi deklaris ĉi tiun volon en mia testamento.

Mi jam estis preta respondi al ŝi, vokante ŝian menson al pli alta regiono, konigante al ŝi novajn ideojn pri frateco kaj fido, sed Narciza alproksimiĝis kaj bonkore diris al mi:

— Andreo, mia amiko, ĉu vi forgesis, ke ni penas mildigi la suferojn de malsanuloj kaj menskonfuzitoj? Kian profiton vi ricevas el tiaj informoj? Frenezuloj seninterrompe paroladas, kaj homo, kiu ilin aŭdas, malŝparte energie, eble ne estas malpli freneza.

Ĉi tiuj vortoj estis diritaj tiel bonkore, ke mi ruĝiĝis de honto, ne kuraĝante ion al ili kontraŭmeti.

— Ne ĉagreniĝu — delikate diris la flegistino. — Ni prizorgu la menskonfuzitajn fratojn.

— Nu, ĉu vi alkalkulas min al tiaj? — demandis ofendetita la maljunulino.

Montrante sin bonega psikologino, Narciza faris mienon, kie travidiĝis karesa frateco, kaj respondis:

— Ne, mia amikino, ne tion mi diras, sed mi pensas, ke vi estas tre laca; via batalado en la purgatorio ja longe daŭris...

— Efektive, efektive — jesis la ĵusvenintino el la Ombrejo. — Vi ne povas prezenti al vi, kiom mi de longe suferas, torturata de la demonoj...

La kompatinda virino estis parolonta plue, ripetante tiun saman historion, sed Narciza, instruante min, kiel konduki en tiaj cirkonstancoj, interrompis:

— Ne tekstu konsideradojn pri malbono. Mi jam scias ĉion, kio amara kaj dolora al vi okazis. Ripozu, pensante pri tio, ke mi flegos vin.

Kaj en tiu sama momento ŝi senafekte sin turnis al unu el siaj helpantoj kaj diris:

— Vi, Zenobio, iru en la virinan departementon kaj en mia nomo venigu Nemezian, ke ŝi konduku ankoraŭ unu fratinnon en liton de flegado.

EKSTERORDINARA RENKONTIĜO

Oni rekolektis ilojn uzitajn dum la ekskurso kaj kondukis servobestojn returne en la stalojn, kiam ies voĉo afable aŭdiĝis apud mi:

— Andreo! Vi ĉi tie?! Bonege! Kia agrabla surprizo!

Mi, ankaŭ surprizite, returnis min kaj rekonis en la tiamaniere parolanta Samariano la maljunan Silvejran, kiun mia patro, neelpetbla negocisto, iam senigis je lia tuta havaĵo.

Prava ĝenateco min tiam ekposedis. Mi ekvolis saluti lin, reciproki lian afablaĵon, sed la rememoro pri la pasinteco min paralizis. Mi ne povis hipokriti en tiu nova medio, kie sincereco travidiĝis tra ĉiuj mienoj. Komprenante tian situacion, Silvejra mem helpis al mi, aldirante:

— Por sincere paroli, mi ne sciis, ke vi forlasis la korpon, kaj for de mi estis la penso, ke mi renkontos vin en “Nia Hejmo”.

Rekonante lian senartifikan afablecon, mi lin kortuŝita ĉirkaŭbrakis, murmurante vortojn de danko.

Mi ekvolis iel klarigi tiun pasintaĵon, sed mi ne sukcesis. Vere, mi deziris peti de li senkulpigon pro tia konduto de mia patro, ke ĉi tiu lin pelis en la abismon de ruiniga bankroto. En tiu momento mi revidis en la menso la bildon de la pasinteco. La memoro ree montris la vivantan scenon. Ŝajnis al mi, ke mi denove aŭdas sinjorinon Silvejra, venintan kun peteganta koro en nian domon klarigi la situacion. Ŝia edzo de longe kuŝis malsana en la lito, kaj ilia senhaveco fariĝis pli premanta pro la malsaneco de du iliaj infanetoj. La bezonoj estis

ne malmultaj kaj la kuracado postulis grandan sumon da mono. La kompatinda sinjorino ploradis, iam kaj iam almetante naztukon al la okuloj. Ŝi petis prokraston de la pago, ŝi petegis justan indulgon. Ŝi humiligiĝis, turnante dolorplenajn okulojn al mia patrino, kvazaŭ petante pri komprenemo kaj helpo la koron de alia virino. Mi rememoris, ke mia patrino bonkore petis mian patron forgesi la subskribitajn dokumentojn kaj deteni sin de ĉia proceso. Sed, kutima al grandaj transakcioj kaj favorite de la sorto, mia patro ne povis kompreni situacion de malgranda detalisto. Li sin tenadis plu necedeme. Li diris, ke li bedaŭras tiujn okazaĵojn, ke li helpos sian klienton kaj amikon en alia maniero, sed ke, rilate la konfesitajn ŝuldojn, li vidas nenian alian solvon, ol strikte observi la leĝon. Li ne povos — li aldonis — rompi la normojn kaj precedencojn de sia firmo. La ŝuldatestoj havos leĝan efikon. Kaj li konsolis tiun afliktitan edzinon, parolante pri la situacio de aliaj klientoj, kiuj, laŭ lia opinio, statis pli malbone ol Silvejra. Mi rememoris la rigardojn de simpatio, kiujn mia patrino direktis al la malfeliĉa petantino, dronanta en larmoj. Mia patro estis absolute indiferenta por ĉiuj tiuj petegoj, kaj, post kiam la kompatinda virino foriris, li severe riproĉis mian patrinon, malpermesante al ŝi iel ajn sin enmiksi en liajn komercajn aferojn. La kompatinda familio devis ricevi sian plenan financon ruiniĝon. Mi perfekte rememoris la momenton, kiam eĉ la piano de fraŭlino Silvejra estis prenita el ilia domo, por kontentigi la lastajn postulojn de la senkora kreditoro.

Mi deziris senkulpigi min, sed mi ne trovis ĝustajn frazojn, ĉar tiam ankaŭ mi kuraĝigis mian patron elplenumi tiun kriantan malhumanaĵon; mi konsideris mian patrinon tro sentimentala kaj tial mi instigis lin daŭrigi plu da proceson ĝis la fino. Mi estis ankoraŭ tre juna, kaj vantamo ekposedis min. Mi ne volis scii, ĉu aliaj suferas; mi ne kapablis vidi la aliulajn bezonojn. Mi vidis sole nur la rajtojn de mia domo, nenion pli. En tiu afero mi estis necedema: vana do ĉia patrina argumentado.

Frakasite en tiu batalo, la familio Silvejra serĉis al

si humilan loketon en la internlando, amare suferante en absoluta mizero la financan ruiniĝon. Ĝis ĉi tiu momento mi neniam plu ricevis ian sciigon pri tiu familio, kiu certe nin malamis.

Ĉi tiuj rememoroj vice ekaperis en mia cerbo rapide, en la daŭro de kelke da sekundoj. En unu sola momento mi refaris en la imago tiun tutan ombran pasintaĵon.

Dum mi apenaŭ kaŝis mian ĝenatecon, Silvejra, ridetante, revokis min en la realon:

— Ĉu vi iam vizitis “la maljunulon”? (*)

Ĉi tiu demando, kiu elmontris spontanee karesemon, ja pliigis mian honton. Mi respondis, ke, malgraŭ mia tre granda deziro, mi tamen ankoraŭ ne povis ricevi tian ĝojon.

Silvejra rimarkis mian ĝenatecon kaj, eble kompatante mian animstaton, ekpensis foriri. Li min noble ĉirkaŭbrakis kaj revenis al siaj taskoj.

Forte ĉagrenita, mi iris al Narciza, sopirante konsilojn. Mi rakontis al ŝi tiun okazaĵon, kun detaloj pri tiuj faktoj sur la Tero.

Ŝi aŭdis min pacience kaj bonkore rimarkis:

— Tiu fariĝo ne estu por vi io stranga. Mi mem, antaŭ longe, troviĝis en tia sama situacio. Mi jam ricevis la feliĉon ĉi tie renkonti la plimulton el la homoj, kiujn mi en la mondo ofendis. Mi hodiaŭ scias, ke tio estas beno de la Sinjoro, kiu ĉiam havigas al ni okazon, por restarigi rompitan simpation, reforĝante la rompitaĵajn erojn de la spirita ĉeno.

Kaj per pli kategoria tono en sia instruado, ŝi demandis:

— Ĉu vi profitis la belan oportunon?

— Kion vi celas? — mi demandis.

— Ĉu vi petis Silvejran pri pardono? Bone notu al vi, estas granda feliĉo rekoni siajn proprajn erarojn. Ĉar

(*) “La maljunulo”: nomo, per kiu iu, en amika rondo, titolas, en Brazilo kaj Portugalujo, sian propran patron aŭ la patron, ĉu de la interparolanto, ĉu de alia, eĉ se la sinjoro tute ne estas maljuna... — *La Trad.*

vi ja kapblas ekzameni vin mem per sufiĉe akra komprenemo, konfesante vin iama ofendinto, tial ne preterlasu la okazon fariĝi nun amiko. Iru, mia kara, kaj ĉirkaŭbraku lin en alia maniero. Uzu la momenton, ĉar Silvejra dronas en laboroj kaj eble ne baldaŭ aperos alia okazo.

Rimarkinte mian sendecidecon, Narciza aldiris:

— Ne timu ian fiaskon. Ĉiam, kiam ni dediĉas menson kaj senton al bono, Jesuo donas al ni ĉion necesan al sukceso. Prenu sur vin la iniciativon. Entrepreni noblajn agojn, kiaj ajn ili estas, prezentas efektivan honoron por la animo. Rememoru la Evangelion ^(*) kaj iru havigi al vi la trezoron de reamikiĝo.

Mi ne plu hezitis. Mi rapidis al Silvejra kaj parolis al li malkaŝe, petante lin pardoni al mia patro kaj al mi niajn ofendojn kaj erarojn kontraŭ li.

— Vi ĝin certe komprenas — mi diris kun akcento —, ni tiam estis blindaj; en tia stato ni do nenion povis vidi, krom nia propra intereso. Kiam mono kuniĝas kun vantamo, Silvejra, la homo malfacile sukcesas deturni sin de la malbona vojo.

Forte emociite, Silvejra ne lasis min fini:

— Nu, Andreo, kiu ja estas libera de kulpoj? Ĉu vi povus pensi, ke mi vivis pura de eraroj? Cetere via patro estis mia vera instruanto. Miaj infanoj kaj mi, ni ŝuldas al li benindajn lecionojn de individua penado. Sen tiu energia sintenado, kiu forprenis de mi la materialajn rimedojn, kio estus kun ni rilate la progreson de la Spirito? Ĉi tie ni ŝanĝas niajn malnovajn ideojn pri la homa vivo. Niaj kontraŭuloj estas ĝustadire ne malamikoj, sed bonfarantoj. Ne fordonu vin al malgajaj rememoroj. Ni laboru kun la Sinjoro, konfesante al ni mem la senfinecon de la vivo.

Kaj emociite, kun rigardo fiksita al miaj okuloj malsekaj de larmoj, li min patrece karesis kaj finis:

^(*) Mateo, 5:25. — *La Trad.*

— Ne perdu tempon ĉe tio. Mi volas kune kun vi baldaŭ havi plezuron viziti vian patron.

Mi tiam lin silente ĉirkaŭbrakis, sentante en mia animo tute novan ĝojon. Ŝajnis al mi, kvazaŭ en unu el la malhelaj anguletoj de la koro ia dia lumo eklumis por eterne.

LA SONGŬO

La laborado senĉese daŭradis plu. Malsanuloj necesigis prizorgon, menskonfuzitoj devis ricevi sindonon.

Ĉe vesperkrepusko mi jam estis sperta en magnetaj emanaĵoj, kaj tial mi ilin fluigis sur ĉiun, kiu ajn ilin bezonis.

Matene Tobija revenis en la Ĉambrojn kaj, pli ĝuste el grandanimeco, ol pro alia motivo, li min stimulis per kuraĝigaj vortoj.

— Brave, Andreo! — li ekkriis kontenta. — Mi tuj rekomendos vin al la ministro Genezio, kaj pro la komencaj laboroj vi ricevos kuponojn duoble.

Mi estis dironta al li vortojn de danko, kiam sinjorino Laŭra kaj Lizio envenis kaj min ĉirkaŭbrakis.

— Ni estas treege kontentaj de vi — diris, ridetante, la nobla sinjorino. — Mi spirite akompanis vin dum la nokto, kaj via unua debuto en laboro vekis pravan ĝojon en nia hejma rondo. Mi klopodis por ricevi la plezuron sciigi pri tio la ministron Klarencon, kaj li petis min gratuli vin en lia nomo.

Ili amike interŝanĝis observojn kun Tobija kaj Narciza. Ili petis de mi buŝan raporton pri miaj personaj impresoj, kaj mi lumradiis de ĝojo.

Sed miaj plej feliĉaj momentoj estis ankoraŭ venontaj.

Malgraŭ la ĝentila invito de la patrino de Lizio, ke mi revenu hejmen por ripozi, Tobija disponigis al mi komfortan ĉambrojn apud la Ĉambroj de Rebonigo kaj konsilis al mi iom ripozi. Efektive, mi sentis grandan bezonon dormi. Narciza pretigis por mi la liton kun fratina zorgemo.

Nun en la vasta kaj komforta ĉambro, mi ekpreĝis al la Sinjoro de la Vivo, dankante Lin por tiu favorkorajo, ke mi estis utila al iu. La “profita laceco” de tiuj, kiuj plenumas sian devon, kaŭzis al mi nenian malagrablan maldormon.

Post kelke da momentoj, sensacioj de malpezeco tute ekokupis mian animon, kaj mi ricevis la impreson, kvaŭ mi estas forportata en malgranda barko al nekonataj regionoj. Kien mi iris? Ne eble ĝin respondi. Silenta sinjoro apud mi tenis la direktilon. Kaj simile al iu infano, kiu ne povoscias elkalkuli nek difini la survojjajn belaĵojn, mi lasis min konduki sen ia ekkrio, kvankam ravita de la majestaĵoj de la pejzaĝo. Ŝajnis al mi, ke la barko veturas rapide, kvankam ĉiam supren.

Post kelke da minutoj mi trafis mirindan havenon, kie iu min vokis per aparte dolĉa voĉo:

— Andreo !... Andreo!...

Mi saltis el la barko kun vere infana rapidegeco. Tiun voĉon mi rekonus inter miloj da aliaj. Post momento mi, kun elverŝiĝanta ĝojego, ĉirkaŭbrakis mian patrinon.

Ŝi tiam kondukis min en miregindan arbaron, kie la floroj havis tiun strangan econ, reteni la lumon, en konstanta festo de parfumo kaj koloro. Sekve de tio lumaj orecaj tapiŝoj sterniĝis sub la grandaj arboj, surantaj en la vento. Mia sento de feliĉo kaj paco atingis la apogeon. Tiu sonĝo ne estis tia sama, kiel sur la Tero. Mi ĝuste sciis, ke mi forlasis mian malpli delikatan envolvajon en la apartamento de la Ĉambroj de Rebonigo, en “Nia Hejmo”, kaj plene konsciis tiun moviĝadon sur kampo alia. Miaj ideoj pri spaco kaj tempo estis ĝustaj. Siaflanke, la multeco de emocioj ĉiam pli kreskis. Dirinte al mi sanktajn vortojn de spirita stimulado, mia patrino bonkore parolis:

— Mi tre petis Jesuon, ke li konsentu al mi la grandegan plezuron de via ĉeesto ĉe mia flanko en via unua tago de utila servo. Kiel vi vidas, mia filo, laboro estas Dia fortikigilo por la koro. Post sia foriro de sur la Tero multaj el niaj amikoj prenas kontraŭefikan teniĝon, atendante miraklojn, kiaj neniam okazos. Belaj kapabloj, en tia maniero, reduktiĝas al simplaj parazitaj.

Unuj pretekstas senkuraĝecon pro sia propra soluleco; aliaj, kiel antaŭe sur la Tero, diras, ke ili ne harmonias kun la medio, kien ili estis vokitaj, por servi al la Sinjoro. Estas nepre necese, Andreo, fari el ĉia oportuna okazo de la vivo motivon de atento al Dio. En la malsuperaj rondoj, mia filo, telero da buljono al malsatulo, balzamo al leprulo, amikaĵo al elreviĝinto, estas Diaj servoj, kiujn la Domo de Nia Patro neniam forgesas; ankaŭ ĉi tie, rigardo de komprenemo al kulpulo, evangelia promeso al senesperulo, espero donata al afliktito, estas benoj de spirita laboro, kiun la Sinjoro observas kaj enskribas en nian krediton...

La fizionomio de mia patrino tiam estis pli bela ol ĉiam. Ŝiaj madonaj okuloj kvazaŭ radiis anĝelan lumon, ŝiaj manoj, per siaj gestoj de amo, verŝis sur min emanajojn, kiuj ne nur kreis novajn fortojn, sed ankaŭ naskis karesajn emociojn.

— La Evangelio de Jesuo, mia Andreo — ŝi ame daŭrigis — memorigas al ni, ke “pli feliĉe estas doni, ol ricevi” (*). Ni lernu konkretigi ĉi tiun principon dum la ĉiutaga laborado, al kiu nin kondukis nia propra feliĉo. Donu ĉiam, mia filo. Plej precipe, neniam forgesu doni el vi mem, per konstrua toleremo, per frata amo, per Dia komprenemo. La praktikado de la bono ekstera estas instruo kaj alvoko, por ke ni praktiku la bonon internan. Por altigi la homon, Jesuo donis el si pli multe, ol ĉiuj surteraj milionuloj, sin dediĉantaj al la materiala, kvankam plej merita, bonfarado. Ne hontu helpi al tiuj ulceruloj kaj sennubigi la menson al tiuj frenezuloj, kondukitaj en la Ĉambrojn de Rebonigo, kie mi spirite observis vian laboron en la pasinta nokto. Laboru, mia filo, farante bonon. En ĉiuj niaj spiritaj kolonioj, same kiel en la medioj de la terĝlobo, vivas animoj maltrankvilaj, sopirantaj al novaĵoj kaj amuzoj. Vi tamen, ĉiam, kiam nur eble, rezignu ĉian distraĵon kaj strebu al utila servado. Kiel mi, kapabla por preskaŭ nenio, povas spirite vidi viajn klopodojn en “Nia Hejmo”

(*) Agoj, 20:35. — *La Trad.*

kaj observadi la dolorojn de via patro en la Ombrejo, tiel same Dio nin ĉiujn vidas kaj akompanas, ekde la plej alta komisiulo de Sia boneco ĝis la plej lastaj kreaĵoj, tre malsuperaj ol la vermoj de la Tero.

Mia patrino faris paŭzon, kiun mi ekdeziris uzi, por ion diri, sed mi tamen ne povis. Larmoj de emocio sufokis mian gorĝon. Komprenante la situacion, ŝi direktis al mi karesan rigardon kaj parolis plu:

— Ĉi tie, en la plimulto de la spiritaĵoj, nia laboro estas pagata per kuponhoroj. Ĉi tiu nia bazo de pagado entenas du esencajn faktorojn: la kuponhoroj prezentas la duoblan eblon, ion ricevi de niaj kunbatalantoj aŭ favori iun, troviĝantan en nia kadro de laboro; tamen la taksado de la “horoj” apartenas sole nur al Dio. Ĉe la ekstera rekompenco, povas okazi multaj eraroj de ni, eraremaĵoj, dank’ al nia esteco mem de evoluantaj Spiritoj, kiel same fariĝas sur la Tero; sed, koncerne la spiritan enhavon de la “horoj”, ekzistas rekta rilato inter ĉiu servanto kaj la Diaj Fortoj de la Kreitaĵaro. Tial, Andreo, niaj provaj laboroj, en la komuna progresado, komencante de la enkarne sfero, ĉiutage ricevas sinsekvajn ŝanĝojn. Tabeloj, kadroj, salajroj estas formoj de elprovado de administrantoj, al kiuj la Sinjoro havigis la oportunojn kunagi en la Diaj Verkoj de la Vivo, simile kiel Li konsentas al homo la privilegiojn iom longe esti patro aŭ patrino, sur la Tero kaj en aliaj mondoj. Ĉiu sincera administranto estas ĵaluza pri la lin koncernantaj taskoj; ĉiu konsciencema patro estas plena de sinofera amo. Ankaŭ Dio, mia filo, estas vigla Administranto kaj tre amanta Patro. Li neniam forgesas kaj rezervas por Si la rajton trakti mem kun la laboranto pri la vera profito el la tempo de servado. Ĉia ekstera rekompenco tuŝas la elprovantan individuon, sed ĉia taksado de tempo interesas la individuon eternan, tiun, ĉiam troviĝantan en niaj rondoj de la vivo direkte al la gloro de Dio. Ĝuste tial la Plejaltulo donas saĝon al la homo, kiu oferas tempon por lerni, kaj pli da vivo kaj ĝojo al tiu, kiu scias rezigni.

Mia patrino eksilentis, kaj mi ekviŝis la okulojn mal-

sekajn de larmoj. Ŝi tiam prenis min en la brakojn kaj min amplene karesis. Simile al infano, kiu endormiĝas post leciono, jen mi senkonsciigis kaj nur post kelka tempo vekigis en la Ĉambroj de Rebonigo kun la koro bolanta de ekstrema ĝojo.

LA LEKCIO DE LA MINISTRINO

En la daŭro de miaj laboroj en la morgaŭa tago, granda estis mia interesiĝo pri la anoncita lekcio de la ministrino Veneranda. Sciante, ke mi devos ricevi permeson por ĝin aŭdi, mi pri tio parolis al Tobija.

— Tiuj lecionoj — li diris — estas aŭdataj nur de tiuj Spiritoj, sincere interesiĝantaj pri ili. La ĉi tieaj instruantoj ne povas perdi tempon. Vi do havas la permeson ĉeesti tiun paroladon inter la centoj da aŭdantoj, kiuj estas servantoj kaj enloĝigitaj ĉe la Ministerio de Regenerado kaj de Helpe.

Amike min stimulantem, li finis:

— Mi deziras al vi bonegan profiton.

La nova tago pasis en vigla laborado. Tiu kontakto kun mia patrino, ŝiaj belaj konsideradoj pri la bonfarado plenigis mian spiriton per neesprimebla kuraĝo.

Komence, tuj kiam mi vekigis, tiuj klarigoj pri la kuponhoro vekis ĉe mi gravajn demandojn. Kiel la pagado de la horo povas koncerni Dion? Ĉu do la kalkulado de la tempo ne apartenas al la administranto, ĉu Spirito, ĉu homo? Tobija prilumis mian intelektan soifon je lumo. La administrantoj, ĝenerale, havas ja la devon kalkuli la servotempon, kaj estas pravigeble, ke ili ankaŭ liveras rimedojn por la respekto kaj konsiderado de la merito de la laboranto; sed, rilate al la esenca valoro de la ĝusta profito, nur la Diaj Fortoj ĝin ja povas precize difini. Kelkaj servantoj, post kvardek jaroj da speciala laboro, foriras de ĝi same nespertaj kiel ĉe la komenco, kaj tiel ili montras, ke ili uzis tempon sen spirita

sindono, same kiel ekzistas homoj, kiuj, post cent jaroj sur la Tero, de ĝi foriras tiel sensciaj kiel dum sia infaneco. Tiom pli valora estas la parolo de via patrino — diris Tobija —, ke sufiĉas pensi pri la horoj de bonuloj kaj maliculoj. Ĉe la unuaj ili fariĝas trezoroj de benoj de la Eternulo; ĉe la duaj, kvazaŭ tiuj estus malbenitoj, ili fariĝas skurĝoj de turmentado kaj riproĉo de konscienco. Ĉiu infano de nia Patro reguligas siajn kontojn kun Li konforme al la uzo de la sin prezentinta okazo aŭ laŭ siaj verkoj.

Ĉi tiu klarigo helpis min taksi la valoron de la tempo laŭ ties tuta amplekso.

Kiam venis la horo difinita por la leciono de la ministrino, post la vespera preĝo, mi kune kun Narciza kaj Salustio direktis min al la granda salono el kreskaĵoj.

Vera mirindaĵo estis ja tiu verda ejo, kie grandaj herbaj benkoj nin komforte akceptis. Plej diversaj floroj, brilantaj ĉe la lumo de belaj kandelabroj, elspiris delikatan parfumon.

Laŭ mia kalkulo tie troviĝis pli ol mil homoj. Inter la multaj simplaj ĉeestantoj mi rimarkis, ke dudek estuloj okupas apartajn seĝojn inter ni simpluloj kaj la florornamita altaĵeto, kie staris la brakseĝo de la instruantino.

Ĉe unu mia demando Narciza klarigis:

— Ni sidas inter la simplaj aŭdantoj. Tiuj fratoj sur reliefa loko estas la plej multe sciantaj pri la hodiaŭa temo, amikoj, kiuj rajtas eldemi la ministrinon. Tiun rajton ili akiris per sia dediĉo al tiu afero kaj ĝin ankaŭ ni niavice povos iam havi.

— Ĉu vi do ne povas esti unu el ili? — mi demandis.

— Ho ne! Ĝis la nuna momento mi rajtas tie sidi nur en tiuj vesperoj, kiam la instruantino pritraktas la flegadon de la menskonfuzitaj Spiritoj. Sed kelkaj fratoj tie sidas konstante, traktante pri pluraj objektoj laŭ sia jam atingita kulturo.

— Tia procedo estas ja kurioza — mi intermetis.

— La Guberniestro — klarigis plu la flegistino — decidis, ke tiel estu dum la lecionoj kaj paroladoj de ĉiuj ministroj, por ke la laboroj ne degeneru en senbridecon

de persona opinio sen pravigebla fundamento, kio prezentus gravan perdon de tempon por ĉiuj enkomune. Ĉiaj duboj, ĉiaj vidpunktoj, se nur vere utilaj, povos ricevi klarigon aŭ uzon, tamen ĉiam en la ĝusta momento.

Ŝi apenaŭ ĵus parolis, kiam jen la ministrino Veneranda envenis kune kun du noblaspektaj sinjorinoj, pri kiuj Narciza min sciigis, ke ili estas ministrinoj de komunikado.

Ĉe sia sola ĉeesto veneranda disverŝis grandegan ĝojon sur ĉiujn mienojn. Ŝi ne montris vizaĝon de maljunulino, kio kontraŭis ŝian nomon ^(*), sed mienon de nobla maturaĝa sinjorino, kun simplaj, senafektaj manieroj.

Post nelonga konversacio kun tiuj dudek plej altaj kunlaborantoj, eble por sciigi pri la plej ĉefaj bezonoj de la ĉeestantoj rilate la temon en tiu vespero, ŝi komencis sian paroladon.

— “Kiel ĉiam, mi ne povas uzi ĉi tiun nian kunsidon por kilometre longa babilado; mi ĉi tie troviĝas, por konversacii kun vi ĉiuj, elvolvante iom da observoj pri la penso.

“Nun sidas inter ni kelkaj centoj da aŭdantoj, kiuj miregas ĉe nia medio plena de aĵoj kun formoj similaj al tiuj surteraj. Ĉu ili do ne lernis, ke la penso estas universa lingvo? Ĉu ili do ne estas informitaj, ke la mensa kreaĵo estas preskaŭ ĉio en nia vivo? Multenombraj estas tiuj fratoj, kiuj faras tiajn demandojn. Ili tamen trovis ĉi tie la surterajn loĝejojn, uzatajn kaj esprimilojn de la penso. Ĉi tiu realaĵo devus tamen nenium surprizi. Ni ne povas forgesi, ke ĝis nun ni vivis (parolante pri la ekzistado homa) en malnovaj rondoj kun vibra antagonismo. La penso estas la bazo de la spiritaj interrilatoj de la estuloj, sed ni tamen ne forgesu, ke ni estas milionoj da animoj en la Universo, ankoraŭ iom ne obeantaj la universajn leĝojn. En la nuna stato ni neniel estas kompareblaj kun la pli aĝaj kaj pli saĝaj

(*) Veneranda, el la latina lingvo, estas ĝustadire “respektinda”. La popolo tamen donas al tiu adjektivo la signifon “maljuna”. — *La Trad.*

fratoj, jam proksimaj al Dio, sed milionoj da estaĵoj, vivantaj en la kapricaj “malsuperaj mondoj” de nia “mi”. La grandaj majstroj de la enkarna homaro instruas Diajn principojn, konigas eternajn kaj profundajn veraĵojn en la surteraj medioj. Sed ordinare, dum nia ekzistado sur la Tero, ni ja ekscias pri tiuj leĝoj, tamen ilin ne obeas, kaj ekkonas tiujn veraĵojn, al kiuj tamen ni ne dediĉas nian vivon.

“Ĉu estas kredeble, ke, nur tial, ke li konsentas pri la povo de la penso, la homo estus libera de ĉia malsupera nivelo? Ne eble!

“Ekzistado eĉ centjara en la surtera karno estas tempo tro mallonga, ke ni aspiru pozicion de esence Diaj kunlaborantoj. En la monda lernado ni sciiĝas pri la mensa forto, sed ni forgesas, ke nian tutan energion, en ĉi tiu rilato, ni uzas, tra sinsekvaj jarmiloj, por mensaj kreaĵoj, detruantaj aŭ malutilantaj nin mem.

“Ni estas enlasataj en la kursojn por spirita klerigo en la pluraj religiaj lernejoj de la mondo, sed ni ofte agadas nur sur la kampo de buŝaj paroloj. Sed neniuj plenumas sian devon sole nur per paroloj. La Biblio instruas, ke la Sinjoro de la Vivo mem ne haltis ĉe la Vorto, sed daŭrigis Sian kreaĵon per Agado.

“Ni ĉiuj scias, ke la penso estas esenca forto, sed ni ne konscias, ke dum jarmiloj ni misuzis tiun forton.

“Nu, estas sciate, ke ĉiu homo devas nutri siajn infanojn; tiel same ĉiu Spirito ja devas tenadi kaj nutradi siajn proprajn kreaĵojn. Krima ideo naskas samnaturajn mensaĵojn; tiun saman leĝon obeas alta penso. Ni imagu ion pli simplan. Leviĝinte ĝis la altoj, la akvo revenas puriĝinta, kunportante potenciajn vivo-fluidecaĵojn en la formo de refreŝiga roso aŭ de bonfara pluvo; se ni ĝin konservas kun la teraj malpuraĵoj, tiam ĝi fariĝas vivejo de mortigaj mikroboj.

“La penso estas vivanta forto ĉie; ĝi estas kreanta atmosfero, kiu envolvas la Patron kaj Liajn infanojn, la Kaŭzon kaj ĝiajn Efikojn, en la Universa Hejmo. En ĝi, homoj turniĝas en anĝelojn direkte al la ĉielo, aŭ naskiĝas diablaj genioj sur la vojo al la infero.

“Ĉu vi komprenas la gravecon de ĉi tio? Certe, kon-

cerne al mensoj pli evoluintaj, ĉe elkarnuloj kaj enkarnuloj, sufiĉas la mensa interŝanĝado sen neceso de formoj, kaj mi rimarkigu, ke la penso per si mem estas la fundamento de ĉiaj silentaj sciigoj de la ideo en la mirindaj sferoj de la intuicio, ĉe ĉiaspecaj estaĵoj. Laŭ ĉi tiu principo, iu Spirito, ĉiam vivinta nur en Francujo, povas aperi en Brazilo, por manifesti ĉiun sian penson, bezonante nenian specialan vortoformon: en ĉi tiu okazo, vortan formon donas ĉiam tiu, kiu ricevas lian penson, sed tio ankaŭ postulas perfektan interkonformecon de ambaŭ (*). Sed ni ne troviĝas en sferoj kun absoluta mensa pureco, kie ĉiuj estuloj inter si harmonias. Ni reciproke agordiĝas en ĉirkaŭlimitaj rondoj, kaj estas devigataj ĉiam ankoraŭ starigi niajn provizorajn konstruojn sur la Tero, por tien reveni kun pli granda sperto el la natura evoluado.

“Kiel transiĝa spirita urbo, “Nia Hejmo” esta do beno, al ni konsentita kiel “aldono de favorkoreco” (**), por ke iaj malmultaj sin preparu por la altiĝo kaj la plimulto revenu sur la Teron por elaĉetaj servoj. Ni komprenu la grandiozecon de la leĝoj de la penso kaj de hodiaŭ ni al ili submetiĝu.”

Post longa paŭzo la ministrino ridetis al la aŭdantaro kaj demandis:

— Kiu deziras ekpraktiki ĉi tiun konsilon?

Tuj poste milda muzikaĵo plenigis la salonon per karesaj melodioj.

Veneranda ankoraŭ longe konversaciis, elmontrante amon kaj komprenemon, delikatecon kaj saĝon.

Sen ia soleneco ĉe la gestoj, por komprenigi la ĉeson de la konversacio, ŝi finis sian paroladon per ŝerca demando.

Vidante miajn kamaradojn stariĝi por la adiaŭo,

(*) Tia perfekta interkonformeco estas io malofta ĉe ordinaraj teranoj; tial la uzado de lingvo kaj bildoj estas la natura perilo de penso kaj sentoj ĉe ni sur la terkrusto kaj en ties ĉirkaŭaĵo. — *La Eldonistoj*.

(**) Vd. Ĉe Mateo, 6:33: “celu unue Lian regnon kaj Lian justecon, kaj ĉio tio estos aldonita al vi”. — *La Trad.*

sub la sonoj de la kutima muzikaĵo, mi, surprizite, demandis Nacizan:

— Kio do?! Ĉu la kunsido ja finiĝis?

La ĝentila flegistino, ridetante, respondis:

— La ministrino Veneranda agas ĉiam tiel. Ŝi finas sian parolon, kiam plej granda estas nia interesiĝo. Ŝi kutimas diri, ke la evangeliaj predikoj komenciĝis ĉe Jesuo, sed neniuj povas diri, kiam kaj kiel ili finiĝos.

XXXVIII

LA AFERO DE TOBIJA

En la tria tago de mia laborado Tobija ĝojigis min per agrabla surprizo. Fininte miajn taskojn, ĉe vesperiĝo, ĉar aliaj prenis sur sin la noktan deĵoron, mi tial estis frate kondukita en lian hejmon, kie min atendis belaj momentoj da plezuro kaj lernado.

Tuj ĉe la pordo li prezentis al mi du sinjorinojn: unu estis jam grandaĝa kaj la dua proksima al matureco. Li klarigis, ke ĉi tiu lasta estas lia edzino kaj la unua lia fratino. Luciana kaj Hilda, afablaj kaj delikataj, superŝutis min per ĝentilaĵoj.

En la ĉarma biblioteko de Tobija ni ekzamenis verkojn mirindajn pro sia bindo kaj altnivela enhavo.

Sinjorino Hilda invitis min viziti la ĝardenon, por ke mi povu de proksime observi kelkajn laŭbojn kun plej fantaziaj formoj. Ŝajnis, ke ĉiu domo, en “Nia Hejmo”, specialiĝis pri la kulturado de iaj difinitaj floroj. Ĉe la domo de Lizio, da glicineoj kaj lilioj estis centoj; ĉe Tobija, sennombraj hortensioj disvolviĝis sur verdaj tapiŝoj el violoj. Belaj laŭboj el delikataj vegetaĵoj, memorigantaj la ankoraŭ junan bambuon, prezentis sur la supro kuriozan grimpkreskaĵon, kies karakterizaĵo estis, ke ĝi kunplektis plurajn branĉetarojn, kvazaŭ grandegajn floriajn laĉojn en la verda hararo de la arboj, formante gracian tegmenton.

Mi ne povosciis esprimi mian miron. La atmosferon balzamis ebriiga parfumo. Ni faradis konsiderojn pri la beleco de tiu tuta pejzaĝo, vidata el tiu loko de la Ministerio de Regenerado, kiam Luciana invitis nin en la domon por manĝeto.

Ravite de tiu simpla medio, plena de elmontroj de sincera frateco, mi ne sciis, kiel danki da grandaniman gastiganton.

En unu momento de la amika konversacio Tobija diris kun rideto:

— Vi, mia amiko, ĝustadire, estas ankoraŭ novico en nia ministerio kaj kredeble ne konas mian familian aferon.

Ambaŭ sinjorinoj dume ankaŭ ridetis. Rimarkinte mian silentan demandon, la domomastro daŭrigis:

— Cetere ĉi tie ekzistas multe da domoj en tia sama situacio. Prezentu al vi, ke mi edziĝis du fojojn...

Kaj montrante niajn kunulinojn en la ĉambro, li bonhumore parolis plue:

— Mi opinias tute superflua ian klarigon pri la edzinoj...

— Ha, jes! — mi elbalbutis ekstreme konfuzita. — Sinjorinoj Hilda kaj Luciana partoprenis do en viaj provoj sur la Tero...

— Trafite! — li rediris trankvila.

En tiu momento sinjorino Hilda prenis la parolon, turnante sin al mi:

— Pardonu nian Tobijan, frato Andreo. Li estas ĉiam preta paroli pri la pasinteco, kiam nin vizitas iu ĵusveninto de la Tero.

— Ĉu do tio ne estas motivo de ĝojo — bonhumore intermetis Tobija —, venki tiun monstron, la malnoblan ĵaluzon, konkerante almenaŭ ian manifestajon de reala frateco?

— Efektive — mi rediris —, ĉi tiu problemo profunde interesas nin ĉiujn. Milionoj da homoj sur la Tero jam la duan fojon tuŝis la katenojn de Himeneo. Kiel do solvi tian altan aman demandon konsidere al la eterna spiriteco? Ni ja scias, ke la morto de la korpo nur transformas, sed ne detruas. La ligiloj de la animo plue daŭras tra la senfina tempo. Kion do fari? Ĉu oni kondamnu iun, kiu fariĝis denove edzo aŭ edzino? Sed oni trovas milionojn da tiaj. Mi jam multajn fojojn rememoris, interesite pri ĉi tiu afero, la evangelian lokon, laŭ kiu la Majstro, parolante pri la geedziĝo en la Eter-

no, promesis al ni la vivon de la anĝeloj. (*)

— Ni tamen konfesu, kun la plej granda respekto antaŭ la Sinjoro — bonanime intermetis la gastiganto —, ke ni ankoraŭ ne troviĝas en la sfero de la anĝeloj, sed en tiu de la homoj elkarniĝintaj.

— Kiel do oni ĉi tie solvas tian situacion? — mi demandis.

Tobija ridetis kaj respondis:

— En tre simpla maniero. Ni konsentas, ke inter la neracia estaĵo kaj la homo ekzistas grandega ŝtupa serio da pozicio; tiel same, ni homoj devas longegan vojon iradi ĝis la anĝelo. Nu, kiel ni povus aspiri la societeton de anĝelaj estuloj, se ni ankoraŭ ne kondutas frate unu kontraŭ alia? Vere estas, ke kelkaj fortanimaj migrantoj superas ĉiajn survojnajn barojn per ekstrema peno de la volo, sed la plej multaj ja bezonas pontojn aŭ la manon de helpemaj Gardanĝeloj. Kiel sekvo de ĉi tiu veraĵo, tiaj aferoj ricevas decidon laŭ la efektiva frateco, ĉar oni rekonas, ke la vera geedziĝo estas kuniĝo de animoj, kaj tian ligitcon neniu kapablas rompi.

En ĉi tiu momento Luciana, kiu sin tenadis silente, sin intermetis, aldonante:

— Mi tamen diru, ke ĉion ĉi, feliĉon kaj komprenemon, ni devas danki al la bonkoreco kaj sinofero de nia Hilda.

Sed, montrante dignan humilecon, la edzino de Tobija rediris:

— Silentu! Ne parolu pri iaj ecoj, kiajn mi ne havas. Mi nun rakontos mallonge nian historion, por ke nia gasto ekkonu mian doloran lernadon.

Kaj senafekte ŝi komencis:

— Tobija kaj mi, ni geediziĝis sur la Tero ankoraŭ tre junaj, obeante sanktan spiritan samecon. Mi opinias superflue pentri la feliĉecon de du animoj, kiuj vere sin reciproke amas kaj ligiĝas unu al la dua per geedziĝo. Sed la morto, eble enviante nian feliĉon, forprenis min el la mondo ĉe la naskiĝo de mia dua infano. Nia turmento estis tiam nepriskribebla. Tobija senhelpe plorad-

(*) Laŭ Mateo, 22:30. — *La Trad.*

is, kaj mi ne havis fortojn por faciligi mian propran angoron. Pezaj tagoj en la Ombrejo min preme envolvis. Mi ne povis alie, ol resti plu alkroĉita al la edzo kaj al la du gefiletoj, surda por ĉia klarigo, kiun la spiritaj amikoj intuicie venigadis al mi.

“Mi volis lukti, simile al kokino ĉe siaj idetoj. Mi rekonis, ke la edzo bezonas reorganizi la hejman medion, ke al la infanoj patrino prizorgado estas nepre necesa. Tia situacio fariĝis ĉiam pli neelportebla. Mia fraŭla bofratino ne toleris la infanojn kaj la kuiristino nur ŝajnis sindonon. Du junaj vartistinoj havis konduton de absolutaj senkapulinoj. Tobija ne povis do prokrasti la ĝustan decidon kaj unu jaron post la nova situacio edziĝis kun Luciana, kontraŭante miajn kapricojn. Ha, se vi nur scius, kiel mi ekindignis! Mi ŝajnis ia vundita lupino. Mia bruteco eĉ faris al si la kutimon malamiki kontraŭ la kompatinda virino, en la intenco ŝin ekstermi.

“Feliĉe Jesuo tiam bonvolis, ke min vizitu mia patrinfanka avino, antaŭ multe da jaroj elkarniĝinta. Tio estis por mi granda surprizo. Ŝi venis kvazaŭ sen difinita celo, sidiĝis apud mi, sidigis min sur siajn krurojn, kiel en pasintaj tempoj, kaj en larmoj demandis min: “— Kion vi faras, mia nepino? Kia estas via rolo en la vivo? Ĉu vi estas ia leonino aŭ animo konscia pri Dio? Nu, nia fratino Luciana anstataŭas patrinon al viaj infanoj, laboras kiel servistino en via domo, flegas vian ĝardenon, suferas la galelverŝojn de via edzo, sed ne povas tamen okupi la provizoran lokon de kunbatalantino apud li? Ĉu do tiamaniere via koro dankas Dion pro Liaj bonfaroj al vi kaj pagas iun, kiu servas al ĝi? Vi volas sklavinon, sed fratino vi malŝatas? Hilda! Hilda! Kion vi faris el tiu religio de la Krucumito, kiun vi lernis? Ho, mia kompatinda nepino, mia malfeliĉa!”

“Mi tiam en larmoj ĉirkaŭbrakis la sanktan maljunulinon, mi forlasis la antaŭan hejmon kaj venis kune kun ŝi por labori en “Nia Hejmo”. De tiu tempo mi havas en Luciana ankoraŭ unu filinon pli. Mi tiam intense eklaboris. Mi donis min al serioza studado, al la morala plibonigo de mi mem, kaj klopodis por helpi tute

egale ĉiujn en nia iama surtera hejmo. Tobija fondis novan familion, kiu ankaŭ al mi ekapartenis per la sanktaj spiritaj ligiloj. Post kelka tempo li revenis akompanata de Luciana, kiu ankaŭ venis al ni, kaj tio kompletigis nian ĝojon. Jen, mia amiko, nia historio...”

Sed Luciana prenis la parolon kaj rimarkis:

— Ŝi tamen forsilentis sian sindonemon, instruante min per sia ekzemplo.

— Kion vi diras, infano? — demandis la mastrino, karesante ŝian dekstran manon.

Luciana ridetis kaj aldonis:

— Dank’ al Jesuo kaj al ŝi mi lernis, ke ekzistas geedziĝoj pro amo, frateco, provado, devo; en la tago, kiam Hilda min kisis, min pardonante, mi eksentis, ke mia koro liberiĝis de tiu monstro, la malnobla ĵaluzo. Spirita geedziĝo estas tiu de animo kun animo; la ceteraj estas simplaj interarangoj, nepre necesaj al la kontentigo de bezonoj, aŭ rebonigaj procedoj, kvankam ĉiaj el ili estas ja sanktaj.

— Kaj tiamaniere ni konstruis nian novan hejmon, nome sur la fundamento de la efektiva frateco — aldiris la domomastro.

Profitante la fariĝinta nelongan silenton, mi demandis:

— Sed kia propre estas ĉi tie la procedo de interedziĝo?

— La kombinado de vibroj — ĝentile respondis Tobija —, aŭ pli bone, pli klare parolante, la plej granda aŭ absoluta interkonformeco.

Nekapabla bridi la scivolemon, mi forgesis la lecionon pri bontoneco kaj demandis:

— Sed, kia estas la pozicio de nia fratino Luciana en ĉi tiu afero?

Antaŭ ol ĝin respondis la spiritaj geedzoj, Luciana mem, al kiu ĝi celis, klarigis:

— Kiam mi edziniĝis kun Tobija, vidvo, mi ja devis esti certa, ke plej probable nia geedziĝo estos antaŭ ĉio kuniĝo frata. Jen kion mi malfacile komprenis. Cetere estas nature, ke, se geedzoj suferas maltrankvilon, re-

ciprokan nekomprenon, malĝojon, ili estas do kunigitaj fizike, sed ne spirite geedziĝintaj.

Mi ekdeziris ankoraŭ ion demandi, sed mi ne trovis vortojn, kiuj ne montrus impertinentan maldiskretecon. Sinjorino Hilda tamen komprenis mian penson kaj diris:

— Estu trankvila. Luciana nun troviĝas en la plena aŭreolo de fianĉineco. Ŝia nobla kamarado de multe da surteraj migradoj antaŭ kelkaj jaroj reiris en la karnon. En la venonta jaro ŝi iros renkonte al li. Mi supozas, ke tiu feliĉa momento fariĝos en São Paulo (*).

Ni ĉiuj gaje ridetis.

En tiu momento Tobija estis vokita por urĝa grava afero en la Ĉambroj de Rebonigo. Fariĝis do necese forĉini la konversacion.



(*) São Paulo: Ŝtato de Brazilo, kiel ankaŭ la ĉefurbo de tiu ŝtato. — *La Trad.*

KONSILIĜO KUN SINJORINO LAŬRA

La afero de Tobija min profunde impresis.

Tiu domo, fundamentita sur novaj principoj de frata ligiĝo, estis io, min forte obsedanta. Por diri la veron, ankaŭ mi sentis min mastro de la surtera hejmo kaj prezentis al mi, kiel malfacila estus por mi mem ia simila situacio. Ĉu mi estus tiel kuraĝa kaj agus tiel, kiel Tobija, imitante lian konduton? Mi supozis, ke ne. Laŭ mia sento, mi ne estus kapabla tiel dolore ĉagreni mian karan Zelian, kaj same, mi neniam akceptus tian altrudon de la flanko de mia edzino.

Tiuj paroloj en la domo de Tobija turmentis mian cerbon. Nenian ĝustan klarigon mi sukcesis trovi, kiu povus min kontentigi.

Tiel maltrankvila mi sentis min, ke en la sekvanta tago mi decidis, en senokupa horo, viziti Lizion, dezirante ian klarigon de sinjorino Laŭra, por kiu mi portis filan konfidon.

Akceptite kun grandega elmonro de ĝojo, mi atendis la oportunan okazon, kiam mi povus trankvile aŭdi la patrinon de Lizio.

Post kiam la gejunuloj foriris al siaj kutimaj amuzoj, mi prezentis al la nobla amikino, ne sen komprenebla ĝenateco, la demandon, kiu min tutan premokupis.

Multe spertinte en la vivo, ŝi ridetis kaj ekparolis:

— Vi agis tre bone, prezentante ĉi tiun demandon, al la konsiderado de ni ambaŭ. La solvo de ĉia demando, kiu turmentas la animon, bezonas amikan kunhelpon.

Post nelonga paŭzo ŝi ĝentile daŭrigis:

— La afero de Tobija estas nur unu el tiuj senombraj, kiujn ni konas ĉi tie kaj en aliaj spiritaĵoj, kies karakteriza trajto estas la alta penso.

— Ĝi tamen ofendas nian sentadon, ĉu ne? — mi vive intermetis.

— Kiam ni nin tenas je la vidpunktoj pure homaj, tiuj aferoj eĉ kaŭzas skandalon; tamen, mia amiko, ni devas loki super ĉio la spiritkarakterajn principojn. En ĉi tiu rilato, Andreo, ni devas kompreni la spiriton de intersekvo, kiu direktas la evoluciokadrojn de la vivo. Se ni laŭiras longan gradaron da besteco, estas do kompreneble, ke tiu besteco ne forviŝiĝus kvazaŭ per sorĉa frapo. Multe da jarcentoj ni konsumas, por elveni el la malsuperaj tavoloj. La sekso estas unu el la Diaj rimedoj, kiujn ni malfacile komprenas. Nun ne estas por vi facila la penetrado, laŭ ĝia nobla senco, en la hejman organizon, kiun vi hieraŭ vizitis; tamen tre granda tie estas la feliĉo dank' al la atmosfero de komprenemo inter la personoj de la surtera dramo. Al ne ĉiuj prosperas en tiel mallonga tempo anstataŭigi katenojn el ombro per ligiloj el lumo.

— Sed, ĉu tio estas ĝenerala regulo? — mi demandis. — Ĉu ĉiu viro, havinta pli ol unu edzinon, aŭ ĉiu virino, havinta pli ol unu edzon, restarigas ĉi tie sian hejmon, akompanate de ĉiuj siaj antaŭaj amatoj?

Farante mienon de granda pacienco, mia kunparolantino klarigis:

— Ne estu tiel radikalema. Ni ne tro rapidu. Multaj povas porti amon, sed ne havi komprenemon. Ne forgesu, ke nia vibra konstruiteco estas multe pli grava, ol tiu surtera. La afero de Tobija estas ekzemplo de venko de la reala frateco, venko akirita de tri animoj, interesigintaj pri la atingo de ĝusta interkompreno. Homo, ne alkonformiĝanta al la leĝo de frateco kaj kompreno, konsekvence ne transiras tiujn limojn. La mallumaj regionoj de la Ombrejo estas plenaj de estuloj, kiuj ne eltenis tiajn provojn. Tiel longe kiel ili malamas, ili similas magnetajn nadlojn sub plej kontraŭaj influoj; dum la tuta tempo, kiam ili ne komprenas la veron, ili elportas la superregadon de la mensogo kaj sekve ne povas eniri en regionojn kun pli altgrada aktiveco. Estas nekalkuleblaj la homoj, kiuj suferas multe da jaroj sen ia spirita faciliĝo, sole nur tial, ke ili sin deturnas de la efektiva frateco.

— Kaj kio do okazas? — mi demandis, profitante

la silentiĝon de mia kunparolantino. — Se ili ne estas enlasataj en la spiritajn rodojn de nobla lernado, kian lokon do ricevas la kompatindaj animoj, sin submetantaj al tiuj provoj?

— Post efektive infera suferado dank' al la malsuperaj kreaĵoj, kiujn ili elpensas al si mem — respondis la patrino de Lizio —, ili foriras de ĉi tie, por fari en la karna vestaĵo tion, kio al ili ne prosperis en medio alia ol la surtera korpo. La Dia Boneco konsentas al ili forgeson pri la pasinteco sur la materia kampo de la Tero, kaj ili akceptas, per la ligiloj de samsangeco, tiujn, de kiuj ili propravole foriĝis pro la veneno de malamo aŭ de nekompreno. El tio sekvas la ĉiam pli viva oportuneco de la rekomendo de Jesuo, ke ni tuj paciĝu kun niaj kontraŭuloj (*). Ĉi tiu konsilo antaŭ ĉio interesas nin mem. Ni devas ĝin observi por nia propra bono. Kiu scias uzi la tempon post la surtera elprovado, eĉ se li devas reiri en la karnon, tiu povas realigi belajn spiritajn konstruojn rilate al la paco de la konscienco, per la reenigo en la malsubtilan materion, kiam li do elportos malpli pezan ŝarĝon de zorgoj. Multaj Spiritoj travivas jarcentojn penante forviŝi malamojn kaj antipatiojn dum la surtera ekzistado, sed ili tiujn samajn sentojn renaskas post la elkarnigo. La demando pri pardono laŭ Jesuo, mia kara Andreo, estas ja problemo serioza. Ne paroloj ĝin solvas. Pardonu buŝe estas afero de vortoj; homo, efektive pardonanta, devas disrompi kaj forbalai pezajn kirasojn, kiujn li forĝis al si mem dum antaŭaj tempoj.

Nun sinjorino Laŭra eksilentis, kvazaŭ devante mediti pri la amplekso de siaj paroloj. Uzante la okazon, mi aldonis:

— La provo de edziĝo estas tre sankta en miaj okuloj.

Mia kunparolantino ne surpriziĝis ĉe tiu ĉi diro kaj rimarkis:

— Tiujn Spiritojn, kiuj ankoraŭ trapasas simplan

(*) Mateo, 5:24. — *La Trad.*

bestan elprovadon, nia konversacio ne interesas; sed ni, komprenantaj la neceson de klerigo per la Kristo, devas zorge pesi ne sole la provon de edziĝo, sed ankaŭ ĉian provon seksan, ĉar ĝi profunde tuŝas la vivon de la animo.

Ĉe tiu rimarko mi ne povis ne ruĝiĝi, rememorante mian pasintecon de ordinara homo. Mia edzino iam estis por mi io sankta, kion mi amis super ĉio; aŭdante la patrinon de Lizio, mi tamen remoris jenajn vortojn de la Malnova Testamento: “ne deziru la domon de via proksimulo, ne deziru la edzinon de via proksimulo, nek lian sklavon, nek lian sklavinon, nek lian azenon, nek lian bovon, nek ion, kio apartenas al la proksimulo” (*). Mi subite sentis min nekapabla ankoraŭ trovi stranga la aferon de Tobija. Sed mia kunparolantino rimarkis mian konfuzitecon kaj daŭrigis:

— Kie la klopodo por korektado estas afero de preskaŭ ĉiuj, tie devas ekzisti granda komprenemo kaj alta respekto por la Dia Favorkoreco, kiu malfermas al ni tiom da vojoj por ĝustaj rebonigoj. Ĉia seksa travivaĵo de homo, kies Spirito jam ricevis iom da lumo, estas okazaĵo tre grava por li mem. Ĝuste tial frata interkompreniĝo antaŭiras ĉian vere savan laboron. Ankoraŭ antaŭ nelonge mi aŭdis de granda instruisto ĉe la Ministerio de Altigo, ke, se li povus, li enmateriiĝus en la sferoj de la karno, por diri al ĉiuj religiuloj ĝenerale, ke ĉia karito, por esti io Dia, devas sin bazi sur frateco.

En tiu momento la mastrino invitis min viziti Eloizan, ankoraŭ restantan en la domo, kaj tiel ŝi komprenigis al mi, ke ŝi ne deziras konigi pliajn detalojn pri la afero. Konstatinte la ĉiam pli bonan farton de tiu junulino, ĵus veninta de la Tero, mi profunde enpenza reiris al la Ĉambroj de Rebonigo.

Nun jam ne okupis mian spiriton la situacio de Tobija nek la sintenado de Hilda kaj Luciana. Min ja impresis la grandioza demando pri la Interhoma Frateco.

(*) Eliro, 20:17. — *La Trad.*

KIU SEMAS, TIU RIKOLTOS

Mi ne sciis klarigi al mi, kiel mi tiel forte deziris viziti la virinan departementon en la Ĉambroj de Rebonigo. Pri tio mi parolis al Narciza, kiu tuj montriĝis preta ĝin kontentigi.

— Kiam la Patro vokas nin al iu loko — ŝi afable diris —, tie do atendas nin ia tasko. Ĉiu situacio, dum la vivo, havas difinitan celon... Nepre observu ĉi tiun principon ĉe viaj ŝajne hazardaj vizitoj. Se nur niaj pensoj celas bonfaradon, ne estas malfacile en ili eltrovi ian Dian inspiron.

En tiu sama tago la flegistino akompanis min al Nemezia, influa oficistino en tiu laborfako. Trovi ŝin ne estis malfacile.

Sur vicoj da tre blankaj kaj zorge tenataj litoj troviĝis virinoj, kiuj pli bone ŝajnis homaj ĉifonaĵoj. Ĉi tie korŝiraj ĝemoj, tie angoraj ekkrioj. Nemezia, kies nobleco egalas tiun de Narciza, bonkore parolis:

— Vi, mia amiko, nun certe kutimis al tiaj vidaĵoj, kiel ĉi tiu. En la vira departemento okazas preskaŭ same.

Kaj farante signifoplenan geston al sia kolemino, ŝi diris:

— Narciza, bonvolu akompani nian fraton kaj montri al li la servojn, kiujn vi opinios konvenaj al lia lernado. Estu vi ambaŭ kiel hejme.

Mia amikino kaj mi paroladis pri la homa vantamo, ĉiam alligita al la fizikaj plezuroj, elnomante observojn kaj instruojn, kiam ni alvenis al la Pavilono 7. Tie sin trovis kelkaj dekoj da virinoj, sur litoj en ioma distanco unu de alia.

Mi esploris la mienon de la malsanulinoj, kiam mia rigardo trafis iun, kiu vekis pli vive mian atenton. Kiu ja estas tiu afliktita, strangaspekta virino? Ŝajne antaŭtempa maljuneco stampiĝis sur ŝia vizaĝo, kaj ŝiajn lipojn streĉis kvazaŭrido, duone el ironio, duone el rezignacio. Ŝiaj okuloj, senbrilaj kaj malgajaj, montriĝis difektaj. Kun memoro tumultanta kaj koro premata, mi en la daŭro de nemultaj sekundoj ŝin lokalizis en la pasinta tempo. Tio estis Eliza, tiu sama Eliza, kiun mi ekkonis en mia juneco. Ŝi aspektis alie pro la multa suferado, tamen ŝian memecon mi neniel dubis. Mi perfekte rememoris tiun tagon, kiam ŝi, en humila teniĝo, venis en nian domon sub la mano de malnova amikino de mia patrino, kiu, akceptinte la kunportitan rekomendon, dungis ŝin kiel servistino. Komence, la kutima laborado, nenio eksterordinara; sed poste la supermezura intimeco inter du homoj, el kiuj unu trouzas la rajton ordoni kaj la dua la staton servi.

Eliza ŝajnis al mi tre ventanima; kiam duope kun mi, ŝi senskrupule rakontadis certajn aventurojn de sia juneco, kaj per tio ŝi plidanĝerigis la malsaĝecon de niaj pensoj. Mi rememoris tiun tagon, kiam mia patrino vokis min por konvena konsilado. Tia intimeco, ŝi diris, ne decas; estas juste de nia flanko trakti la servantinon amike, sed konsilinde tiujn interrilatojn saĝe tenadi. Mi tamen, senpripense, jam tre malproksimen pelis nian kamaradecon. Sub grandega morala angoro Eliza post kelka tempo forlasis nian domon, ne kuraĝinte ĵeti al mi en la vizaĝon eĉ la plej malgrandan akuzon.

La tempo forpasis kaj reduktis, en mia menso, tiun okazaĵon al akcidenta epizodo de la homa ekzistado. Tamen la epizodo, kiel io de la vivo, ankaŭ estis vivanta. Antaŭ mi estis Eliza, nun venkita, humiligita! Kie ĝis hodiaŭ vivis tiu malfeliĉa virino, tiel frue pelita en doloran kirlegon da suferoj? De kie ŝi venis? Ho ve! en ĉi tiu okazo ne estis antaŭ mi Silvejra, rilate al kiu mi povis dividi mian ŝuldon kun mia patro. La ŝuldo estis nun tute mia. Mi eĉ ektemis, hontante la elŝoviĝon de tiuj rememoroj, sed, simile al infano sopiranta par-

donon pri siaj eraroj, mi iris al Narciza, por peti ŝin pri konsilo.

Mi mem estis mirigita de la konfido, kiun tiuj sanktaj virinoj inspiris al mi. Kredeble mi neniel kuraĝus peti de la ministro Klarenco la klarigojn, pri kiuj mi petis la patrinon de Lizio, kaj eble mia konduto nun estus alia, se Tobija starus apud mi. Konsiderante, ke ĉiu nobla kaj kristana virino estas ja patrino, mi min turnis al la flegistino, fidante al ŝi pli ol ĉiam. Laŭ la rigardo, kiun ŝi direktis sur min, ŝajnis, ke Narciza komprenas mian situacion. Retenante la larmojn, mi ekparolis, sed en unu momento de tiu dolora konfeso mia amikino intermetis:

— Ne estas necese paroli plu; mi divenas la epilogon de la historio. Ne donu vin al detruaj pensoj. Mi proprasperte konas vian moralan turmenton. Se tamen la Sinjoro permesis, ke vi denove renkontiĝu kun ĉi tiu fratino, Li do konsideras vin jam kapabla pagi vian ŝuldon.

Vidante, ke mi staras sendecide, ŝi daŭrigis:

— Havu nenian timon. Alproksimiĝu al ŝi kaj ŝin konsolu. Ni ĉiuj, mia frato, trafas sur la vojo la fruktojn de la bono aŭ malbono, kiun ni semas. Ĉi tiu aserto ne estas ia doktrina frazo, sed universala veraĵo. Multe da profito mi ĝis hodiaŭ ĉerpis el situacioj similaj al ĉi tiu. Feliĉaj la solventaj ŝuldantoj.

Rimarkinte nun mian firman decidon entrepreni la necesan reguligon de kontoj, ŝi insiste parolis plue:

— Ni iru, tamen ne rekonigu vin ĝis pli oportuna okazo, nur post kiam vi sukcese bonfaros al ŝi. Tio ne estos malfacila, ĉar ŝi ankoraŭ estas preskaŭ tute blinda, almenaŭ por kelka tempo. Laŭ la fortoj, ŝin envolvantaj, mi vidas ĉe ŝi la malĝojan stampon de la fiaskintaj patrinoj kaj de la edzinoj de neniu.

Ni alproksimiĝis. Mi prenis sur min la iniciaton de la konsola parolo. Eliza rekonigis sin, eldirante sian nomon kaj volonte donante aliajn informojn. Antaŭ tri monatoj ŝi estis enportita en la Ĉambrojn de Rebonigo. Dezirante nepre puni min mem antaŭ Narciza, por ke

la leciono neforviŝeble penetru en mian animon, mi demandis:

— Kaj via historio, Eliza? Vi certe multe suferis...

Sentante la amikan tonon de mia demando, ŝi plena de rezignacio ridetis kaj malŝarĝis sian koron:

— Por kio do rememori tiajn malĝojajn aferojn?

— Doloraj travivaĵoj ĉiam instruas — mi rediris.

La malfeliĉa virino, kiu montris profundan moralan aliiĝon, dum kelke da momentoj meditis, kvazaŭ kolektante siajn pensojn, kaj diris:

— Mia travivaĵo estis tiu de ĉiuj ventkapaj virinoj, kiuj ŝanĝas la benatan panon de laboro je la venena galo de iluzio. En mia longe pasinta juneco, kiel filino de malriĉega hejmo, mi dungigis min en la domo de riĉa komercisto, kie la vivo trudis al mi grandegan aliiĝon. Tiu komercisto havis filon, same junan kiel mi; kiam la intimeco inter ni atingis tian gradon, ke ĉia mia reago estus senutila, mi krime forgesis, ke Dio konsentas laboron al ĉiu, kiu amas virtan vivon, kiel ajn kulpa tiu estis, kaj fordonis min al doloraj faroj, kiujn priparoli mi trovas superflue. Mi proksime konis plezuron, lukson, materian komforton kaj poste la naŭzon al mi mem, sifilison, hospitalon, forlasitecon, terurajn elreviĝojn, kiuj kulminis per blindeco kaj per la morto de la korpo. Mi longe vagadis en freneziga malespero, sed mi tiel insiste petis pri helpo la Virgulinon el Nazaret, ke unu tagon senditoj de la Bono prenis min pro amo al ŝia nomo kaj kondukis min en ĉi tiun domon de beninda konsolado.

Kortuŝite ĝis larmoj, mi demandis:

— Kaj li? Kiel estas nomata tiu viro, kiu faris vin tiel malfeliĉa?

Mi tiam aŭdis de ŝi mian nomon kaj la nomojn de miaj gepatroj.

— Ĉu vi lin malamas? — mi demandis frakasita.

Ŝi malgaje ridetis kaj respondis:

— Dum la tempo de mia antaŭa suferado mi malbenis lian memoron, mi portis kontraŭ li mortan malamon, sed la fratino Nemezia igis min pensi alie. Se mi lin malamus, mi devus malami min mem. En ĉi tiu afero la kulpo devas esti dividita. Mi do devas kulpigi neniun.

Tia humileco min kortuŝis. Mi ekprenis ŝian dekstran manon, sur kiu, sen ke mi povus tion eviti, ekruliĝis larmo de pento kaj konscienco-riproĉo.

— Aŭskultu, mia amikino — mi diris forte emociita —, ankaŭ mi nomiĝas Andreo, kaj mi devas vin helpi. De nun kalkulu je mi.

— Via voĉo — naive diris Eliza — similas lian.

— Nu — mi daŭrigis, kortuŝita —, ĝis nun mi ĝustadire ne havas familion en “Nia Hejmo”; vi do estos ĉi tie mia fratino laŭ la koro. Kalkulu je mia sindoneco de amiko.

En la mieno de tiu suferanta virino, klara rideto ŝajnis esperplena lumo.

— Ho, kiel mi vin dankas! — ŝi diris, forviŝante la larmojn. — De kiom da jaroj neniu parolis al mi tiele, per tia familiara tono, donante al mi la konsolon de sincera amikeco! Jesuo benu vin!

En tiu momento, kiam miaj larmoj pli abunde elverŝiĝis, Narciza patrine ekprenis al mi la manojn kaj ripetis:

— Jesuo benu vin!

KUNVOKO AL BATALADO

Dum la unuaj tagoj de Septembro 1939 ankaŭ “Nian Hejmon” trafis la bato, kiu atingis plurajn spiritajn koloniojn, ligitajn al la amerika kontinento. Ĝi estis la eŭropa milito, tiel ruiniganta la rondojn de la karno, kiel konfuzanta la sferojn de la spirito. Multaj el ni faradis konsiderojn pri la militaj entreprenoj, kredeble baldaŭ okazontaj, ne kaŝante la grandegan teruron, kiu ilin posedis.

Oni de longe sciis, ke la Grandaj Orientaj Fratularoj suferadis la malamikajn vibrojn de Japanujo, spertante grandegajn malfacilaĵojn. Nun tamen montriĝis kuriozaj kaj altedukaj faktoj. Simile kiel la noblaj spiritaj rondoj de la maljuna Azio silente luktadis, tiel “Nia Hejmo” sin preparadis por tia sama laboro. Krom altvaloraj rekomendoj sur la kampo de frateco kaj simpatio, la Guberniestro ankaŭ konsilis al ni esti singardaj en la sfero de la pensoj, detenante nin de ĉia malpli digna inklino en la sentimenta orbito.

Mi konstatis, ke la Superaj Spiritoj, en tiaj cirkonstancoj, rigardas la agresantajn naciojn ne kiel malamikojn, sed kiel renversemulojn, kies kriman agadon oni nepre devas bridi.

— Ve al tiuj popoloj, ebriiĝantaj per la vino de malbono! — diris al mi Salustio. — Eĉ se ili kelkatempe sukcesas, tiaj venkoj donos nur la pligravigon de ilia ruino, farante pli frakasantaj iliajn neprajn disbatojn. Ĉiu lando, kiu eksplodigas militon, fariĝas kapo de malordo en la Domo de la Patro kaj pagos pro tio teruran prezon.

Mi tiam rimarkis, ke la superaj regionoj de la vivo sin turnas, en justa defendo de la viktimoj, kontraŭ la entreprenojn de malklereco kaj de ombro, kuniĝintaj por anarkio kaj sekve por detruado. Miaj laborkolegoj sciigis min, ke ĉe tiaj okazaĵoj la agresantaj landoj fariĝas naturaj potencaj centroj de la fortoj de malbono. Ne gardante sin kontraŭ grandegaj danĝeroj, tiuj popoloj, esceptinte la noblajn kaj saĝajn Spiritojn, tie laborantaj, senprudentiĝas ĉe la kontakto kun la elementoj de malvirtigo, kiujn ili elvokas el la mallumaj regionoj. Laboremaj kolektivoj fariĝas aŭtomatoj de krimo. Inferaj legioj sin ĵetas sur grandajn produktejojn de la komuna progreso, turnante ilin en mediojn de maliceco kaj teruro. Tamen, dum la mallumaj bandoj ekposedas la menson de la agresintoj, la spiritaj grupoj de la nobla vivo ekmoviĝas helpe al la atakitoj.

Se ni devas kompati homon, kiu kontraŭas la leĝon de bono, des pli ĝuste ni kompatu popolon, kiu forgesas justecon.

Tuj post la tagoj, kiujn signis la unuaj bomboj sur la polan landon, mi ĉe noktigo troviĝis, en la Ĉambroj de Rebonigo, kune kun Tobija kaj Narciza, kiam neforgesebla klariono ekaŭdiĝis dum horkvarono. Profunda emocio nin ĉiujn ekposedis.

— Ĝi estas la supera kunvoko al helpservoj al la Tero — bonkore klarigis al mi Narciza.

— Ĝi estas signo, ke la milito longe daŭros, alportante terurajn turmentojn al la homa spirito — diris Tobija maltrankvila. — Kvankam malproksime, la tuta psika vivo en Ameriko naskiĝis en Eŭropo. Ni devos forte klopodi, por antaŭsavi de ia katastrofo la Novan Mondo.

La klariono aŭdiĝis plu kun stranga kaj impona modulado. Mi rimarkis, ke profunda silento falis sur la tutan Ministerion de Regenerado.

Ĉe mia teniĝo de aflikta atendo, Tobija sciigis:

— Kiam la alarmklariono sonoras, en la nomo de la Sinjoro, ni devas silentigi la malsuprajn bruojn, por ke la alvoko gravuriĝu en niaj koroj.

Kiam la mistera instrumento ellasis la lastan noton,

ni iris en la grandan parkon, por observi la ĉielon. Treege kortuŝite, mi ekvidis multegon da brilantaj punktoj, kiuj aspektis kvazaŭ malproksimaj lumeroj, ŝvebantaj sur la firmamento.

— Tiu klariono — diris Tobija, ankaŭ emociita — estas uzata de viglantaj Spiritoj, okupantaj altan hierarkian rangon.

Survoje al la Ĉambroj, mia atento estis turnita al grandegaj bruoj el la pli altaj lokoj de la kolonio, kie troviĝis la publikaj vojoj.

Tobija konfidis al Narciza certajn gravajn servojn ĉe la malsanuloj kaj invitis min eliri, por observi la polan moviĝadon.

Veninte al la supraj etaĝoj, de kie ni povus direkti nin al la Placo de la Guberniestrejo, ni ĉie rimarkis intensan moviĝadon. Ĉe mia komprenebla mirego mia kunulo klarigis:

— Ĉi tiuj multopaj grupoj direktiĝas al la Ministerio de Komunikado, celante ricevi sciigojn. La ĵus sonorintan klarionon ni aŭdas nur en tre gravaj okazoj. Ni ĉiuj scias, ke temas pri milito, kaj tiu ministerio eble konigos al ni ian esencan detalon. Observu la pasantojn.

Ĉe nia flanko iris du sinjoroj kaj kvar sinjorinoj en animita konversacio.

— Prezentu al vi — diris unu el la sinjorinoj —, kio al ni okazos en la Ministerio de Helpo. De multe da seninterrompaj monatoj la venado de petoj estas eksterordinara. Estas kompreneble, ke ni tre malfacile plenumas ĉiujn devojn.

— Kaj ni, en la Ministerio de Regenerado? — diris la pli aĝa sinjoro. — La laboro estas multe pli granda. En mia fako la gardado kontraŭ la vibroj el la Ombrejo necesigas senĉesajn klopodojn. Mi jam antaŭsentas, kio venos sur nin...

Tobija delikate ekprenis mian brakon kaj diris:

— Ni paŝu iom pli antaŭen. Ni aŭdu, kion diras aliaj grupoj.

Kiam ni alproksimiĝis al du sinjoroj, mi aŭdis unu el ili demandi:

— Ĉu kredeble tiu malfeliĉego trafos nin ĉiujn?!

La pridemandito, kiu ŝajnis homo kun granda spirita ekvilibro, trankvile respondis:

— Kiel ajn ĝi estas, mi vidas nenian motivaĵon por konfuzo. La sola novaĵo estas ekstra laboro, kio en la fundo estos beno. Ĉio cetera, laŭ mia opinio, estas natura. Malsano instruas sanon, malfeliĉo naskas saĝon. Jam de longe mitralo vipas Ĉinuĵojn, kaj tamen vi ĝis nun elmontris pri tio nenian miregon.

— Sed nun — malkontente kontraŭdiris lia kunulo — ŝajnas, ke mi estos devigita ŝanĝi mian laborprogramon.

Tiu unua ridetis kaj rimarkis:

— Helvecio, Helvecio, ni forgesu “mian programon” kaj ni pensu pri “niaj programoj”.

Ĉe nova gesto de Tobija, kiu petis mian atenton, mi ekobservis tri sinjorinojn, kiuj iris en tiu sama direkto kiel ni, ĉe nia maldekstra flanko, kaj samtempe mi vidis, ke pitoreskaĵoj ja ekzistas ankaŭ tie, en tiu maltrankvila krepusko.

— Ĉi tiu afero min ekstreme impresas — diris la plej juna —, ĉar Everardo ne nun devus reveni de la mondo.

— Sed la milito — diris unu el ŝiaj kunulinoj —, ŝajnas, ne atingos la Iberan Duoninsulon. Portugalujo situacias tre malproksime de la kampo de tiuj okazaĵoj.

— Kial tamen — demandis la tria sinjorino — tia maltrankvilo? Se Everardo ja venus, kio do okazus?

— Mi timas — respondis la junulino —, ke li penus renkonti min kiel edzinon. Mi lin ne povus toleri. Li estas tre malklera, kaj mi neniel submetiĝus al pluaj kruelaĵoj.

— Vi malsaĝa! — rediris ŝia kamaradino. — Ĉu vi forgesis, ke Everardo estus retenita en la Ombrejo aŭ suferus ion pli malbonan?

Tobija, ridetante, klarigis:

— Ŝi timas la liberiĝon de senprudenta kaj perversa edzo.

Post multe da minutoj, dum kiuj ni observadis tiun popolamason, ni venis antaŭ la Ministerion de Komu-

nikado kun ĝiaj grandegaj konstruoj, destinitaj por informaj servoj.

Miloj da estuloj afliktite sin reciproke puŝadis. Ĉiuj volis informojn kaj klarigojn, sed ne ebla estis ia ĝenerala interkonsento. Treege surprizite de tiu kriegado, mi ekvidis, ke iu suriris altan balkonon kaj petas la popolon atenti. Tio estis imponaspekta maljunulo, anoncanta, ke post dek minutoj aŭdiĝos alvoko de la Guberniestro.

— Tio estas la ministro Speridio — informis Tobija, kontentigante mian scivolemon.

Kiam ĉesis la bruado, post kelke da momentoj ek-aŭdiĝis la voĉo de la Guberniestro mem per multnombraj laŭtparoliloj:

— “Fratoj el “Nia Hejmo”, ne fordonu vin al tumultoj de la pensado aŭ de la parolo. Aflikto ne konstruas, angoro nenion solidan starigas. Ni sciu indi la klarionon de la Sinjoro, obeante Lian Dian Volon per silenta laborado sur niaj postenoj.”

Tiu klara kaj flama voĉo de iu, kiu parolas kun aŭtoritato kaj amo, faris drastan efikon sur la amaso. En la nelonga daŭro de unu horo la tuta kolonio revenis al sia kutima sereneco.

XLII

LA PAROLO DE LA GUBERNIESTRO

Por la dimanĉo post tiu sonorado de la klariono la Guberniestro promesis la efektivigon de la evangelia kulto en la Ministerio de Regenerado. La esenca celo de tiu decido, klarigis Narciza, estis la preparado de pli-aj lernejoj por helpantoj en la Ministerio de Helpo kaj sekcioj por ekzercado de novaj servantoj en tiu de Regenerado.

— Ni devas prepari — ŝi diris — iom da homoj por la urĝa hospital servo, kvankam la konflikto eksplodis tiel malproksime, kaj ankaŭ organizi ekzercojn taŭgajn kontraŭ timo.

— Kontraŭ timo?! — mi demandis mirigita.

— Kiel do ne? — ĝentile rediris la flegistino. — Eble, kiel okazas al multaj, vin mirigos ekscii pri la granda nombro da homoj mortigitaj nur de la detruaj vibroj de la teruro, kiu estas tiel infekta kiel ĉiu danĝere disvastiĝanta malsano. Ni rigardas la timon kiel unu el la plej grandaj malamikoj de homo, ĉar ĝi enlokiĝas en la citadelo de la animo, atakante la plej internajn fortojn.

Rimarkinte mian miron, ŝi daŭrigis:

— Ne dubu tion. En la nuna situacio la Guberniestraro konsideras la ekzerciĝadon kontraŭ timo multe pli grava, ol la lecionojn mem pri flegado de malsanuloj. Animtrankvileco estas garantio de sukceso. Vi poste komprenos tiajn postulojn de la laboro.

Nenian argumenton mi trovis, kiu rebatus tiajn asertojn.

En la hieraŭo de la anoncita evento mi havis la

honoron esti unu el la multenombraj servantoj, difinitaj por la purigo kaj natura ornamado de la granda salono, rezervita por la plej alta estro en la kolonio.

Mi tiam prave sopiris tiun tagon. La unuan fojon mi estis vidonta apud mi la noblan direktiston, kiun ĉiuj plej alte estimis. Mi ne estis la sola homo en tia atendo, ĉar tiel same tiam troviĝis multaj el miaj kamaradoj.

Mi havis la impreson, ke la tuta oficistaro de nia ministerio alsvarmis en la grandan naturan salonon, tuj de la aŭroro de dimanĉo, kiam efektivaj karavanoj el ĉiuj departementoj venis al tiu loko. La Granda Ĥoro de la Templo de la Guberniestrejo, aliĝinte al la knaboj-kantistoj el la lernejoj de la Ministerio de Klarigo, komencis la feston per la mirinda himno titolita "Ĉiam kun vi, Sinjoro Jesuo", kiun kantis samtempe du mil voĉoj. Aliaj belegaj melodioj plenigis la spacan. La delikata susurado de la vento, enfluanta per ondoj da parfumo, kvazaŭ respondis la mildajn ariojn.

La eniro en la grandegan verdan ejon estis permesita al ĉiuj servantoj ĉe la Ministerio de Regenerado, ĉar, laŭ la organizita programo, la evangelia kulto celis speciale ilin; la ceterajn ministeriojn reprezentis multenombraj delegitaroj.

La unuan fojon mi havis antaŭ la okuloj kelke da servantoj en la Ministerio de Altigo kaj de Dia Unuigo, kiuj, ŝajnis al mi, portis veston el brilega lumo.

La festo superis ĉion, kion mi povus revii pri beleco kaj ravo. Muzikaj instrumentoj kun ĉarmega vibrado luladis per melodioj la bonodoran pejzaĝon.

Je la deka horo alvenis la Guberniestro, akompanata de la dek du ministroj de Regenerado.

Mi neniam forgesos la majestan kaj imponan figuron de tiu blankhara maljunulo, kies fizionomio laŭŝajne montris samtempe la saĝon de grandaĝulo kaj la energion de junulo, la karaktermildecon de sanktulo kaj la serenecon de konscienca kaj justa administranto. Alta, malgrasa, portante tre blankan tunikon, kun akraj kaj mirinde klaraj okuloj, li apogis sin sur bastono, kvankam li paŝadis tenante sin rekte kiel junulo.

Kontentigante mian scivolon, Salustio informis:

— La Guberniestro ĉiam amis la patriarkan sintenon, konsiderante, ke oni devas administri kun patra amo.

Post kiam li sidigis sur la plej alta tribunon, eklevigis la infanaj voĉoj, akompanataj de karestonaj harpoj, kantante la himnon “Al Vi, Sinjoro, niaj vivoj”.

La energia kaj aminda maljunulo jetis la rigardon ĉirkaŭen sur la densan kunsidantaron el miloj da ĉeestantoj. Tuj poste li malfermis lumantan libron, pri kiu mia kunulo informis min, ke ĝi estas la Evangelio de Nia Sinjoro Jesuo Kristo. Li ĝin atente foliumis kaj tiam malrapide legis:

“Kaj vi aŭdos pri militoj kaj famoj de militoj. Zorgu, ke vi ne maltrankviliĝu; ĉar tio devas okazi; sed ankorau ne estas la fino.” Vortoj de la Majstro laŭ Mateo, ĉap. 24, par. 6.

Kun voĉo multe pli forte sonanta pro la elektraj vibroj, la estro de la urbo kortuŝite preĝis, petante la benojn de la Kristo; poste li salutis la reprezentantojn de la ministerio de Dia Unuigo, Altigo, Klarigo, Komunikado kaj Helpo, kaj, kun aparta atentemo, li sin turnis al ĉiuj, servantaj en nia ministerio.

Ne eble estus priskribi la tonon dolĉan kaj energian, aman kaj konvinkan de tiu neforgesebla voĉo, kaj ankaŭ fiksi sur la homa papero la Diajn komentariojn pri tiu evangelia loko, faritajn kun profunda sento de respekto antaŭ sanktaj aferoj.

Finante, ĉe respekta silento, la Guberniestro direktis apartan parolon al la servantoj en la Ministerio de Regenerado, dirante pli aŭ malpli la jenon:

— Al vi, miaj fratoj, kies laboroj troviĝas plej proksime al tiuj surteraj, mi persone vokas, esperante multe ricevi el via nobla sindonemo. Ni plej alte levu nian gradon da kuraĝo kaj servemeco. Kiam la fortoj de ombro pliigas la malfacilaĵojn en la malsuperaj sferoj, novaj lumoj fariĝas nepre necesaj, por disbati sur la Tero la densan mallumon. Mi dediĉis la hodiaŭan kulton al ĉiuj, kiuj servas en ĉi tiu ministerio, aparte al ili donante la konfidon de mia koro. Mi do en ĉi tiu momento parolas ne al niaj fratoj, kies mensoj jam laboras en pli altaj regionoj de la vivo, sed al tiuj el vi,

kiuj kunportas sur la sandaloj de sia rememorado la signojn de la polvo de la mondo, por reliefigi ilian gigant-an taskon.

“Nia Hejmo” bezonas tridek mil servantojn lertajn en defendado, tridek mil laborantojn, ne pensantajn pri ripozo aŭ personaj oportunaĵoj, dum daŭros nia batalo kontraŭ la elĉeniĝintaj fortoj de krimo kaj malklereco. Taskoj estos por ĉiuj en la regionoj de vibra limo, inter ni kaj la malsuperaj tavoloj, ĉar ni ja ne povas atendi la malamikon en nia spirita loĝejo. En la kolektivaj organizaĵoj estas nepre necese konsideri la preventan medicinon kiel plej precipan rimedon por la antaŭgardo de la interna paco. Ni estas, en “Nia Hejmo”, pli ol unu miliono da estuloj, sin donantaj al la superaj ordonoj kaj al la morala rafinado de si mem. Ĉu estos karitaĵo permesi, ke kelkaj milionoj da tumultemaj Spiritoj invadu nian teritorion? Ni do ne povas heziti pri la defendo de la bono.

“Mi scias, ke multaj el vi en ĉi tiu momento rememoras la Grandan Krucumiton. Vere, Jesuo donis sin mem al la amaso da ribeluloj kaj krimuloj pro amo al la saviĝo de ni ĉiuj, sed li tamen ne fordonis la mondon al malordo kaj disnieniĝo. Ni ĉiuj devas esti pretaj al individua sinofero, sed ni ne povas malfermi nian domon al maliculoj. Sendube nia esenca tasko estas celado al interfratiĝo kaj paco, al amo kaj moderigo de doloroj de suferantoj; kompreneble, ke ni rigardas ĉian malbonon kiel disperdon de energio, kaj ĉian krimon kiel malsanon de la animo; “Nia Hejmo” tamen estas Dia apartenaĵo, kiun ni devas defendi per ĉiuj fortoj de la koro. Kiu ne scias antaŭgardi, tiu ne indas ĝui. Ni do preparu legiojn da laborantoj por mensklarigo kaj konsolado sur la Tero, en la Ombrejo kaj en Mallumo, kiel misiuloj de frata amo; sed ni devas organizi, en ĉi tiu ministerio, antaŭ ĉio ian specialan legion por defendo, kiu garantius niajn spiritajn laborojn ĉe niaj vibraj limoj.”

Tiel li longe paroladis plu, atentigante pri la neceso de fundamentaj disponoj, teksante konsiderojn, kiujn mi neniel povus ĉi tie priskribi. Finante siajn komentariojn, li relegis tiun paragrafon laŭ Mateo; poste li denove pet-

is la benojn de Jesuo kaj la aŭdantojn, ke ĉi tiuj estu fortaj, por ke neniu el ni vane ricevu donojn.

Kortuŝita kaj ravita, mi aŭdis la infanojn kanti la himnon, kiun la ministrino Veneranda titolis “La Granda Jerusalemo”. La Guberniestro malsupreniris de la tribuno sub vibroj de grandega espero; tiam karesanta venteto ekblovis sur la arbojn, kunportante, eble de tre malproksime, petalojn de rozoj aliaj ol niaj, kun mirinde blua koloro, kiuj facile aerdisiĝis ektuŝante niajn fruntojn kaj plenigis niajn korojn per plej intensa ĝojo.

XLIII

INTERPAROLOJ

Kvankam la Guberniestro retiriĝis en sian pli intiman rondon, la Ministerio de Regenerado tamen ankoraŭ zumadis per festaj elmontraj.

Oni interparolis pri la okazaĵoj. Centoj da kamaradoj, respondante al la voko de la granda spirita estro, proponis sin por la malfacilaj laboroj de la defensivo.

Mi iris al Tobija, por demandi lin pri la ebleco de mia kunhelpo, sed la nobla frato ridetis mian naivecon kaj diris:

— Andreo, vi nun apenaŭ komencas la novan laboron. Ne rapidu peti aldonon de pirespondeco. Taskoj estos por ĉiuj, ĵus diris al ni la Guberniestro. Ne forgesu, ke niaj Ĉambroj de Rebonigo estas centroj de aktiva laborado, tage kaj nokte. Ne faru al vi mem afliktojn. Memoru, ke oni kolektos tridek mil servantojn por la konstanta gardado. Sur nia posta flanko estos do multo da vakantaj lokoj por plenigi.

Rimarkinte mian honton, la nobla kamarado, bomhumora, daŭrigis post nelonga paŭzo.

— Kontentiĝu per via enskribiĝo en la lernejon kontraŭ timo. KREDU, ke tio alportos al vi grandegan bonon.

En ĉi tiu momento mi ricevis fortan ĉirkaŭbrakon de Lizio, kiu, ĉe tiu festo, estis unu el la delegitoj de la Ministerio de Helpeco.

Forpermesite de Tobija, mi foriris kune kun Lizio, por ĝui pli intiman konversacion.

— Ĉu vi konas — li demandis — la ĉi tie oficantan ministron Benevenuto, el Regenerado, tiun saman, antaŭhieraaŭ venintan el Pollando?

— Mi ne havas tian plezuron.

— Ni do iru al li — rediris Lizio, envolvante min en la vibroj de sia grandega frata amo. — De longe mi havas la honoron alkalkuli lin al la rondo de miaj personaj amikoj.

Post kelke da momentoj ni troviĝis en la granda verda salono, kie laboradis tiu ministro de Regenerado, kiun mi konis nur vizaĝe.

Multenombraj grupoj da vizitantoj babiladis sub la foliaro de la grandaj arboj. Lizio kondukis min al la plej granda homamaso, en kiu Benevenuto konversaciis kun pluraj amikoj, kaj kun laŭdaj vortoj prezentis min al li. La ministro min ĝentile akceptis kaj plej bonkore permesis, ke mi partoprenu en lia rondo.

La konversacio normale daŭris plu, kaj mi rimarkis, ke oni pridiskutadis la situacion sur la Tero.

— Tre dolora estas la sceno, kiun ni vidis — diris Benevenuto per serioza tono —; kutimiĝinte al la laboro por paco en Ameriko, neniu el ni faris al si ian ideon pri tio, kiaj estos la klopodoj por spirita helpo sur la kampoj de Pollando. Ĉio maluma, ĉio malfacila. Oni tie ne povas esperi lumon el Fido ĉe la atakintoj, tiom pli ĉe la plimulto el la viktimoj, kiuj sin tute fordonas al teruregaj impresoj. La enkarnuloj nin ne helpas, sed nur konsumas niajn fortojn. De kiam mi estas ministro, mi neniam vidis tiajn multopajn suferojn.

— Ĉu la komisiono tie longe restis? — interesite demandis unu el niaj samrondanoj.

— La tutan disponeblan tempon — respondis la ministro. — La estro de la ekspedicio, mia kolego el Helpo, opiniis konsilinde, ke ni nin ankoraŭ okupu nur pri tiu tasko, por fari pluajn observojn kaj pli bone profiti el la travivaĵo. Efektive, la okazo ne povus esti pli favora. Mi pensas, ke ni troviĝas tre malproksime de la eksterordinara rezistemo de la sindonaj spiritaj servantoj, tie deĵorantaj. Ĉiuj servoj de tuja helpo estas perfekte plenumataj, malgraŭ la atmosfero sufokanta, saturita de detruaj vibroj. La batalkampo, nevidebla por niaj surteraj fratoj, estas vera, nepentrebte ampleksa infero.

Neniam, kiel dum milito, la homa spirito elmontras sian staton de defalinta animo, kun trajtoj esence diablaj. Mi vidis inteligentajn kaj klerajn sinjorojn plej detale lokalizi difinitajn kampojn de paca aktiveco por tio, kion ili nomas “rektaj pafoj”. Forte eksplodemaj bomboj dis-pulvorigas pacience starigitajn konstruojn. Kun la venenaj blovaĵoj de la obusoj miksiĝas la haladzo de mal-amo, kiu preskaŭ nebligas ian helpon. Sed nin plej profunde ĉagrenis la kompatinda stato de la agresintoj, kiam iu el ili, devigite de la cirkonstancoj, demetis sian karnan vestaĵon. Plejparte superregataj de mallumaj fortoj, ili sin forpelis de la Spiritoj-misiuloj, nomante ĉi tiujn “fantomoj de la Kruco”.

— Ĉu ili ne estis ie enloĝigataj, por ricevi la necesan klarigon pri sia situacio? — iu el ni intermetis.

Benevenuto faris multesignifan geston kaj respondis:

— La trankvilajn frenezulojn oni ĉiam povas helpi en la hejmo; sed kian alian rimedon oni havas kontraŭ la furiozaj, ol la frenezulejon? Pri tiaj estuloj oni povus fari nenion, krom restigi ilin plu en la abismo de mal-umo, kie ili estos nature devigitaj revirtiĝi, ebligante veni al ili noblajn pensojn. Estas do kompreneble, ke la helpmisiuloj rifuĝigas nur tiujn pretajn ricevi la altan helpon. La viditaj scenoj estis do, pro multaj motivoj, treege doloraj.

Profitante nelongan interrompon, alia amiko diris:

— Estas preskaŭ nekredeble, ke Eŭropo, kun tiom da kulturaj riĉaĵoj, kuraĝis fari tian ruinigan paŝon.

— Tion naskas manko de religia preparado, miaj amikoj — klarigis la ministro per esprimoplena tono. — Al homo ne sufiĉas kulturita intelekto, sed estas necese lumigi al si la menson por la vivo eterna. La eklezioj estas ĉiam sanktaj pri siaj fundamentoj, kaj la pastreco estas ĉiam dia, nur se la pastroj zorgas esence pri la Vero de Dio; pastreco politika neniam kvietigos la spiritan soifon de la civilizacio. Sen la Dia blovo la religiaj institucioj povas inspiri respekton kaj admiron, sed ne kredon kaj konfidon.

— Sed, Spiritismo? — subite demandis unu el la

ĉeestantoj. — Ĉu antaŭ pli ol kvindek jaroj (*) ne ekaperis en Ameriko kaj en Eŭropo la unuaj doktrinaj burĝonoj? Ĉu tiu nova movado ne servas ĉiam ankoraŭ al la eternaj veraĵoj?

Benevenuto ridetis, faris tre signifan geston kaj respondis:

— Spiritismo estas nia granda espero kaj laŭrajte la Konsolanto de la enkarna homaro; tamen nia irado estas ankoraŭ tre malrapida. Ĝi estas Dia dono, pri kiu la plimulto el la homoj ne havas “okulojn por vidi”. Grandega nombro de la novuloj venas al tiu Dia fonto, sed refaras la malbonaĵojn de siaj antaŭaj religioj. Ili volas ĉerpi profitojn, sed ne volontiĝas ion ajn doni el si mem. Ili alvokas la veron, sed ne iras renkonte al ĝi. De unu flanko, multaj, studentaj tiujn fenomenojn, faras el la medioj simplajn homajn kobajojn, kaj de la dua flanko multaj kredantoj kondutas simile al iaj malsanuloj, kiuj, kvankam jam resaniĝintaj, prefere kredas la malsanon, ol la sanon, kaj neniam uzas siajn proprajn piedojn. Unuvorte, oni sur la Tero elserĉas materiigintajn Spiritojn por la nedaŭra fenomenismo, dum ni ĉi tieaj konstante elserĉas spiritiĝintajn homojn por serioza laboro.

Ĉi tiu vortludo elvokis esprimojn de ĝenerala bomhumoro, kaj la ministro gravamiene aldonis:

— Niaj taskoj estas astronomie grandegaj. Ni tamen ne forgesu, ke ĉiu homo estas embrio de dio. Ni ekplenumu niajn devojn kun espero kaj optimismo, kaj ni estu ĉiam konvinkitaj, ke, se ni bone faros tion, kio nin koncernas, ni povos esti trankvilaj, ĉar la Sinjoro zorgos pri la cetero.

(*) Ĉi tiu interparolo okazis en 1939. La unuaj spiri-
tismaj fenomenoj en Usono fariĝis en la 31-a de Marto 1848;
la unua filozofia verko pri Spiritismo, nome “La Libro de la
Spiritoj”, de Allan Kardec, aperis la 18-an de Aprilo 1857.
Sekve, en 1939 estis forpasintaj 91 kaj 82 jaroj post la apero
de Spiritismo, respektive en Ameriko kaj en Eŭropo. Kaj
nun, kiam mi faras ĉi tiun tradukon, la mondo jam solene
festis la unuan centjaron de ambaŭ aperoj. — *La Trad.*

XLIV

LA MALLUMO

Por nia pli granda ĝojo en tiu kunestado, Lizio konigis al mi novajn flankojn de sia kulturo kaj sentemeco. Majstre vibrigante la kordojn de sia citro, li rememorigis al ni malnovajn kanzonojn kaj ariojn de la Tero.

Vere mirinda tago! Spiritaj ĉarmaĵoj sekvis unu alian, kvazaŭ ni troviĝus en la paradizo mem.

Kiam mi ektroviĝis duope kun la bonkora flegisto, servanta en la Ministerio de Helpo, mi konigis al li miajn impresojn de raviteco.

— Ne dubu tion — li diris, ridetante —; kiam ni estas kune kun iu, kiun ni amas, okazas en nia interno io konsola kaj konstrua. Ĝi estas tiu nia nutraĵo, la amo, Andreo. Kiam multe da animoj kolektiĝas en la rondo de tiu aŭ tiu aktiveco, iliaj pensoj interplektiĝas, formante centrojn de vivanta fonto, en kiuj ĉiu ricevas el la ĝenerala vibrado sian porcion da ĝojo aŭ sufero. Tial, sur la Tero, la demando pri la medio estas ĉiam konsiderinda faktoro sur la vojo de ĉiu homo. Ĉiu kreito vivas el tio, kion li kulturas. Kiu ĉiutage sin allasas al malĝojo, tiu en ĝi implikiĝas; kiu tro reliefiĝas malsanon, tiu suferas ĝian malutilon.

Rimarkinte mian miron, li finis:

— En tio ekzistas nenia mistero. Ĝi estas leĝo de la vivo, kiel pri la klopodoj de bono, tiel ankaŭ pri la manovroj de malbono. El la kunvenoj de frateco, espero, amo kaj ĝojo, ni eliras kun frateco, espero, amo kaj ĝojo de ĉiuj; sed el ĉiu kolektiĝo kun malnoblaj inklinoj, kie regas egoismo, vantamo aŭ krimo, ni eliras venenitaj de la detruaj vibroj de tiuj sentoj.

— Vi ja estas prava — mi diris, kortuŝita —; en tio mi vidas ankaŭ la principojn, kiuj regas la vivon en la homaj hejmoj. Kiam ekzistas reciproka kompreno, ni vivas ĉe la sojlo de la ĉiela feliĉo, sed se ni obstinas en malkompreno kaj malico, ni brulas en vivanta infero.

Li faris bonhumoran mienon kaj, ridetante, jesis.

Mi tiam decidiĝis demandi lin pri unu afero, kiu jam de kelke da horoj premokupis mian menson. Dum sia parolado al ni la Guberniestro aludis pri la Tero, la Ombrejo kaj la Mallumo, sed, sincere dirite, mi ĝis tiam neniam aŭdis pri ĉi tiu lasta tavolo. Ĉu “malluma regiono” ja ne estas la Ombrejo mem, kie mi mem dum tutaj jaroj vivadis en plej nigra nokto? Ĉu mi konstante ne vidis multe da menskonfuzitoj kaj da ĉiaspecaj malsanuloj, venintaj el la regionoj de la Ombrejo? Rememorante, ke Lizio donis al mi tiel altvalorajn klarigojn pri mia propra situacio, en la komenco de mia provado en “Nia Hejmo”, mi konfidis al li miajn dubojn, malkaŝante al li la perpleksecon, en kiu mi troviĝis.

Li faris tre signifan mienon kaj diris:

— Ni nomas “Mallumo” la plej malaltajn regionojn, kiajn ni konas. Konsideru la homojn kiel vojirantojn de la vivo. Iaj malmultaj paŝas firme, kun rigardo fiksita al la esenca celo de la irado: tiuj estas la noblegaj Spiritoj, kiuj, eltrovinte en si mem la Dian esencon, senhezite marŝas al la superega celo. Sed la plimulto senmove staradas: tiuj estas multego da animoj, kiuj tutajn jarcentojn treniĝas, referante ĉiam samajn provojn. La unuaj iras laŭ rektaj linioj; la lastaj sin movas laŭ grandaj kurboj, kaj tiel, referante paŝojn kaj penojn, ili estas elmetitaj al la kaprico de multenombraj sortovicoj. Multaj ofte perdiĝas meze en la arbaro de la vivo, implikite en la labirinto, kiun ili konstruas por siaj propraj piedoj. Al tiu klaso apartenas milionoj da estuloj, vagantaj en la Ombrejo. Aliaj, preferante iradi en mallumo, pro la ilin absorbanta zorgado pri sia “mem”, ofte falas en abismojn, sur kies fundo ili kuŝas tra nedifinita tempo. Ĉu vi komprenis?

Ĉi tiu klarigo ne povus esti pli trafa. Emociite de

la amplekso kaj malsimpleco de la temo, mi tamen demandis:

— Sed, kiel ŝajnas al vi tiaj faloj? Ĉu ili okazas sole nur sur la Tero? Nur enkarnuloj povas fali en profundegaĵon?

Lizio enpensiĝis unu minuton kaj respondis:

— Via rimarko estas ĝusta. Ĉie ajn iu Spirito povas alfundiĝi en la marĉojn de malbono; mi tamen aldonu, ke en la superaj sferoj la kapableco de sindefendo estas pli granda kaj tial ĉia kulpo estas rigardata kiel multe pli grava.

— Al mi tamen — mi rediris — falo ĉiam ŝajnis ne ebla en regionoj nekomunaj al la surtera korpo. La Dia medio, la konado de vero, la supera helpo aspektis al mi kvazaŭ rimedoj, nepre efikantaj kontraŭ la veneno de vantamo kaj tento.

Mia amiko ridetis kaj klarigis:

— La demando pri la tento estas pli kompleksa. Ĉie sur la tergloba estas plene da Dia atmosfero, konado de vero kaj supera helpo. Ne malmultaj tie partoprenas en disruinigaj bataloj inter protektantaj arboj kaj sur florantaj kampoj; multaj murdas en la lunlumo, nesentemaj por la altega inspirado de la steloj; aliaj ekspluatas pli malfortajn, aŭdante profundan revelacion de la supera vero. Sur la Tero ja ne mankas bildoj kaj esprim-oj esence Diaj.

Ĉi tiuj vortoj de la flegisto penetris al mi profunde en la spiriton. Efektive, la militistoj pli volonte sin donas al detruado ordinare en printempo kaj en somero, kiam la Naturo sternas sur la tero kaj firmamento mirindaĵojn el koloro, parfumo kaj lumo; oni rabas kaj murdas prefere nokte, kiam la luno kaj steloj dronigas la Teron en Dian poezion. La plej multaj turmentistoj de la homaro estas treege kleraj homoj, kiuj forpuŝas de si la Dian inspiron. Revenante al mia ideo pri la spirita falo, mi ankoraŭ demandis:

— Tamen, Lizio, ĉu vi povus iel sciigi min, kie situacias tiu “Mallumo”? Se la Ombrejo intime rilatas kun la homa menso, kie do kuŝas tia loko de suferado kaj teruro?

— Ĉie ekzistas vivosferoj — li ĝentile respondis —; la vakuo neniel povas esti io alia, ol simpla literatura figuro (*). En ĉio troviĝas vivantaj fortoj, kaj ĉiu speco de estaĵoj agas en iu difinita regiono de la vivo.

Post nelonga halto, en kiu li, laŭŝajne, profunde meditis, li daŭrigis:

— Kompreneble, kiel okazis al ni ĉi-tieaj, vi rigardis kiel regionon kun iaj ekzistaĵoj post la morto de la korpo nur tiujn, kiuj etendiĝas de la Tero supren, forgesinte la malsuprajn tavolojn. La vivo tamen pulsas en la profundaĵoj de la maroj kaj en la internaĵoj de la Tero. Krom tio, al principoj pri gravito obeas la Spirito, simile kiel la materiaj korpoj. La Tero ne estas simpla kampo, kiun ni povas vundi aŭ malŝati laŭ nia propra arbitro; ĝi estas vivanta organizaĵo, havanta difinitajn leĝojn, kiuj nin sklavigas aŭ liberigas laŭ niaj faroj. Evidente, animo ŝarĝita de kulpoj ne povas leviĝi sur la supraĵon de la mirinda lago de la vivo. Resume, mi rememorigu, ke la birdoj liberaj de malhelpoj flugas al la altoj; tiuj, kiuj implikiĝas en arbitraĵo, sentas siajn flugilojn paralizitaj; kaj tiuj, kiuj sin katenas al granda pezo, estas nenio alia, ol sklavoj de la nekonataĵo. Ĉu vi komprenis?

Ĉi tiu demando de Lizio estis ja superflua. Mi tuj prezentis al mi la grandegan bildon de purigaj luktoj, kiu pentriĝis antaŭ miaj spiritaj okuloj en la plej malaltaj regionoj de la vivo.

Kiel ĉiu, devanta multe mediti por paroli, mia kompaniulo pensis, pensis, kaj finis:

— Kiel ni portas en nia interno du naturojn: la superan kaj la malsuperan, tiel ankaŭ la Tero havas en si manifestaĵojn altajn kaj malaltajn, per kiuj ĝi punkorektas kulpulon aŭ malfermas al venkinto la pordon en la vivon eternan. Kiel iama kuracisto surtera, vi ja scias, ke en la homa cerbo sin trovas elementoj, kiuj kontrolas ĝian direktosenson; sed nun vi konstatis, ke

(*) Vd. Similan aserton en "La Libro de la Spiritoj", § 36, p. 69. — *La Trad.*

tiuj elementoj estas, en sia esenco, ĝustadire ne fizikaj, sed spiritaj. Kiu amas vivi nur en ombro, tiu malakrigas la Dian senson pri direkto. Ne estus do mirige, ke tia homo falas en la Mallumon, ĉar abismo abismon altiras, kaj ĉiu ja venos al tiu loko, kien li direktas mem siajn paŝojn.

XLV

SUR LA KAMPO DE MUZIKO

Ĉe vesperkrepusko Lizio invitis min akompani lin al la Kampe de Muziko.

— Vi devas iom distriĝi, Andreo ! — li ĝentile diris.

Vidante min hezilita, li insistis:

— Mi parolos al Tobija. Narciza mem destinis la hodiaŭan tagon por ripozo. Ni iru do!

Mi tamen rimarkis en mi mem strangan fenomenon. Kvankam mi tie laboradis nur de nemultaj tagoj, mi jam forte amis tiujn Ĉambrojn. La ĉiutagaj vizitoj de la ministro Genezio, la kompanio de Narciza, la inspirado de Tobija, la amika societo de miaj kamaradoj, ĉio ĉi en aparta maniero tuŝis mian spiriton. Narciza, Salustio kaj mi, ni uzadis ĉiujn liberajn momentojn, por ĉi tie kaj tie plibonigi la internon de tiu fako, mildigante la situacion de la malsanuloj, kiujn ni amis el la tuta koro, kvazaŭ niajn filojn. Ĉe tiu nova cirkonstanco mi iris al Tobija, al kiu la flegisto, oficianta en la Ministerio de Helpe, sin turnis kun respekta intimo. Ricevinte lian peton, tiu, kiu kondukis min en la tiean laboradon, ĝoje konsentis:

— Bonega programo! Andreo devas ja ekkoni la Kampon de Muziko.

Kaj, ĉirkaŭbrakante min:

— Ne hezitu. Uzu la okazon! Revenu nokte, en ĉia ajn tempo. Ĉiuj niaj servoj estas jam konvene prizorgitaj.

Mi danke akompanis Lizion. Veninte en lian hejmon, ĉe la Ministerio de Helpe, mi havis la plezuron revidi sinjorinon Laŭra kaj ekscii pri la reveno de la sindon-

ema patrino de Eloiza de la Tero, en la plej proksima semajno. La domo estis plena de ĝojo. Estis pli bele en la hejma interno, novaj aranĝoj en la ĝardeno.

Ĉe nia adiaŭo la mastrino ĉirkaŭbrakis min kaj bonhumore parolis:

— Nu, de hodiaŭ la urbo havos do ankoraŭ unu vizitanton de la kampo de Muziko. Atentu, ke la koro ne enretiĝu! Mi, mi hodiaŭ ankoraŭ restos hejme. Sed tre baldaŭ mi venĝos al vi ĉiuj! Mi ne prokrastos serĉi mian nutraĵon sur la Tero!

Meze en ĝenerala ĝojo ni eliris sur la straton. La junulinojn akompanis Polidoro kaj Estacio, kun kiuj ili vigle konversaciis. Tuj kiam ni eliĝis el la aerobuso sur unu el la placoj ĉe la Ministerio de Altigo, Lizio, apud mi, diris kortuŝita:

— Jen vi nun konatiĝos kun mia fianĉino, al kiu mi jam multajn fojojn parolis pri vi.

— Estas kurioze — mi kun mirego rimarkis —, ke ni ankaŭ ĉi tie vidas gefianĉojn...

— Kial do ne? Ĉu rafinita amo vivas en la korpo mortema aŭ en la animo eterna? Tie, sur la Tero, mia kara, amo estas ia oro sufokita meze inter krudaj ŝtonoj. La homoj ĝin tiel miksas kun la bezonoj, la deziroj kaj la malsuperaj inklinoj, ke oni malofte diferencigas inter la gango kaj la nobla metalo.

Ĉi tiu rimarko estis logika. Konstatinte la bonan efikon de sia klarigo, li daŭrigis:

— Fianĉeco estas multe pli bela en la spirita mondo. Nenia iluzio-vualo malklarigas al ni la rigardon. Ni estas tiaj, kiaj ni ja estas. Lascinia kaj mi, ni jam multajn fojojn fiaskis ĉe la materiaj provoj. Mi devas konfesi, ke preskaŭ ĉiuj tiaj malsukcesoj en la pasinteco originis de mia neantaŭzorgemo kaj absoluta manko de memregeco. La liberecon, kiun la surteraj sociaj leĝoj konsentas al la virsekso, ni viroj ankoraŭ ne ĝuste ĝin komprenis. Tre malmultaj el ni ĝin uzas en la mondo, por doni al la amo spiritan karakteron; la plej multaj faras el tia libereco rulfalejon en bestecon. La virinoj, kontraŭe, ĝis nun havis por si la plej severan disciplinon: dum la surtera nedaŭra ekzistado, ili suferas nian tiranecon

kaj elportas la ŝarĝon de niaj altrudoj; sed ĉi tie fariĝas reĝustiĝo de valoroj. Vere libera estas nur tia homo, kiu lernas obei. Tio ŝajnas paradokso, tamen ĝi esprimas veron.

— Sed — mi demandis —, ĉu vi havas ian planon por la nova enkarniĝo?

— Ne povus ja esti alie — li tuj respondis. — Mi bezonas pliriĉigi mian trezoron da spertoj, kaj, krom tio, miaj ŝuldoj al la Tero estas ankoraŭ grandegaj. Lascinia kaj mi baldaŭ fondos ĉi tie nian feliĉodomon, ĉar ni pensas, ke ni reiros sur la Teron ĝuste post tridek jaroj de hodiaŭ.

Ni dume atingis la ĉirkaŭaĵon de la Kampo de Muziko. Nepriskribeble ravantaj lumoj superverŝis vastan parkon, kie montriĝis ĉarmajoj de vera mirrakonto. Lumantaj fontanoj pentris miregigajn bildojn; tio estis spektaklo tute nova por mi.

Antaŭ ol mi povis esprimi mian profundan miron, Lizio bonhumore rekomendis:

— Lascinia ĉiam prenas kun si du fratinojn, pri kiuj mi esperas, ke vi ilin honore akompanos kiel kavaliro.

— Sed, Lizio... — mi hezite murmuris, konsiderante mian iaman edzecon —, vi ja komprenas, ke mi estas alligita al Zelia...

La amika flegisto tiam eksplodis per rido kaj rediris:

— Jen, kio mankis! Neniu intencas vundi viajn sentojn pri fideleco. Mi tamen ne pensas, ke edzece nepre kuntrenas forgeson je la socia vivo. Ĉu vi do, Andreo, jam ne scias esti ies frato?

Mi ridis konfuzita kaj nenion povis kontraŭmeti.

En tiu momento ni venis antaŭ la enirejon, kie Lizio ĝentile pagis nian enlason.

En tiu sama loko mi ekvidis grandan aron da promenantoj ĉirkaŭ gracia paviloneto, kie orkestro el nemultaj ludantoj faris amuzan muzikon. Vojoj, borderitaj de floroj, antaŭ ni, kondukis en la internon de la parko en pluraj direktoj. Rimarkinte mian miron ĉe la aŭdataj kantoj, mia kompaniulo klarigis:

— Ĉe la ekstretoj de la Kampo oni ludas tiajn muzikaĵojn, kiuj alkonformiĝas al la propra gusto de ĉiu

grupo de tiuj personoj, ankoraŭ ne povosciantaj kompreni la altegan arton; sed en ĝia centro oni ĝuas la universan, dian muzikon, la arton kvazaŭ sanktigitan, laŭ ĝia esenco mem.

Efektive, post kiam ni trapaŝis ridetantajn aleojn, kie ĉiu floro ŝajne havis sian apartan reĝejon, mi ekaŭdis mirindan melodion, kiu plenigis la spacon. Sur la Tero nur malmultaj ŝatas la elektitan muzikon, dum multegaj plezuras ĉe la muziko regiona. Ĉi tie okazis inverse: la centro de la kampo estis plene okupita. Mi antaŭe vidis multenombrajn homamasojn en la kolonio, mi estis ravita de tiu kunveno, per kiu nia ministerio honoris la Guberniestron, sed tio, kion mi nun vidis, superbrilis ĉion, kio min ĝis tiam miregigis.

La elito de “Nia Hejmo” prezentis sin majeste.

Ne lukso nek ia superabundeco havigis tiom da brilo al tiu ĉarmega bildo, sed la natura manifestiĝo de ĉio, simpleco kune kun beleco, arto pura, vivo sen artifikoj. En tiu pejzaĝo estis reprezentita la bela sekso, montranta rafinitan guston sen superflujaj ornamoj kaj ne dekliniĝante de la Dia simpleco. Grandaj arboj, malsamaj ol tiuj surteraj, garnis belajn prilumitajn ejojn, invitantajn al eniro.

Ne nur la multaj geamantoj longe promenis sur la floraj vojoj; grupoj da sinjorinoj kaj sinjoroj distriĝis per animita konversacio, profita kaj edifa. Kvankam sentante min sincere humiligita pro mia propra nenieco antaŭ tiu plej elektita societo, mi tamen perceptis silentan esprimon de simpatio en la rigardo de ĉiu, kiu min renkontis okulo al okulo. Mi aŭdadis unuopajn frazojn rilate al la rondoj de la karno, tamen en neniu interparolo mi rimarkis eĉ la plej malgrandan ombbron da pikemo aŭ akuzo kontraŭ la homoj. Oni diskutadis pri amo, intelekta kulturo, scienca esplorado, edifa filozofio, sed ĉiuj konsideroj celis la altan sferon de reciproka helpo, sen ia malkonsento inter la opinioj. Mi rimarkis, ke tie la pli kleraj limigas la vibradon de sia intelekta povo, dum la malpli instruitaj kiom nur eble streĉas sian komprenkapablon, por sorbi la donojn de la supera konado. Ĉe multaj konversacioj mi aŭdis pri Jesuo kaj la

Evangelio, tamen kio min plej forte impresis, tio estis la gajeco en ĉiuj rondoj. Neniu rememoris la Majstron kun la negativaj vibroj de la senutila malĝojo aŭ de la nepravigebla senkuraĝeco. Antaŭ la menso de ĉiuj Jesuo sin prezentis kiel la superega direktanto de la surteraj organizaĵoj, same videblaj kiel nevideblaj, plena de komprenemo kaj boneco, sed ankaŭ konscianta la energion kaj viklecon necesajn al la gardado de ordo kaj justeco.

Tiu optimista societo min ravis. Antaŭ miaj okuloj troviĝis realigitaj la esperoj de multaj vere noblaj pensuloj sur la Tero.

Forte ravite de tiu ĉarmega muzikaĵo, mi aŭdis Lizion diri:

— Niaj direktantoj, en reciproka harmonio, sorbas el pli altaj tavoloj radiojn da inspiro; la grandaj surteraj komponistoj iafoje estas kondukataj en sferojn, kiel la nia, kie ili ricevas kelke da melodiaĵoj; ĉi tiujn ili siavice transaŭdigas al la homaj oreloj, ornamente la ricevitaĵajn temojn per sia propra genio. La Universo, Andreo, svarmas per belaĵoj kaj ĉarmoj. La brilega torĉo eterna de la vivo havas sian originon ĉe Dio.

Sed la flegisto ne povis daŭrigi nian konversacion. Gracia grupo nin ja renkontis. Lascinia kaj ŝiaj fratinoj estis alvenintaj, kaj ni devis do observi la ŝuldojn de la frateco.

SINOFERO DE VIRINO

Unu jaro pasis en laboroj konstruaj por mia animo, kio min treege ĝojigis. Mi ja lernis esti utila, mi trovis la plezuron de servado, kaj tial mi sentis ĉiam kreskantan ĝojon kaj memfidon.

Ĝis tiam mi ne revenis al mia surtera hejmo, malgraŭ la grandega deziro, kiu ŝiradis al mi la koron. Ifoje mi ekpensis peti favoran konsenton pri tio, sed io min retenis. Ĉu mi ja iam ne ricevis konvenan helpon, ĉu mi tie ne ĝuadis la kareson kaj estimon de ĉiuj kamaradoj? Mi do konfesis al mi, ke, se tio donus ian profiton, mi jam de longe estus kondukita en mian antaŭan hejmon. Mi tial devis atendi la ordonvorton. Krom tio, kvankam mi plue laboradis ĉe la Ministerio de Regenerado, la ministro Klarenco ankoraŭ havis sur si la respondecon por mia restado en la kolonio. Sinjorino Laŭra kaj eĉ Tobija mem ĉiam rememorigadis al mi ĉi tion. Mi pluajn fojojn troviĝis antaŭ la nobla ministro de Helpo, kaj tamen li prisilentis tiun aferon. Cetere Klarenco neniam ŝanĝis sian sindetenemon en la plenumo de la devoj, koncernantaj lian aŭtoritaton. Nur ĉe Kristnasko, kiam mi ĉeestis la festojn de la Ministerio de Altigo, li apenaŭ tuŝis la aferon, rimarkinte mian kaŝitan resopiron je la edzino kaj infanoj. Li parolis pri la plezuroj en tiu vespero kaj asertis, ke ne malproksima estas la tago, kiam li iros kune kun mi al mia familia nesto. Mi lin kortuŝite dankis kaj esperplene ekatendis tiun okazon, sed estis jam Septembro 1940, kaj mi ne vidis la realigon de tiu deziro.

Min tamen konsolis la certeco, ke mi plenigis mian tutan tempon ĉe la Ĉambroj de Rebonigo per utila servado. Mi ne estis ripozinta. Niaj taskoj daŭradis ĉiam plu, sen interrompo de la kontinueco.

Mi jam kutimiĝis prizorgi la malsanulojn, signifoklarigi al mi iliajn pensojn. Mi neniam forlasis la kompatindan Elizan, nerekte kondukante ŝin al pli efikaj provoj.

Sed, laŭmezure kiel firmiĝis mia emocia ekvilibro, pliintensiĝis la sopirego revidi miajn karajn.

La respiro profunde doloris, tamen, por kompenso pro mia sufero, iam kaj iam min vizitadis mia patrino, kiu min neniam forlasis al mia propra sorto, kvankam ŝi loĝis en pli altaj regionoj.

La lastan fojon, kiam ni intervidiĝis, ŝi diris al mi, ke ŝi intencas sciigi min pri iaj novaj projektoj. Tiu patrina sinteno de dolĉa rezignacio, ĉe la moralaj suferoj, kiuj vundis ŝian senteman animon, min profunde kortuŝis. Kiajn novajn decidojn ŝi estis farinta? Scivola mi atendis ŝian viziton, ardante de la deziro ekkoni ŝiajn planojn.

Efektive, en la komenco de Septembro 1940 mia patrino venis al la ĉambroj kaj post karesa saluto sciigis min pri sia decido reveni sur la Teron. Per ama tono ŝi elvolvis sian projekton. Surprizite kaj indignante pro tia decido, mi protestis:

— Mi ne konsentas. Ĉu vi returne en la karnon? Kial? Ĉu vi denove sur la malluma vojo, sen ia tuja bezono?

Vidigante noblan mienon de sereneco, mia patrino saĝe rimarkis:

— Ĉu vi ne pensas pri la angora stato de via patro, mia filo? Jam de multe da jaroj mi klopodas por lin relevi, sed tute vane. Laerto estas hodiaŭ skeptikulo kun venenita koro. Li ne povus resti plu en tia stato, ĉar li englitiĝis en pli profundajn abismojn. Kion do fari, Andreo? Ĉu revidante lin en tia situacio, vi rifuzus doni al li la necesan helpon?

— Ne — mi repondis, impresita de ŝiaj vortoj —; mi penus lin helpi; vi tamen povus oferi al li vian manon ankaŭ de ĉi tie.

— Mi tion ne dubas; tamen la Spiritoj, vere amantaj, ne limigas sin per tio, ke ili etendus la manojn nur de malproksime. Kion utilis al ni la tuta materiala riĉeco, se ni ne povus ĝin dividi kun niaj amatoj? Ĉu ni povus loĝi en palaco, forlasinte niajn infanojn senŝirme dum malbona vetero? Mi ne povas restadi malproksime. Ĉar mi povas kalkuli je vi ĉi tie, mi alkolektiĝos al Ludovika por helpi vian patron iri la ĝustan vojon.

Mi longe enpensiĝis kaj rediris:

— Mi tamen insistus ĉe vi. Ĉu nenia rimedo ekzistas, por antaŭliberigi vin de tia ofero?

— Ne, ne eble. Ĉi tiun aferon mi plej detale esploris. Miaj hierarkiaj superuloj konsentis, ke tio estas konsilinda. Mi ne povas konduki la malsuperan al la supera, sed la malon mi povas fari. Kio do al mi restas krom tio? Mi ne devas heziti eĉ unu minuton. Mi havas en vi la apogon de la estonteco. Ne dekliniĝu do de la vojo, mia filo, kaj helpu vian patrinon, kiam vi povos trairi la sferojn, kiuj nin disigas de la terkrusto. Dume zorgu pri viaj fratinoj, kiuj eble ankoraŭ sin trovas en la mallumo de la Ombrejo, purigante sin de kulpoj. Post nemultaj tagoj mi estos denove en la mondo, kie mi renkontiĝos kun Laerto por la servoj, kiujn la Patro al ni konfidos.

— Sed — mi demandis —, kiel li renkontiĝas kun vi? Ĉu spirite?

— Ne — diris mia patrino kun multesignifa miena esprimo. — Per la helpo de kelkaj amikoj mi en la pasinta semajno lokis lin ie sur la Tero; ni preparis lian tujan reenkarniĝon sen lia rimarko pri nia rekta helpo. Li ekdeziris fortiri sin de tiuj virinoj, kiuj lin ankoraŭ, eble prave, subjugigas, kaj ni profitis tiun pretecon, por kateni lin al la nova enkarniĝo.

— Sed, ĉu tio estas farebla? Kaj la individua libereco?

Mia patrino iom malgaja ridetis kaj saĝe respondis:

— Iuj reenkarniĝoj agas simile al drastaĵoj. Eĉ se la malsanulo ne sentas en si sufiĉan kuraĝon, amikoj tamen helpas lin gluti la savontan, kvankam maldolĉan medikamenton. Koncerne senliman liberecon, iu animo

povas pretendi tian rajton nur tiam, kiam ĝi komprenas kaj plenumas siajn devojn. Cetere ni nepre konfesu al ni, ke ĉia ŝuldanto estas sklavo al sia ŝuldo (*). Dio kreis la liberan volon; ni kreas la fatalon. Estas do necese rompi la katenojn, kiujn ni forĝas al ni mem.

Dum mi vagadis meze inter gravaj pensoj, ŝi parolis plu, repreninte siajn antaŭajn rimarkojn:

— Tiuj malfeliĉaj fratinoj, lin persekutantaj, lin tamen ne forlasas, kaj, se ne estus la Dia Protekto, pere de niaj spiritaj Gvidantoj, eble ili deklinus de li la oportunan okazon de tiu nova reenkarriĝo.

— Dio mia! — mi ekkriis. — Ĉu do tio estas farbla? Ĉu ĝis tia grado ni troviĝas sub la kaprico de malbono? Simplaj marionetoj en la manoj de malamikoj?!

— Tiaj demandoj, mia filo — tre trankvile klarigis mia patrino — devas ŝvebi super nia koro kaj niaj lipoj, antaŭ ol ni ŝarĝos nin per ia ajn ŝuldo kaj antaŭ ol ni turnos fratojn en malamikojn por nia propra vojo. Ne prenu prunte de la malico...

— Kaj tiuj virinoj? — mi demandis. — Kio fariĝos el tiuj malfeliĉulinoj?

Mia patrino ridetis kaj respondis:

— Ili estos miaj filinoj post kelke da jaroj de nun. Vi ne forgesu, ke mi iros en la mondon helpe al via patro. Neniu helpas efike, farante pli potencaj la kontraŭajn fortojn, same kiel, sur la Tero, oni ne povas estingi fajron per petrolo. Estas nepre necese ami, Andreo! La nekredantoj perdas la veran direkton kaj ektravagas tra dezerto; la erarantoj dekliniĝas de la vojo kaj dronas en marĉo. Via patro estas hodiaŭ skeptikulo, kaj tiuj kompatindaj fratinoj portas sur si pezajn ŝarĝojn en la ŝlimo de malklereco kaj iluzio. Post ne malproksima tempo mi ĉiun el ili ricevos en mian patrinan ventron, efektivigante mian novan provadon.

Kaj, kun okuloj brilantaj kaj malsekaj de larmoj, kvazaŭ celante la rigardon en estontan horizonton, ŝi finis:

(*) Vd. ĉe Johano, 8:34. — *La Trad.*

— Poste ... Kiu scias? Mi eble revenos al “Nia Hejmo”, ĉirkaŭite de aliaj sanktaj amoj, por granda festo de ĝojo, amo kaj kuniĝo ...

Vidante ŝian resignacion, mi genuiĝis kaj kisis al ŝi la manojn.

De post tiu momento mia patrino ne estis sole nur mia patrino, sed multe pli ol tio. Ŝi estis la senditino de la helpo, povoscianta transformi ekzekutistojn en infanojn de ŝia koro, por ke ili reprenu la vojon de la infanoj de Dio.

XLVII

LA REENKARNIĜO DE LAŬRA

Ne sole mia patrino sin preparis por reveni al al Tero; ankaŭ sinjorino Laŭra jam staris kun unu piedo sur la granda vojo. Avizite de kelkaj kamaradoj, mi aliĝis al la demonstracio de simpatio kaj estimo, kiun pluraj oficistoj, precipe el la Ministerioj de Helpo kaj Regenerado, estis farontaj al la nobla matrono, por ŝia reveno al la homaj provoj. Tiu amika honorado efektiviĝis en la vespero, en kiu la Departemento de Kontoj donis en ŝiajn manojn la kalkulon pri la tuta tempo, kiun ŝi servadis en la kolonio.

Ne eble estas per la ordinaraj literoj esprimi la spiritan signifon de tiu intima festo.

La ĉarman loĝejon plenigis melodioj kaj lumoj. La floroj ŝajnis pli belaj.

Multenombraj familioj venis saluti la baldaŭ forirontan amikinson. La plej multaj vizitantoj ŝin afable salutis kaj sen pliaj vortoj foriris, sed la pli intimaj amikoj tie restis ĝis malfrue en la nokto. Mi havis tial okazon aŭdi kuriozajn kaj saĝajn rimarkojn.

Sinjorino Laŭra ŝajnis al mi pli gravaspekta, pli serioza. Oni rimarkis ŝian penadon akompani la fluon de la ĝenerala optimismo. En la konversaciejo plena de gastoj la patrino de Lizio diris al la reprezentanto de tiu Departemento:

— Mi supozas, ke mi ĉi tie ne plu restos pli ol du tagojn. Finiĝis la laboroj en la Sekcio de Preparado, de la Ministerio de Klarigo ...

Kaj kun iom malgaja rigardo ŝi finis:

— Kiel vi vidas, mi estas preta.

Ŝia kunparolanto prenis mienon de sincera frateco kaj rediris, stimolante ŝin:

— Mi tamen esperas, ke vi estas plena de entuziasmo por la batalado. Estas gloro iri en la mondon, kiel vi iras; multmiloj da horoj da servado parolas por vi antaŭ kolektivo de pli ol unu miliono da kamaradoj. Krom tio, la infanoj estos bela stimulilo malantaŭ vi.

— Ĉio ĉi min kuraĝigas — diris la mastrino, ne kaŝante tamen sian maltrankvilecon. — Malgraŭ ĉio ni devas kompreni, ke reenkarigi estas ĉiam plej grava provo. Mi konfesas, ke mia edzo antaŭiris min por tiu grandega penado kaj ke miaj amataj infanoj estos miaj ĉiumomentaj amikoj; sed ...

— Pa, pa! Ne lasu vin treni de iaj konjektoj — intermetis la ministro Genezio —, ni devas fidi la Dian Protekton kaj nin mem. La fonto de la Providenco estas neelĉerpebla. Estas necese disrompi la malhelajn okulvitrojn, kiuj prezentas al ni la fizikan kampon kiel amaran ekzilejon. Ne pensu pri iaj eblaj fiaskoj, sed ja kreu en via menso nur ideon pri sukceso. Cetere, estas juste iom fidi al ni ĉi-tieaj, viaj amikoj, kiuj ne staros tiel malproksimaj de vi, rilate la “vibranta distanco”. (*)

(*) *Vibra distanco*. Oni ordinare rilatigas “distancon” al “spaco”; ĉi tie aperas ia “vibra” distanco, pri kiu ŝajnis al mi, ke ĝi bezonas klarigon, kvankam ĝi kredeble ne estas io fremda por kelkaj el la legantoj.

Oni scias, ke ekz-e sono naskiĝas de la “vibra” movado de la materio. Tiu movado fariĝas per “ondoj” pli aŭ malpli “rapidaj”; alivorte: en unu sekundo oni povas kalkuli pli aŭ malpli grandan nombron da ondoj. Oni diras, ke ĝia “frekvenco” havas iun difinitan valoron kaj ke la ondoj havas iun difinitan “longon”. En radiofonio ĉiu ja scias pri ondoj “longaj” kaj ondoj “mallongaj”. Ekzistas do ia “diferenco” en la longo de tiaj ondoj, kaj tian diferencan oni povas nomi ĝenerale “vibradistanco”, ekz-e inter du muzikaj notoj: oni devus “trakuri” tiun “distancon”, por veni de unu noto al la dua.

La aŭtoro parolas pri tia “vibra distanco” ĝuste en ĉi tiu senco. La Spiritojn apartigas unu de alia ne ia “ordinara” distanco, kiun ili devus trapasi por interkomunikiĝi, sed ioma

Pensu pri la ĝojo helpi antaŭajn amatojn, konsideru la grandegan gloron esti utila.

Ŝajne kun pli da kuraĝo, sinjorino Laŭra ridetis kaj diris:

— Mi ne ĉesas peti la spiritan helpon de ĉiuj amikoj, por tenadi min atenta pri la ĉi tie prenitaj lecionoj. Mi ja scias, ke la Tero esta plena de la Dia Grandeco. Ŝufiĉas rememori, ke nia suno estas tiu sama, kiu nutras la homojn; tamen, mia kara ministro, mi timas tiun kelkatempan forgeson, en kiu ni dronas. Mi sentas min simile al malsanulino, resaniĝinta de multo da vundoj... Vere, la ulceroj min jam ne turmentas, sed mi konservas la cikatrojn. Sufiĉus grateto, por ke la malsano revenu.

La ministro faris mienon signifantan, ke li komprenis la sencon de la aludo, kaj rediris:

— Mi ja scias, kio estas la ombro de la malsupera sfero, tamen estas nepre necese havi kuraĝon kaj marŝi antaŭen. Ni helpos vin labori multe pli por la bono de la aliaj, ol por la kontentigo de vi mem. La granda danĝero, ankoraŭ kaj ĉiam, estas la longa restado ĉe la kompleksaj tentoj de egoismo.

— Ĉi tie — ŝi saĝe diris — ni havas la spiritajn vibrojn de la plimulto el la loĝantoj, preskaŭ ĉiuj edukataj ĉe la lumo de la Savanta Evangelio; kaj kvankam malnovaj mizeraĵoj venas supren en niajn pensojn, ni tamen trovas naturan defendon en la medio mem. Sed sur la Tero nia bona intenco estas kvazaŭ apenaŭ brilanta lumeto meze en uragano da malamikaj fortoj.

— Ne parolu tiele — intermetis la nobla ministro

diferenco inter iliaj ondoj de vibrado. Al ili sufiĉas do ŝanĝi sian propran ondolongon, por ke ili estu kune, unu apud alia. Tiamaniere oni povus klarigi al si la pli aŭ malpli ĝustan "agordon" inter du estuloj — en aŭ ekster la karno — kaj ankaŭ la procedon de komunikiĝado inter ili — sur la Tero, en la Spaco aŭ inter la Tero kaj la Spaco —, nome per la simpla "interkonformigo" de la frekvencoj, se nur ili ne vibras "unisone".

En ĉi tiu rilato oni povus diri, ke "spaco" estas nura "diferenco de energiaj niveloj". — *La Trad.*

—, ne donu tian grandan gravecon al la influo de la malsuperaj regionoj; tio liverus armilojn al la malamiko, por ke li nin vundu. La areno de la ideoj estas ankaŭ kampo de luktado. Ĉiu lumo, kiun ni efektive ekbruligos sur la Tero, tie restos por eterne, ĉar la ventego de la homaj pasioj neniam estingos eĉ unu el la lumoj de Dio.

Ĉe tiuj ĉi konsideroj ŝajnis, ke la sinjorino nun vidas ĉion pli klare; ŝi radikale ŝanĝis sian mensan sintenon kaj, ricevinte pli da kuraĝo, diris:

— Mi nun estas konvinkita, ke via vizito estas providenca. Mi ja bezonis reveki miajn fortojn. Mankis al mi tiu admono. Vere, nia mensa regiono estas kampo de senĉesa batalado. Ni devas disbati malbonon kaj mallumon en nia propra interno, ilin surprizi en la reduto, en kiun ili enfermiĝas, ne konsiderante ilin tiel gravaj, kiel ili postulas. Jes, nun mi ja komprenas.

Genezio ridetis kontenta kaj aldonis:

— En la interno de nia individua mondo ĉiu ideo estas kvazaŭ aparta estaĵo... Estas necese pensi pri tio. Se ni nutras la elementojn de bono, ili kreskos por nia feliĉo, formos niajn defendarmeojn; sed nutri ĉiajn ajn elementojn de malbono estas konstrui firman bazon por niaj torturantaj malamikoj.

En tiu momento la oficisto de la Departemento de Kontoj rimarkis:

— Cetere ni ne povas forgesi, ke Laŭra revenos al la Tero kun eksterordinara spirita kredito. Ankoraŭ hodiaŭ la Kabineto de la Guberniestraro sendis leteron al la Ministerio de Helpo, rekomendante al la teknikistoj pri Reenkarniĝo la plej grandan atenton koncerne la biologiajn fontojn, kiuj kontribuos al la konsistigo de la nova organismo de nia fratino.

— Ho, efektive — ŝi diris —; mi petis tiun antaŭzorgon, por ne esti tro multe submetita al la leĝo pri heredeco. Min de longe maltrankviligas la demando pri la sango.

— Rimarku — ĝentile diris ŝia kunparolanto —, ke via merito en “Nia Hejmo” estas tre granda, ĉar la Guberniestro mem ordonis la necesajn disponojn.

— Ne zorgu do, mia amikino — ridetante diris la

ministro Genezio. — Vi havos apud vi multenombrajn fratojn kaj kamaradojn, kune klopodantajn, por ke tie estu al vi bone.

— Dank' al Dio! — ekkriis sinjorino Laŭra kun ĝojo —. Mankis al mi vin aŭdi, mankis al mi vin aŭdi...

Lizio, kiel ankaŭ liaj fratinoj, al kiuj nun alkolektiĝis la simpatia kaj grandanima Tereza, manifestis sinceran ĝojon.

— Mia patrino ja bezonis forgesi siajn zorgojn — konsideris la sindonema flegisto —; vere, ni ne restos ĉi tie dormante.

— Vi estas prava — aldiris la domestrino —; mi nutros la esperon, mi fidos la Sinjoron kaj vin ĉiujn.

Poste la temo de la konversacioj estis denove fido kaj optimismo. Neniu parolis pri la reveno sur la Teron alie, ol kiel pri beninda okazo por reregardi en la pasintecon kaj lerni, celante bonon.

Adiaŭante min, jam malfrue en la nokto, sinjorino Laŭra diris al mi per patrineca tono:

— Morgaŭ vespere, Andreo, mi atendas ankaŭ vin. Ni faros intiman kunveneton. La Ministerio de Komunikado promesis al ni la viziton de mia edzo. Kvankam alligita al la materio, Rikardo estos kondukita ĉi tien per la frata helpo de kelkaj el niaj amikoj. Cetere mi morgaŭ faros mian adiaŭon. Nepre venu do.

Mi kortuŝite dankis ŝin, perforte retenante la larmojn pro la antaŭtempa resopiro, kiu jam ekburĝonis en mia koro.

XLVIII

FAMILIA KULTO

Eble praktikantojn de Spiritismo ne tiel mirigus la kunsido, kiun mi ĉeesti en la hejmo de Lizio; tamen al miaj okuloj la sceno estis nova kaj interesa.

En la vasta konversaciejo kunvenis areto da nemulte pli ol tridek homoj. La aranĝo de la mebloj estis plej simpla. Unu apud alia staris komfortaj brakseĝoj, po dek du en ĉiu vico, antaŭ la estrado, kie la ministro Klarenco sidis kiel direktanto, ĉirkaŭita de sinjorino Laŭra kaj ŝiaj gefiloj. En la proksimuma distanco de kvar metroj troviĝis granda kristala globo, ĉirkaŭ du metrojn alta, malsupre envolvita en multenombraj fadenoj, ligitaj al malgranda aparato tute simila al niaj laŭt-paroliloj.

Multenombraj demandoj valsis en mia cerbo.

En tiu vasta salono ĉiu estis preninta konvenan lokon, sed mi konstatis fratan konversacion en ĉiuj grupoj.

Sidante apud Nikolao, malnova servanto en la Ministerio de Helpo kaj intimo de la familio de Lizio, mi kuraĝis demandi lin pri io. Mia kompaniulo min tuj kontentigis, klarigante:

— Ni estas pretaj, tamen ni atendas la ordonon de la Ministerio de Komunikado. Nia frato Rikardo troviĝas en la fazo de la surtera infaneco, kaj ne estos por li malfacile dum kelke da momentoj liberiĝi de la materiaj ligiloj.

— Sed, ĉu li ja venos ĉi tien? — mi demandis.

— Kial do ne? — rediris mia kunparolanto. — Ne ĉiuj enkarnuloj alkroĉiĝas al la grundo de la terglobo. Kiel la kurierkolomboj iafoje vivas, tra longa tempo da

servado, inter du regionoj, tiel ankaŭ ekzistas Spiritoj, kiuj tie vivas inter du mondoj.

Kaj montrante al la aparato antaŭ ni, li informis:

— Tie estas la kamero, kiu lin prezentos al ni.

— Kial la kristala globo? — mi demandis scivola.
— Ĉu li ne povus sin manifesti sen ĝi?

— Ni memoru — ĝentile diris Nikolao —, ke nia emociemo elradias fortojn kapablajn konfuzi la medion. Tiu kristala kamereto estas farita el izola materialo; niaj mensaj fortoj ne povas ĝin trapasi.

En tiu momento, Lizio estis vokita al la aŭdilo el la Ministerio de Komunikado. Estis veninta la momento. Oni povos do komenci la plej ĉefan laboron de la kunsido.

La murhorloĝo montris kvardek minutojn post noktomezo. Rimarkinte mian demandan rigardon, Nikolao flustris:

— Nur nun estas sufiĉe kviete en la nova surtera hejmo de Rikardo. Komprenoble la domo ripozas, liaj gepatroj dormas, kaj li, en sia nova fazo, ne staras tute apud sia lulilo...

Li ne povis paroli plue. Stariĝinte, la ministro Klarenco petis pri sameco de pensoj kaj efektiva kunfandiĝo de sentoj.

Fariĝis granda kvieto kaj Klarenco eldiris simplan kaj kortuŝantan preĝon. Poste Lizio ekludis sian harmonian citron, plenigante la salonon per profundaj vibroj de paco kaj ĉarmo. Tuj poste Klarenco denove prenis la parolon:

— Fratinoj kaj fratoj — li diris —, ni nun sendu al Rikardo nian amomesaĝon.

Mi tiam, surprizite, rimarkis, ke la filinoj kaj la nepino de sinjorino Laŭra, akompanataj de Lizio, deiras de la estrado, lokante sin ĉe la muzikaj instrumentoj: Jehudit, Jolanda kaj Lizio respektive ĉe la piano, la harpo kaj la citro, apud Tereza kaj Eloiza, kiuj kompletigis la gracian familian ĥoron.

La agorditaj kordoj kunfandis la eĥojn de milda melodio, kaj la muziko altiĝis, karesa kaj dia, simila al ĉiela trilo. Mi sentis min transportita al ravantaj sferoj de la penso, kiam arĝentasonaj voĉoj eklulis la salonon.

Lizio kaj liaj fratinoj tiam kantadis mirindan kanzonon, komponitan de ili mem.

Tre malfacile oni per homa lingvo vortigus tiujn multesignifajn strofojn, plenajn de spirita karaktero kaj beleco, sed mi tamen provos ĝin fari, por montri la riĉecon de la korligiĝoj en la regionoj de la vivo trans la morto:

*Nun, patreto, kiam nokto
Donas benon de ripozo,
Jen, akceptu ĝin, la rozo,
De nia amo la flor'!
Dum la steloj brile kantas
Ĉe la lum' de l' Alta Reĝo,
Kunigu kun nia preĝo
La voĉon de via kor'.*

*Ne konsternu vin la ombroj
De l' forgeso sur la Tero;
Ne doloru vin sufero,
Ne trafu malbono vin;
Dolorojn mondajn ne timu,
Nian kuniĝon memoru;
L' esper' ĉe vi ĉiam floru,
Por la feliĉo sen fin'.*

*Dum vi dormas en la mondo,
Nin nedormantajn memoroj
Atingas pri la aŭroroj
De la supera lazur'.
Atendu rozan morgaŭon,
Denove nin en ĝardeno
De l' amo via, en beno
De l' familia plezur'.*

*Al ni revenu, patreto,
De nia nest' al la paco,
Al la lumo de la spaco
Eĉ en sonĝo venu vi.*

*Momenton lasu la Teron:
Konsolo, kareso fluas
El la fontoj, kiuj bruas
En Nia Hejm' tie ĉi.*

*Nia domo ne forgesas
Vian sindonemon belan,
La bonecon, la ĉielan
Instruadon pri la bon'.
Traboru la densan ombron,
Forlasu kanon de l' mondo,
Preĝu nun en nia rondo
Proksima de l' Dia Kron'!*

Ĉe la lastaj notoj de ĉi tiu bela komponaĵo mi rimarkis, ke la interno de la globo kovriĝas per griza lakteca substanco, kiu tuj poste prezentis la simpatian figuron de maturaĝa sinjoro. Tio estis Rikardo. Ne eble estas priskribi la sanktan emociion de lia familio, lin ame salutanta.

Parolinte aparte al la edzino kaj gefiloj, la ĵusveninto fiksas amikan rigardon sur la ceteraj ĉeestantoj kaj petis, ke oni ripetu la dolĉan kanzonon, kiun li larme aŭdis. Kiam la lastaj notoj forsonis, li kortuŝite diris:

— Ho, miaj infanoj, kiel granda estas la boneco de Jesuo, kiu kronis la hejman kulton de la Evangelio per la grandega ĝojo en tiu vespero! En ĉi tiu salono ni kune ĉiam serĉadas la vojon al la superaj sferoj, ĉi tie ni multajn fojojn ricevis la spiritan panon de la vivo kaj ankoraŭ ĉi tie ni denove renkontiĝas por la reciproka sankta stimulado. Kiel feliĉa mi ja estas!

Sinjorino Laŭra diskrete ploradis. Lizio kaj liaj fratinoj havis okulojn malsekajn de larmoj.

Mi rimarkis, ke la ĵusveninton parolas iom ĝenece kaj ne povas disponi multe da tempo inter ni. Kredeble ĉiuj tie havis tian saman impreson, ĉar mi vidis Jehuditon ĉirkaŭbraki la kristalan globon kaj aŭdis ŝin ame ekkrii:

— Patro kara, diru, kion vi bezonas de ni; parolu, per kio ni povos esti utilaj al via sindona koro!

Mi tiam vidis, ke Rikardo fiksas profundan rigardon

sur sinjorino Laŭra, dirante:

— Via patrino venos baldaŭ renkontiĝi kun mi, fi-
lineto! Post kelka tempo venos ankaŭ vi ceteraj! Kion
alian mi ankoraŭ povus deziri, por esti feliĉa, ol peti la
Majstron, ke li nin benu por ĉiam?

Ni ĉiuj ploradis kortuŝitaj.

Kiam la globo denove ekmontris tiun saman grizetan
koloron, mi aŭdis Rikardon ekkrii, preskaŭ ĉe sia adiaŭo:

— Ha, miaj infanoj, mi havas ion por peti de vi el
la profundo de mia animo: petu la Sinjoron, ke mi nen-
iam havu antaŭ mi facilaĵojn sur la Tero, por ke la lumo
de dankemo kaj komprenemo restu ĉiam vivanta en mia
spirito!

Tia neatendita peto min samtempe tuŝis kaj sur-
prizis. Rikardo ĉiujn amplene salutis, kaj la vualo el
griza substanco tegis la tutan kameron, kiu, tuj poste,
reprenis sian ordinaran aspekton.

La ministro Klarenco sentoplene ekpreĝis kaj la
kunsido estis fermita, postlasinte en niaj animoj nepri-
skribeblan ĝojon.

Mi direktis min al la estrado, por ĉirkaŭbraki sinjor-
inon Laŭra, por esprimi al ŝi, per propra buŝo, mian
profundan impreson kaj dankon, kiam iu haltigis min
preskaŭ apud la mastrino, kiu ricevadis la multajn gra-
tulojn de la ĉeestantaj amikoj. Tio estis Klarenco, kiu
min afable alparolis:

— Andreo, mi morgaŭ akompanos nian fratinton Laŭ-
ra al la sfero de la karno. Se tio al vi plaĉos, vi povos
iri kune kun ni, por viziti vian familion.

Mia surpriziĝo ne povus esti pli granda. Intensa ĝojo
min ekposedis, sed mi instinkte ekpensis pri la laboroj
ĉe la Ĉambroj. Sed, divenante mian penson, la grand-
anima ministro parolis plu:

— Vi havas en via konto ne malgrandan kvanton
da horoj da ekstra laboro. Ne estos malfacile por Ge-
nezio forpermesi vin por unu semanjno, post la unua jaro
de seninterrompa kunlaborado.

Posedita de granda ĝojo, mi lin dankis, plorante kaj
ridante miksite. Mi fine ja revidos la amatajn edzinon
kaj infanojn.

XLIX

REVENO HEJMEN

Simile al infano, iranta laŭ la paŝoj de siaj bonfarantoj, mi venis en mian urbon kun la neesprimebla sensacio de vojaĝanto, kiu revenas al sia loko de naskiĝo post longa forestado.

Vere, la pejzaĝo ne rimarkinde ŝanĝiĝis. La maljunaj arboj de la kvartalo, la maro, tiu sama ĉielo, tiu sama ŝvebanta parfumo. Ebria de ĝojo, mi jam ne rimarkis la mienon de sinjorino Laŭra, kiu travidigis plej grandan maltrankvilecon, kaj adiaŭis la karavanon, kiu celis pli malproksimen.

Klarenco ĉirkaŭbrakis min kaj diris:

— Vi havas unu semajnon al via dispono. Mi ĉi tien venos ĉiutage por vin revidi, atenta pri la disponoj, kiujn mi devas fari koncerne la problemojn pri la reenkarneigo de nia fratino. Se vi volos iri al “Nia Hejmo”, vi povos profiti mian kompanion. Fartu bone, Andreo!

Lasta adiaŭ al la sindonema patrino de Lizio — kaj jen mi vidis min tute sola, plenpulme spirante tiun aeron de mia pasinteco.

Mi nenie haltis, por detala trarigardo. Mi rapide trairis kelke da stratoj, direkte al la hejmo. Mia koro sentakte batis, laŭgrade kiel mi alproksimiĝis al la enirpordego. La vento, kiel antaŭe, karese flustris inter la arboj de la malgranda parko. Elvolviĝis azaleoj kaj rozoj, salutante la printempan lumon. Antaŭ la portiko leviĝis svelte tiu palmo, kiun mi kun Zelia plantis ĉe la unua datreveno de nia geedziĝo.

Ebria de feliĉo, mi antaŭeniris en la internon de la domo, sed ĉio estis treege ŝanĝita. Kie ja estis la mal-

novaj mebloj el palisandro? Kaj tiu granda portreto, kie mi, la edzino kaj la infanoj, ni formis gracion grupon? Io min forte premis. Kio do okazis? Mi komencis malferme paŝi pro emocio. Mi iris en la mangoĉambron, kaj tie mi vidis mian malpli aĝan filineton jam edziniĝipova junulino. Preskaŭ en la sama momento mi vidis Zelian, elirantan el la dormoĉambro kune kun sinjoro, kiu ĉe la unua ekrigardo ŝajnis al mi kuracisto.

Mi elverŝis mian ĝojon per la tuta forto de la pulm-oj, sed la vortoj, ŝajnante tondri en la domo, ne atingis tamen la orelon de ĝiaj loĝantoj. Mi ekkomprenis la situacion kaj eksilentis konsternita. Kun la kareso de mia grandega resopiro mi ĉirkaŭbrakis mian edzinon, sed ŝajnis, ke Zelia estas absolute nesentema por la manifestajo de mia amo. Tre interesita, ŝi demandis la sinjoron pri io, kion mi ne povis tuj kompreni. Mallaŭtigante la voĉon, li respekte respondis:

— Nur morgaŭ mi povos diagnozi kun certeco, ĉar la pneŭmonio montriĝas tre komplikita pro la hipertensio. Plej streĉa prizorgado estas necesega, doktoro Ernesto bezonas absolutan ripozon.

Kiu estis tiu doktoro Ernesto? Mi travagis en amaso da demandoj, kiam mi aŭdis mian edzinon petegi afliktita:

— Sed, doktoro, savu lin pro karito! Mi vin petas! Ho, mi ne eltenus duan vidviniĝon.

Zelia ploradis kaj tordadis la manojn, elmontrante grandegan angoron.

Fulmo min ne tiel fortege frapus. Alia viro ekposedis mian hejmon. Mia edzino forgesis min. Tiu domo jam ne al mi apartenis. Ĉu do valoris al mi la penon, ke mi tiel longe atendis, por fine ricevi tiajn elreviĝojn? Mi kuris en mian dormoĉambron, kaj tie mi ekvidis alian meblaron. Sur la lito kuŝis maturaĝa sinjoro, kies sanstato estis videble delikata. Apud li tri nigraj figuroj iradis tien kaj reen, kun evidenta intereso pliigi lian suferadon.

Mi tuj eksentis la impulson per ĉiuj fortoj malami tiun entrudiĝinton, sed mi jam ne estis tiu sama homo de la tempo pasinta. La Sinjoro estis vokinta min al la instruado pri amo, frateco kaj pardono. Mi rimarkis,

ke la malsanulon ĉirkaŭas malsuperaj estuloj, sin donantaj al malbono, sed mi ne sukcesis lin tuj helpi.

Mi sidiĝis, disreviĝinta kaj frakasita, vidante Zelian plurajn fojojn iri en la ĉambron enen kaj elen, karesadi la malsanulon kun la dolĉeco, kiun mi iam ricevadis. Post kelke da horoj da amara observado kaj meditado, mi ŝanceliĝante revenis en la manĝoĉambron, kie mi trovis miajn filinojn konversaciantaj. Surprizo sekvis surprizon. La pli aĝa edziniĝis kaj ĉe la brusto havis sian fileton. Kaj mia filo? Kie li estas?

Zelia konvene instrukciis maljunan flegistinon kaj venis pli trankvile konversacii kun siaj filinoj.

— Mi venis vidi vin ĉiujn, panjo — diris la unue-naskitino —, ne nur por ekscii pri doktoro Ernesto, sed ankaŭ tial, ĉar hodiaŭ stranga resopiro je paĉjo turmentas al mi la koron. De frue matene mi ne scias, kial mi tiel forte pensas pri li. Ĝi estas io, kion mi ne povas ĝuste difini...

Ŝi ne finis. Abundaj larmoj torente ekfluis el ŝiaj okuloj.

Ĉe mia granda surpriziĝo, Zelia aŭtoritatece sin turnis al sia filino:

— He! Jen kio al ni mankis! Afliktigita, kiel mi estas, mi toleru vian mensmalordon! Kia paseismo tio estas, mia filino? Mi jam formale malpermesis al vi ĉiujian aludon, en ĉi tiu domo, al via patro. Ĉu vi ne scias, ke tio malplaĉas al Ernesto? Mi jam vendis ĉion, kio ajn ĉi tie rememorigis la formortintan pasintecon. Mi ŝanĝis la aspekton eĉ de la muroj mem, kaj ĉu vi ne povas helpi al mi pri tio?

La pli juna filino sin intermetis, aldonante:

— De kiam mia kompatinda fratino ekinteresiĝis pri la malbeninda Spiritismo, ŝi havas tiajn muŝojn en la cerbo. Kia sensencaĵo! Tia historio, ke la mortintoj revenus, estas la kvintesenco de la malsaĝaĵoj.

Ŝia fratino, kvankam ankoraŭ ploranta, pene rediris:

— Mi esprimas neniajn religiajn konvinkojn. Ĉu do estas krimo resopiri paĉjon? Ĉu vi ceteraj ne amas, ne estas sentemaj? Se paĉjo troviĝus kune kun ni, panjo, via sola filo ne farus tiom da malsaĝaĵoj.

— Nu, nu — kontraŭmetis Zelia, kun malpacienco kaj kolereto —, ĉiu havas la sorton, kiun Dio donis al li. Ne forgesu, ke Andreo estas mortinta. Ne ĝenu min do per iaj lamentoj kaj larmoj pro la nehelpebla pasinteco.

Mi tiam alproksimiĝis al la ploranta filino kaj haltigis ŝiajn larmojn, flustrante kuraĝigajn kaj konsolajn vortojn, kiujn ŝi ricevis ne orele, sed subjektive, en la formo de revigligaj pensoj.

Efektive, mi vidis min ĉe stranga situacio! Mi nun komprenis, kial miaj veraj amikoj tiel prokrastis mian revenon en la surteran hejmon.

Angoroj kaj disreviĝoj rapidege sekvis unu alian. Mia domo tiam ŝajnis al mi posedaĵo, kiun ŝtelistoj kaj vermoj aliaspektigis. Neniom da havaĵoj, da titoloj, da korligiĝoj! Nur unu filino tie daŭre gardadis mian malnovan kaj sinceran amon.

Eĉ ne la multaj jaroj da suferado, dum miaj unuaj transtombaj tagoj, verŝigis al mi tiel amarajn larmojn.

Venis la nokto kaj revenis la tago, kaj mi ankoraŭ troviĝis en la sama perplekseco, aŭdante opiniojn kaj vidante teniĝojn, pri kiaj mi neniam povus eĉ ekpensi.

Ĉe vesperkrepusko, Klarenco venis kaj havigis al mi la refortigilon de sia honesta kaj amika parolo. Rimarkinte mian konsternon, li helpeme diris:

— Mi komprenas vian ĉagrenon kaj ĝojas pro la bonega oportuno por ĉi tiu atesto. Nenian novan planon mi havas. Ĉia konsilo de mi estus do neĝustatempa. Mi diru nur, mia kara, ke mi ne povas forgesi, ke tiu rekomendo de Jesuo, nome: ni amu Dion super ĉio kaj la proksimulon kiel nin mem, faras, kiam observata, verajn miraklojn pri feliĉo kaj komprenemo sur niaj vojoj.

Mi lin kortuŝite dankis kaj petis ne deturni sin de mi, kiam mi bezonos lian helpon. Klarenco ridetis kaj adiaŭis min.

Tiam, antaŭ la realaĵo, tute sola ĉe la atesto, mi komencis mezuri la amplekson de tiu evangelia rekomendo kaj pli trankvile ekmeditis pri la situacio. Efektive, kial kondamni la konduton de Zelia? Kaj se estus mi la vidvo sur la Tero? Ĉu mi estus elportinta la longedaŭran solelecon? Ĉu mi ne estus elserĉinta mil pretekstojn, por

pravigi reedziĝon? Kaj la kompatinda malsanulo? Kial lin malami? Ĉu ankaŭ li ne estas mia frato en la Domo de Nia Patro? Ĉu mia hejmo ne status pli malbone, se Zelia ne estus akceptinta lian amligiĝon? Mi devis do batali kontraŭ la sovaĝa egoismo. Jesuo kondukis min al aliaj fontoj. Mi ne povus agi kiel surtera viro. Mia familio ja ne estis nur unu edzino kaj tri infanoj sur la Tero, sed centoj da malsanuloj en la Ĉambroj de Rebonigo, kaj nun ĝi ampleksis la universan kolektivon. Posedite de novaj pensoj, mi eksentis, ke la klara akvo de la vera amo ekfluas el la bonfarantaj tranĉoj, per kiuj la realo vundis al mi la koron.

L

CIVITANO DE “NIA HEJMO”

En la dua nokto mi sentis min lacega. Mi komencis kompreni la valoron de la spirita nutraĵo pere de la reciprokaj amo kaj kompreno. En “Nia Hejmo” mi pasigis plurajn tagojn da aktiva laborado sen la ordinara manĝo, ekzerciĝante pri la animaltiĝo, al kiu multaj el ni sin dediĉis. Tie sufiĉis al mi la ĉeesto de la karaj amikoj, la elmontroj de amo, la ensorbado de puraj elementoj el la aero kaj akvo, sed en la hejmo surtera mi renkontis nenion, krom malluma batalkampo, kie la amatoj fariĝis turmentistoj. La grandvaloraj meditoj, al kiuj min kondukis la parolo de Klarencio, iom trankviligis mian koron. Mi fine komprenis la homajn bezonojn. De Zelia mi estas ne mastro, sed frato kaj amiko; de miaj infanoj mi estas ne sinjoro, sed kamarado de luktoj kaj faroj.

Mi rememoris, ke sinjorino Laŭra unu fojon diris al mi, ke ĉiu homo, ĉe sia atesto, devas agi tiel, kiel la abelo, alirante al la floroj de la vivo, kiaj estas la noblaj animoj, sur la kampo de la rememoroj, kaj el ĉiu el ili suĉante la bonajn ekzemplojn, por havigi al si la mielon de la saĝo.

Mi aplikis al mi mem tiun utilan konsilon kaj komencis, rememorante mian patrinon. Ĉu ŝi ja ne oferis sin por mia patro ĝis tia grado, ke ŝi adoptis malfeliĉajn virinojn kiel filinojn laŭ la koro? “Nia Hejmo” estis plena de edifaj ekzemploj. La ministrino Veneranda jam tutajn jarcentojn klopodas pri la spirita grupo, pli proksime ligita al ŝia koro. Narciza laboregas ĉe la Ĉambroj, celante ricevi spiritan apogon al sia deziro reveni

en la mondon por helpado. Sinjorino Hilda venkis tiun drakon, la malnoblan ĵaluzon. Kaj la fratelmontraĵoj de la ceteraj amikoj en la kolonio? Klarence akceptis min kun patra sindonemo, la patrino de Lizio bonvenigis min kiel filon, Tobija kiel fraton. Ĉiu kamarado de miaj novaj luktoj donis al mi ion utilan al la malsama mensa konstruo, kiu rapide levigadis en mia spirito.

Mi penis forpeli de mi la ŝajne sendankajn konsiderojn, kiujn mi aŭdis en la hejmo, kaj decidis loki super ĉio la Dian amon kaj super ĉiuj miaj personaj sentoj la justajn bezonojn de miaj similuloj.

Kvankam laca, mi tamen iris en la ĉambron de la malsanulo, kies farto estis ĉiumomente pli malbona. Zelia subtenis lian frunton kaj en larmoj diris:

— Ernesto, Ernesto, kompatu min, kara! Ne lasu min sola! Kio estos kun mi, se mi perdos vin?

La malsanulo karesadis ŝiajn manojn kaj plej ame respondadis malgraŭ la forta dispneo (*).

Mi petis la Sinjoron pri fortoj por konservi la nepre necesan komprenemon kaj komencis rigardi tiujn geedzojn kvazaŭ miajn gefratojn.

Mi rekonis, ke Zelia kaj Ernesto sin forte amas reciproke; kaj, se mi ja sentis min frata kamarado de ambaŭ, mi do devos ilin helpi, kiel mi nur povos. Mi komencis tian laboron penante mensklarigi la malfeliĉajn Spiritojn, kiuj sin tenadis obstine ligitaj al la malsanulo, sed mi trafis grandegajn malfacilaĵojn; mi sentis min frakasita.

En tia situacio mi rememoris unu lecionon de Tobija, nome: “ĉi tie, en “Nia Hejmo”, ne ĉiuj bezonas la aerobuson por ien iri, ĉar la pli progresintaj loĝantoj de la kolonio kapablas flugi; kaj ne ĉiuj bezonas komunikilojn por konversacii tra longaj distancoj, ĉar iliaj pensoj absolute harmonias. Tiuj, kiuj tiel estas agorditaj, povas laŭplaĉe uzi la procedon de mensa interparolado malgraŭ la distanco”.

Venis al mi en la kapon, kiel utila estus al mi la helpo de Narciza, kaj mi ja provis tiun rimedon. Mi

(*) Dispneo : spirmalfacileco. — *La Trad.*

enprofundiĝis en fervoran preĝon al la Patro kaj en ĝiaj vibroj mi turnis min al Narciza kun mia peto pri ŝia helpo. Mi pense rakontis al ŝi mian doloran travivaĵon, sciigis ŝin pri tiu mia deziro kaj insistis, ke ŝi ne forlasu min.

Tiam okazis io, kion mi ne povus esperi. Post ĉirkaŭ dudek minutoj, kiam mia menso ankoraŭ koncentriĝis en tiu peto, iu delikate ektuŝis mian ŝultron. Tio estis Narciza, kiu min elaŭdis kaj ridetante diris:

— Mi aŭdis vian vokon, mia amiko, kaj venis al vi renkonte.

Mia ĝojego atingis la apogeon.

La senditino de bono fikse ekrigardis tiun scenon, ekkomprenis la seriozecon de la momento kaj diris:

— Ni perdu neniom da tempo.

Antaŭ ĉio ŝi fluigis revigligajn emanaĵojn en la malsanulon, izolante lin for de la mallumaj figuroj, kiuj tial foriĝis kvazaŭ per sorĉa frapo. Tuj poste ŝi per firma voĉo invitis min:

— Ni iru al la Naturo!

Mi ŝin senhezite akompanis, kaj ŝi, rimarkinte mian miron, emfaze aldonis:

— Ne nur la homo povas ricevi kaj ellasi fludecaĵojn; same faras la fortoj naturaj, en la pluraj regnoj, en kiujn ili disdividiĝas. Por la okazo de nia malsanulo ni bezonas la arbojn: ili nin efike helpos.

Plena de miro pro la tute nova leciono, mi ŝin silente sekvis. Kiam ni venis al loko, kie staris grandaj foliriĉaj arboj, Narciza vokis iun per lingvo, kiun mi ne povis kompreni. Post kelke da momentoj ok spiritaj estuloj jen tie estis laŭ ŝia alvoko. Treege surprizite, mi aŭdis ŝin demandi, ĉu tie ekzistas mangarboj kaj eŭkaliptoj. Jese informite de tiuj amikoj, tute fremdaj por mi, la flegistino klarigis:

— Ĉi tiuj fratoj, venintaj al ni, estas ordinaraj servantoj de la vegeta regno.

Kaj ĉe mia surpriziĝo, ŝi finis:

— Kiel vi vidas, ekzistas nenio neutila en la Domo de Nia Patro. Ĉie ajn, kie iu bezonas lerni, sin trovas iu instruanto; kaj kie aperas ia malfacilaĵo, tie montr-

iĝas la Providenco. La sola malfeliĉa, en la Dia Verko, estas la senprudenta Spirito, kiu kondamnis sin mem al la mallumo de malico.

En nemultaj momentoj Narciza preparis ian substancojn per la vaporaĵoj de eŭkalipto kaj mangarbo, kaj dum la tuta nokto ni aplikis tiun medikamenton al la malsanulo pere de la ordinara spirado kaj de sorbado tra la poroj.

La malsanulo ricevis videble pli bonan farton. Frue matene la kuracisto, forte surprizite, rimarkis:

— Eksterordinara reago okazis dum ĉi tiu nokto! Vera miraklo de la Naturo!

Zelia radiis de feliĉo. La domo pleniĝis per nova ĝojo. Miaflanke, mia animo vibris de ĝojego. Profunda kuraĝo kaj belaj esperoj reanimis mian “mi”. Mi mem rekonis, ke fortikaj ligiloj de malsupereco en mi por ĉiam rompiĝis.

En tiu tago mi revenis al “Nia Hejmo” kune kun Narciza kaj la unuan fojon mi praktikis la flugokapablon. En la daŭro de unu momento ni atingis grandajn distancojn. La standardo de ĝojo disfaldiĝis en mia interno. Sciiginte al la nobla flegistino mian impreson de malpezeco, mi aŭdis de ŝi jenan klarigon:

— En “Nia Hejmo” multaj el niaj kamaradoj povus ne uzi la aerobuson kaj laŭplaĉe moviĝi sur la kampoj de nia vibra regiono; tamen, ĉar la plimulto ankoraŭ ne havas ĉi tiun kapablon, tial ĉiuj sin detenas ĝin praktiki sur niaj promenejoj. Tia sindeteno tamen ne malhelpas al ni uzi tiun alian procedon ekster la urbo, kiam estas necese rapide laŭ distanco kaj tempo.

Nova kompreno kaj nova ĝojo pliriĉigis mian spiriton. Instruite de Narciza, mi iradis de la surtera hejmo al la spirita urbo kaj returne, sen granda malfacileco, intense daŭrigante la kuracadon de Ernesto, kiu ĉiam pli bone fartis, rimarkinde kaj rapide. Klarenco min ĉiutage vizitadis, montrante sian kontentecon pri mia laboro.

En la lasta tago de tiu semajno finiĝis mia unua forpermeso for de la laboroj ĉe la Ĉambroj de Rebonigo. La ĝojo estis reveninta al al geedzoj, kiujn mi ekamis kiel fratojn.

Mi devis do reveni al miaj ĉiutagaj taskoj.

Ĉe la karesa kaj lulanta lumo de la krepusko mi, tute alia homo ol iam antaŭe, ekiris la vojon al “Nia Hejmo”. Dum tiuj rapide pasintaj sep tagoj mi lernis grandvalorajn praktikajn lecionojn pri la viva kulturado de la veraj komprenemo kaj frateco. La ĉarmega posttagmezo plenigis min per alteflugaj pensoj.

Kiel granda esta la Dia Providenco! — mi ekkriis, interne monologante. Kun kia saĝeco la Sinjoro disponas ĉiujn laborojn kaj situaciojn en la vivo! Kun kia amo Li prizorgas la tutan Kreitaĵaron!

Sed io ŝiris min el la meditado, en kiun mi retiriĝis. Pli ol ducent kamaradoj venis al mi renkonte.

Kun granda nobleco kaj malfermitaj brakoj, ĉiuj min salutis: Lizio, Lascinia, Narciza, Silvejra, Tobija, Salustio kaj multaj el la servantoj ĉe la Ĉambroj tie troviĝis. Ĉe tia surpizo mi ne sciis, kian teniĝon mi prenu. Tiam la ministro Klarenco el inter ĉiuj elpaŝis, etendis al mi sian helpeman dekstran manon kaj diris:

— Ĝis hodiaŭ, Andreo, vi estis mia zorgato en la urbo, sed de nun, en la nomo de la Guberniestraro, mi deklaras vin civitano de “Nia Hejmo”.

Kial tia granda favorkoraĵo, se mia venko estis ja tiel bagatela? Mi ne sukcesis reteni la larmojn de emocio, kiuj sufokis mian voĉon. Kaj, konsiderante, kiel grandega estas la Dia Boneco, mi min ĵetis en la patrecajn brakojn de Klarenco, plorante de danko kaj ĝojo.

FINO

Zamenhof

En la jaro, kiam tiu altega Spirito, kiu laste ricevis la nomon *Lazaro Ludoviko Zamenhof*, vidus la centan fojon reveni sian naskotagon, ni Eldonistoj deziras lin honori per ankoraŭ unu verko en la “Lingvo Internacia”.

Por rememori samtempe alian superan Spiriton, kiu naskiĝis, vivis kaj elkarniĝis en Nov-Zelando, kun afabla permeso de la eldonistoj de “Kien la Poezio?” ni represas tie ĉi belan poemon de *Brendon Clark*:

MEMORE DE ZAMENHOF

*Zamenhof! — konato en la hejmo de doloro,
Vi, el raso jam delonge disnacia,
Sentis ĉies malfeliĉon en la propra koro,
Kaj sopiris al homaro familia.
En la mondo kiun vortoj, vortoj jam inundis
Per malamo, miskompreno kaj arbitroj,
Vi batalis ĝis la malamikoj Vin elvundis,
Vi, kolombo, inter rabaj akcipitroj.*

*Korrompите mortis Vi, en mondo al milito
Sin doninta kaj graveda per la semoj
De terura estonteco. Tamen la spirito
Scias, kiel post la perdoj kaj subpremoj
Via mensa ido pli fortiĝas sur la tero —
Kiel, nun elkorpigita, la animo
Strebas al pli vasta regno; ĉar la granda vero
Fendas la kokonon de l' homeca limo.*

*Kio estas Vero, krom la Universa Leĝo,
Kiun vidas nur popece ĉiu homo,
Same kiel malsanulo en fenestra seĝo
Vidas la ĉirkaŭon de neniuj domoj?
Tamen Vi la veron tuŝas en la homa menso,
Truegante murojn kiuj interstaras,
Ĉar la vero trovas veron en komuna penso
Kiel akvo akvon, kvankam ĉio baras.*

*Vane tian veron la tirano penas kaŝi:
Ju pli oni premas ĝin, des pli ĝi ardas;
Kiu por detrui veron riskas ĝin alpaŝi,
Cedas sin al tio, kion li rigardas.
Tiel ĉe animo Via: ĉiu homangoro,
Ĉiu timo, ĉiu manko aŭ sopiro,
Tuj malfermas al Vi pordon en la homa koro —
Kaj Vi vekas la esperon en martiro.*

*Jen! de Via genieco la centmil fajreroj
Falas, kaj flagretis sur diversaj lokoj.
Iuj sufokiĝis en malpuraj atmosferoj,
Iuj estingiĝis sur la nudaj rokoj.
Tamen laŭ la nevidataj vojoj rampebrulos,
Kuniĝonte, la flametoj de l' espero —
Ĝis la finbriladon eĉ la steloj respegulos,
Por konservi Vian lumon sur la tero.*

BRENDON CLARK.

6. 7. 1947.

Brendon Clark mortis en Dargaville, Nov-Zelando, la 9-an de Novembro 1956, antaŭ la apero de sia sola libro, kiu aperis nur en Oktobro 1957.

Li plej bone komprenis la idealon de Zamenhof kaj vigle laboris por ĝia efektiviĝo.

LA ELDONISTOJ.